

Cross-linguistic and Cross-cultural Studies 2

The Intercultural Role of Esperanto
Interkultura rolo de Esperanto
Miĝdkulturowa rola esperanta

Editors – Redaktoroj – Redakcja
Ilona Koutny & Ida Stria & Michael Farris



Poznań 2021

The Intercultural Role of Esperanto

Interkultura rolo de Esperanto

Międzykulturowa rola esperanta



Uniwersytet im. Adama Mickiewicza – Adam Mickiewicz University
Instytut Etnolingwistyki – Institute of Ethnolinguistics

The Intercultural Role of Esperanto
Interkultura rolo de Esperanto
Międzykulturowa rola esperanta

Editors – Redaktorj – Redakcja
Ilona Koutny & Ida Stria & Michael Farris



Poznań 2021

Cross-linguistic and Cross-cultural Studies 2

Redaktor serii – Series editor:
Ilona KOUTNY

Recenzenci:
Probal DASGUPTA
Nicolau Dols SALAS
Michael FARRIS
Sabine FIEDLER
Wim JANSEN
KIMURA Goro
Ilona KOUTNY
Carlo MINNAJA
Humphrey TONKIN

Projekt okładki:
Ilona Koutny

Copyright by:
Aŭtoroj – Authors – Autorzy

Copyright by:
Wydawnictwo Rys

Wydanie I, Poznań 2021

ISBN 978-83-66666-31-3

DOI
10.48226/978-83-66666-31-3

Wydanie:



Wydawnictwo Rys
ul. Kolejowa 41
62-070 Dąbrówka
tel. 600 44 55 80
e-mail: tomasz.paluszynski@wydawnictworys.com
www.wydawnictworys.com

Contents – Enhavtabelo – Spis treści

| | |
|---|-----|
| Antaŭparolo / Foreword / Przedmowa..... | 7 |
| 1. Esperanto: ligilo inter kulturoj / Esperanto: a link between cultures / Esperanto: łącznik między kulturami | |
| Carlo MINNAJA Literaturo, peranto inter unuopuloj kaj inter popoloj..... | 17 |
| Humphrey TONKIN Esperanto and transnationalism: Soros, Zaleski-Zamenhof, Kosinski, and the crossing of languages | 31 |
| Lorraine WONG Encounters between Esperanto and Chinese: Julio Baghy, Ba Jin, and Armand Su | 49 |
| Probal DASGUPTA Translating the anti-exotic: The modulation of cultural settings in a Bangla translation of <i>Waitapu</i> via Esperanto | 65 |
| Christian LAVARENNE Fruaj interkulturaj valoroj en Esperanto en la kerno de la Zamenhofaj <i>Hilelismo</i> kaj <i>Homaranismo</i> | 77 |
| 2. Esperanto: komunikilo por internacia parolantaro / Esperanto: a communication tool for an international language community / Esperanto: narzędzie dla międzynarodowych użytkowników / | |
| GONG Xiaofeng Diferencoj inter orientaj kaj okcidentaj kulturoj en Esperanta Instruado | 93 |
| Renato CORSETTI Komuniki trans kulturaj baroj per Esperanto..... | 103 |
| Emerson WERNECK Denaskismo en Brazilo: speciala dulingvismo | 117 |
| Federico GOBBO Does Esperanto family use foster Europeanization? A pilot study | 135 |
| Ida STRIA Legitimacy in a multilingual community: how identity studies can benefit from experiences of the Esperanto community | 147 |
| 3. Esperanto: lingvo inter lingvoj / Esperanto: a language among languages / Esperanto: język pośród języków | |
| Philippe PLANCHON Ĉu Esperanto enhavas la necesajn rimedojn por roli kiel interkultura lingvo? – Esploro de la esprim-rimedoj de Esperanto laŭ semantika, pragmatika kaj enunciativa vidpunktoj..... | 161 |

| | |
|---|-----|
| Guilherme FIANs | |
| Lingvo kiel ĉies propraĵo, ŝanĝo kiel ĉies rajto: Vortelektio, lingva aŭtoritato kaj normigado en Esperanto..... | 175 |
| François Lo JACOMO | |
| Ĉu ekzistas bona lingvo? | 189 |
| Marcos CRAMER | |
| Empirical study on the use of gender-neutral pronouns in Esperanto | 201 |
| Natalia DANKOVA | |
| Rakontoj en parola Esperanto | 219 |
| Michał KOZICKI | |
| <i>Fervojaj paspagoj, fervojaj pordegoj, fervojaj mastoj aŭ fervojaj baroj?</i> Komparo de la lingva bildo de fervoja terminologio en la pola, angla, nederlanda kaj Esperanto | 231 |
| Abstrakty polskie | 243 |
| Authors – Aŭtoroj | 251 |

Antaŭparolo

Interkulturaj studoj iĝis gravaj en nia tutteriĝanta mondo por helpi la reciprokan komprenon kaj kunlaboron mondscale. La unua volumo de la eldonserio de la Etnolingvistika Instituto de AMU “*Cross-linguistic and Cross-cultural Studies*” (Interlingvaj kaj interkulturaj studoj) esploris la rolon de lingvoj en interkultura komunikado en diversaj kunteksto, krome la al ĝi rilatan lingvopolitikon kaj lingvoinstruadon. En la dua volumo ***Interkultura rolo de Esperanto*** ni prezentos la rolon de la internacia planlingvo en la multkultura mondo. Kiel lingvo kreita por internacia komunikado peras inter lingvoj, literaturoj, inter kulturoj; kiujn defiojn ĝi alfrontas en diverskultura internacia parolkomunumo.

Nin inspiris ankaŭ la *5-a Interlingvistika Simpozio*, organizita en la Etnolingvistika Instituto de UAM en septembro 2020 kie pluraj prelegoj tuŝis la supran temon. En la libro troviĝas esperantlingvaj kaj anglaj kontribuajtoj de 16 aŭtoroj el 11 landoj, krome polaj resumoj. Ĝi konsistas el 3 ĉapitroj: (1) Esperanto: ligilo inter kulturoj, (2) Esperanto: lingvo por internacia parolantaro, (3) Esperanto: lingvo inter lingvoj.

(1) La ĉapitro **Esperanto: ligilo inter kulturoj** komenciĝas per la esploro de Carlo Minnaja kiomgrade la esperantlingva literaturo ĉerpas el aliaj fontoj kaj montras valorojn de diversaj popoloj, pri la rolo de la esperanta PEN-centro kaj la kulturpera rolo de Esperanto en la serio Oriento–Okcidento de UEA. Humphrey Tonkin prezentas la interesajn vivovojojn de tri konataj personecoj: la hungardevena Tivadar Soros, la poldevenaj Louis Christophe Zaleski-Zamenhof, nepo de Zamenhof kaj Jerzy Kosinski kiuj estante judoj eskapis de sia patrolando pro naziismo kaj trovis komunikeblecon, sekurecon kaj filantropion en Esperanto.

Lorraine Wong malkovras la kosmopolitecon de esperanta literaturo surbaze de la influo de hungara esperantista verkisto Julio Baghy al la ĉina esperantista poeto Ba Jin kaj kelkajn jarojn pli poste tra li al la poemoj de Armand Su kiu suferas en maoisma malliberejo pro siaj internaciaj rilatoj. Probal Dasgupta analizas la pontorolon de Esperanta literaturo tra la traduko de la kroata infanromano *Waitapu* al la bengala, kiel eblas reorientigi la malekzotigan postnacion aliron en la multnacia kaj multkultura Barato. Christian Lavarenne reiras al la filozofiaj pensoj de Zamenhof pri *Hilelismo* kaj *Homaranismo* kaj prezentas la internaciajn valorojn de Esperanto aperantaj en la fruaj verkoj.

(2) La dua ĉapitro **Esperanto: komunikilo por internacia parolantaro** traktas diversajn problemojn ekde lingvouzo tra denaskimo ĝis identeco en la esperanta parolantaro. Gong Xiaofeng prezentas diferencojn inter la okcidenta kaj orienta pensmanieroj kiuj speguliĝas en la lingvo (ekz. alparoloj, familiaj rilatoj) konsiderante Esperanton kiel portanton de okcidenta, t.e. eŭropa kulturo ĉe ŝi. Ŝi konsilas ilian

envolvon en la instruadon de Esperanto por ĉinoj. Ankaŭ Renato Corsetti konstatas la eŭropan influon al la esperanta kulturo kaj prezentas liston de tiaj diraĵoj kun klarigoj kiuj por ne-eŭropanoj ne kompreneblas, krome kelkajn el aziaj diraĵoj kiuj por eŭropanoj kaŭzas problemojn.

Emerson Werneck analizas specifan kazon de dulingveco, la denaskismon, kiam Esperanto iĝas gepatra lingvo de la infano. Li surbaze de propra enketo prezentas la brazilajn denaskulojn kaj komparas ilin al alilandaj denaskuloj. Tutmondeco kiel kerna valoro kaj eŭropismo pro la fontoj de Esperanto aperas en la studo de Federico Gobbo. Li intervjuis eŭropajn esperantlingvajn familiojn pri tiu temo por alveni al la konkludo ke esperantismo ne favoras eŭropiĝon. Ida Stria esploras la specifan identecon de esperanto-parolantoj (por kiuj Esperanto ne estas gepatra lingvo) kiuj diferencas de parolantoj de fremdaj lingvoj, ŝi komparas tiun identecon kun tiu de parolantoj de la angla kiel lingvafrankao (ELF).

(3) La ĉapitro **Esperanto: lingvo inter lingvoj** koncentriĝas al la lingvaj ecoj de Esperanto. Philippe Planchon esploras, ĉu Esperanto enhavas la necesajn rimedojn por roli kiel interkultura lingvo analizante la esprim-rimedojn de Esperanto laŭ semantika kaj pragmatika vidpunktoj. Li emfazas ke la signifoj konstruiĝas dum interparolado, kaj malgraŭ la malsamaj kulturaj fonoj de la parolantoj kaj eblaj miskomprenoj la fleksebleco de Esperanto multe helpas en la interkompreniĝo. Guilherme Fians – surbaze de soci-antropologia esploro – serĉas la mekanismon kiel esperantistoj elturniĝas por novaj vortoj, ĉu ekzistas lingva aŭtoritato. Li proponas 3 principojn – flekseblecon, internaciecon kaj originecon – por evoluigi la vortoprovizon. Ankaŭ François Lo Jacomo revenas al la problemo de lingva evoluo kaj novaj vortoj diskutante la trouzon de la 15a regulo (transpreno de “internaciaj” vortoj) kaj konservante la econ de Esperanto kiel “bona lingvo” en la senco de Piron por certigi la bonan interkomunikadon de parolantoj kun plej diversaj lingvoj kaj kulturoj.

Nuntempe la seks-rilataj personaj pronomoj kaŭzas problemojn en diversaj lingvoj kaj ankaŭ en Esperanto kiu surhavas signojn de sia ekestoloko kaj -tempo. Marcos Cramer / Markos Kramer esploris la uzon de la ne-oficiala seks-neŭtrala pronomo *ri* far esperanto-parolantoj, kiu disvastiĝas inter junuloj en diskutforumoj kaj babilejoj. Natalia Dankova analizas manierojn rakonti en Esperanto kaj konstatas malsamanjn strategiojn kaj lingvajn formojn laŭ la gepatra lingvo de la parolanto – kion ebligas la fleksebla strukturo de Esperanto. Michał Kozicki elektis fervojajn terminojn en kvar lingvoj: pola, angla, nederlanda kaj Esperanto por montri la similecojn kaj diferencojn kiuj manifestas la lingvan bildon de la mondo en tiuj lingvoj.

Foreword

Intercultural studies have become important in the globalizing world in order to aid in mutual understanding and collaboration on a global scale. The first volume in this series “*Cross-linguistic and Cross-cultural Studies*” from the Institute of Ethnolinguistics of AMU looked at the role of languages in intercultural communication in a variety of contexts as well as related questions of language policy and language instruction. In the second volume, the *Intercultural role of Esperanto*, we present the role of this international planned language in a multicultural world, how a language created for the needs of international communication mediates between languages, literatures and cultures as well as what challenges are faced by a multicultural and international language community.

We were also inspired by the *Fifth Interlinguistics Symposium*, organized in the Institute of Ethnolinguistics at AMU in September 2020, in which many papers touched on the above themes. This book features contributions in Esperanto and English by 16 authors from 11 countries as well as Polish abstracts. It is divided into three chapters. The first is Esperanto: a link between cultures, the second is Esperanto: a language for international language community and the third is Esperanto: a language among languages.

(1) The chapter **Esperanto: a link between cultures** begins with a study by Carlo Minnaja on the extent to which literature in Esperanto draws upon diverse sources and displays the values of diverse peoples, on the role of the Esperanto PEN Center and the culture-mediating role of Esperanto in the *Oriento–Okcidento* series published by the Universal Esperanto Association. Humphrey Tonkin presents the interesting life paths of three well known personalities. These are Tivadar Soros, originally from Hungary, Louis Christophe Zaleski-Zamenhof the grandson of Zamenhof and Jerzy Kosinski, both from Poland. As Jews they were all compelled to leave their homelands due to Nazism and found the ability to communicate, security and a spirit of philanthropy in Esperanto.

Lorraine Wong discovers the cosmopolitanism of Esperanto literature on the basis of the influence that the Hungarian Esperanto author Julio Baghy had on the Chinese Esperanto poet Ba Jin and several years later through him on the poems of Armand Su, who suffered in a Maoist prison for his international connections. Probal Dasgupta analyzes the bridge role played by Esperanto literature through the Bengali translation of the Croatian children’s novel *Waitapu* and how it can help an anti-exotic, **postnational** approach in multi-ethnic and multilingual India. Christian Lavarenne returns to the philosophical thoughts of Zamenhof on *Hillelism* and *Homaranismo* and discusses the international values of Esperanto appearing in early works.

(2) The second chapter, **Esperanto: a communication tool for an international language community**, tackles diverse problems from language usage through native speakers of Esperanto to questions of identity in the Esperanto community. Gong Xiaofeng presents differences between western and eastern ways of thinking that

are reflected in language (such as forms of address or family relations). Considering Esperanto to be a carrier of western values, that is for her, European culture, she advises incorporating these into the instruction of Esperanto to Chinese learners. Renato Corsetti also notes European influence on Esperanto culture and gives a list of sayings, with explanations, that are incomprehensible to non-Europeans as well as some Asian sayings that could cause problems for Europeans.

Emerson Werneck analyzes a specific case of bilingualism, that which occurs when Esperanto becomes a mother tongue of a child. He presents Brazilian native speakers on the basis of a survey and compares them to native speakers of Esperanto in other countries. Globalism as a core value and Europeanism due to the sources of Esperanto are topics of Federico Gobbo's study. He interviewed European Esperanto-speaking families on the subject to reach the conclusion that Esperantism does not lead to Europeanization. Ida Stria explores the specific identity of Esperanto speakers (for whom Esperanto is not a mother tongue) which differs from that of speakers of foreign languages; she suggests comparing their sense of identity with that of speakers of English as a lingua franca (ELF).

(3) The chapter **Esperanto: a language among languages** focuses on the linguistic features of Esperanto. Philippe Planchon investigates whether Esperanto contains the necessary resources to act as an intercultural language by exploring the means of expression of Esperanto from semantic and pragmatic points of view. He emphasizes that meanings are constructed during conversation, and despite speakers' differing cultural backgrounds and possible misunderstandings the flexibility of Esperanto is a great help to mutual understanding. Guilherme Fians, based on socio-anthropological research, searches for the mechanisms through which Esperantists turn to creating new words and whether or not there is a linguistic authority. He proposes three principles – flexibility, internationality, and originality – to develop the vocabulary of Esperanto. François Lo Jacomo also returns to the problem of language development and new words by discussing abuses of the 15th rule (concerning the incorporation of “international” words) and preserving the quality of Esperanto as a “good language” in the meaning given by Piron in order to ensure successful communication among speakers from a wide variety of language and cultural backgrounds.

At present, gender-related personal pronouns are a source of problems in a number of languages including Esperanto, which still bears the marks of its European origin in the 19th century. Marcos Cramer has researched the use of the unofficial gender-neutral pronoun *ri* by Esperanto speakers, which is now widespread among young people in discussion forums and chat rooms. Natalia Dankova analyzes ways of telling stories in Esperanto and notes different strategies and language forms that appear according to the speaker's native language – which is made possible by the flexible structure of Esperanto. Michał Koziński chose railway terms in four languages: Polish, English, Dutch and Esperanto to show similarities and differences that manifest the linguistic picture of the world in those languages.

Przedmowa

W dzisiejszym zglobalizowanym świecie studia międzykulturowe stają się ważne, aby wspierać wzajemne zrozumienie i współpracę w skali globalnej. Pierwszy tom serii wydawniczej Instytutu Etnolingwistyki UAM „*Cross-linguistic and Cross-cultural Studies*” poświęcony był roli języków w komunikacji międzykulturowej w różnych kontekstach, a także związanej z tym polityce językowej i nauczaniu języków. W drugim tomie ***Międzykulturowa rola esperanta*** przedstawiamy rolę tego międzynarodowego języka planowego w wielokulturowym świecie: jak język stworzony na potrzeby komunikacji międzynarodowej pośredniczy między językami, literaturami i kulturami; przed jakimi wyzwaniem staje w wielokulturowej międzynarodowej społeczności językowej.

Zainspirowało nas również 5. *Symposium Interlingwistyczne* zorganizowane w Instytucie Etnolingwistyki UAM we wrześniu 2020 roku, gdzie w kilku prelekcjach poruszono powyższy temat. Tom zawiera teksty 16 autorów z 11 krajów w językach angielskim i esperanto a także polskie streszczenia. Składa się z 3 rozdziałów: (1) Esperanto: łącznik między kulturami, (2) Esperanto: narzędzie dla międzynarodowych użytkowników, (3) Esperanto: język pośród języków.

(1) Rozdział **Esperanto: łącznik między kulturami** rozpoczyna Carlo Minnaja badaniami nad zakresem, w jakim literatura esperancka czerpie z innych źródeł i ukazuje wartości różnych narodów, rolę esperanckiego centrum PEN i kulturową rolę esperanta w serii *Wschód–Zachód* Światowego Związku Esperantystów (UEA). Humphrey Tonkin przedstawia interesujące drogi życiowe trzech znanych osobistości: urodzonego na Węgrzech Tivadara Sorosa, urodzonego w Polsce Louisa Christophe’a Zaleskiego-Zamenhofs, wnuka Zamenhofs oraz Jerzego Kosińskiego, którzy, będąc Żydami, uciekli z ojczyzny z powodu nazizmu i odnaleźli możliwość komunikacji, bezpieczeństwo i filantropię w esperancie.

Lorraine Wong odkrywa kosmopolityzm literatury esperanckiej w oparciu o wpływ węgierskiego pisarza esperanckiego Julio Baghy’ego na chińskiego poetę esperanckiego Ba Jina, a kilka lat później przez tego ostatniego na wiersze Armanda Su, który cierpi w maoistowskim więzieniu z powodu międzynarodowych kontaktów. Probal Dasgupta analizuje pomostową rolę literatury esperanckiej na przykładzie tłumaczenia chorwackiej powieści dziecięcej *Waitapu* na bengalski i tego, jak może zmienić kierunek anty-egzotycznego, postnarodowego podejścia w wieloetnicznych i wielojęzycznych Indiach. Christian Lavarenne wraca do filozoficznych myśli Zamenhofs na temat *Hillelizmu* i *Homaranizmu* i przedstawia międzynarodowe wartości esperanta pojawiające się we wczesnych pracach.

(2) Drugi rozdział **Esperanto: narzędzie dla międzynarodowych użytkowników** podejmuje różne zagadnienia: od użycia języka, poprzez użytkowników rodzimych

esperanta, aż po tożsamość w społeczności esperanckiej. Gong Xiaofeng przedstawia różnice między zachodnim i wschodnim sposobem myślenia, które znajdują odzwierciedlenie w języku (np. formy adresatywne, relacje rodzinne); traktując esperanto jako nosiciela zachodniej, tj. w tym wypadku europejskiej kultury, doradza ich włączenie w nauczanie esperanta dla chińskich uczniów. Renato Corsetti również zwraca uwagę na europejski wpływ na kulturę esperancką i przedstawia listę takich powiedzeń (z objaśnieniami), które są niezrozumiałe dla nie-Europejczyków, a także niektóre z powiedzeń azjatyckich, które powodują problemy dla Europejczyków.

Emerson Werneck analizuje szczególny przypadek dwujęzyczności, tj. kiedy esperanto staje się językiem rodzimym dziecka. Na podstawie badań własnych przedstawia brazylijskich użytkowników rodzimych esperanta i porównuje ich mowcami z innych krajów. Globalizm jako podstawowa wartość i europeizm ze względu na źródła esperanta pojawiają się w studium Federico Gobbo. Autor przeprowadził na ten temat wywiady z europejskimi rodzinami posługującymi się językiem esperanto, aby dojść do wniosku, że esperantyzm nie sprzyja europeizacji. Ida Stria bada specyficzną tożsamość użytkowników esperanta (dla których esperanto nie jest językiem ojczystym), różniących się od osób mówiących w językach obcych i proponuje porównać tę tożsamość z tożsamością osób posługujących się angielskim jako *lingua franca* (ELF).

(3) Rozdział **Esperanto: język pośród języków** skupia się na językowych cechach esperanta. Philippe Planchon bada, czy esperanto zawiera niezbędne zasoby, aby funkcjonować jako język międzykulturowy, analizując środki wyrazu w tym języku z semantycznego i pragmatycznego punktu widzenia. Podkreśla, że znaczenia są konstruowane podczas rozmowy, a pomimo odmiennego pochodzenia kulturowego rozmówców i możliwych nieporozumień elastyczność esperanta bardzo pomaga we wzajemnym zrozumieniu. Guilherme Fians w oparciu o badania socjo-antropologiczne poszukuje mechanizmu, za pomocą którego esperantysty negocjują nowe słowa oraz sprawdza, czy istnieje autorytet językowy. Proponuje 3 zasady – elastyczność, międzynarodowość i oryginalność – aby rozwinąć leksykę esperanta. Także François Lo Jacomo powraca do problemu rozwoju języka i nowych słów, omawiając nadużycie piętnastej reguły (dot. włączania do leksyki wyrazów „międzynarodowych”) i zachowując jakość esperanta jako „dobrego języka” w znaczeniu nadanym przez Pirona, aby zapewnić dobrą komunikację między użytkownikami posługującymi się różnymi językami i pochodzącymi z różnych kultur.

Obecnie zaimki osobowe związane z płcią powodują problemy w różnych językach – także w esperancie, które nosi oznaki swoich korzeni i czasu tworzenia. Marcos Cramer zbadał użycie przez esperantystów nieoficjalnego neutralnego płciowo zaimka *ri*, który jest szeroko rozpowszechniony wśród młodych ludzi na forach dyskusyjnych i czatach. Natalia Dankova analizuje sposoby opowiadania w języku esperanto i zauważa różne strategie i formy językowe w zależności od języka ojczystego mówiącego, co jest możliwe dzięki elastycznej strukturze esperanta. Michał Kozicki

wybrał terminy kolejowe w czterech językach: polskim, angielskim, niderlandzkim i esperanto, aby pokazać podobieństwa i różnice, które manifestują językowe obrazy świata w tych językach.

Poznań, styczeń 2020

Redaktorzy

1

Esperanto: ligilo inter kulturoj

Esperanto: a link between cultures

Esperanto: łącznik między kulturami

Literaturo, peranto inter unuopuloj kaj inter popoloj

Abstract. Literature, a mediator between individuals and between peoples

This chapter discusses the purpose and value of literature with special attention paid to literature in Esperanto and to the structures that coordinate writers in different countries, including the Esperanto branch of PEN International (*esperanta PEN-centro*). The work of UNESCO is examined in relation to Esperanto organizations, mainly the Universal Esperanto Association (*Universala Esperanto-Asocio*), with which it partnered for the publication of *De ideoj al agoj* (From ideas to actions) in celebration of its 70th anniversary and which it motivated to initiate the series “Oriento-Okcidento” (East-West) for the reciprocal appreciation of the cultural values of the two parts into which the world is broadly divided. Finally, using current statistics, the importance of original and translated literature in Esperanto in a global context is analyzed as is its ability to communicate knowledge and ideals between different peoples.

Resumo. La studo traktas la celon kaj la valoron de la literaturo, kun aparta rigardo al la esperantlingva kaj al la strukturoj kiuj kunordigas verkistojn diverslandajn, inter ili la esperanta PEN-centro. Estas esplorita la laboro de UNESCO en rilato kun esperantistaj organizaĵoj, ĉefe Universala Esperanto-Asocio, kun kiu ĝi partneris la eldonaĵon *De ideoj al agoj* celebre al la 70-a datreveno de ĝia naskiĝo kaj kiun ĝi stimulis iniciati la serion “Oriento-Okcidento” por la reciproka aprezo de la kulturaj valoroj de la du partoj en kiuj la mondo estas grandtrajte dividita. Laste, surbaze de la ĝisnunaj statistikoj estas analizata la graveco de la esperanta literaturo originala kaj traduka en la monda kunteksto kaj ĝia kapablo peri konojn kaj idealojn inter la diversaj popoloj.

1. PEN Internacia kaj la esperanta PEN-centro

1.1. La naskiĝo de PEN

La evoluo de la koncepto pri literaturo ne nur kiel rilato inter verkisto kaj leganto, sed inter verkistoj konsiderataj kiel kolegoj sendepende de la lingvo uzata en la verkado, havas gravan komencopunkton: la naskiĝon de PEN, asocio kies nomo estas siglo indikanta, kun aludo al plumo, la anglalingvajn vortojn *Poets, Essayists, Novelists*. Ĝi estis fondita en 1921 en Londono de la poetino Catharine Amy Dawson-Scott (1865–1934) kaj de John Galsworthy (1867–1933), kiu estis ĝia unua prezidanto; inter la unuaj membroj estis Joseph Conrad, George Bernard Shaw, Herbert John Wells. La asocio tuj organiziĝis ne laŭ landoj, kiel estus la ordinare kutima subdivido de internacia asocio, sed ja laŭ lingvoj, tial kreiĝis diverslingvaj PEN-centroj eĉ pri relative malgrandaj minoritataj lingvoj; ekzemple nuntempe la italan lingvon reprezentas la

centroj itala (naskiĝinta tuj la postan jaron), svisitala, triesta. La nuna funkciado estas konfederacio de tiaj centroj.

Kvankam ĉe la fonda akto la koncernatoj estis nur verkistoj, la anaro poste plilarĝiĝis al ĉiuj agantoj tra la skriba komunikado, do estis enprenitaj ĵurnalistoj, kritikistoj, eldonistoj, historiistoj, blogantoj: la siglo restis la sama, sed nun kompreninda kiel *Poets, Playwrights, Editors, Essayists, Novelists*.

Pluraj estis la celoj de ĉi tiu organizaĵo: unua estis stimuli la solidarecon inter verkistoj, en la konscio, ke verkistoj kapablas pleje influi la homojn, eĉ se nur la legokapablajn, kiuj en la tempo de la fondiĝo estis malplimulto eĉ en la ĉefaj eŭropaj landoj. Efektive Galsworthy, kiu iĝos Nobel-laŭreato pri literaturo en 1932, ne nur estis fama priskribanto de la brita socio de sia tempo, sed ankaŭ socie engaĝita kritikanto de kelkaj maljustaĵoj: forta estis lia kritiko, ekzemple, de la situacio en la britaj karceroj, kaj, rezulte, estis ŝanĝita la ŝtata leĝo tiurilata. De Galsworthy ekzistas en esperanto *Vojaĝo en la inferon*, fragmento el *La proprietulo*, en traduko de C. A. Capp (Galsworthy 1987).

Dua grava celo estis la defendo de la rajto esprimi sian opinion skribe kaj parole. Tio kompreneble opozicias al ĉia cenzuro, kvankam oni ja agnosku, ke la celoj de PEN estas solidareco inter verkistoj, sed ankaŭ fido al edifaj principoj; PEN ne estas senkritike akcepta al ia ajn ideologio, ekzemple ĝi eksigis siatempe la naziajn verkistojn kaj subtenas la verkistojn kiuj estas en karceroj pro ideologiaj kaŭzoj, opozicie al totalismaj reĝimoj. En 2020 estis nuligita kongreso en lando, kie okazas persekuto de minoritato. Ja la kulturo devus esti ĉiam ĉe la kontrolo de la registaro, do ĉe la opozicio, kiel pluraj diris, ekzemple la itala verkisto Leonardo Sciascia (1921–1989), deputito ĉe la itala kaj ĉe la Eŭropa parlamento por la radikala partio.

La ĉefaj principoj, fiksataj de la ĉiujaraj PEN-kongresoj, povas listiĝi tiel:

- Literaturo ne konas landlimojn kaj restas komuna rilato inter la personoj spite al internaciaj malordoj;
- en ĉiuj situacioj, precipe militaj, la literaturaj kaj kulturaj valoroj devas esti respektataj;
- PEN-anoj agu por ke restu respekto inter la nacioj kaj por ke la modelo de la homaro estu komunumo vivanta en paco;
- PEN kontraŭas ĉiujn malhelpojn en la transdono de la komunikoj, distordojn kaj mensogojn por politikaj celoj.

Tial en 1960 estis starigita ene de PEN la komitato por verkistoj en prizono, kiu sekvas la kazojn de verkistoj arestataj, torturataj, mortigataj (estas ĉ. 900 malaperigoj ĉiujare). Alia komitato zorgas pri la rajtoj de aŭtoroj kaj de tradukistoj; ja tradukado estas grava en la akcelo de la digno de ĉiuj kulturoj, kaj tradukistoj estas necesaj perantoj de komunikado inter la popoloj.

1.2. PEN kaj ĝia rilato al la esperantlingva verkado

En la menciita medio preskaŭ nature enmetiĝis la agado de esperantistoj, kaj la ideo de Esperanta PEN-centro konceptiĝis jam en 1931. Tiujare la 9-a PEN-kongreso okazis en Hago kaj Amsterdamo. Parolis inaŭgure John Galsworthy, substrekkante ke amo al la propra patrujo estas garantio por respekto de la amo de alilandaj verkistoj al patrujo sia. Legate nun, tiuj vortoj ŝajnis ekstertempaj, en Eŭropo la koncepto pri “propra patrujo” estas misklasata al “suverenismo”, kiu indikas per malŝata nuanco tiun pensokolon, kiu favoras ke ĉiu lando estu mastro en sia hejmo; sed en tiu tempo la koncepto pri lando kun siaj difinitaj limoj, eĉ lingvaj, estis tute preciza, eventuale iom artifice insistata.

Dum la unua vespera festo estis prezentita fragmento de nederlanda teatraĵo, hinda danco kaj fine unuaktaĵo kiu konkludiĝis per sprita bondeziro, tradicia en Nederlando: la tri geaktoroj kompilis ĝin en pluraj lingvoj, en la fino ĉirkaŭ tridek, inter kiuj ankaŭ esperanto, kaj la prezidanto Jan Feith diris kelkajn frazojn en esperanto, kvankam li ne estis esperantisto. La raporto en *Literatura Mondo* (Bijleveld 1931) finiĝas tiel:

Ĉu ne estus eble fondi ankaŭ Esperantan P.E.N-klubon kaj aliĝi al la federacio? Verŝajne la rilato inter la verkistoj nacilingvaj kaj la Esperantaj estus interesa kaj utila por ambaŭ flankoj. Ĉu eble la sekvantan jaron en Budapeŝto partoprenos nova sekcio: la PLUM-klubo? Per Literaturo Universala Mondpacon!

La posta kongreso okazis en Budapeŝto (Bodó 1932), kie Frigyes Karinthy (1887–1938), elstara klerulo hungara kaj prezidanto de Hungara Tutlanda Esperanto-Asocio (kvankam ne mem esperanto-parolanto) pledis pri la neceso havi komunan lingvon por interkomuniki ene de PEN Internacia kaj finis petante, ke PEN esploru, ĉu esperanto estas plej taŭga ne nur por komuniki, sed ankaŭ por peri arton; dua peto estis ke PEN esprimu simpatian al celoj de la esperanto-movado, fakte al la “fina venko”. Sed tiuj petoj havis neniun sekvon, kaj la temo “esperanto” malaperis el la tagordo de la postaj PEN-kongresoj.

1.3. La esperanta PEN-centro

Pasis kvaronjarcento kaj rean aperon ni registras dum la 50-a PEN-kongreso en Lugano (Svislando) en majo 1987, kie 600 kongresanoj el 82 landoj debatis pri la temo *Verkistoj kaj limliteraturoj*; al ĝi estis akreditita *Literatura Foiro*, revuo ekzistanta jam de 1970, reprezentata de la tiama ĉefredaktoro Perla Martinelli (Martinelli 1987). La kongreso estis antaŭata de ronda tablo en Campione d'Italia, itala enklavo en la svisa kantono Tiĉino, pri *Limliteraturoj por Eŭropo sen landlimoj*; intervenis la tiĉina verkisto Grytzko Mascioni, prezidanto de la Kongresa Komitato, Alexandre Blokh, ĝenerala PEN-sekretario, Arnaldo Alberti, prezidanto de la svisitala kaj romanĉa

PEN-centroj, Sergio Franzese, spertulo pri ciganologio, kaj Giorgio Silfer, tiama prezidanto de LF-koop, kies prelego pri la transnacieco de esperanto kiel arta esprimilo estis poste presita, itallingve, en la aktoj de la kongreso mem (Silfer 1987). Krom en tiu prepara ronda tablo, esperanto estis menciita ankaŭ en la kongresa interveno de la itala verkisto Claudio Magris, kiu vidis en nia lingvo kaj la ilon de intima, preskaŭ kaŝa, poezio kaj la karakterizon de universaleco. De tiu aŭtoro aperos en esperanto *La muzeo de milito*, traduko de la originala *Non luogo a procedere* ‘Ne procezinde’ (Magris 2019). Dum tiu kongreso, kiun partoprenis la kremo de la monda verkistaro, Tibor Sekelj intervjuis kvin gravulojn pri ilia sinteno al esperanto (Sekelj 1987).

Post pluraj kromaj personaj kontaktoj maturiĝis fine la tempo por ke ankaŭ la esperanto-verkistoj enmarketriĝu en tiom vastan kaj gravan komunumon kia PEN. En novembro 1991 Perla Martinelli, István Nemere kaj Giorgio Silfer fondis la esperantan PEN-centron; kvara membro estis tuj Gaston Waringhien (unu monaton antaŭ la morto), baldaŭ sekvis William Auld; la centro rapide alprenis stabilan strukturon kaj prezidantoj ĝis nun estis István Nemere, William Auld, Vinko Ošlak, Perla Martinelli, Bertil Nilsson, Walter Ŝelazny, ekde 2019 Tomasz Chmielik.

Al la 60-a PEN-kongreso en Santiago de Kompostelo en 1993 estis prezentita la demando pri la aliĝo de la esperanta PEN-centro al la internacia PEN; estis kontraŭa interveno de la reprezentantino de la angla PEN-centro, laŭ kiu esperanto, ĉar lingvo kreita, ne povas havi literaturon; estis favoraj pledoj de la hungara delegito, kiu estis la prezidanto de PEN, de la skota, de la finna, de la svisitala kaj konklude la peto estis aprobita la 10-an de septembro 1993 per 29 voĉoj poraj, 4 kontraŭaj (inter ili la angla kaj la japana delegitoj) kaj 13 sindetenoj (Martinelli 1993, subskribita kiel “redakcio”). Tiu atingita sukceso ĝemelas al la fama UNESCO-rezolucio de Montevideo de 1954: ĉi lasta agnoskis ke la lingvo estas “bona”, ke ĝia komunumo agas por alproksimigi la popolojn, dum la rezolucio de Santiago agnoskis, ke la lingvo estas “bela”, ke ĝiaj verkistoj kvalifikiĝas en la celoj de PEN. En 1994 *Literatura Foiro* fariĝis oficiala organo de la esperanta PEN-centro kaj tia ĝi plu estas nun; pluraj ĝiaj numeroj havas specife paĝojn dediĉitajn al la agado de la centro kaj ĝi estas interŝanĝata kun revuoj de alilingvaj PEN-centroj, tiel akcelante interŝanĝon de kulturoj. En la eldona kampo ĝi aŭspiciis la verkojn *Historio de la Esperanta Literaturo* de C. Minnaja kaj G. Silfer (2015) kaj *Historio de la Akademio de Esperanto* de C. Minnaja (2018a).

La esperanta PEN-centro partoprenas regule, per iu aŭ alia delegito, en la kongresoj de PEN Internacia kaj agas en la specifaj PEN-komitatoj pri verkistoj en prizono, verkistoj por paco, tradukarto kaj lingvaj rajtoj, verkistinoj. Aparte notinda estas la komitato pri tradukado, ĉar ĝuste tradukado estas la ilo kontaktiganta la diverslingvulojn: ja leganto de tradukita verko legas la konceptojn kaj ideojn de la originala verkinto, sed la vortojn de la tradukinto, kies nomo plejofte aperas nek sur la kovrilo nek sur la frontispico, sed estas preskaŭ kaŝita en parnumera paĝo, do ne tuj videbla ĉe la libromalfermo. Tiu kutimo sabotas la laboron kaj sekve la meritojn de la tradukinto, kaj ankaŭ lia financa rekompenco estas ofte neadekvata. La aliaj komitatoj estas en striktaj rilatoj kun aliaj similcelaj organizaĵoj: la komitato pri verkistoj en prizono

laboras man-ĉe-mane kun Amnesty International, pri la komitato pri verkistinoj daŭre raportis kaj kontaktis revuo *Femina* (2005–2014, reta en 2016), ĉefredaktita de Perla Martinelli, la plej altnivela revuo pri virinoj, kvankam “ne nur por virinoj”, ekzistinta en la esperantlingva medio.

La esperanta PEN-centro, same kiel revuo *Femina*, aliĝis al la “Pakto por la Esperanta Civito” (1998), kiu promulgis la Konstitucion de la Esperanta Civito (2001); la Civito estas suverena kaj federa kolektivo, akceptita kiel observanto ĉe la neregistara organizaĵo UNPO (Unrepresented Nations and Peoples Organization) kiel reprezentanto de la esperantoparolanta komunumo.

2. UNESCO, UEA kaj la serio Oriento–Okcidento

2.1. UEA, UNESCO kaj la du partoj de la mondo

PEN Internacia estas ege aprezata de UNESCO, kaj eble ĝuste pro ĝia jam delonga ekzisto UNESCO ĉe sia organiziĝo rezignis havi propran agentejon pri literaturo. Tio kuntrenis kunlaboron inter UNESCO kaj la esperanta PEN-centro, kiam UNESCO eldonis libron kiu celebru la 70-jaran datrevenon de ĝia naskiĝo, okazinta en 1945.

Estis produktita verko en tri lingvoj (angla, franca, brazil-portugala), kiu rakontas, per abundo da tre belaj bildoj kaj per klare redaktita teksto, la longan, kaj ege allogan kaj meritplenan, historion de UNESCO. Ĉi lasta, kiu jam publikigis ankaŭ en esperanto sian *Kurieron*, por disvastigi kiel eble plej multe sian agadon akordiĝis kun UEA pri kuna eldono de tiu libro en dulingva versio esperanta-ĉina, kiu eventuale povu esti modelo por alilingvaj versioj. Por havi garantion pri la fideleco de la traduko kaj pri adekvata literatura kvalito, UNESCO volis havi kontrol-legon fare de strukturo, kiu estu nek UEA nek organizo iel ligita al ĝi; tial la esperantan version prizorgis profesia tradukisto, kaj la revizion plenumis eta komisiono kun fina revizio fare de komisiito de la esperanta PEN-centro. La afero progresis ĝis la konkludo kaj en somero 2020 aperis *De ideoj al agoj* (kun ĉina sama titolo), dulingva 230-paĝa libro eldonita kune de UNESCO kaj UEA (UNESCO, UEA 2020).

La kunlaboro inter la du institucioj daŭras delonge, UEA estas ja en konsultaj rilatoj kun UNESCO ekde 1954; specife pri diskonigo de la diversaj kulturoj ni povas indiki komencon per la publikigo de 50-paĝa broŝuro de G. Fradier *Oriento kaj okcidento – al reciproka kompreno?*, eldonita en 1962 de UEA “kun la helpo de UNESCO” (Fradier 1962). La motivo de tiu eldono troviĝis en tio, ke, malprecize dirite, la du partoj de la mondo ne konas unu la alian. Efektive, kiel diras la unua ĉapitro “La nedifinebla Oriento”: “Oriento, Okcidento estas neprecizaj terminoj. Oni ofte rimarkigis, ke estas malfacile montri, kie la unua finiĝas kaj la alia komenciĝas. [...] Tamen, se oni allasas, ke ili elvokas fundamentajn diferencojn, kaj oni povas, je multaj kazoj, juĝi: ĉi tiu estas orienta, tiu ne estas, necesas, ke oni nomu la kriteriojn por tiuj juĝoj. Estas almenaŭ kvin, kiuj prezentas sin al la menso: la geografio,

rasoj, lingvoj, religioj kaj sociaj moroj.” La ĉapitro pluas per pluraj konsideroj kie la diversaj kriterioj kelkfoje kontraŭdiras inter si: ekzemple, de la vidpunkto de italo, Marakeŝo estas en la oriento, dum Sidnejo en la okcidento, kvakam la meridianoj dirus la kontraŭon. Kriterio senduba estas, ke, en kiu ajn punkto de la terglobo oni troviĝas, oriento estas la direkto kie la suno naskiĝas. Ĉu eventuale, subpercepte, “oriento” karakterizas “ne-eŭropecon”? Apenaŭ: multaj afrikaj landoj sorbis la francan aŭ anglan kulturon, do kristanismo povas ilin klasi “okcidentaj”, kaj cetere la kontrasto “oriento-okcidento” en Afriko estus tute alikriterie perceptebla. Certe, la islama religio disvastiĝis ĉefe oriente de la romia imperio, do islamanojn eŭropanoj klasus “orientaj”, kaj kristanismo, naskiĝinta pli malpli je la sama meridiano kiel islamismo, tamen estis transportita al Romo de Paŭlo (kiun kristanoj nomas “sankta Paŭlo”) kaj do fariĝis esenca karakterizo de okcidenteco.

La granda miksaĵo de la popoloj de la lasta jardudeko, kun abundaj migradoj, rifuĝadoj, setloj eĉ pli multe konfuzis la kriteriojn menciitajn en la citita verko (ĝi ja aĝas pli ol duonjarcenton); termine, en centra Eŭropo ankoraŭ uzatas Mez-Oriento kaj Malproksima Oriento por indiki, respektive, la areojn ĉe la orienta bordo de Mediteraneo kaj tiujn pli-malpli oriente de la hinda duoninsulo. Oni devas agnoski, ke la kriterioj estis, kaj larĝparte plu restas, forte influataj de la Eŭrop-centra pensmaniero.

Oni tamen esploru, kion la diversaj popoloj opinias pri si kaj per kiuj terminoj ili indikas sin mem. En Japanio floras *La Revuo Orienta* jam ekde 1920 ĝis nun, kun sola interrompo en la jarduoj 1944–1945 pro la milito; en 1956 aperas *El orienta florbedo*, skizoj pri japana poezio, de Kenĵi Ossaka, do senkompromise japanoj nomas sin mem orientanoj, evidente akceptante ne nur, ke la nula meridiano estas la grenviĉa kaj ke la longitudo kreskas en la iro orienten, sed ankaŭ ke “okcidento” estas la karakterizo de Eŭropo kaj de la civilizo kiun ĝi alportis ankaŭ alikontinenten.

La paca kunvivado estis la ĉefa celo de Unuiĝintaj Nacioj (UN) kaj de ĝia kultura organizaĵo UNESCO. Kvankam kun bedaŭro, oni povus diskuti kiom UN sukcesis teni senmilitan kunvivadon sur la terglobo; ekde ĝia fondiĝo ne eksplodis tutmonda milito kia ni ĝin spertis antaŭe, sed la planedo estis plagata de preskaŭ seninterrompa serio da militoj en Barato, Koreio, Vjetnamio, Kamboĝo, Malvinoj, kaŭkazaj landoj, Libano, Israelo, eksa Jugoslavio, Irano, Irako, Kuvajto, Afganio, Libio, Sudano, Ukrainio kaj aliloke: fakte okazis kaj estas plu okazanta tria mondmilito, kiu tamen distribuiĝas poparte. UNESCO ĉiam klopodis, kvankam kontraŭ kanonoj aŭ bombadoj senarma institucio estas malforta, savi la artaĵojn kaj historiajn lokojn dum tiuj konfliktoj.

2.2. La granda projekto pri reciproka aprezado

Interŝanĝoj inter Orientaj kaj Okcidentaj landoj estis forte financataj de UNESCO, kiu per stipendioj ebligis al orientaj kleruloj, edukistoj kaj artistoj akiri novajn spertojn en Okcidento, kaj, reciproke, ebligis al okcidentanoj studi surloke la kulturojn de diversaj orientaj popoloj; sed tiuj unuopaj agadoj estis evoluigindaj al pli vasta

dimensio. Fine de 1956 la Ĝenerala Konferenco de UNESCO, kunveninta en Nova Delhio, unuanime adoptis grandan projekton titolitan “Reciproka aprezado de la kulturaj valoroj de la Oriento kaj de la Okcidento”. Diskutado pri precizigo de la celoj, kaj precipe de la strategio por ilin atingi, okupis laŭcele formitan internacian komitaton. La kulturaj valoroj menciitaj estas la plej altaj kreaĵoj de la homa spirito, ne nur artaj ĉefverkoj, sed ankaŭ ideoj kaj normoj kiuj esprimas la apartan genion de nacio kaj permesas ĝian evoluon. Tiaj kulturaj valoroj ne estas ekskluziva propraĵo de iu popolo aŭ iu kulturo, sed ja de ĉiuj. La vorto “aprezi” indikas, krom konado, ankaŭ elementon de kunsento, de solidareco, do tiu aprezado devas esti reciproka. Tial la Projekto havas celon universalan: “fondi sur la dialogo inter popoloj la respekton, kiun ili ŝuldas unuaj al la aliaj pro tio, ke ili partoprenas la saman aventuron; agnoski la absolutan kaj ne anstataŭigeblan valoron de ĉiu kulturo, sed samtempe ĝin inviti preni sian lokon en komuna haveco” (Fradier 1962: 41).

Al tiu projekto UEA decidis kontribui per serio da tradukoj de skribaj ĉefverkoj apartenantaj al kulturoj konsiderataj reprezentaj de oriento aŭ okcidento. Tutunue montriĝis, ke la plej forta ekonomio en la diskonigo de siaj valoroj troviĝas en la okcidentaj landoj: ekzistis (kaj plu ekzistas) tre pli multaj verkoj “okcidentaj” disvastigitaj kaj do konataj en oriento ol inverse: Alighieri, Shakespeare, Goethe, Heine, Sartre estas vaste konataj en Ĉinio aŭ Japanio, dum Takur aŭ Pu Song Lin aŭ Nguyen Du estas aŭtoroj kies nomojn eĉ klera eŭropano konas apenaŭ, aŭ eĉ tute ne. Jam Zamenhof por montri, ke lia nova lingvo taŭgas por esprimi ĉion, tradukis el la germana poemojn de Heine, el la angla el Shakespeare kaj el Dickens, el la franca el Molière, el la rusa el Gogol, sed nur malfrue kuraĝas traduki el la pola, kvazaŭ tiu lingvo ne meritus lokon inter la grandaj; esperanto disvastiĝas ĉefe en okcidento, do pli multe da okcidentaj verkoj estas internaciigitaj tra esperanto.

2.3. La serio “Oriento–Okcidento”

Apoge al la projekto de UNESCO, UEA decidis lanĉi serion “Oriento-Okcidento” kuraĝigante la esperantistajn eldonejojn publikigi tradukojn de reprezentaj verkoj el ĉiuj du hemisferoj, se tiel diri, kiel ajn oni ilin konsideru. UEA ne alprenas financan respondecon, krom se ĝi estas mem eldonanto de la koncerna libro, ĝia estraro nur decidas, ĉu la verko eniru la serion. Kondiĉoj estas fizika konformiĝo (21 x 15 cm, kompost-areo 162 x 100 mm, dimensio de almenaŭ 100 paĝoj), adekvata lingva kvalito, enkonduko klariganta la celon de la serio. Kun la paso de la jaroj kaj la sinsekvo de la verkoj iuj karakterizoj riskis ne esti precize respektataj, sed en la komenco la respekto estis rigora, tiel ke, ekzemple, la luksa dulingva eldono de la *Dia Komedio* de Dante Alighieri, en blankversa traduko de Giovanni Peterlongo kun originalo vid-al-vida kaj kun pluraj dekoj da gravuraĵoj de la dekkvinjarcenta itala artisto Sandro Botticelli, dislokita en diversaj lokoj, estis klasata kiel “eksterordinara numero”, ĉar la formato de la volumo estis tro granda (Alighieri 1963). Utilas anekdoto rilatanta al tiu verko (Minnaja 2018c). Kiam

estis planata ĝia eldono, unu el la konkuratoroj, Clelia Conterno, por organizi notojn kaj enkondukon, enketis pri la kono, kiun povas havi lernanto de supera mezgrada lernejo en Ĉinio kaj en Japanio pri la itala mezepoka historio, pri la luktoj inter la roma papo kaj la imperiestro heredinto de la roma imperio. Ja la poemo estas forte ligita al tiu epoko kaj al la antaŭa historio de la itala duoninsulo: en la tri kantikoj, Infero, Purgatorio kaj Paradizo, distribuiĝas tuta aro da historiaj personoj, kiujn Dante jen kondamnas al la infero, jen glorigas en la paradizo. Nu, la rezultoj de la enketo montris, ke la acelataj lernejoj en Ĉinio kaj Japanio konas pli ol sufiĉe la politikajn kaj religiajn luktojn en Eŭropo, tiel ke la poemo ne estis por ili pli malfacila ol por eŭropano.

Same eksterordinaraj numeroj estas *Aniario* (Martinson 1979) kaj *La Biblio*.

La iniciato de UEA movis elstarajn tradukantojn kaj entreprenemajn eldonejojn: ja la marko “Serio Oriento-Okcidento” estas bona prezento por ambaŭ kategorioj. Entute la serio entenas tradukojn el 17 lingvoj; Krome estas du multlingvaj antologioj, kiuj enhavas tradukojn el trideko.

Esploro de la 57 (plus 3 eksternumeraj) ĝis nun aperintaj verkoj de la serio (lasta en 2019), estas edifa. La unua, aperinta en 1961, *Malsata ŝtono*, estas rakontaro de Rabindranath Takur (okcidentece: Tagore), tradukita el la bengala de Lakshmiswar Sinha kaj eldonita en Svedlando; la dua estas japana rakontaro de Mori Oogai, la tria estas *La naŭzo*, de Sartre. Sin sekvas kvazaŭ altvalora koliero verkoj vere ĉefaj kiel la finna nacia epopeo *Kalevala*, la argentina rakonta poemo *Martin Fierro*, la preskaŭ 9000-versa portugala epopeo *La Luzidoj*, la *Sonetoj* de Shakespeare, verkoj de Nobel-laŭreatoj kaj tiel plu. Ĉiu el ĉi tiuj libroj meritis mencioni kaj apartan komenton: la tuta serio prezentas ege valoran panoramon de ambaŭ terpartoj, kie trovas lokon ĉefverkoj el la bengala, ĉina, japana, palia, turka, vjetnama same kiel el la angla, ĉeĥa, finna, franca, galega, germana, helena, hispana, hungara, itala, latina, nederlanda, norvega, pola, portugala, rumana, rusa, serbo-kroata, sveda.

La elekto ne estas tute ekvilibra, fakte la “okcidentaj” verkoj laŭnombre superas la “orientajn” (ĉ. kvardeko kontraŭ ĉ. dekkvino); pleje abundas la japana per 6 verkoj, sekvas la rusa per 5, la angla kaj la ĉina per 4, franca, itala, hispana kaj germana per 3. Tamen iuj orientaj alvenas ja sur la mondan scenejon kaj iĝas tra esperanto konataj tutmonde, kion la vasta traduka merkato, orientita al la “grandaj” lingvoj, ne garantiis: Ihara Saikaku, Tanizaki Junichiro, kiuj verkis en la japana, Upendronath Gangopadhae, kiu verkis en la bengala, aŭ Nguyen Du, kiu verkis en la vjetnama, ĝuis tre malmultajn tradukojn al okcidentaj lingvoj, do ili estas apenaŭ konataj de la “riĉa” okcidenta mondo; same la granda epopeo en la palia, mezhinda lingvo kaj sankta lingvo de budhismo (pri ĉi lasta interese estas, ke ĝi estis esperantigita de svedo). Ja sendube la aĉetpovo estas pli granda en okcidento kaj tio certe influas la elekton de la legantoj kaj sekve la elekton de la eldonejoj pri tio kion publikigi.

Ĉeestas en la serio la fundamentoj de du grandaj religioj, *La Biblio* kaj *La nobla Korano*, ĉeestas la multlingvaj antologioj *Tutmonda sonoro* (Kalocsay 1981) kaj *El-pafu la sagon* (Sekelj 1983). Ĉi tiuj du lastaj estas aparte konsiderindaj, ĉar ne temas pri tradukoj de aŭtonomaj etnolingvaj verkoj, sed pri kompilaĵoj reflektantaj elekton

faritan de esperanto-verkistoj, do tra ili parte transdoniĝas la esperanta kulturo. La unua temas pri duvoluma kunmeto de 581 poemoj de 185 poetoj el tridek lingvoj, do panoramo ege ampleksa kaj laŭ la etnoj kaj laŭ la epokoj, la dua kunigas la buŝan poezion de popoloj, kiuj plejparte neniam estis tradukitaj al esperanto.

Al la ideo de esperanta kulturo kiel transnacia nin trenas unu el la verkoj de la serio, *Je la flanko de la Profeto*, la nura originala en esperanto, de la triesta aktuario Italo Chiussi (Chiussi 1978), kiu konvertiĝis al islamo, tradukis *La noblan Koranon* kaj verkis pluron pri islama kulturo; lia ĉi tie menciita libro, emfazanta la personecon de Mahometo, ricevis mencion de grava islama fondaĵo kiel elstara islama verko.

3. La esperanta kulturo: tradukoj al kaj el Esperanto

3.1. Kruda statistiko pri eldonado

La verko *Je la flanko de la Profeto* estis do konsiderata de UEA kiel inda je enlistigo en la serion “Oriento-Okcidento”: evidente verko de itala matematikisto transloĝiĝinta al Germanio, denaske katolika, konvertiĝinta al islamo estis taŭga ekzemplo de la miksiĝo de kulturoj esprimata tra esperanto. Ne valoras nun aliri la jam antaŭ longe levitan diskuton pri la ekzisto de propra kulturo esperanta; male, oportunas vidi kiel status la esperanta eldonado kaj kiom kaj kiuj originalaj esperantlingvaj verkoj transdonas ion tiom gravan, ke ili meritas esti tradukitaj al etnolingvoj.

Laŭ *La Ondo de Esperanto*, revuo startinta en 1909, sed ekde ĉi tiu jaro ne plu aperanta entute, post eksperimento pri reta versio en 2017, la lastaj tridek jaroj de la esperantlingva eldonado donas la jenan statistikon (Lo-304):

| | 1991-2015 | 2016 | 2017 | 2018 | 2019 | 1991-2019 Sume aŭ averaĝe |
|--------------------------------------|-----------|--------|--------|--------|--------|---------------------------------|
| Nombro de libroj en/pri Eo | 4802 | 189 | 139 | 127 | 150 | 5407 |
| Suma paĝonombro | 635.808 | 32.323 | 23.353 | 19.483 | 28.194 | 739.151 |
| Nombro de la eldonintoj | 1162 | 75 | 64 | 55 | 84 | 1247 |
| Averaĝa paĝonombro de 1 libro | 132 | 171 | 168 | 153 | 188 | 136 |
| Averaĝa prezo de 1 libro (eŭroj) | 10,00 | 12,84 | 13,01 | 12,45 | 13,37 | 10,33 |
| Lernolibroj, vortaroj k. s. pri Eo | 699 | 20 | 26 | 7 | 18 | 770 |
| Originala beletro | 562 | 30 | 15 | 26 | 33 | 666 |
| Traduka beletro | 997 | 28 | 32 | 32 | 41 | 1130 |
| Lingvistiko, esperantologio | 555 | 23 | 14 | 9 | 8 | 609 |
| Eo: historio, kulturo, movado k. s. | 639 | 28 | 17 | 14 | 12 | 710 |
| Politiko, historio, filozofio, socio | 513 | 34 | 26 | 24 | 21 | 618 |
| Scienco kaj tekniko | 294 | 5 | 1 | 3 | 2 | 305 |
| Religio | 235 | 14 | 5 | 6 | 10 | 270 |
| Aliaj temoj | 308 | 7 | 3 | 6 | 5 | 329 |

I would suggest – and this is at the same stroke a practical and a theoretical proposal – that we should tell the children, “Teachings come with teams attached. Education is a team sport. When you play with an actual ball on the field, it goes back and forth. When you play the game with books and CDs, there is translation, which is exactly like the sports you know and love. A ball doesn’t stand still; why do you expect words to stand still? They only make sense when they are thrown around the field.”

If translatability between educational apparatuses is packaged as an essential part of the deal between the child and her books, we move into a new geometry for the play of apparatuses – and will perhaps prepare the children for a different politics, one in which parties will learn how to read each other’s agendas in a spirit of conviviality, without sacrificing differences, but on the contrary learning to make sense of them by reading them with non-hostile, friendly, but also non-surrendering caringness. From such new forms of nurture, a different relation between languages, politics and pedagogies will arise, under a sky capable of serious peace at last.

Bibliography

- Damrosch, David 2009: What could a message mean to a cloud?: Kalidasa travels west. In: I. Chanda, C. Mohan, & S. Chakraborty Dasgupta (eds.): *Travelling in Cultures: Comparative Studies, Theory and Practice*. Delhi: Worldview. 119–134.
- Dasgupta, Probal 2010a: La postnacia literatura entrepreno kaj Esperanto. In: D. Blanke, U. Lins (eds.): *La Arto Labori Kune: Festlibro por Humphrey Tonkin*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. 695–701.
- 2010b: Translating fiction for children: pedagogy and the post-national imaginary. *Jadavpur Journal of Comparative Literature* 47: 13–26.
- 2011: *Inhabiting Human Languages: The Substantivist Visualization*. Delhi: Samskriti, in collaboration with the Indian Council of Philosophical Research
- Horvat, Joža 1989: *Wakajtapu*. Tr [from Croatian into Esperanto] Zlatko Tišljar. Zagreb: Internacia Kultura Servo
- 2010: *Oāotāpu*. Tr [from Esperanto into Bangla] Malasree Dasgupta. Kolkata: Samatat
- Nouss, Alexis 2007: Translation and métissage. In: P. St-Pierre, P. C. Kar (eds.): *In Translation – Reflections, Refractions, Transformations*. Amsterdam/Philadelphia: John Benjamins. 245–252.
- Venuti, Lawrence 1995: *The Translator’s Invisibility: A History of Translation*. London: Routledge
- Viswanathan, Gauri 2005: “Synthetic vision”: internationalism and the poetics of decolonization. In: S. Bermann, M. Wood (eds.): *Nation, Language, and the Ethics of Translation*. Princeton: Princeton University Press. 326–345.

Fruaj interkulturaj valoroj en Esperanto en la kerno de la Zamenhofaj *Hilelismo* kaj *Homaranismo*

Abstract. Early intercultural values in Esperanto: at the heart of Zamenhof's *Hillelism* and *Homaranismo*

People liked Esperanto “because it brings their hearts together” (Zamenhof). Hearts opening somehow alludes to the *internal idea of Esperantism*. In the “fundamental law” of *Hillelism*, according to Zamenhof the only just rule for reciprocal relations between peoples and religions, attributed by him to Hillel the Elder but found earlier in the *Story of Ahikar* about an Assyrian minister (7th century BC), is the golden rule: “Act toward others as you would like them to act toward you”. In this way mutual trust is provided, because the thought that the other is probably also trying to follow that rule psychologically helps both sides in their intercultural communication. In addition, there is an effort not to have prejudices, but to see in the other first a human being and sibling, a principle of his later *Homaranismo*. Apart from linguistic features, therefore, non-linguistic features, related to Esperanto literature as a carrier of international values are also helpful for intercultural communication. In the formulation of these values first expressed by Zamenhof, we found other, Indian, influences.

Resumo. Homoj ŝatis Esperanton «tial ke ĝi alproksimigas iliajn *korojn*» (Zamenhof), Tia kora malfermiĝo iel ligiĝas kun la *interna ideo de la esperantismo*. En la «fundamenta leĝo» de *Hilelismo*, laŭ Zamenhof, la sola justa reguligo de reciprokaj rilatoj inter gentoj kaj religioj, troviĝas –atribuita de li al Hillel, sed jam trovebla en la *Saĝo de Ahikar*, asiria ministro (7-a jc a.K.) – la ora regulo: «Agu kun aliaj tiel, kiel vi deziras ke aliaj agu kun vi». Tiel estas provizita reciproka konfido, ĉar la penso ke verŝajne ankaŭ la alia provas agi laŭ tiu regulo, psikologie helpas ambaŭ kunparolantojn en sia interkultura komunikado. Aldoniĝas strebo ne havi antaŭjuĝojn, sed vidi en la alia unue *homon* kaj fraton, principo de lia posta *Homaranismo*. Krom lingvaj trajtoj, do estas, ankaŭ helpaj por interkultura komunikado, nelingvaj trajtoj ligitaj al la Esperanta literaturo kiel portanto de internaciaj valoroj. En la formulado de tiuj unue esprimitaj de Zamenhof, ni malkovris pliajn influojn, hindajn.

Enkonduko

Ni interesiĝos pri *nelingvaj* trajtoj de Esperanto, kiuj helpas aŭ almenaŭ influas la komunikadon. La kerno de la Zamenhofaj *Hilelismo* kaj *Homaranismo* estos ankaŭ la kerno de nia studeto. Sed por unue evidenti ke, kvankam tio estas malfacile priskribebla en si mem, ekzistas ja io eksterlingva, nepalbebla sed perceptebla per ĝia efiko, mi komencos per jena rakonto de anglino en Anglujo dum la unua mondmilito:

«Kio pri la Esperanto ‘sento’ mem, kiu tuŝas la koron? Tion ĉiu el vi certe jam spertis laŭ propra maniero, kaj tio ofte estas tro profunda por esprimiĝi per vortoj. Tiel estas ja por mi, kiam mi pensas pri la mirinda akcepto kiun mi renkontis en aŭgusto 1916, en urbeto de Jorkio (*Yorkshire*): min, nur kelkmonatan esperantiston kaj mian amikon kiu tiam eĉ ne estis Esperantisto sed ĉi-okaze decidis fariĝi tia, gastigis du tute nekonataj samideanoj (...) [Ni] ricevis la plej elkoran el la bonvenoj, certe neniam superitan per tiu de eĉ la plej malnova amiko aŭ plej kara parenco, [ni] trovis ĉion kio povus eble ion aldoni al nia komforto kaj plezuro, planitan kaj plenumitan en la plej malgranda detalo, [ni] estis traktataj samtempe kiel honora gasto kaj intima amiko, kaj nia foriro la sekvan tagon estis akompanata per la plej elkoraj deziresprimoj» (Truss: 38).

Kial tiu ĉi rakonto – nun kiam ekzistas *Pasporta Servo* – pri preskaŭ banala okazaĵo (kiu tamen decidigis la amikon eklerni Esperanton)? Pro jenaj punktoj:

- temis pri kvar denaskaj *samlingvanoj* (ĉiuj denaskaj angloparolantoj);
- la amiko tute ne estis Esperantisto, do scipovis nek paroli nek kompreni Esperanton. Do, la komunikado devis okazi en la angla, krom eble kelkaj frazetoj en Esperanto; kaj fine:
- la gastigantoj estis du *nekonatuloj* (*entirely unknown*).

Tio montras ke ne la *lingvo* Esperanto rolis en la komunikado, sed io alia, *ne* lingva, kiu tuj malfermis la korojn (vorto tri-foje uzita). Tiu tuj amikiga rolo de Esperanto, kiu igis nekonatulojn agi kiel jam «la plej malnova amiko» (samloke) estas atestita pli frue dum la milito. Pál Lengyel estis malliberigita kun sia familio en urbo de centra Francio; kaj

«inter la soldatoj gardantaj la ejon mi trovis du samideanojn... ili konsideris nin, ‘malamikojn’, tuj amikoj kaj ili faris en nia intereso kion ili povis... Ja! Esperanto ne estas nur lingvo; ĝi estas io alia...» (Lengyel 1923: 15).

Kaj jen tria ekzemplo, de angla junulo partopreninta en la unua Universala Kongreso (en 1905 en Boulogne-sur-Mer). Pri la dua tago de la kongreso (kiam li ekskurse iris al la Bulonja ĉevalkurejo), li skribis:

«Ni baldaŭ estis atingitaj de aliaj amikoj. Kelkaj amikoj de unu tuta tago, aliaj de nur malmultaj minutoj, sed ĉiuj tamen amikoj, ĉar en Esperantujo malmultminutaj konatiĝoj egalvaloras tiun plurjaran en aliaj landoj» (Anonima Anglo [1905], en Colas: [14]).

Alia partopreninto baldaŭ publikigis poemon kun jenaj lastaj versoj:

«Per BICIKLETO mi fremdulajn landojn vidas,
Sed ESPERANTO min al homaj koroj gvidas» (Bicknell: 188).

Per tiuj du personaj konfirmoj ni alvenas al la fama rimarko de Zamenhof pri la unua kongreso, iomete longa, do el kiu mi konservas nur la por ni plej gravajn frazojn:

«Vi memoras, kiel forte ni ĉiuj estis entuziasmigita en Bulonjo ĉe l' Maro (...) Kio do tiel entuziasmigis la membrojn de la kongreso? (...) Ĉu la fakto, ke ni komprenis nin reciproke? Sed en ĉiu kongreso de samnaciaĵoj ni ja komprenas nin ne malpli bone, kaj tamen nenio nin entuziasmigas. Ne, vi ĉiuj sentis tre bone, ke nin entuziasmigis ne (...) la reciproka sinkomprenado per si mem (...) sed la interna *ideo* de la esperantismo, kiun ni ĉiuj sentis en nia koro» (Zamenhof, 1906d: 211),

kaj kiun ĝis tiam ĉiuj nomis, laŭ la poemo *La Espero* de Zamenhof, la «nova sento». Ideo estas pli intelekta, sento, pli kora. La pli grava el ambaŭ flankoj de la sama afero, por Zamenhof, estis la lasta, kion li klare ĵus montris dirante ke la unuaj esperantistoj «ŝatis Esperanton (...) ne tial ke ĝi alproksimigas la *cerbojn* de la homoj, sed nur tial, ke ĝi alproksimigas iliajn *korojn*.» (samloke).

Do la interna ideo, kiu cetere restis iom nebula koncepto (kaj do eble pro tio pli facile akceptebla de ĉiuj), estis por Zamenhof nur ia surrogato de tio kion li ne rajtis prezenti dum la dua UK (Ĝenevo 1906), lia Hilelismo, kies ĉefa regulo estos la temo de la unua parto.

1. Hilelismo aŭ *Ahikar*-ismo?

Multaj el vi plej verŝajne jam konas tiun nomon kiun, laŭ ĝia elpensinto Zamenhof, «la hilelismo ricevis laŭ la nomo de la antikva Palestina saĝulo Hillel, kies modifika principo estas akceptita kiel bazo por la religio de la hilelistoj» (Zamenhof 1906a: 5) aŭ pli precize nura «*ponto* inter ĉiuj religioj», kiel Zamenhof klarigis poste (Zamenhof 1906c: 102). Mi tamen deziras alporti iom detalajn precizigojn pri tiu nomo.

La unua parto de la ĉefa regulo kaj fundamenta leĝo de hilelismo estas «agu kun aliaj tiel, kiel vi deziras ke aliaj agu kun vi» (Zamenhof 1906a: 10, §10b)¹. Zamenhof atribuis ĝin al Hillel ha-Zaken («la Maljuna»), samtempulo de Jesuo, sed temas pri versio de la tiel nomata *Ora regulo*, multe pli antikva. Ekzemple ĝi jam ekzistas en la Malnova Testamento: en la biblia dua-kanona libro de Tobio (IV, 15), verkita almenaŭ du jarcentojn antaŭ la fama Hillel. Zamenhof cetere skribis: «Se okaze tiu principo estus esprimita [subkomprenite: unufoje] ne de Hillel, sed de ia tute sensignifa kaj senvalora persono, ni devus nomi tiun principon per la nomo de tiu persono» (Zamenhof 1906c: 103; same kiel pri fizikaj leĝoj, ekzemple la principo de Arkimedo).

Nu, la plej probable unua kiu esprimis tion, estis Ahikar, ministro de la sinsekvaj asiriaj imperiestroj Sin-ahe-eriba (Sanherib en la Biblio kaj PIV) kaj lia filo Asur-ah-

¹ Ĉi tie ni ne parolos pri ties dua parto, «kaj aŭskultu ĉiam la voĉon de via konscienco», ĉar ĝi ne rilatas al interhoma komunikado.

iddin (la biblia Esar-Ĥadon), kiuj regis de 705/704 ĝis 669 antaŭ Kristo². El lia legenda biografio, *Historio kaj saĝo de Ahikar*, kies originalo estis verkita plej verŝajne en la aramea, arameaj eroj estas konservitaj al ni sur papirusoj, malkovritaj komence de la XX-a jc sur Elefantino (insulo en Nilo), kaj montras ke en la V-a jc antaŭ Kristo lia historio kaj liaj sentencoj estis disvastigitaj en la tuta juda mondo; kaj ankaŭ ekster ĝi: la helena filozofo Demokrito, ekzemple, en sia vojaĝo ĝis Babilonio, ilin trovis kaj tradukis en la grekan (Nau: 35–36), ktp; kaj la ora regulo mem troviĝas en la armena versio (*Maksimoj kaj saĝo de Khikar*, 88), jene formulita:

«Mia filo, kio ŝajnas al vi malbona, tion vi devas ne fari al via proksimulo.»³

Do en 1906 Zamenhof, almenaŭ laŭ sia propra principo, devintus nomi sian projekton ne plu Hilelismo, kiel en sia unua broŝuro ruslingva (Zamenhof 1901) – fakte ne diskonigita ĝis ĉi ties reprodukto kun Esperanta traduko de Adolf Holzhaus en 1972, sed Ahikarismo (kvankam eble estis ankoraŭ multe pli malnova ora regulo, sed sufiĉe malsame formulita: „Agu en la strikta respekto al vi mem kaj al la aliaj.”)⁴

Des pli ke en 1904 ankaŭ en la germana, lingvo kiun li flue parolis (Zamenhof 1905: 111), aperis la maksimumo tre simila, malgraŭ ĝia negativa formo, al la principo laŭ li «formulita jam antaŭ 2000 jaroj de rabeno Hillel» (Zamenhof 1990: 1163), sed do almenaŭ duon-jarmilon pli frua (krom se, ne tute maleble kiel rimarkis Wattles: 43, temus pri interpolaĵo): «Kind, was dir schlecht scheint, sollst du deinem Genossen nicht antun» (Vetter: 343).

2. Aliaj eblaj influoj?

Simila frazo estis elpensita pli malpli samtempe ankaŭ de Konfuceo, aŭ atribuita al li de postaj disĉiploj: «Kion vi mem ne volas, ne trudu al aliaj», laŭ traduko (en Zhang Qicheng) plej probable el *Analektoj*, xv, 24. Ĉar la kunteksto, surprize, iel paralele kompareblas al tiu de rakonto pri Hillel (al kiu ni alvenos nur poste), ni citas ankaŭ pli kompletan tradukon:

Zi Gong [la fidela disĉiplo Duanmu Ci] demandis: «Ĉu ekzistas iu vorto kiu povus gvidi personon dum vivo?» La majstro respondis: «Kiel pri ‘reciprokeco’! Neniam trudu al aliaj kion vi ne elektus por vi mem.» (eble laŭ la angla sed kun originalo, en Konfuceo)

² Vidu Tobit 1: 21–22: 1957; Gerard: 41–42; *II Reĝoj* 19:36–37, en Zamenhof 1926: 341; Cardascia, Lafforgue: 651; kaj Assyrie.

³ Laŭ: „Mon fils, ce qui te paraît mauvais, tu ne dois pas le faire à ton *prochain*„ (Nau: 269) aŭ: „via najbaro” (*voisin*) (p. 58). Tria senco: „Son, that which seems evil unto thee, do not to thy *companion*.” (Conybeare, Rendel Harris, Lewis: 34), simila al la germana: *Genossen*.

⁴ Laŭ jena franca traduko el la egipta: „règle d’or: « Agir dans le strict respect de soi même et des autres », (Mpala Mbabula: 87).

Diro simila – krom la reciprokeco⁵, kiu eble implicas atendon pri sama traktado de la flanko de la aliulo – ĉi-foje prezentiĝas kiel resumo de la tuta religia instruo, kaj plie kun distingo inter tiu esenco kaj la tuta cetero. Mi tradukas kiel eble plej laŭvorte el sanskrito:

| | |
|--|--|
| न तत्परस्य संदद्यात् प्रतिकूलं यदात्मनः । एष संक्षेपतो धर्मः कामादन्यःप्रवर्तते ॥ | na tat parasya saṃdadyāt pratikūlam yad ātmanaḥ eṣa saṃkṣepato dharmāḥ kāmad anyāḥ pravartate |
|--|--|

([parto 13:] Anuśāsanaparvan, 114,8. En: *Mahābhārata* 1999)

Ne tion al aliulo faru,

kio [estus] malagrable al vi mem (subkomprenite: se iu farus tion al vi)⁶.

Tio ĉi [estas], koncentrita (densigita), la [tuta] Leĝo (*dharmā*).

De la deziro – aŭ: laŭ la [propra] plaĉo [de ĉiu] – devenas [ĉio] alia.

Por doni pli da aŭtoritato al tiu instruo oni metis ĝin en respondon de princogovernisto (Droṇa), surtera enkarniĝo de la dio Bṛhaspati kiu eĉ estas la «guruo de la dioj» (*deva-guru*); kaj tiam, per la buŝo de Droṇa, tiu dio mem parolis: „bṛhaspatir uvāca” (13, 114,2).

Aliflanke almenaŭ la okcidentaj fakuloj pri tiu giganta epopeo rigardas preskaŭ la tutajn partojn 12-an kaj 13-an (en kiu tiu *śloka*⁷ troviĝas) kiel vastajn malfruajn interpolaĵojn⁸, tamen enmetitajn probable plej malfrue en la IV-a jc post Kristo⁹. Sed preskaŭ identa kaj samsenca *śloka* troviĝas ankaŭ en la 5-a parto (*MBh.* 5,39,57)¹⁰, kaj do povas esti verkita iam ekde la IV-a jc antaŭ Kristo, aŭ pli frue se temus pri unu el la multaj originaj elementoj kiuj „povas datumi el sufiĉe antaŭa tempo”¹¹.

Fakte ĝi apartenas al la kategorio de la anonimaj tradiciaj *subhāṣita*: la «bele dirita[j]», iaj ekvivalentoj, en poezia formo, de la proverboj, kaj kiuj estas reproduktitaj, aŭ tute idente aŭ kun variantoj, kiel literaturaj ornamaĵoj. Jen traduko de tria versio, el *Pañcatantra*. Sed ĝi ankaŭ troviĝas ekzemple en la antologio *Śārṅgadhara-Paddhati*,

⁵ Sed en la tempo de Zamenhof, anstataŭ ĝi alia traduko estis jena: «Ĉu tiu ne estas la vorto tolere-mo?» (Laŭ Couvreur 1895: „N’est-ce pas celui de tolérance?”). Tiun ĉi tradukon Zamenhof *teorie* povis konsulti ĉar li mem skribis: „La lingvon francan mi legas libere” (Zamenhof 1905: 111).

⁶ Laŭ prava klariga aldono de Böhtlingk (n° 3253): II, 212.

⁷ Sanskrita strofo kies Esperanta nomo povus esti „ĝloko” kaj kiu, plej kutime sen-rima, konsistas el kvar 8-silaboj.

⁸ „Les portions didactiques (...) ont leur place privilégiée dans les sections XII (...) et XIII (...) Il s’agit là d’une gigantesque interpolation” (Renou, Filliozat, §792: I, 394). „The Anusasana Parva is (...) obviously a later inter-polation in the epic” (Anonima indiko en Ganguli).

⁹ „Das Mahābhārata kann demnach seine jetzige Gestalt nicht früher als im 4. Jahrhundert v. Chr. und nicht später als im 4. Jahrhundert n. Chr. erhalten haben.” (Winternitz: I, 396).

¹⁰ *saṃdadhyāt* anstataŭ *saṃdadyāt*, sinonimaj malgraŭ malsamaj radikoj (DĀ: „doni”, kaj DHĀ: „meti, direkti”); kaj jena 3-a verso: *saṃgrahaṇaiṣa dharmāḥ syāt*, laŭvorte: „En resumo, tio ĉi la [tuta] leĝo estas [aŭ: estu].”

¹¹ „Le *Mahābhārata* a pris sa forme actuelle entre le IV^e s. avant l’ère et le IV^e s. après. Mais les origines peuvent remonter sensiblement plus haut.” (Renou, Filliozat §803: I, 401).

verkita en 1363; kaj tie ankaŭ ĝi estas atribuita al la mita Krishna-Dwaipayana Vyāsa, la laŭlegenda aŭtoro kaj de *Mahābhārata* kaj eĉ de la Vedoj (la plej unuaj prahinduismaj verkoj):

श्रूयतां धर्मसरस्वत्
श्रुत्वा चैवावधारयतां ।
आत्मनः प्रतिकूलानि
परेषां न समाचरेत् ॥

śrūyatām dharma-sarva-svam
śrutvā caivāvadhāryatām
ātmanaḥ pratikūlāni
pareṣāṃ na samācaret

(Kosegarten III, 104: 166; por referencoj al aliaj verkoj vidu en: Böhtlingk (n° 6579): III, 401.)

Aŭdatu de l' leĝ' la esenco,
aŭdintoj akceptu en penso:
se io al iu malplaĉas,
li *ne* al aliaj faraĉas!

(Aŭ, pli fidela fino: «al aliaj li ne faru». Mi tradukis per triamfibrakaj versoj la oksilabojn de la sanskrito, kies ritmo ne estas reproduktebla en Esperanto.)

En la 12-a parto de *Mahābhārata* troviĝas simila regulo sed *pozitive* formulita (kiel ĝeneraligo aŭ pravigo de unue aparta *retorika* demando, kion mi reliefigas per amfibrakoj):

जीवति यः स्वयं चेच्छेत्
कथं सोऽन्यं प्रघातयेत् ।
यद्यदात्मनश्चेच्छेत्
तत्परस्यापि चिन्तयेत् ॥

jīvitum yaḥ svayaṃ cecchet
katham so 'nyam praghātayet
yad yad ātmani ceccheta
tat parasyāpi cintayet

([12-a parto:] Śāntiparvan, Mokṣadharmap., 260, 9250-9251. En: *Mahābhārata* 1837: 692)

Se iu [ja prave] deziras mem vivi, [subkomprenite: «Ĉar ĉiu»]
alian [vivanton] li kial mortigus?
Ĉiun ion kio deziratas por li,
tion ankaŭ por aliaj li prizorgu.

Laŭ la Talmudo ne disĉiplo lia sed pagano, kaj ne en unu vorto sed en la tempo dum li staros sur unu piedo, petis Hilelon instrui al li la tutan Leĝon (Steinsaltz). Zamenhof jene indikas ĉi ties respondon: «La tuta esenco de nia religio estas la leĝo: ‘agu kun aliaj, kiel vi volas, ke oni agu kun vi’; ĉio alia estas nur komentarioj» (Zamenhof 1906c: 103), sufiĉe fidele, sed ne tute, kaj unue ne komplete ĉar li forlasis la finajn vortojn per kiuj Hillel petis sian demandinton tamen studi; kaj ankaŭ ĉar Hillel uzis ne la pozitivan formon, sed la negativan, jenan, לא תעבירך לא תעבירך (Davidson), tio estas:

«Kio ne estas agrabla al vi, ja tion ne faru al homo alia» (Maimon 1978: 181).

Sed por havi ĉion bezonatan, ni citu ankoraŭ eron el la *Evangelio* laŭ Mateo (7,12):

«Nu, agu kun la homoj en ĉio kiel vi deziras ke ili agu kun vi. Ĉar tio estas la Leĝo kaj la Profetoj» (trad. Berveling: 21).

Do eble Zamenhof akceptis ne nur la oficialan influon de Hillel sed, pli malpli, ankaŭ tiun de kristanaj evangelioj kies cititan eron li verŝajne konis ĉar pri kristanismo li sciis pli ol mezklara judo. Ekzemple li tradukis la “Patro nia” (Zamenhof 1887: 19) instruatan de Jesuo al siaj disĉiploj. Kaj li certe sciis multe pli ol ĝis nun oni kutime opiniis. Ni komparu la finon de jena deka paragrafo el la unua versio de la zamenhofa “Deklaracio de hilelismo”:

«Kiel fundamentan leĝon de mia religio mi rigardas la regulon ‘agu kun aliaj tiel kiel vi deziras ke aliaj agu kun vi, kaj aŭskultu ĉiam la voĉon de via konscienco’; ĉion alian en mia religio mi rigardas nur kiel legendojn aŭ kiel religiajn morojn (...), kies plenumado aŭ neplenumado *dependas de mia persona deziro*» (Zamenhof 1906a: 10).

kun la du lastaj versoj el *ŝloka* jam tradukita de ni, sed nun en jena malsimila germana traduko: “das ist die Summe des Gesetzes, jedes andere Gesetz *gilt nach Belieben*” (Böhtlingk: II, 212), kion, traduke el la germana, jene citas Wattles (noto 1 de p. 4): “that is the sum of the law; every other law is *valid as you like*.”¹²

Pro la rimarkinda simileco, mi emas supozi ke tiu ĉi germana tradukero, publikiĝita en Sankt-Peterburgo en 1864 kaj denove en 1872, influis lian formuladon, sed ke Zamenhof legis ĝin nur post aprilo 1901 ĉar liaj unuaj versioj estis malsamaj. Unue, preskaŭ certe en lia “brila parolado” dum la unua sionista kongreso en Varsovio (Wiesenfeld: 1), 19-22 de aŭgusto 1898 (Korĵenkov: 143), li diris:

«Ĉiuj ceteraj religiaj instruoj (...) faras nur homajn komentariojn, kiuj en religia rilato estas devigaj al vi nur en tiu okazo, se voĉo de via koro diras al vi, ke tiuj komentarioj estas veraj» (Zamenhof [1898(?)], tradukita en Zamenhof 1990: 1101)

kaj en lia nedisvastigita broŝuro: “(...) nurajn homajn komentariojn, kiuj povas esti veraj, sed povas esti ankaŭ eraraj” (Zamenhof 1901, en Zamenhof 1990: 1166). Do Zamenhof eble estis simile influita de la aliaj citaĵoj, ankaŭ tradukitaj en la XIX-a jc, ĉar li klarigis:

«En la daŭro de tre multaj jaroj la iniciatoroj [ĉefe aŭ eble eĉ nur li] devis malfacile bataladi kun si mem, konstante serĉadi, esploradi kaj ŝanĝadi, antaŭ

¹² Mi ne povas ĉi tie kritiki tiujn tradukojn, el kiuj la dua, cetera, nur paŭzas la unuan.

ol tra la multegaj kaj plej diversaj komplikitaj dogmoj, kiujn instruas la mondo kaj niaj kutimoj, ili venis al tiuj dogmoj, kiujn instruas la absoluta justeco kaj logiko (...) Nia ideo ne estas nova; sed ĝuste tio ĉi estas nia forto: ĝuste tiu fakto, ke pri nia ideo revis kaj revas la plej bonaj homoj en ĉiu tempoj kaj en ĉiuj lokoj de la tero» (Zamenhof 1906c: 103–104).

Tiu principo – ne nur do laŭ Zamenhof – estas la «sole justa reguligo de la reciprokaj rilatoj inter ĉiuj gentoj kaj religioj» (Zamenhof 1906a: 2), kaj pli ĝenerale inter kulturoj kaj inter homoj; do ĝi estas ia kultura bazo komuna al ĉiuj raciaj kaj logike pensantaj homoj. La plano kiun li nomis Hilelismo ne temis pri religio sed konsistis «en la kreado de morala ponto, per kiu povus unuiĝi frate ĉiuj popoloj kaj religioj» (Zamenhof 1905: 107), kaj fakte li baldaŭ forĵetis eĉ la ideon de unuiĝo mem, aŭ almenaŭ de unuformiĝo (Zamenhof 1905: 109).

Estas strange ke, sen mencio nek aludo al Zamenhof kaj Hilelismo, nuntempa profesoro pri morala teologio ĉe la brusela Instituto de teologiaj studoj verkis artikolon titolitan «Pluraj religioj, unu moralo?». Kaj en ĝi, eble la kerno de tiu etiko kiun li nomas «komuna morala trezoro» de la homaro, estas la sama ora regulo, en kiu la Patroj de la Eklezio (la unuaj teologoj) vidis kvazaŭan «resumon de la tuta ‘natura leĝo’, t. e. de la leĝo enskribita de la Kreinto en la naturo mem de la homo» (Hennaux: 555). Plie, en piednoto de sia konkludo li citas, pri dialogo kun frato[j] de alia[j] religio[j] karesman leteron de kardinalo skribinta: «La tuta homaro konsistigas ununuran familion (...) La papo Johan-Paŭlo la II-a (...) en Asizo (...) povis paroli pri ‘mistero de unueco’ kaŝita sub la *eksteraj* diferencoj kiuj distingigas la religiojn unu de la aliaj.» (p. 560), kaj li mem konkludas: «Kiaj ajn estas la malfacilaĵoj eventuale renkontotaj survoje, la religioj povas alveni (...) ĝis substanca akordo pri komuna moralo» (p. 561).

Kiel transiro al la parto pri Homaranismo, jen kion, tuj post la 3-a UK en Cambridge, Zamenhof respondis al rabeno kiu intervjuis lin (Zamenhof 1907: 17):

«Mi jam delonge [fakte antaŭ malpli ol unu jaro!] forĵetis tiun projekton [Hilelismo], kiu montriĝis ne praktika, kaj mi laboradas nun per mia tuta forto por simila celo, nome, por la movado al kiu mi donis la nomon ‘Esperantismo’. (...) Ĝiaj idealoj – krom la praktika celo de la lingvo Esperanto – estas pure humanaj. Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povu pace kaj frate interkomunikiĝi, ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn» (do inkluzive la ne tuj kompreneblajn eŭropajn esprimojn pri kiuj atentigas Renato Corsetti en tiu ĉi volumo).

Sed aparta movado kun nomo «Esperantismo» fakte neniam naskiĝis ĉar ĝi jam ricevis alian nomon, *Homaranismo*, kiun Zamenhof ne menciis eble nur ĉar ĝi estis malfacile klarigebla al neesperantista publiko (la legantoj de la semajna londona gazeto *Jewish Chronicle*).

3. Homaranismo

Senkulpiga averto de la unua homarano, ankaŭ taŭga ĝuste nun:

«Mi ne [povas] nun multe paroli pri la esenco kaj celoj de la homaranismo, ĉar tio ĉi postulus la skribadon de multaj kaj grandegaj volumoj, kiuj pli aŭ malpli frue sendube estos verkitaj de diversaj homaranoj. La temo estas tiel ampleksa, ke kiom ajn multe mi parolus, mi ne klarigus eĉ la centonon de tio, kio devas esti klarigata. Tial mi lasas al aliaj personoj kaj aliaj tempoj la iom-post-ioman plenan klarigadon de la homaranismo kaj mi diros nur kelke da vortoj» (Zamenhof 1906c: 102).

Sed pri kio temas kaj unue kial tiu nomo? Male de hilelismo kiu klare aludis precizan personon (kaj plie judan, kio povis forpuŝi multajn el la nejudaj esperantistoj), homaranismo estas senpersona nomo kaj tute Esperanta. Laŭ Zamenhof tiu nova nomo «pli precize esprimas la tutan esencon de nia ideo (‘homarano’ en la lingvo Esperanto signifas ‘membro de la homa familio’)» (Zamenhof 1906b: 27, kaj sama difino en lia lasta versio, Zamenhof 1917: 2721).

Jen pri kio temas laŭ D-ro Aleksandro Gottfried Naumann (kiu ne estas pseŭdonimo de Zamenhof, ĉar tiu homo reale ekzistis, kiel pruvas lia foto en *La Ondo de Esperanto* 1912/5: 81, ktp), (dua) sekretario de la Unua Grupo Homarana:

«Lingvo Internacia havas la celon krei inter la gentoj neŭtralan ponton en rilato *lingva*, la homaranismo volas krei tian saman ponton en *ĉiuj* rilatoj. La homaranismo estas nur plifortigita esperantismo, kaj ĉiuj tion ĉi sentas (...)» (Naumann 1906a: [121], kaj same en [Naumann] 1906b: 150).

Tiuj rilatoj plie de la rilato lingva ne estas listigitaj, sed inter ili certe estis rilatoj frataj aŭ amikaj, ĉar la principo I de la zamenhofa «Deklaracio pri Homaranismo» komenciĝas per: «Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion» (Zamenhof 1913: 5; kaj same, Zamenhof 1917: 2725). Tial, pli supre, lia citita klarigo, iomete stranga, de homarano ne per ‘membro de la homaro’ sed ‘membro de la homa familio’. Do la homoj estas gefratoj almenaŭ en la vasta senco de parencoj (kiel, ekzemple, ankaŭ Gandhi poste diris, en sia batalo i.a. kontraŭ la netuŝebleco, «ĉiuj homoj estas fratoj»); kaj neniun denaske superas aliajn laŭ *nur imagita* hierarkio ekzemple socia, etna aŭ nacia (aŭ nun, lingva). Tion Zamenhof nerekte komprenigas komence de sia dua principo, kiam li deklaras: «Mi vidas en ĉiu homo nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj» (Zamenhof 1913: 5–6; kaj same, Zamenhof 1917: 2725).

En tempo de etnaj kaj naciaj konkuradoj (krom la ankaŭ ĉiamaj soci-politikaj bataladoj), tia vidpunkto estis psikologie revolucia pri interhoma komunikado. Tio fariĝis tre videbla kaj emociiga ĉe la unua universala kongreso: okaze de la malferma parolado de Zamenhof. Post jam tre varmaj kaj longaj aplaŭdoj kaj vivoj, plej verŝajne kiam li diris:

«En nia kunveno ne ekzistas nacioj fortaj kaj malfortaj, privilegiitaj kaj senprivilegiaj, neniu humiliĝas, neniu sin ĝenas; ni ĉiuj staras sur fundamento neŭtrala, ni ĉiuj estas plene egalrajtaj; ni ĉiuj sentas nin kiel membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio, kaj la unuan fojon en la homa historio ni, membroj de la plej malsamaj popoloj, staras unu apud la alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj sed kiel fratoj [ĉi tie jam estas denove indikitaj aplaŭdoj] kiuj, ne altrudante unu al la alia sian lingvon, komprenas sin reciproke, ne suspektas unu alian pro mallumo ilin dividanta, amas sin reciproke kaj premas al si reciproke la manojn ne hipokrite, kiel alinaciano al alinaciano, sed sincere, kiel homo al homo» (Zamenhof 1990: 1557),

tiam estiĝis, laŭ okula atestanto, «ŝtorma entuziasmo; tute nekonatuloj kore premis la manojn unu de la aliaj; ili aklamis kaj aklamis»¹³; kaj preskaŭ tuj post tio Zamenhof eldiris la faman: «kunvenis ne francoj kun angloj [la tradiciaj malamikoj], ne rusoj kun poloj [same], sed homoj kun homoj» (samloke). Jen la unua publika esprimo de la homaranismo eĉ antaŭ ol Zamenhof elpensis ties nomon. Tia entuziasmo diferencis de kvazaŭa frenezigo de la publiko – ekzemple dum rokmuŝika koncerto de famega stelulino aŭ similaĵoj almenaŭ nun banalaj – ĉar, pri pli malpli sama okazaĵo ĉe la sekva UK (Ĝenevo, 1906), Carlo Bourlet komentis:

«Tiu komuniĝo de entuziasmo estis tiel forta, tiel stranga, ke profesoro de Psikologio ĉe la Ĝeneva Universitato, ĉeestinte ĉe tiu unua kunsido, kaj ne povante al si klarigi kiel kaj kial *lingvo*, *simpla lingvo*, povas naski tian uraganon de komuniĝema ekscititeco, petis de S^{ro} Rektoro Boirac, ke li verku por psikologia gazeto specialan artikolon klarigantan, kial lingvo povas tiel entuziasmi homojn ĝis frenezeco» (Ito 1984: 190).

Mi ne pli kompetentas ja ol universitata profesoro pri psikologio kaj do ne riskos proponi klarigon, sed tion i.a. mi nomas la *nelingvaj* trajtoj de la rolo de Esperanto, kiuj helpas en la interkultura komunikado, entuziasmigante do, aŭ tuj amikigante nekonatulojn. Krome, tio ofte ne kreas nur supraĵajn kaj efemerajn, senestontajn rilatojn, ĉar *daŭraj* amikiĝoj naskiĝis dum Esperanto-kongresoj kaj eĉ, prava estas la konata kaj netradukebla Esperanta vortludo, plej probable elpensita de Raymond Schwartz (cetere fondinto en 1913 de Esperanto-grupo nomita «Amika Rondo»), aŭ almenaŭ uzita de li en 1923, en la lasta strofo de lia poemo «La bona peranto»: «Esperanto (...) edzperanto».¹⁴

¹³ Aŭ, laŭ la unua eldono: „a scene of wild enthusiasm. Men shook hands with perfect strangers, and all cheered and cheered again” (Clark 1907).

¹⁴ „,‘ (...) Kaj kiam nin la pastro benas, / Ĝi estas dank’al Esperanto!’...
... La dua diris: ‘Mi komprenas, / Por vi ĝi estas... Edzperanto!’”, (Schwartz: 145)

Konklude

Nia historia studo, do kun klarigoj pri eblaj influoj per kiuj la kerno de la zamenhofa hilelismo kaj homaranismo montriĝas ankoraŭ pli interkultura ne nur en have, sed ankaŭ forme, celis nur prezenti nekutiman fenomenon (almenaŭ tiam), ligitan kun la interna ideo, pli detale priskribitaj en mia neeldonita tezo. Ĝi ne pretendis alporti respondojn, sed male demandojn. Ekzemple kial, pli ol aliaj lingvoj, Esperanto faciligas tre rapidajn amikiĝojn inter personoj de malsamaj landoj kaj kulturoj? Eble parte pro la nun ankoraŭ «vilaĝeca» karaktero de ĝia uzo, kiu intimigas la interparolantojn? (Tial mi aŭdis, plurfoje, esperantistojn konfesi ke ili *timas* eventualan tro sukcesan disvastiĝon de Esperanto ĉar tiam riskus malaperi la forta psikologia ligiteco inter Esperanto-parolantoj.)

Aŭ ĉu pro tio ke, kvankam relative facilan lingvon, ambaŭ uzantoj devis ĝin lerni, iom longe kaj eĉ ne tute sen peno, kaj preskaŭ certe ne por mona profito? ke do ĉiu scias ke ankaŭ la alia estas idealisto, do kara sam*ide*ano? Ĉu eble tial la reciproka kora malfermiĝo al la alia? Kaj tio pravigus la nuntempan almenaŭ francan sloganon: «La angla estas la lingvo de mono (aŭ fakte, pli slange, «monaĉo»: *du fric*), Esperanto la lingvo de koro.» Tiu dua parto delonge estis memstara frapa esprimo diverse formulita, ekzemple de Théophile Cart, «la amiko de la blinduloj» kaj iama prezidanto de la Akademio: «Esperanto estas la lingvo de boneco»¹⁵, aŭ laŭ aŭstralia ĵurnalisto: «Esperanto, lingvo de amo»¹⁶.

Bibliografio

- Assyrie. <https://www.universalis.fr/encyclopedie/assyrie/1-histoire>
- Berveling, Gerrit (trad.) 1992: *La bona mesaĝo de Jesuo laŭ Mateo*. Chapecó: Fonto
- Bicknell, Clarence 1915: Duobla akrostiko. En: *The Esperantist* 1905/12: 188.
- Böhtlingk, Otto (trad.) 1870–1873²: *Indische Sprüche: Sanskrit und Deutsch*, 3 vol. St' Petersburg: Commissionäre der Kaiserlichen Akademie der Wissenschaften
- Boulton, Marjorie 1962: *Zamenhof: Aŭtoro de Esperanto*. La Laguna: J. Régulo
- Cardascia, Guillaume & Lafforgue, Gilbert 1968: Assyrie. En: *Encyclopædia Universalis*. Paris: Encycl. Univ. France: vol. 2: 646–653.
- Clark, W.J. 1907: *International Language* [...]. Londres: J.M. Dent
- Colas, René-Claude (trad.) [1947?]: 1905. La 1^a universala Kongreso—Boulogne s/ Mer. En: R.-C. Colas, sen-titola manuskripta kajero sen loko nek dato (Parizo, 1947?): [11]-[21]
- Conybeare, F.C. & Rendel Harris, J. & Lewis, Agnes Smith 1913: *The Story of Aḥiḳar: From the Aramaic, Syriac, Arabic, Armenian (...) Versions* [1898¹], Cambridge: Univ. Press
- [Corret, Pierre sub pseŭdonimo Tedulo] 1906: Raporto pri la 2-a Universala Kongreso de Esperanto en Genève. En: *Lingvo Internacia* 1906/18; kaj reproduktita en Ito 1984: 201–232.
- Couvreur s.j., S. (trad.) 1895¹: *Les Quatres Livres* [...]. Ho Kien Fou: Impr. de la Miss. cath. Repr. sub *Entretiens de Confucius*, wengu.tartarie.com/Lunyu/Couvreur/Lunyu_15.htm

¹⁵ „L'Esperanto est la langue de la bonté” (Perret: série E, Div. I, F° 2,3 verso).

¹⁶ „Esperanto: A language of love.” (Jahshan).

- Davidson, William (ed.): *The [Babylonian] Talmud*. <https://www.sefaria.org/Shabbat.31a>
- Ganguli, Kisari Mohan (trad.) [1883–1896]: *The Mahabharata of Krishna-Dwaipayana Vyasa, Book 13 (Part one of two), Anusasana Parva*. www.sacred-texts.com/hin/ml3/index.htm (Scanned 2005. Proofed by John Bruno Hare, January 2005)
- Gerard, André-Marie 1989: *Dictionnaire de la Bible*. Paris: Robert Laffont
- Hennaux, Jean-Marie 1996: Plusieurs religions, une morale? En: *Nouvelle revue théologique*, 1996/4: 550–561. <https://www.nrt.be/fr/articles/plusieurs-religions-une-morale-236>
- [Ito K., sub pseŭd.] Ludovikito 1984: *La neforgeseblaj kongresoj*. [Kyoto?]: Eld. ludovikito
- Jahshan, Elias: Local news: Esperanto a language of love. En: *Advocate: Hornsby and Upper North Shore*, 18-11-2010.
- Konfuceo. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Konfuceo>
- Korĵenkov, Aleksander 2009: *Homarano*: [...] *Zamenhof*. Kaliningrad / Kaunas: Sezonoj / LEA
- Kosegarten, J. G. L. (ed.) 1848: *Pantschatantrum*. Bonnæ ad Rhenum: H. B. Koenig
- Lavarenne, Christian 2012: *Espéranto: Son idée interne dans ses origines et quelques-unes de ses expressions et manifestations* [...] ‘*Esperanto: La Interna Ideo en siaj originoj kaj kelkaj el siaj esprimoj kaj manifestiĝoj*’, neeldonita histori-doktora disertaĵo ĉe Université Paris 13 – Sorbonne Paris Cité
- 2019: Lazar Zamenhof (1859–1917): Du sionisme au hillélisme et de l’hébreu à l’espéranto ‘De sionismo al hilelismo kaj de la hebrea al Esperanto’. En: *Tsafon* 76, aŭt. 2018–vintro 2019: 123–142 <https://journals.openedition.org/tsafon/1379>
- Lengyel, Paŭlo de 1923: El miaj rememoroj: (Fino). En: *Literatura Mondo* 1923/1: 14–15.
- Mahābhārata* 1837: *The Mahābhārata* [...], vol. III : [...]. Calcutta: The Asiatic Society of Bengal. http://digital.onb.ac.at/OnbViewer/viewer.faces?doc=ABO_%2BZ182664808
- Mahābhārata* 1999: *The Mahābhārata: Electronic text* [...]. Pune: Bhandarkar Oriental Research Institute. <https://bombay.indology.info/mahabharata/welcome.html>
- Maimon, N[aftali] Z[vi] 1978: *La kaŝita vivo de Zamenhof*. Tokio: Japana E-Instituto
- Monier-Williams, Sir Monier 1899: *A Sanskrit-English dict.* Delhi: Banarsidass (repr. 1984)
- Mpala, Abbé Louis 2007: Sur la conception de l’Au-delà dans l’Égypte antique. En: *Mitunda* (Revue des Cultures Africaines./ Univ. de Lubumbashi), N° sp., okt. 2007: 87–103.
- Nau, François 1909: *Histoire et sagesse d’Aĥikar l’Assyrien* [...]. Paris: Letouzey et Ané
- Naumann, d-ro Aleksandro 1906a: Nefermita letero al s-ro de Beaufront. En *Ruslanda Esperantisto* 1906/6-7: 121–122. [kaj erare reproduktita en Zamenhof 1990: 1767–1771]
- [Naumann, d-ro Aleksandro] 1906b: Nefermita letero al s-ro de Beaufront: (de Homarano). En: *L’Espérantiste* 1906/7: 149–151.
- N[ekraso]v, N[ikolaj] V[ladimiroviĉ] 1929: Zamenhof en Moskvo: Nepublikigitaj dokumentoj [...]. En: *La Nova Epoko* 1929/[3]: 58–68. <http://data.onb.ac.at/rep/1001E5ED>
- Perret, Louis [1946–1957], *Feuillets encyclopédiques de documentation espérantiste: Ouvrage encyclopédique méthodique sur la Langue Internationale auxiliaire Esperanto*. [Lyon] PIV: *Plena ilustrita vortaro de Esperanto 2020*. <https://vortaro.net>
- Renou, Louis & Filliozat, Jean 1985²: *L’Inde classique* [...]. Paris: Adrien Maisonneuve
- Schwartz, Raymond 1923: La bona peranto: El la programo de kabaredo «Verda Kato», Parizo. En: *Literatura Mondo*, 1923/8: 145.
- Steinsaltz, Adin Even-Israel (trad.) [s.d.]: Shabbat 31 a. En: *The William Davidson [Babylonian] Talmud*. <https://www.sefaria.org/Shabbat.31a?lang=bi>
- Tobit 1975: *Le Livre de Tobit*. En: *Traduction Œcuménique de la Bible, éd. intégrale: Ancien Testament*. Paris: Cerf / Les bergers et les mages: 1949–1974.

- Truss, Margaret D. 1917: How I became an Esperantist, II. En: *The Esperanto Monthly* 1917/4–5: 37–38.
- Vetter, Paul (trad.) 1904: *Die Sprüche und die Weisheit Chikars* [...]: 330–364. En: Vetter, P., Das Buch Tobias und die Achikar-Sage. En: *Theologische Quartalschrift* 1904/3: 321–364/4: 512–539. http://idb.ub.uni-tuebingen.de/opedigi/thq_1904/pdf/thq_1904.pdf
- Waringhien, Prof. G[aston] 1948: *Leteroj de L.-L. Zamenhof*, 2 vol. Paris: SAT
- Wattles, Jeffrey 1996: *The Golden Rule*. New York: Oxford University Press
- Wiesenfeld, Edv. 1925: La Galerio de Zamenhofoj: D-o Ludoviko Zamenhof [...]. (Daŭrigo). En: *Heroldo de Esperanto* 1925/3: 1–2.
- Winternitz, Dr. M[oriz] 1909²: *Geschichte der indischen Litteratur*. Leipzig: C.F. Amelangs [Zamenhof, L.L., sub ps.] Дѣлѣ Эсперанто 1887: *Международный языкъ предисловіе и полный учебникъ: por Rusoj*. Varŝava [Varšava]: X. Kельтера [Ch. Kelter]. <http://data.onb.ac.at/rep/10039E3D>; kaj en la aliaj eld. de la t.n. „Unua libro”
- Zamenhof, L.L. [1898(?): *Obraŝŝenje k evrejskoj inteligentsji*. Traduko de Adolf Holzhaus titolita *Alvoko al la juda intelektularo*. En Zamenhof 1990: 1071–1115.
- [Zamenhof, sub pseŭd.] Homo Sum 1901: *Гиллелизм: проект решения еврейского вопроса*, trad. de Adolf Holzhaus (Helsinki: Fondumo Esperanto, 1972) sub la titolo *Hilelismo: Projekto pri solvo de la hebrea demando*, kaj repr. en Zamenhof 1990: 1123–1205.
- 1905: L[etero] al Michaux (21. II. [19]05). En: Waringhien: I, 105–115; kaj reproduktita en Zamenhof, L.L. 1990: 1436–1446.
- [Zamenhof: anonima letero «de la unua rondeto Hilelista»] 1906a: Dogmoj de Hilelismo. En: *Ruslanda Esperantisto* 1906/1: 1–11; kaj reproduktita en Zamenhof 1990: 1672–1682.
- [Zamenhof, L.L.] 1906b: Aldono al la «Dogmoj de Hilelismo». En: *Ruslanda Esperantisto* 1906/2: 27–28; kaj reproduktita en Zamenhof 1990: 1684–1685.
- [Zamenhof, sub ps.] Homarano 1906c: Pri la homaranismo: Respondo al P-ro Dombrovski. En: *Ruslanda Esperantisto* 1906/5: 102–106; kaj reproduktita en Zamenhof 1990: 1729–1739.
- 1906d: Parolado de D^{no} —: (Ĉe la malfermo de l’Kongreso). En: *L’Espérantiste* 1906/9: 209–211; repr. kun variantetoj en Corret 1906; Boulton: 138–141; Ito 1984: 215–216; Zamenhof 1990: 1782–1790.
- 1907: Esperanto and Jewish Ideals: Interview [...] with Dr. —. *The Jewish Chronicle* 6-9-1907:16–18. autodidactproject.org/esperanto2010/zamenhof_interview_1907.html; kaj <http://www.thejc.com/archive>; Esperanta traduko en Maimon: 161–173
- 1913: *Deklaracio pri homaranismo*. Madrid: Homaro. Konsultita ĉe <http://data.onb.ac.at/rep/1002ACC8>; kaj reproduktita en: Zamenhof 1991: 2582–2588.
- 1917: *Homaranismo*. Reproduktita en: Zamenhof 1991: 2720–2732.
- (trad.) 1926: *La sankta Biblio: [...] La Malnova Testamento: el la hebrea ori-ginalo trad.* —, Londono [...]: Brita kaj Alilanda Biblia Societo [repr. en 1931, 1947...]
- 1990: *Originalaro 2* [...]: *Ĝis la homaranismo, 1896–1906*, Tokyo: Ludovikito
- 1991: *Origin. 3* [...]: *Destino de ludovika dinastio, 1907–1917*, Tokyo: Ludovikito
- Zhang Qicheng: Idiomajhoj [tiele] en la china lingvo. <http://esperanto.china.org.cn/world/shi-wenhua/literaturo/11.htm>

2.

Esperanto: komunikilo por internacia parolantaro

Esperanto: a communication tool for international language community

Esperanto: narzędzie dla międzynarodowych użytkowników

Diferencoj inter orientaj kaj okcidentaj kulturoj en Esperanta Instruado

Abstract. Differences in Eastern and Western cultures in the instruction of Esperanto

Culture has close ties to language, they stimulate each other and develop together. In foreign language instruction, cultural differences between East and West have a very important effect on the development of students' ability to use a language. Esperanto is not only a language. While teaching Esperanto, both language and cultural knowledge should be taught to the same extent in order that students understand the characteristics of Western culture in order to better use their language knowledge. This paper is about the differences between Eastern and Western culture in the instruction of Esperanto, especially between Chinese and European cultures, including, for example, forms of address, kinship, using the phone and word associations.

Resumo. Kulturoj havas striktan ligitecon kun lingvoj, ili stimulas unu la alian kaj disvolviĝas kune. En la instruado de fremdaj lingvoj, kulturaj diferencoj inter Oriento kaj Okcidento havas gravegan efikon sur la kulturado de la lingva aplika kapablo de studentoj. Esperanto ne nur estas lingvo. En la instruado de Esperanto, lingva kaj kultura scioj devus esti samgrave instruataj por ke studentoj komprenu la karakterizaĵojn de Okcidenta kulturo por pli bone uzi la lingvan scion. Tiu ĉi prelego temas pri la diferencoj inter orientaj kaj okcidentaj kulturoj en Esperanta instruado, ĉefe inter ĉinaj kaj eŭropaj kulturoj, ekz. ĉe la flankoj kiel formoj de alparolo, parencoj, telefonado, la asociado de vortoj kaj tiel plu.

Enkonduko

Kun la akcelo de ekonomia tutmondiĝo la internaciaj interŝanĝoj nun pli kaj pli oftigas, kultura diverseco fariĝis ĉefa karaktero de tutmonda kulturo. Lingvo estas parto kaj portanto de kulturo, por ĉiuj kultureroj ĝi havas esprimon, ĝi spegulas la spiriton de siaj parolantoj (Koutny 1998). La riĉa diverseco de kulturo havas propran valoron de socia kohereco.


Diversaj lingvoj havas malsamajn kulturajn fonojn. La kulturaj diferencoj inter Oriento kaj Okcidento influas pensmanierojn de homoj, kaj la diferencoj en pensado kaŭzis lingvajn diferencojn (vd. Liu Ch. & Wang 2006, Liu M. 2015, Liu Y. 2015) .

1. Reflektitaj flankoj de kulturaj diferencoj inter Ĉinio kaj Okcidento

La kulturaj diferencoj inter ĉinoj kaj okcidentanoj estas tre videblaj, kio reflektiĝas en diversaj aspektoj kiel interhomaj rilatoj, parolmanieroj kaj vivmanieroj. La sekvaj bildoj (Liu Y. 2015) prezentas la diferencojn tre vive kaj precise (maldekstre la germana, do okcidenta aliro, dekstre la ĉina, do orienta).

1.1. Interhomaj rilatoj


En la Figura 1 ni povas vidi, ke Germanoj estas liberaj, senĝenaj kaj havas simplajn interhomajn rilatojn, sed Ĉinoj fervore interkomunikas kaj ŝatas societumi, havante komplikajn interhomajn rilatojn. Ĉina proverbo ja diras: “Unu plia amiko, unu plia vojo de oportuno por vi.”



Figuro 1: Kultura kontrasto ĉe interhomaj rilatoj inter Germanio kaj Ĉinio

1.2. Esprimi sian opinion


Eŭropanoj kaj usonanoj estas pli rektaj, dum ĉinoj ŝatas komplikigi simplajn aferojn kaj estas eŭfemismaj. Japanoj estas pli eŭfemismaj, ili apenaŭ malakceptas homojn rekte.



Figuro 2: Kultura kontrasto ĉe opini-esprimoj inter Germanio kaj Ĉinio

1.3. Alfronti problemon aŭ parol-maniero


Germanoj ŝatas rektan solvon, sed ĉinoj ŝatas saltadi ĉirkaŭ la afero aŭ danci kiel kato ĉirkaŭ poto.



Figuro 3: Kultura kontrasto ĉe problem-solvo kaj parol-maniero inter Germanio kaj Ĉinio

1.4. Statuso de gvidanto

Ĝenerale, ĉefo el okcidento estas sen-antaŭjuĝa, preta aŭskulti vin kaj efika; sed en Ĉinio, gvidantoj estas fieraj kaj malefikaj, ili havas pli altan statuson. La kialoj de ĉi tia diferenco estas pro historio, neskribitaj reguloj, kaj profunde enradikiĝinta en ĉiuj generacioj de Ĉinio.



Figuro 4: Kultura kontrasto ĉe statuso de gvidanto inter Germanio kaj Ĉinio

1.5. Aliaj flankoj

Malsamaj vivmanieroj kaj kulturoj kaŭzis diferencojn ĉe multaj flankoj: atendo, akurateco, vivmaniero, ktp. Ĉinoj ŝatas amasiĝi; okcidentanoj preferas tri ĝis kvin homojn kune. Maljunuloj en Ĉinio ŝatas prizorgi siajn nepojn; maljunuloj en Okcidento ŝatas vivi siajn proprajn vivojn. Ĉinoj ŝatas loĝi en grandaj familioj; okcidentanoj ŝatas loĝi en siaj propraj malgrandaj familioj.



Figuro 5: Kultura kontrasto ĉe aliaj flankoj inter Germanio kaj Ĉinio

2. Influo de kulturaj diferencoj en E-instruado

Oriento kaj Okcidento apartenas al malsamaj kulturaj sistemoj. Ili formas kaj disvolvas siajn proprajn sistemojn. La kulturaj diferencoj inter Oriento kaj Okcidento influas pensmanierojn de homoj, kaj la diferencoj en pensado kaŭzis lingvajn diferencojn. Ili rekte speguliĝas en la lingvolernado.

Kulturaj diferencoj montriĝas ankaŭ ĉe la esprimoj de salutoj kaj bondeziroj, manĝa kulturo kaj vivkutimoj, laŭdo kaj danko, titoloj kaj ĉiutagaj tabuoj, ferioj kaj festoj, idiomaj esprimoj, literaturaj aŭ historiaj aludoj, proverboj, ktp. La kialoj estas malsamaj pensmanieroj, malsamaj sociaj etiketoj, Malsamaj moroj, malsamaj kulturaj tradicioj, malsamaj kulturaj implicoj de vortoj kaj malsamaj imagoj.

2.1. Influo de malsamaj pensmanieroj

La kulturaj diferencoj inter Oriento kaj Okcidento respeguliĝas rekte en la malsamaj pensmanieroj. La orienta kulturo estas relative introvertita kaj implicita, fokusante al la tuto kaj konkreteco, dum okcidenta kulturo estas relative malferma kaj racia, fokusante sur la individuo kaj abstrakto. Ĉi tiuj diferencoj estas rekte reflektitaj en la lingvoj orientaj kaj okcidentaj. Ekzemple:

- Kie vi loĝas?
- Mi loĝas en Novjorko, Usono.
- Mia adreso estas: 1234 Long-strato, Novjorko, Usono.
(ANA PANA Leciono 1 Parto 1 – Saluton!)

El la vortordo-strukturo, oni povas vidi, pro la logika ordo de pensado, kiam ni respondas la demandon “Kie vi loĝas?”, okcidentanoj respondas laŭ la vico: numero, strato, urbo, provinco, lando, “malgranda unue kaj poste granda”, ekz. *Ana Pana, 1234 Long-strato, Novjorko, Usono*. Sed en oriento, ekz. en la ĉina lingvo, estas male: Lando, provinco, urbo, strato, numero, “granda unue kaj poste malgranda”.

Aliaj du ekzemploj estas pri telefonado kaj aĉetado.

Telefonado:

Okcidente: *Saluton/Haloo, parolas Anna. / Kun kiu mi parolas?*

En Ĉinio: *He, Kiu serĉas min? / Kiu vi estas? / Kiu?*

Aĉetado:

Okcidente: Vendisto: “*Ĉu mi povas helpi vin?*” / “*Per kio mi povas servi al vi?*”

Okcidentanoj ofte komencas el sia propra flanko.

En Ĉinio: Vendisto: *Kion vi volas aĉeti?*

Ĉinoj ŝatas preni sian kunparolanton kiel centron kaj konsideri la emociojn de la alia flanko. El tiuj ĉi ekzemploj videblas, ke ekzistas diferencoj en la pensmaniero inter ĉinoj kaj okcidentanoj.

2.2. Malsamaj sociaj etiketoj – Salutvortoj

Krom la kulturaj signifoj portataj de la lingvo mem, la moroj kaj kutimoj de okcidentaj landoj, vivstiloj de homoj, religiaj kredoj, pensmanieroj, ktp., ĉiuj havas ĉi tiun profundan kulturajn fonon kaj heredaĵon. Tial en Esperanto-instruado ni ankaŭ devas konigi al studentoj la kulturajn fonajn sciojn en oportuna maniero.

Ekzemple, diversaj kulturaj fonoj kreis malsamajn manierojn saluti kaj instruistoj devas plifortigi la penetradon de komunikada kulturo en la instruan procezon. En Ĉinio, dum longa tempo manĝado ĉiam estis nia aparta zorgado, tial homoj ĉiam kutimas diri “*ĉu vi jam manĝis?*” kiam oni renkontiĝas kaj salutas unu la alian. Fakte la parolanto ne tre zorgas pri tio, ĉu la salutito manĝis, sed nur por saluti unu la alian pro ĝentileco.

Ĉi tiuj vortoj ŝajnas al ni ĉinoj sufiĉe decaj, sed kiam eksteruloj aŭskultas tion, ili estas iom konfuzitaj. La ĉina salutmaniero “*Ĉu vi manĝis?*” en iuj okazoj povas sentigi al okcidentano, ke li estas invitita al vespermanĝo. La demando “*Kien vi iras?*” sentigas al ili, ke ili eble iras al loko, kien ili ne devus. Post la reformado kaj malfermo, influite de eksterlanda kulturo, kiam ni renkontiĝas, ofte ni diras “Saluton!”, “Bonan matenon!” kaj “Bonan nokton!”

En Esperanto-instruado, instruistoj povas kompari du malsamajn kulturojn por ebligi al studentoj eviti lingvajn erarojn en komunikado kaj pli taŭge uzi la lingvon. Ekzemple, oni devus esprimi dankon al aliaj anstataŭ esti humila; uzu “Bonvolu” en ĉiutagaj esprimoj, inkluzive inter familianoj.

2.3. Influo de malsamaj moroj

La kulturaj diferencoj inter Oriento kaj Okcidento speguliĝas ankaŭ en la iliaj moroj, precipe en vivaj moroj kaj sociaj moroj. Moroj rilatas al la specifaj kutimoj formitaj de diversaj etnoj en sia longdaŭra vivo. La tre malsamaj vivstiloj kondukas al signifaj diferencoj inter orienta kaj okcidenta moroj, kio ankaŭ kondukas al pliigo de diferencoj en la literaturo de la du.

a) titoloj

Teksto: La Familio

La familio Lang konsistas el kvar personoj: sinjoro Lang, sinjorino Lang kaj la du infanoj, Andreo kaj Maria. Andreo estas knabo kaj Maria estas knabino. Sinjoro Lang estas la patro de la infanoj. Sinjorino Lang estas la patrino. Gesinjoroj Lang estas la gepatroj; (Cresswell & Hartley 1968).

En Okcidento, vortojn kiel sinjor(in)o, fraŭl(in)o, doktor(in)o, profesor(in)o k.s. oni ofte uzas antaŭ propra nomo de persono. ekz. *Sinjoro Lang, Profesoro John Wells* aŭ *Profesoro Wells*; sed en Ĉinio, estas male, se traduki laŭ vorto: Lang sinjoro, Wells profesoro...

Ankaŭ la vorton numero oni ofte uzas en tia titoleca maniero: *Li loĝas en (ĉambro) numero 110. Ĉu vi legis numeron 12 de tiu gazeto?* Sed en Ĉinio, la vicordo estas mala.

b) formo de alparolo

En okcidentaj landoj, krom en iuj specialaj okazoj, ĉiuj povas nomi unu la alian per siaj nomoj, eĉ inter parencoj; sed en Ĉinio oni faras distingon inter la aĝoj kaj sociaj rangoj, tio estas la tradicia kultura koncepto de la Han-nacieco. Laŭ la pensmaniero de Han-nacieco, ĉiuj havas relativan identecon kaj statuson, kiu ofte estas enkorpigita per alparol-terminoj, kiuj inkluzivas okupojn. Tial la pliaĝajn maljunulojn oni devas voki per honora nomo, kaj ne decas diri la personan aŭ familian nomon laŭvole; por la plijunuloj, ĝenerale oni ne uzas iliajn plenajn nomojn rekte. Por subuloj ne decas rekte voki la superulon per lia nomo, ĉiam necesas komenci per titolo aŭ ofico, ekz. ZHANG direktoro, LI lernejestro, TAN urbestro... En la ĉina, vortoj kiel “instruisto”, “kuracisto”, “direktoro” kaj tiel plu povas esti uzataj kiel alparolaj terminoj. Ŝifu (“majstro”) estas la plej populara formo de alparolo inter la laboristoj. “Sinjoro” estas titolo de ĝentileco uzata por la viroj.

c) parencaj titoloj

Parencaj titoloj en okcidentaj lingvoj estas famili-centraj, ili distingas nur inter viroj kaj virinoj en generacio, ignorante la nomajn diferencojn inter la geedzoj pro seksaj diferencoj. La parenceco en Ĉinio kaj ĝia responda nomado estas ege komplikaj. Estas diferencoj inter viroj kaj virinoj, kaj ili estas bone organizitaj laŭ proksimaj parencoj kaj malproksimaj parencoj. Ekzemple la rilato inter kuzoj en la ĉina estas tre klara: kuzo de patrinflanka parenco kaj kuzo de patraflanka parenco, la diferenco estas tre strikta, ne nur distingi la sekson, sed ankaŭ aĝodiferencon. En Esperanto ĝenerale ekzistas nur kuzo kaj kuzino. Por patra generacio, ĉine distingiĝas:

Ye ye (爷爷): avo de patra flanko, Nai nai (奶奶): avino de patra flanko,
Wai Gong (aŭ Lao Ye) (外公、姥爷): avo de patrina flanko,
Wai Po (aŭ Lao Lao) (外婆、姥姥): avino de patrina flanko.

Alia ekzemplo, la nomado inter la gepatroj de la sama generacio: en Esperanto estas onklo kaj onklino, dum la ĉinaj ekvivalentoj estas dividitaj en 5 nomojn:

Bo bo (伯伯), pliaĝa frato de patro; en Esperanto: onklo
Shu Shu (叔叔): malpliaĝa frato de patro: onklo
Gu Gu (姑姑): fratino de patro, pliaĝa aŭ malpliaĝa: onklino
Jiu Jiu (舅舅): frato de patrino, onklo
A Yi (阿姨): fratino de patrino, pliaĝa aŭ malpliaĝa: onklino

La Han-nacieco strikte distingas parencecon, kiu originis de la feŭda kulturo de la Han-nacieco dum miloj da jaroj.

2.4. Malsamaj kulturaj implicoj de vortoj

Malsamaj naciecoj havas malsamajn valorojn por iuj samaj aferoj, kiel ekzemple: en okcidento oni kutimas plugi per ĉevaloj, sed en Ĉinio oni kutime plugas per bovoj. Tio estas, ĉar Britio uzis ĉevalojn por kultivi teron en la fruaj jaroj, dum Ĉinio uzis brutaron por kultivi teron pli ofte. Sed ĉi tiuj du specoj de bestoj estas sinonimaj de “diligento” kaj “laboregi sen plendo”.

Malsamaj kulturaj kutimoj rezultas malsamajn imagojn, la signifo de la vortoj kaj kultura enhavo ne egalas. La diferenco inter la ĉina kaj okcidenta kulturoj ankaŭ manifestiĝas en la kompreno de la signifo de iuj bestoj. Ekzemple drako kaj hundo. La dektria ĉapitro de Apokalipso prezentas bestegon suprenirantan el la maro. *La drako, tio estas, la diablo, donis al tiu ĉi bestego potencon por fari miraklojn, tiel ke la homoj adorkliniĝas al la drako kaj al la bestego.* Sed en ĉinaj antikvaj mitoj kaj en ĉina kulturo, drako estas miriga besto kaj simbolas favorajn

dignon, severecon kaj forton. Ĉinoj nomas sin “la posteuloj de la drako”. Kutime, oni esperantigas ĝin kiel “drako”, sed fakte, la esperanta vorto “drako” kaj la ĉina drako ne egalas. Laŭ PIV, “drako estas fabela besto, kiun antikvuloj imagis kun flugiloj, ungegoj kaj serpenta vosto”. Videble, “drako” havas flugilojn, sed ĉina drako, sen flugiloj.

Hundo estas neŭtrala vorto en la brita kaj usona kulturo, kaj ĝi estas ofte uzata por laŭdi aliajn. En la angla, *a luck dog* (bonŝanca hundo), *Love me, love my dog* (amu min, amu mian hundon), *Every dog has his day* (Ĉiu hundo havas sian tagon.). Tamen en Han-kulturo, hundo havas malestiman signifon, kiel: “hunda bastardo”, “hundo persekutata eĉ muron transsaltas”, “la hundo kuraĝas pro sia mastro”, ktp. Kvankam hundoj estas ŝatataj de pli kaj pli de homoj kiel dorlotbestoj en la lastaj jaroj, la stato de hundoj pliboniĝis en la koroj de homoj, tamen la malestima bildo de hundoj restis profunde en la ĉina lingvo kaj kulturo.

Pro malsamaj kulturoj, oni havas malsamajn vidpunktojn kaj ideo-asociojn al la aferoj. Malsamaj landoj kaj regionoj povas uzi malsamajn objektojn por esprimi saman vort-signifon.

3. Socia kaj kultura enhavo kaŭzita de diferencoj en asocia signifo

Por ĉinaj lernantoj, malfacile kompreneblaj estas idiomaj esprimoj, literaturaj aŭ historiaj aludoj kaj proverboj. Lingvo tute sen idiotismoj estus senviva kaj tro peza. Sed kutime idiotismoj havas nacian kulturen koloron, iasence reprezentante sian nacian pensmanieron kaj kutimon, Ili havas intimegan rilaton kun la kultura tradicio. Multaj aludoj venas el la “Biblio” kaj greka-romia mitologio, aŭ implikas rolulojn kaj eventojn el literatura trezorejo, ekz. la verkojn de Ŝekspiro. Esperanto estas kreita en Eŭropo, neeviteble ĝi kunportas kulturen faktoron de eŭropaj lingvoj.

Lernantoj ŝatas supraĵe interpreti la signifon de vorto aŭ frazo, ne kaptante en ĝi la sencon, implicitan sencon. Ekz: “*Danĝera estas bovo antaŭe, ĉevalo malantaŭe, kaj malsaĝulo de ĉiuj flankoj*” (Zamenhof 1990). Ĉu supraĵa senco aŭ metafora senco? Eĉ en la Esperanto-Ĉina vortaro (presita en la 1980-jaroj) nur aperis la traduko laŭvorte. Ĉi tie oni ne asociis kornojn de bovo kaj hufojn de ĉevalo, per kiuj ili vundos vin. Sed malsaĝa homo estas danĝera ĉiufanke, ĉar la malsaĝulo povas kaŭzi ĉiajn neatenditajn malbonajn aferojn

Alia ekzemplo: “*London jam staras al mi en la gorĝo. Pramas al Danio merkrede, poste trajnos norde*” (Johansson 2015). Kion signifas “stari al iu en la gorĝo”? Multaj konjektis laŭ la vorto “gorĝo”, ke ĝi eble havas saman signifon kun ĉina idioma esprimo 如鯁在喉 [rú gěng zài hóu], sed ĉu vere ili havas saman signifon? Jen ĝia supraĵa senco: havi fiŝoston en la gorĝo, sed la metafora senco estas, ke vortoj en la koro ankoraŭ ne eldiritaj, malĝojigaj.

Konkludo

Estas multaj kialoj por la diferencoj inter ĉina kaj okcidenta kulturoj, sed ili estas ĉefe kaŭzitaj de la diferencoj en la historio, geografia medio, vivmaniero, homa kaj socia medioj de la ĉina kaj okcidentaj landoj kaj malsamaj kulturaj originoj. Do, lingvoinstruado devas kunfandiĝi kun kultura fono de la lingvo.

En Esperanto-instruado, ni devas ne nur trakti kulturen edukadon kiel la bazon, sed ankaŭ preni la kapablon kompreni kaj regi la kulturon de okcidentaj landoj kiel unu el la gravaj kriterioj por testi la efikecon de lingvoinstruado. En la praktiko de Esperanto-instruado, nur kiam instruistoj gvidas studentojn precize kompreni la diferencojn inter orientaj kaj okcidentaj kulturoj, ili povas antaŭenigi ĝustan komprenon de malsamaj moroj kaj kutimoj en la kunteksto de okcidentaj kulturoj, kaj ankaŭ povas plibonigi la kapablon de studentoj uzi Esperanton.

Ankaŭ okcidentanoj devus konsideri la efektivajn bezonojn de transkultura komunikado kun orientaj studentoj dum kompilado kaj kreado de estontaj lernolibroj de Esperanto kaj retejoj kiel lernu.net, kaj taŭge enkonduki la sciojn pri multkultureco. Ankaŭ la venonta eldono de PIV devus indiku ekz. ke la drako en la ĉina kulturo malhavas flugilojn.

Bibliografio

Ana Pana <https://lernu.net/eo/biblioteko/119>

Auld, William 1986: *Kulturo kaj internacia lingvo*. Chapeco: Fonto

Cresswell, John & Hartley, John 1968: *Teach yourself Esperanto*. English Universities Press. 2nd ed.

Johansson, Sten 2013: *Marina*. Novjorko: Mondial

Koutny, Ilona 1998: Interkultura komunikado. En: Wandel, A. (red.) 1998: *Internacia Kongresa Universitato*. Rotterdam: UEA <http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/interkultura-komunikado.html>

LIU Yang 2015: *East meets West*. Köln: Taschen

LIU Chang-yuan & WANG Song, 2006: The Importance of the Introduction of Cultural Background Knowledge Into the Teaching of English Vocabulary. *Journal of Harbin University*, 2006/27(4): 91–94.

YU Miao 2015: The influence of cultural difference between China kaj Western countries on college English teaching. *Heilongjiang Science* 2015/7: 228–229.

Zamenhof, L.L. 1910: *Esperanta proverbaro*. Ĉina eldono en 1990. Vd ankaŭ <http://www.proverbaro.net>

Komuniki trans kulturaj baroj per Esperanto

Abstract. Communication in Esperanto across cultural barriers between Europeans and Asians

Esperanto was born in Europe, in the 19th century, and it has chiefly evolved within the European cultural area so almost naturally it has absorbed European cultural features known to all those in the continent. Who has never heard of the Trojan War, Hamlet or at least one version of the proverbs in Zamenhof's collection? But can anyone be certain that a Chinese, Vietnamese or Japanese person has also heard of them or understands the meaning when they hear someone say "That woman is a real Venus" or "That woman is more beautiful than Helen of Troy"? At times, some of these stories are known through recent American movies, but these certainly don't convey everything that the originals do. Some others are simply not well known stories in the East. But the opposite is also happens. What educated European has read the national epic poem of Vietnam or can cite three classic Chinese novels?


Therefore speaking of Esperanto to a global audience it is necessary to pay special attention to metaphors and to clarify them as far as possible in the text or in footnotes. The author presents a list of European expressions which are not necessarily understandable across the world and also Asian sayings which need clarification for Westerners. To communicate or not to communicate across cultures? – that is the question.

Resumo. Esperanto naskiĝis en Eŭropo, en la 19-a jarcento kaj ĝi evoluis ĉefe en la eŭropa kulturzono, do preskaŭ nature ĝi ensorbis eŭropajn kulturaĵojn konatajn al ĉiuj en Eŭropo en tiu epoko. Kiu neniam aŭdis pri la milito de Trojo, Hamleto aŭ almenaŭ unu nacilingva versio de la proverboj en la Proverbaro de Zamenhof? Sed ĉu vi certas, ke ĉino, vjetnamo, japano same aŭdis kaj komprenas la sencon, se vi diras ion kiel „Tiu virino estas vera Venuso” aŭ „Tiu virino estas pli bela ol Heleno el Trojo”? Foje, Kelkaj el ĉi tiuj rakontoj estas konataj tra lastatempaj usonaj filmoj, kiuj certe ne redonas ĉion de la originalaj verkoj, kelkaj aliaj simple ne estas rakontataj en la Oriento. Sed ankaŭ la malo okazas. Kiu edukita eŭropano legis la nacian eposon de Vjetnamo aŭ povas citi el klasikaj ĉinaj romanoj?

Pro tio, parolante en Esperanto al tutmonda publiko, oni devas aparte atenti pri siaj metaforoj kaj klarigi ilin laŭeble en la teksto aŭ en piednotoj. La aŭtoro prezentas liston de eŭropaj metaforoj, kiuj ne estas kompreneblaj tutmonde kaj ankaŭ aziajn diraĵojn, kiuj bezonas klarigon por okcidentanoj. Komuniki aŭ ne komuniki transkulture? – tio estas la demando.

1. Antaŭparolo kaj pravigo de ĉi tiu temo

Anaksimandro el Mileto, naskiĝinta en la jaro 610 antaŭ nia komuna erao, estis la unua filozofiisto, kiu notis skribe siajn pensojn. Tiamaj filozofiistoj estis fakte ĝeneralaj sciencistoj kaj li interalie produktis la unuan mapon de la mondo, kiu, laŭ li, aspektis tiele:



Alivorte por li la mondo konsistis el tri kontinentoj: Eŭropo, Azio kaj Afriko (Libio estis ĝia nomo). Azio kaj Afriko estis dividitaj de la rivero Nilo kaj Eŭropo kaj Azio de la rivero Don (la tiama greka nomo estis alia). En la 2500 jaroj post Anaksimandro la mapo ŝanĝiĝis, sed la mondo restas dividita en kelkaj partoj, certe ĝi restas dividita kulture. Oni multe aŭdis dum la lastaj jardekoj pri tutmondiĝo/tutmondigo per la angla vorto *globalization*, sed temis fakte nur pri bela kovrilo, sub kiu marŝis la klopodo inundi la mondon per la usonaj varoj kaj ĝenerale per la varoj de la ekonomie evoluintaj okcidentaj landoj. La klopodo estis retirita, kiam oni rimarkis, ke ankaŭ subevoluintaj landoj komencis utiligi ĝin por inundi per siaj varoj. Ĉiuokaze la kulturo de azianoj, eŭropanoj kaj amerikanoj restas malsamaj. Ĉi tie ‚kulturo‘ estas la tuto de la scioj pri la mondo, la historio, la literaturo de la normalaj homoj.

La tuta ideo pri internacia lingvo uzinda inter malsamlingvaj grupoj estas ideo eŭropa, kaj la esploroj pri ĝi daŭris kelkajn jarcentojn ek de la Renesanco, kiel klare montras Umberto Eco (1993). Zamenhof estis sendube Europa, eĉ profunde mezeŭropa kaj la kreado de Esperanto certe daŭrigas la vojon de la serĉado de perfekta lingvo en la eŭropa kulturo. La ideo, kiu fine konkretiĝis en Esperanto, esence estas eŭropa ideo. Ĝi naskiĝis en la Renesanco kiel reago al la fino de la latina lingvo kiel kultura interlingvo de ĉiuj kleraj eŭropanoj kaj vastiĝas poste per filozofiaj konsideroj al la kreado de perfekta lingvo, en kiu ne eblas mensogi, kaj fine per konsideroj pri la bezono de lingvo por ĉiuj malsamlingvaj popoloj. Dum tiuj jarcentoj eŭropanoj vojaĝis tra la mondo kaj kreis vastajn multlingvajn imperiojn. Cetere la sola interlingvo naskiĝinta

ekster Eŭropo, *Balaibalan* (Bausani 1974) ŝajnas havi pli religiajn celojn ol interlingvaj celojn kaj *Zilengo*, kreaĵo de japana esperantisto, Oka Asajiro, en 1889 estas nur dumtempa provo plibonigi Esperanton, poste forlasita de la proponinto mem.

Ĉiuokaze Zamenhof, ne estante profesia lingvisto, sukcesis fari ion, kion ĉiuj profesiaj lingvistoj taksus neebla. Fakte lia laboro estas plie sekvo de poeta vizio ol de lingvista analizo. Li kreis lingvon, kiu estas preskaŭ perfekta miksaĵo de la lingvoj de la mondo (Gledhill 1998: 19–23) kaj tamen facile lernebla kaj facile uzebla. Ĝi havas strukturajn elementojn de la izolaj lingvoj (ĉina kaj iugrade angla), de la aglutinaj lingvoj kaj de la fleksiaj hind-eŭropaj lingvoj. Pluraj aliaj aŭtoroj traktas la saman temon kun konkludoj parte samaj kaj parte malsamaj. Ekzemple Piron (1977) trovas ke la trajtoj komunaj inter Esperanto kaj izolaj lingvoj (li komparas Esperanton kun la ĉina) estas absolute pli gravaj. Aliaj, ekzemple Wells (1989) substrekas la aglutinecon kaj iugrade sintezecon de Esperanto, dum pritrakto de la hind-eŭropaj elementoj de Esperanto estas troveblaj en Jansen (2010) kaj ĝenerala artikolo pri ĉi triu temo estas tiu de Koutny (2015).

2. La antaŭvido de Ferdinand de Saussure aplikiĝis ne nur al semantiko, sed ankaŭ al la kulturo

La konata antaŭvido de Fernand de Saussure, kiu rilatis ĉefe al la signifo-kampo de vortoj aplikiĝis ankaŭ al la kulturo ligita al Esperanto. Saussure estis dirinta (en Nascentes 2015): “Kiu kreas lingvon, havas ĝin sub kontrolo dum ĝi ne eniras en cirkuladon; sed ekde la momento, kiam ĝi plenumas sian mision kaj fariĝas ĉies posedaĵo, forfuĝas el kontrolo. Esperanto estas eseo de tiu specaro; se ĝi triumfos, ĉu ĝi eskapos al la fatala leĝo? Post la unua momento, la lingvo eniros tre probable en sian semiologian vivon; ĝi dissendiĝos laŭ leĝoj, kiuj havas nenion similan al tiuj de sia refleksiva kreaĵo, kaj ne plu povos malantaŭeniri”.

Ĉar Zamenhof estis profunde mezeŭropa kaj komence proponis sian lingvon al eŭropanoj, interalie, kiel oni supozas, por reagi al la kreskanta naciismo vaganta tra Eŭropo en tiu periodo (Hjartson 2014), li ne povis ne komenci provizi sian lingvon per tradukoj de verkoj vaste konataj en Eŭropo. La unuaj tradukoj estas tiu de „Patro nia”, partoj de la Biblio kaj poemo de Heinrich Heine [Hajnriĥ Hajne]. Lia unua grava tradukaĵo estis *La Batalo de l' Vivo* de Charles Dickens (1891). En 1894 aperis *Hamleto* de William Shakespeare kaj en la postaj jardekoj sekvis *La Revizoro*, komedio de Nikolaj Gogol (1907), *La Rabistoj* de Friedrich Schiller (1907), *Ifigenio en Taŭrido* de Johann Wolfgang von Goethe (1907), *Marta* de Eliza Orzeszko (1910). El la *Malnova Testamento*, L.L. Zamenhof tradukis inter 1907 kaj 1914 plurajn partojn kaj post lia morto, aperis la traduko de la *fabeloj* de Hans Christian Andersen.

En la unua jarcento de Esperanto la eŭropeco pliiĝis. Kvankam jam en la komenco de la 20-a jarcento ĉinaj kaj japanaj anarĥismaj studentoj lernis Esperanton en Tokio

kaj faris grandiozajn planojn anstatŭigi la klasikan ĉinan per Esperanto por eduki la amasojn, la nombro de uzantoj de Esperanto en tiu mondoparto restis relative malgranda. Ni konsideru la literaturajn skolojn de la unua jarcento de Esperanto kaj ni vidos ke ĉiuj nomoj rilatas al Eŭropo: Budapeŝta skolo, Hispana Opo, Ibera Skolo, La Patrolo (itala), Skota Skolo, Moskva Skolo (Lapenna 1974).

La unua verko sendube neeŭropa la „Malsata ŝtono” aperas en la serio Oriento-Okcidento en la jaro 1961. Ekzistis ankaŭ malgranda japana skolo inter la du mondmilitoj kaj komencis aperi multaj tradukoj el la ĉina post 1949. Estas malfacile doni statistikajn ciferojn pri la kvanto da kulturajĵoj neeŭropaj, kiuj iĝis komuna propraĵo de esperantistoj en la mondo, sed ni povas aserti sen timo pri kontraŭdiro, ke ili estas malmultaj.

Ni konsentas kun Koutny (2018) pri la konsistaj partoj de la kulturo de Esperanto:

La Esperanto-kulturo ekzistas pro ĝia parol-komunumo, kaj Esperanto evoluis pro la uzado dum 130 jaroj en internacia komunikado. La lingvo prezentas elementojn de – internacia kulturo inkluzive de elementoj de universala kaj amas-kulturo; – la kulturojn de la font-lingvoj, ĉar la vortaro kaj sekve la mapado de la mondo estis prunteprenita el eŭropaj lingvoj kaj – la propra kulturo de Esperanto, kiu evoluigis siajn proprajn kulture ŝarĝitajn elementojn, konservante samtempe ioman trariveblecon pro la aparta kunmeta strukturo de la lingvo.¹

Aliflanke en ĉi tiu kontribuo ni interesiĝas pri fiksitaj frazoj troveblaj en skribitaj tekstoj en libroj kaj revuoj, kiuj estas elĉerpe troveblaj en Fiedler (1999). Kun ĉi tiu lasta aŭtorino ni plene konsentas, ke „granda parto de la frazeologiaj unuoj reiras al pruntaĵoj el eŭropaj lingvoj, kies fontoj estis ĉefe la mitologio kaj la antikva historio” (Fiedler, 1999: 67–68) kaj ke „aparte ofte” oni uzas bibliajn frazeologiaĵojn (Fiedler 1999: 69). Ni ne aparte interesiĝas ĉi tie pri la kulturaj elementoj kreitaj de la movado de la parolantoj de Esperanto, kiuj estas laŭ mi elementoj de iu speco de internacia subkulturo de la parolantaro de Esperanto kaj rilatas al agadoj tipaj de ĉi tiu movado. Pri ĝi oni abunde parolas Melnikov en multaj verkoj (ekz. Melnikov 1992).

Intertempe la lingvo disvastiĝis tra Afriko, Azio kaj Suda Ameriko kaj la disvastiĝo de la interreta komunikado igis ĝin vere tutmonda. Pro tio la verkinto kaj iugrade la parolanto en Esperanto ne povas certi pri la konateco de la kulturaj aludoj, kiujn ni renkontas je ĉiu paŝo en nia literaturo kaj en solenaj paroladoj. Cetere pri multaj lingvo-kulturaj malfacilaĵoj de azianoj kaj specife de ĉinoj prezentas interesan resumon la ĉina Gong Xiaofeng (esperanta nomo: Arko, dum la 5a Interlingvistika Simpozio

¹ Esperanto culture exists because of its speech community, and Esperanto is developing due to its use during 130 years in international communication. The language manifests elements of: – international culture including universal and mass culture elements; – the source languages’ cultures, because the vocabulary and therefore the mapping of the word is borrowed from European languages, and – Esperanto culture itself, which has developed its own culturally charged elements, at the same time conserving a kind of transparency due to the special compositional structure of the language.

en AMU, Poznano, artikolo en tiu ĉi volumo). Ŝi aparte atentigis pri la malfacilo kompreni metaforajn dignifojn.

3. Ekzemploj kun komentoj

Ni transiru nun al la praktiko per ekzemploj kolektitaj el literaturaj verkoj okcidentaj kaj orientaj ĝenerale ne reciproke kompreneblaj, kolektitajn kaj troveblajn en la retejo: http://bonalingvo.net/index.php/Esprimoj_ne_tutmonde_kompreneblaj. Tamen mi donas ekzemplojn de efektiva uzo nur de la okcidentaj esprimoj ne kompreneblaj por azianoj. La aziaj ekzemploj, aliflanke venas el kelkaj literaturaj verkoj apenaŭ legataj en Eŭropo.

BELECO

Venuso= Diino de amo (*laŭ la praa okcidenta mitaro*). Metafore: belega virino. (*tuteŭropa*)
virino estas kiel abrikot-arbo = ŝi estas bela (*el la vjetnama*)

Sufiĉas rigardo en la reton por trovi ekzemplon el la vaste legata *Kredu min, sinjorino* de Reto Rossetti: *Belega, pompa Venuso aperis ĉe la pordo. Je la sep pereigaj pekoj, ŝi estis rava, kaj ŝi rigardis min en maniero, kiu forprenis al mi la spiron.*

BONECO

virino estas kiel neĝo = ŝi estas bonkora (*el la vjetnama*)

ERARO

Foje eĉ Homero dormetas! = tri zamenhofaj proverboj kun simila signifo: *Peko kaj eraro estas ecoj de l' homaro.*; *Kiu ne pekis, kiu ne eraris?*; *Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras.* La baza signifo estas: eĉ tre famaj homoj foje eraras aŭ **Homero** kiel ĝenerala nomo por poeto.
La fontaine estas kvazaŭ la homero de la francoj. En <http://verkoj.com/index.html>

DECIDO

Tansiri la riveron Rubikono = fari decidon nemalfareblan (*la rivero Rubikono estis la norda limo de la teritorio de Romo, kiun armeo ne rajtis trairi, sed Julio Cezaro dum la intercivitana milito decidis trairi ĝin kaj tiel ataki Romon mem.*)

Multegaj ekzemploj estas en Esperanto-tekstoj en la reto. Ni ŝatas mencii el *Heroldo Komunikas* (HeKo 662 9-E, 27 okt 17): *Madrido kaj Barcelono jam trans la Rubikono.* Temas pri tio, ke la kataluna parlamento voĉdonis favore al sendependiĝo el Hispanujo.

FINO DE LA MONDO

kolonoj de Herkulo = fino de la mondo, Gibraltaro (*laŭ la greka mitaro Herkules metis du kolonojn je la fino de la mondo tiama*).

La esprimo troviĝas eĉ en la reta revuo *uea.facila*, kvankam kun sufiĉa klarigo: *Ili pasas inter la altaĵoj de Ĝibraltaro ĉe la sudo de Eŭropo kaj la nordo de Afriko. Iuj nomas tiun lokon "La Kolonoj de Herkulo"* (<https://uea.facila.org/artikoloj/lega-%C4%B5oj/%C4%89u-la-unua-scienc-fikcia-libro/>)

HELPO SOLVI PROBLEMOJN

la fadeno de Ariadne = helpilo por solvi malfacilan problemon (*laŭ la greka mitaro Ariadne donis al la heroo Teseo grandan fadenbobenon, kiun li utiligis por trovi la elirvojon en labirinta palaco en Kreto, kiun li eniris por mortigi monstron, kiu postulis homajn oferojn*)

Ĝi estas eĉ titolo de libro relative frua en la movado: *Ariadna fadeno: universala alfabeto nomaro-adresaro (ANA); unua provo de enciklopedio de l'esperantismo (1914-1917)* de Vladimir Franceviĉ Szmurlo. Reeldonita de S.N. Kuznecov (kunlabore kun kompanio *Rutenia*) en 1993 de la eldonejo Impeto.

IZOLECO

ebura turo = izolita loko, loko de izoliĝo (*ĝenerale dirata pri intelektuloj, kiuj ne okupiĝas pri la vera mondo*).

La esprimo venas el la Biblio: *Kanto de la Kantoj*, kie temas pri princino: *Via kolo estas kiel turo konstruita el eburo, kaj fiero estas via nazo, kiel Libanona turo/rigardanta al Damaskus*, sed estas vaste uzata en eŭropaj lingvoj, ankaŭ en la okcidenta literaturo en Esperanto. Ni citas nur pometon de Blazio Wacha: *Poemeto je turo ebura: Havas mi eburan turon, en la mur' mi havas truon, okul-preme mi rigardas, ĉu la sun' ekstere ardas* (el la retejo *Ipernity*).

KONFUZO

bordelo (*en la senco de ,konfuzo, ĥaoso, malordo, sendisciplino*) = konfuzo, malordo, ktp. laŭ la senco en la unuopa okazo (*almenaŭ itala*).
turni aferon sur la kapon = turni aferon kapon malsupren = tute renversi.

KONTRAŬADO

advokato de la diablo = iu, kiu principe kontraŭas, kontraŭanto (*eŭrop-katolika*).

En unu el la plej konataj lingvaj retejoj: *Tatoeba*, ĝi estas la frazo 555460: *Li lacis de sia rolo kiel advokato de la diablo kaj li nun aprobas ĉiun ideon, kiun ili sugestas senkonsidere de ĝia stulteco*. La esprimo originas el la eklezia procedo por aprobi la sanktecon de homo. En tiu procedo aparta funkciulo havas la taskon fari ĉiujn demandojn por pruvi, ke la homo ne meritas esti sanktulo. Evidente en la fino normale oni pruvas, ke li ja meritas

LUMO

ne metu vian lampon sub grenmezurilon = ne kaŝu vian scion de aliaj homoj / ne lasu aliajn homojn en ignoro (el la Evangelio).

El la *Evangelio: Parabolo de la Lumo*, en kiu oni admonas ke, se oni eklumigas lampon, oni ne metu ĝin sub sitelon, por kaŝi la lumon de aliaj homoj. Oni trovas ĝin en Esperanto en religiaj verkoj kiel *Kristana Spiritismo: Kiam oni bruligas lampon, oni metas ĝin ne sub grenmezurilon, sed sur la lampingon; kaj ĝi lumas sur ĉiujn, kiuj estas en la domo* (Mateo 5:15).

MALBONHUMORO

iu havas kazon de la lundoj = el la usona *,someone has a case of the Mondays!* = Iu havas lundan malsanon, aŭ iu (ĉi tie) grumblemas pro lundo, tago de re-ek-laboro.

MALFACILO, MALEBLO

estas pli facile por kamelo/elefanto iri tra kudril-truo, ol ke io okazos = estas absolute maleble, ke io okazos.

Eŭropa dirmaniero baziĝanta sur la kristana *Evangelio*, kiun oni trovas eĉ en la Reta Vortaro ĉe la kapvorto ,tra' por doni ekzemplojn de akuzativo post prepozicio: *Estas pli facile por kamelo iri tra trueton de kudrilo, ol por riĉulo eniri en la regnon de Dio*.

grimpi sur spegulo = Ĉerpi akvon per kribrilo; Batadi la venton (*fari ion maleblan*).

MALŜPARADO

ĵeti monon tra la fenestro = malŝparegi (*dirmaniero en kelkaj eŭropaj lingvoj*).
Li havas truon en la manplato = Li malŝparegas.

MENSOGO

blanka mensogo = bonintenca mensogo,
ruĝa mensogo = kompleta mensogo, vera mensogo.

MIELMONATO

post-geedziĝaj semajnoj.

MOŜTULO

bonz-o (en la senco de ,moŝtul-o') = moŝtulo (germana)

Tiam li [Auld] fariĝis vera bonzo, legata de malmultaj sed uzata de ĉiuj (el artikolo en *Libera Folio: Mortis la bonzo, restu la bardo* de Goncalo Neves).

PERFIDO

kvina kolono = organizaĵo, ĉefe armea, pli malpli neformala, kiu agas kaŝe en lando aŭ urbo por subteni la invadontan malamikon.

La esprimo naskiĝis dum la hispana civitana milito, kiam 4 armeaj kolonoj estis atakontaj Madridon kaj la generalo de la atakonta armeo parolis pri supozata ,kvina kolono' interne de la urbo mem, kiu favorus la invadon. Nun la esprimo estas uzata en ĉiuj kampoj, ankaŭ politika, socia, ktp. Ekzemplo el artikolo en la Esperanto-eldono de *Le Monde diplomatique* de 2015: *Ĝia dua projekto estas instigi la plej multajn okcidentanojn kredi ke iliaj islamaj samlandanoj povus esti „kvina kolono” en la ombro, „interna malamiko” en la servo de la mortigistoj.*

RESPEKTO, ADMIRO

levi/forpreni sian ĉapelon (antaŭ iu)! = admire saluti iun = respekte/admire depreni de si la ĉapelon, respekte/admire saluti (okcidentanoj salutis sin per levado/forprendo de sia ĉapelo).

REZIGNADO

enĵeti la bantukon (en la senco de l'kapitulaci') = kapitulaci, rezigni. La esprimo venas el la angla "throw in the towel" aŭ similaj nacilingvaj esprimoj uzataj dum boksado).

SENFINA LABORO\

Sizifa laboro = senfina laboro

Laŭ la greka mitaro Sizifo, reĝo de Korinto, pro malbonaj agoj dum la vivo estis kondamnita en la transmondo ruli ŝtonojn al la pinto de monto, de kiu la ŝtono daŭre refalis al la bazo de la monto. Ekzemplo el la respondo de leganto de *Libera Folio* al artikolo pri la labor-plano: *Denove estas sizifa laboro farita.*

SENVALORECO

esti la kvina rado de ĉaro = esti senutila, superflua (*en kelkaj eŭropaj lingvoj*).
akvo-lento = sensignifa persono, senpova homo (*el la vjetnama*).

TIMO

Kiun mordis serpento, timas ecx de lacerto. = La timema homo timas eĉ nedanĝeran aferon (*hungara diraĵo*).

TROMPO

troja ĉevalo = Ŝajne sendanĝera propono aŭ ilo aŭ maniero por eniri malamikan lokon aŭ ideon kun la intenco detruigi ĝin el la interno.

Mita evento dum la milito de grekoj kontraŭ la urbo Trojo, en kiu grekoj proponas donaci al la urbo grandan lignan ĉevalon honore al loka dio, kiun oni enportu en la urbon, dum en la realo grekaj soldatoj estas kaŝitaj en la ĉevalo kaj poste atakos la urbon el la interno. Ekzemplo el la reto en recenzo de la revuo MONATO, 2004: *Legantoj de ĉi tiu libro kaj observantoj de la aktualaj Eŭropo kaj mondo apenaŭ povas nei, ke la angla iĝas troja ĉevalo, ruze donacita de la imperiismaj potencoj de tutmondigo, kaj blinde akceptita de socioj alilingvaj kaj alikulturaj, kiuj senzorge malfermas siajn pordegojn por enlasi ĝin.*

PLURAJ ESPRIMOJ PRI PLURAJ TEMOJ

da A ĝis Z = tute, de la komenco ĝis la fino (*de la unua ĝis la lasta litero de la latina alfabeto*),

disigi alcionojn/sovaĝajn anserojn = disigi fidelan/amantan paron (*el la vjetnama*),

engluti sian fierecon = bridi/subpremi sian fierecon. (*el eŭropaj lingvoj*),

familio de broĉoj kaj bendoj = nobela familio (*el la vjetnama*)

freŝa menso/freŝa kapo = ripoziĝinta menso/kapo: ekzemple *fari ion ĉe freŝa menso/kapo en la mateno*.

havi skeleton en la ŝranko = havi kaŝindan sekreton (*en la vivo de ĉiuj estas malbelaj agadoj, kiujn oni kaŝas de la mondo*).

Ekzempla frazo 923410 de *Tatoeba*: *Ĉiu familio havas skeleton en la ŝranko.*

imposta paradizo = impost-evita lando, mild-imposta lando,

(jen) hoko en la ezoko (*en la senco 'jen la problemo'*) = jen problemo Temas evidente pri erara uzo de la proverbo "ankoraŭ ne estas la ezoko sur la hoko", kies senco estas klara: 'ni ne finfaris nian laboron'.

je la aĝo de 15 jaroj knabino pinglas siajn harojn = ŝi estas preta por edziniĝo *el la vjetnama kaj aliaj aziaj kulturoj*) entk 01.

kirli la maron kaj serĉi ambrozion = fari malfacilan serĉan taskon (*en aziaj verkoj*), simile al ‚serĉi kudrilon en fojnamaso’ en okcidentaj lingvoj,

knabino kun ruĝa pantalono = bonstata knabino, bonedukita kabino (*el la vjetnama*),

kokono = en metafora senco komforta nesto, ne estas tutmonde komprenebla, en Ĉinujo ĝi estas komprenata kiel amaso da problemoj, kiujn oni kreis por si. Diru ekzemple *komforta familia nesto!*

Kopernika revolucio = granda ŝanĝo, transiro de la sistemo ter-centra al la sistemo suncentra. Nikolao Koperniko estis pola ĉielsciencisto, kiu favoris la sistemon sun-centran.

El *La Lakta Vojo – nia hejmo en la universo*, artikolo prezentita en la Internacia Kongresa Universitato 2005, Vilno, Litovujo: *Konklude montriĝis ke okazis kvazaŭ dua Kopernika revolucio, ĉifoje rilate al la centro de nia stelsistemo.*

kri-kolora = bril-kolora

kukuma periodo = sennovaĝa periodo (*ĵurnalisma slango en kelkaj eŭropaj lingvoj*)

legi diagonale = legi rapide por kapti la ĝeneralan signifon

levi la ŝultrojn = en kelkaj lingvoj tio montras nescion, senhelpecon, nekomprenon aŭ indiferecon

lukto inter Davido kaj Goliato/Goljato = malegala lukto, lukto inter fortulo kaj malfortulo (el la Biblio: juna juda paŝtisto, Davido, mortigas malamikan giganton, Goliaton/Goljaton).

Ekzemplo el artikolo en la projekto „min produktas vi” (<https://sites.google.com/site/minproduktasvi/home>): *Nur necesas trovi la rimedon, kiu anstataŭos la aŭtorrajtan kaj komercan sistemon, en kiu Davido malvenkis kontraŭ Goliato pro uzo de la samaj bataliloj.*

malvarma sango = en figura senco, egalas al sinregado, memregado aŭ al foresto de emocioj, skrupuloj kaj simile.

mol-kapulo (*en la senco de stultulo*) = stultulo (en Japanujo homo kun mola kapo estas laŭdo. *Ha, tiu mola kapo* en la japana signifas flekseblan pensmanieron aŭ elpenskapablon en ia ajn situacio (te: plio 1)

nigra merkato = neleĝa merkato

orientiĝi = direkti sin, trovi sian pozicion

pakaĵo de luno kaj vento = manko de pakaĵo (*el la vjetnama*)

perdi sian vizaĝon = perdi sian dignon, perdi sian respektindecon

ponta tago = interfesta tago

propeka kapro = origine: virkapro, kiu simbole transprenis ĉiujn pekojn de la israelanoj kaj estis forĉasita al la dezerto; laŭ la uzo: (senkulpa) kulpigito.

prifiki = trompi, vulgara esprimo por trompi sub speciale kritikendaj cirkonstancoj

(havi) profundajn poŝojn = esti tre riĉa

Silvestro = (en kelkaj eŭropaj landoj) La jarfina vespero.

Silvestro en Berlino – *Proponoj por la Novjara festo*. Titolo de reta reklamo fare de esperantistoj en Berlino, Germanujo <https://ootel.co/eo/nova-jaroj-hiera%C5%ADo-en-berlin-proponoj-por-la-nova-jaroj-partio>

sinŝirmado malantaŭ figo-folio = malefika kaŝado de io (el la Biblio: Adamo kaj Eva provis kovri siajn seksajn organojn per figo-folio)

Heroldo komunikas (HeKo 367 4-B, 7 sep 08): *Mi lernis el tio, ke iuj gvidantoj de SAT ne vere volas havi la feminismon, sed laŭ mia opinio bezonas ĝin maksimume kiel figo folio.*

spartaj viv-kondiĉoj = tre rigoraj viv-kondiĉoj

starigi ies harojn = timegigi/ŝoki/malagrabla surprizi iun

tendeno/kalkano de Aĥilo = tre vundebla loko. Aĥilo estis greka heroo nemortigebla krom se oni povis vundi lian tendenon/kalkano

El la *RETA VORTARO*, kapvorto Aĥilo (<http://www.reta-vortaro.de/revo/art/ahxil.html>): *Helena heroo, vundebla nur je la kalkano*

tenu la kapon malvarma = ne ekscitiĝu

transmisia rimeno = porparolantoj de potenculoj, ekzemple: sindikatanoj, kiuj kaŝe defendas la mastrojn kaj ne la laboristojn

(for)turni sin en la tombo = esti tre malkontenta (fare de mortinto) pri io

(la) vizaĝo plilongiĝas (en la senco de ‚oni iĝas senespera‘) = iĝi senespera

vivi de la mano al la buŝo = konsumi tuj ĉion kion oni trovas/perlaboras

voli (kun nepersona subjekto, ekzemple: *la aŭtomobilo ne volas ekiri*) = *Esprimo ne facile komprenebla de azianoj*. Uzu anstataŭe alian esprimon: La aŭtomobilo neniel ekiras.

4. Konkludoj

Ne estas facile konkludi pri tio, kio estas farebla kaj farinda en ĉi tiu kampo, ĉar la kulturo de Esperanto ankaŭ nur pri metaforoj estas produktata de la parolantoj de nia monda lingvo, kaj dum la komunumo de la parolantoj restas nombre malekvilibra ankaŭ la metaforoj restos malekvilibre kompreneblaj en la malsamaj mondopartoj. Certe momente estas aplikeblaj kelkaj provizoraj help-rimedo, kiuj konsistas esence el **klarigoj en la teksto** mem (tiu aktorino estas vera Venuso, belega virino), **interkrampaj iom pli longaj klarigoj**. Ekzemple ‘La rivaleco inter Esperanto kaj la angla lingvo kiel tutmonda intenacia komunikilo estas kiel la batalo inter Davido kaj Goljato (batalo en la kristanaj sanktaj libroj inter knabo kaj giganta militisto)’. Kaj en pli malsimplaj okazoj oni devas uzi **piednotojn**, por ke la ali-kultura leganto komprenu.

Sed ĉiuokaze malfermiteco al la problemoj kaj preteco pri vasta internacia kunlaboro certe helpus ankaŭ nun. Invitoj al neeŭropanoj paroli pri la kulturaj malfacilaĵoj, kiujn ili trovas en Esperanto, certe estos tre utilaj, kiel tiu de la ĉian Gong Xiaofeng.

Alian historian, sed ankoraŭ validan ekzemplon donis al ni nia granda poeto Kálmán Kalocsay en la referenca verko *Domfabriko*, en kiu li, kun helpo de Ada Csiszár (Csiszár & Kalocsay 1975) kaj surbaze de korespondado kun pluraj diversnaciaj konsultantoj, klopodis kompili kiel eble plej internacie kompreneblan esprimaron. Tiu verko estas ankoraŭ rekomeninda al hodiaŭaj laborantoj en ĉi tiu kampo, kiuj povus uzi ĝin kiel parton de la bazmaterialo kaj samtempe de la metodo por pluiro. Kompreneble nun per la reto la laboro farita de Kalocsay kaj Csiszár devas nepre baziĝi sur monda interkonsiliĝo por ke la rezulto de plua laboro estu maksimume utila inter la kontinentoj.

Bibliografio

- Bausani, Alessandro 1974: *Le lingue inventate: linguaggi artificiali, linguaggi segreti, linguaggi universali*. Roma: Ubaldini.
- Eco, Umberto 1993: *La ricerca della lingua perfetta nella cultura europea*. Bari: Laterza
- Csiszár Ada & Kalocsay Kálmán 1975: *Domfabriko. 6000 frazeologiaj esprimoj hungaraj-
-Esperantaj*. Budapeŝt: HEA
- Gledhill, Christopher 1998: *The Grammar of Esperanto – A corpus-based description*. München: LINCOM EUROPA.
- Gong Xiaofeng 2021: Diferencoj inter orientaj kaj okcidentaj kulturoj en Esperanta Instruado. En: I. Koutny & I. Stria & M. Farris (red.) 2021: *Interkultura rolo de Esperanto / Intercultural role of Esperanto*. Poznan: Rys.
- Hjartson, Benedikt 2014: Anationalism and the Search for a Universal Language: Esperantism and the European Avant-Garde. En: P. Bäckström & B. Hjartson: *Decentring the Avant-Garde*. Amsterdam: Rodopi. 267–393.
- Jansen, Wim 2010: La Fundamento de Esperanto: nekontesteble eŭropa, sed ... En: D. Blanke, U. Lins (red.): *La arto labori kune*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio: 271–283.
- Fiedler, Sabine 1999: *Plansprache und Phraseologie*. Frankfurt-am-Main: Peter Lang
- Koutny, Ilona 2015. A typological description of Esperanto as a natural language. En: *Jezyk Komunikacja. Informacja* 10: 43–62. Esperante: Tipologia karakterizo de esperanto kiel natura lingvo. En: Christer Kiselman & Renato Corsetti & Probal Dasgupta (red.) 2018: *Aliroj al Esperanto*. Dobřichovice: Kava-Pech. 129–146.
- 2018: Can language create culture. A case study of the planned language Esperanto. En: A. Biedrzyńska & M. Zięba-Plebankiewicz & G.A. Ziętałi: *Jezyk i jego wyzwania: jezyk w kulturze, kultura w jezyk. Tom I. Jezykoznanstwo*. Nowy Sącz: Państwowa Wyższa Szkoła Zawodowa w Nowym Sączu. 69–75. https://www.academia.edu/38366224/Can_language_create_culture_A_case_study_of_the_planned_language_Esperanto
- Lapenna, Ivo (ĉefred.) 1974: *Esperanto en perspektivo*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Melnikov, Aleksandro S. 1992: *Specifaj kulturaj scioj de la esperantista kvazaŭetno kaj ilia respuguliĝo en la koncerna lingv(aj)o*. Rostov-na-Donu: Esperanto-Klubo.
- Nascentes, Paulo P. 2015: Enkonduko al influoj de Ferdinand de Saussure sur la esplorkampo pri helplingvoj. En: GRKG. *Humankybernetik*. junio 2015: 85–91.
- Piron, Claude 1977: *Esperanto: ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. angle: <http://claudepiron.free.fr/articlesenanglais/europeanorasiatic.htm>

Saussure, Ferdinand de 1916: *Cours de linguistique générale*. Lausanne – Paris: Payot.
Wells, John 1989: *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
<https://eo.wikipedia.org/wiki/Zilengo>, kontrolita la 1-an de oktobro 2020.
Esprimoj ne tutmonde kompreneblaj: http://bonalingvo.net/index.php/Esprimoj_ne_tutmonde_kompreneblaj

Denaskismo en Brazilo: speciala dulingvismo

Abstract. *Denaskismo in Brazil – perspectives on a special bilingualism*

There are several types of bilingualism, and even of multilingualism (a situation in which a person speaks three or more languages). This study aims to analyze a special kind of bilingualism: *denaskismo* which occurs when a person speaks, from infancy, Esperanto and one or more other languages. The scope of the research was a single country – Brazil. Online questionnaires were used to interview 16 native speakers of Esperanto and the results were compared to those of other, European, inquiries. The results yield a comprehensive portrait of the current situation of native speakers of Esperanto (*denaskuloj*) in Brazil including information on their and their parents' educational level, method of language transmission, religion (the common conception is that most Brazilian *denaskuloj* are spiritualists), contacts with other Esperanto users, international travel and other languages learned by them.

Resumo. Ekzistas diversaj tipoj de dulingvismo, kaj eĉ de plurlingvismo (situacio, en kiu unu homo parolas tri lingvojn aŭ pli). Ĉi tiu studo celas analizi specialan tipon de dulingvismo: denaskismo, kiu okazas, kiam homo parolas, ekde la naskiĝo Esperanton kaj alia(j)n lingvo(j)n. La celo de la esploro estis nur unu lando: Brazilo (la lando de la esploristo). Oni malkovros la averaĝan aĝon, la lernejan situacion de la denaskuloj kaj de iliaj gepatroj, kaj la metodon plej uzatan en tiu lando por lernigi Esperanton denaske, tio estas, ĉu ekzemple la metodon UPUL (unu persono, unu lingvo) aŭ USUL (unu situacio, unu lingvo). Pri la religio, ni malkovros, ĉu veras, ke la plejmulto de la brazilaj denaskuloj estas spiritismaj. Oni vidos, ĉu la denaskuloj tie havas Esperanto-amiko(j)n. Ni ekscios ĉu la lernejo havis specialan influon al la lernado de Esperanto. Kaj kiu(j)n alia(j)n lingvo(j)n oni instruas al la denaskuloj. Oni vidos iliajn hobiajn kaj plej ŝatatajn lernobjektojn. Kaj fine, en kiom da landoj la infanoj ĝis nun vojaĝis, kaj ĉu ili havis menciinda(j)n fakto(j)n/sciojn pri sia plurlingva eduko. Ni havos vastan portreton de la situacio de la denaskuloj en Brazilo nuntempe. Per interretaj enketiloj, 16 denaskaj esperantistoj estis intervjuataj, kaj la rezultoj estis komparataj al tiuj de aliaj eŭropaj esploroj.

Enkonduko

La fenomeno de plurlingvismo, kiu inkludas dulingvismon, estas pli komuna en nia mondo ol oni ĝenerale kredas. Fakte estas pli da plurlingvuloj ol unulingvuloj en la homaro (Grosjean, 2010). Tiu ĉi studo celas portreti la realon de iu tipo speciala de plurlingvismo: la *denaskismo* (difinota poste), en la Brazila komunumo nuntempe.

En la unua parto, difiniĝas la komunaj konceptoj kaj terminoj de la disciplino plurlingvismo, kaj montriĝas ankaŭ la realo de la Esperanta komunumo ene de la

temo. Brosch (2019) konstatas, ke “Entute ne estas tre multaj studoj pri la *Denaskuloj* (parolantoj de Esperanto denaske), kaj la plej multaj el ili estas socilingvistikaj”.

Unu el la hipotezoj de ĉi-tiu studo asertas, ke la E-denaskuloj ne parolas la lingvon aparte brile, kaj la testo de kompetento de Cramer, utiligita de mi, montris la malon: Pli ol 50% el la enketitoj elmontris sufiĉan kapablon en la precipaj gramatikaj punktoj de la lingvo. Eble tio signifas, ke en la kazo de la brazilaj denaskaj esperantistoj, ili havis pli bonajn modelojn de siaj gepatroj ol siaj kontraŭpartoj eŭropaj. Por venontaj esploradoj estus bone registri ilian paroladon dum longa tempo, kaj en kontrolata maniero, por pravigi aŭ ne, ĉu ili havas specialan fluecon kaj bonan elparolon.

Unu el la plej bazaj demandoj pri denaskismo kaj Esperanto estas pri la nombro de Esperanto-parolantoj en la mondo. Lindstedt (2010) asertas, ke:

“Ne estas fideblaj statistikoj pri la parolantoj de Esperanto. Por Nuessel (2000: 82-83), stimoj de diversaj fontoj rangas inter 120.000 kaj 15 milionoj (!). La historiisto Sikosek (2003: 60) diras, ke eĉ 40.000 estas “optimista stimo” kaj, ke li ne surpriziĝus, se montriĝus, ke malpli ol 10.000 homoj parolas Esperanton flue. La nombroj povas, klare, esti tre diversaj, depende de kiu nivelo de kapableco estas la kriterio. Mia [Lindstedt] kruda stimo estas, ke ekzistas ĉirkaŭ 100.000 personoj, kiuj povas aktive uzi la lingvon, kaj ĉirkaŭ 10.000, kiuj povas kvalifikiĝi kiel fluaj parolantoj, kun marĝeno de eble mezordo de magnitudo por ambaŭ nombroj (t.e., povas ekzisti inter 30.000 kaj 300.000 aktivaj uzantoj, kaj inter 3.000 kaj 30.000 fluaj parolantoj”.

Estas interese ankaŭ tio, ke, kiel notas Lindstedt, “infanoj, kiuj fariĝas fluaj parolantoj de Esperanto ĉiam montras transferojn de siaj aliaj denaskaj lingvoj”, kaj ili ankaŭ influas unu la alian en la uzo de la lingvo, inkluzive de la prononco. Lindstedt observas, ke estas praktike neeble distingi iun denaskan Esperanto-parolanton de iu alia flua parolanto de la lingvo (krom la eblaj diferencoj en la cerba reprezentado de la lingvo). Li nomas la kvin kaptilojn de la ĝisnunaj studoj pri Esperanto kiel familia lingvo:

1. Koncentri al miksaj geedziĝoj;
2. Konfuzi la komunumon de Esperanto-parolantoj kun la Esperanto-movado;
3. Ne regi sufiĉe la lingvon;
4. Ignori la lingvistikan fonon de la subjektoj; kaj
5. Supozi, ke a priori denaskigo portu ŝanĝojn en la lingvon.

Do, mi klopodos ne fali en tiujn kaptilojn, dum mia esplorado, kaj lasi kiel unuan paŝon tiun verkon, por la estontaj esploristoj de la Esperanto-familioj en Brazilo kaj Sud-Ameriko.

1. Precipaj konceptoj

1.1. Difinoj de unu-/du-/plurlingvismo

Unue, necesas difini kelkajn bazajn konceptojn uzatajn en ĉi tiu studo.

Unulingvismo: karakterizo de unulingva homo aŭ komunumo. **Unulingva:** dirita de homo/komunumo kun nur unu lingvo (Crystal 1987).

Dulingvismo: la psikologia statuso de individuo, kiu havas aliron al pli ol unu lingva kodo kiel formo de socia komunikado: la grado de aliro varias tra diversaj dimensioj, kiuj estas psikologiaj, kognaj, psikolingvikaj, sociaj psikologiaj, sociologiaj, sociolingvikaj, sociokulturaj kaj lingvikaj (Ellis 2006). Laŭ Baker (2004), ĉiu lingvolernanto estas komenciĝanta dulingvulo, kaj ĉiu dulingvulo estas/is lingvolernanto. Dulingvaj parolantoj, ĝis antaŭnelonge, estis erare montritaj negative, laŭ Baker (ekz. havante apartan identecon aŭ kognitivajn mankojn).

Plurlingvismo (aŭ multlingvismo): “la kompetento de socioj, institucioj, grupoj kaj individuoj, engaĝi, en regula frekvenco, kun pli ol unu lingvo en siaj ĉiutagaj vivoj” (European Commission 2007: 6). Tiel, kiel por dulingvismo, necesas difini la tipojn kaj la gradojn de plurlingvismo, kion mi faros tuj sube. En multaj landoj de Afriko kaj Azio (ekz. Barato), multaj lingvoj kunekzistas, kaj estas multaj homoj, kiuj estas plurlingvuloj. Ankaŭ la indiĝenaj homoj de Brazilo kutime estas plurlingvuloj.

La lingvoj de plurlingva homo povas disvolviĝi aŭ dekadenci post iu tempo. Unu aŭ du lingvoj povas fariĝi pli fortaj aŭ malpli disvolviĝintaj. Malmultaj homoj havas situacion, en kiu ili povas regule uzi la tri aŭ pliajn lingvojn dum la tuta vivo.

Bell (2014: 24) asertas, ke alia valoro de plurlingvismo estas ĝia rilato kun kognitiva kapablo. Unu aliro diras, ke esti dulingva malfruigas la cerbo-disvolviĝon. Malgraŭ ties disvastiĝo, tiu aliro estis kontraŭigita de multaj esploroj pri la mensa disvolviĝo de dulingvaj infanoj dum pli ol 50 jaroj. Evidentas nun, ke dulingvuloj spertas kognitivajn avantaĝojn super unulingvuloj, pli ol malavantaĝojn.

Denaskismo: Karakterizo de la denaskaj Esperanto-parolantoj (ankaŭ nomataj denaskuloj), kiuj estiĝas en familioj, en kiuj oni uzas Esperanton (kaj plej ofte ankaŭ aliajn lingvojn). Kutime unu el la gepatroj elektas uzi Esperanton kiel ĉefan lingvon en komunikado kun la infano, kiu do akiras la lingvon same kiel aliaj infanoj akiras siajn denaskajn lingvojn. Ordinare tiaj infanoj fariĝas denaske dulingvaj, trilingvaj aŭ eĉ pli plurlingvaj.

Interfero (transfero): En la unulingva modo, dulingvuloj povas enmeti pruntvortojn aŭ fremdajn strukturojn en la diskurson. Tio estas interfero, ĝenerale de la domina lingvo en la duan.

La gradoj de dulingvismo: Preskaŭ ĉiu parolanto (ĉar estas ankaŭ analfabetoj) de ĉiu lingvo havas kvar bazajn kapablojn: kompreno, parolo, legado, skribado. Do oni povas sin demandi, kiom lerta tiu parolanto estas en ĉiuj tiuj kapabloj. Laŭ Bassani (2016):

“la parolanto povas ne havi la saman gradon de kompetento en la uzo de tiuj kvar kapabloj en sia patrina lingvo, kaj la samo okazas rilate al dua lingvo. Kelkaj dulingvuloj povas kompreni egale bone la du lingvojn, sed ne kapablas legi aŭ skribi en unu el ili, aŭ li/ŝi kapablas legi kaj skribi en ambaŭ lingvoj, sed ne tiel bone en unu el ili. Krom tio, por ĉiuj tiuj kapabloj, la parolanto povas havi malsaman plenumon en ĉiu lingvistika nivelo: fonetika-skriba, gramatika, leksika kaj stilistika. Ekzemple, iu parolanto povas havi vastan vortprovizon, koni multajn vortojn de la lingvo, sed ne havi altan kapablon por prononci tiujn vortojn. Aŭ li/ŝi povas havi kapablon, sin esprimi buŝe en diversaj okazoj, sed havi malfacilecon, skribi laŭ la ortografiaj reguloj”.

1.2. Ĉu dulingveco estas utila aŭ damaĝa?

Nuntempe la plimulto de la fakuloj konsentas, ke normalaj infanoj kapablas lerni pli ol unu lingvon sen problemoj kaj depende de la metodo uzata ili sufiĉe frue lernas apartigi unu lingvon de la alia kaj ne miksi ilin. Plue oni trovis, ke la lingva evoluo de plurlingvaj infanoj povas esti, en la unuaj jaroj, iom malpli rapida ol la averaĝo de unulingvuloj, sed tiu eventuala malfruo estas malpli granda ol la diferenco inter individuaj infanoj... (Wandel 1996: 61-62).

“Ĉu esti dulingva signifas havi la saman kompetenton en ambaŭ lingvoj?” La usona lingvisto Leonard Bloomfield difinis dulingvismon kiel “la kvazaŭ denaska rego de du lingvoj” (1933: 56). La termino *balancita dulingvulo* estas ofte uzata por priskribi tiujn parolantojn, sed verdire la plejmulto de la dulingvuloj estas malsame kompetentaj en siaj du lingvoj. Ili povas, ekzemple, skribi facile en unu, sed ne en la alia (Bell 2014: 22)”.

2. Denaskismo en Esperanto

2.1. Kiun metodon uzi?

Estas pluraj metodoj por instrui duan lingvon al junaj infanoj:

1. Unu persono – unu lingvo (UPUL): – ĉiu el la gepatroj ĉiam parolas al la bebo en la sama lingvo: paĉjo en unu, panjo en alia. Tiu estas la plej kutima metodo kaj havas la avantaĝon, ke la bebo lernas ligi la lingvon al persono, kaj tiel malpli miksas la du lingvojn.
2. La dua lingvo hejme – ambaŭ gepatroj parolas al la infano hejme la duan lingvon, kaj la nacian lingvon (supozeble tiun de la ekster-hejma medio) la infano alprenas el la televido, en infanvartejo kaj de geamikoj.
3. Unu tempo – unu lingvo: – ĉiun lingvon oni parolas dum certa tempo aŭ okazo: tago de la semajno, periodo dum la tago, vespermanĝo, ktp.

4. Ofta kontakto kun flua parolanto (ne nur el la gepatroj, ekzemple iu parenco). Tiun metodon multaj konsideras malpli efika ol la tri antaŭajn, sed ĝi estas utila en la kazo de pli ol tri lingvoj.
5. Ne fiksa plurlingveco – la tuta familio parolas plurajn lingvojn, sed ĉiuj parolas la saman lingvon dum certa tempo, kaj ŝanĝas de unu lingvo al alia laŭokaze.

La plimulto de la plurlingvaj familioj kaj ankaŭ edukistoj konsideras la UPUL metodon kiel la plej efikan por denaska plurlingveco: eĉ tre junaj infanoj povas facile identigi lingvojn kun personoj kaj tiel eviti mikسادon kaj lerni apartigi la diversajn lingvojn (Wandel 1996: 65-66).

2.2. Lernado de fremdaj lingvoj

Laŭ Wandel (1996: 63), estas sciencaj esploroj, kiuj montras, ke dulingveco speciale helpas la lernadon de fremdaj lingvoj, ĉar dulingvaj infanoj alprenas la konceptojn de tradukado kaj transiro de unu lingvo al la alia jam en frua aĝo kaj tute nature. Tio esence diferencas de la studado de fremda lingvo en lernejo. Edukistoj delonge scias, ke junaj infanoj pli efike lernas lingvojn, kaj konstatas, ke la plej taŭga aĝo por tio estas ĝis 12 jaroj. Grant Goodall (2020) atentigas nin, ke la “ora” periodo povas daŭri ĝis la aĝo de 17-18 jaroj, sed la infanoj devas komenci lerni la duan lingvon ĉirkaŭ la 10-jariĝo. Sed eblas atingi atentindan nivelon en nova lingvo eĉ se oni komencas malfrue, malgraŭ la fakto ke ĝi estos malpli alta ol tiu kiun atingus infano. Ankaŭ estas fakto, ke inteligenta plenkreskulo povas pli rapide ekposedi Esperanton ol eta infano, do ne gravas, laŭ Csiszár (2000), se patro (aŭ patrino) kaj la suĉinfano kvazaŭ samtempe komencas lerni Esperanton. Tio certe ne okazas al aliaj dulingvuloj.

La aŭtoro de *Dulingve – Pli Simple* (Csiszár 2000) surbendigis multajn minutojn de parolado de la infanoj (Nóra kaj Pálma), kelkfoje kun helpo kaj instigo de plenkreskuloj, nur por observi lingvajn faktojn. La diferenco en la kazo de Esperanto estas, ke la gramatika sistemo estas pli regula ol tiu de naciaj lingvoj, kaj pro tio la infano tutverŝajne povas pli rapide transpaŝi la necesajn evoluo-gradojn ol ĉe aliaj lingvoj, ĉar ili sekvas analogion komence, kaj la neregulaĵojn ili devas aparte lerni.

Dum la observado, kun la infanoj libervole parolantaj ekzemple pri rememoro, pri ĝojo pro donaco, pri eksterlanda vojaĝo aŭ pri klarigo de iu interesa travivaĵo, post mallonga periodo de surbendigo jam konstateblis, ke la infano bone konis plurajn objektojn de sia medio, kvankam fonetike, memkompreneble, la parolo estis tre infaneca, kaj ne ĉiuj fonemoj estis tute ĝustaj (ekzemple, la r kaj l tre similis unu al la alia. Sed la gepatroj – aŭ eĉ ceteruloj, post mallonga alkutimiĝo – povis facile kompreni la infanparoladon senmanke.

La surbendigado daŭris kelkajn jarojn, kaj inkluzivis la periodon de la infanĝardeno. “Oni opinias, ke, se la infano komencas viziti la infanĝardenon la prospera periodo de dulingveco finiĝas, la gepatra lingvo superas la internacian, la konoj pri la alia lingvo rapide malkreskas. Se la familio ne havas firmajn internaciajn kontaktojn kaj

Esperanto perdas sian veran funkcion, kiel lingvo de malsamnacaj homoj, tiu opinio fariĝas certe ne malprava” (Csiszár 2000: 34).

Sed la analizo pri la triaj surbendigitaj konversacioj – kun ambaŭ infanoj jam regule vizitantaj infanĝardenon – pruvis la malon. Dum parto de la periodo, Nóra, post la ricevo de parolebleco, senĉese parolis 4 minutojn, sen iu ajn interdiro de la gepatroj. Dum 15 minutoj de surbendigado, ŝi parolis libere 4 minutojn, kaj uzis 256 vortojn, kaj tiel atingis la ordinaran parolritmon de plenkreskuloj.

2.3. Esperanto kiel familia lingvo

Laŭ Corsetti (2005: 5-6), la ideo, lernigi Esperanton al siaj propraj gefiloj de la nasko ekaperis tre frue en la historio de la esperantofona komunumo. Estas dokumentitaj diversaj ekzemploj, ekde unu angla familio ĝis multaj postaj. La fenomeno estas sufiĉe disvastigata en la esperantlingva medio, laŭ la ekzisto de renkontoj, ĝenerale en centra Eŭropo, intence dediĉitaj al esperantofonaj familioj, tiel kiel la *porinfanaj kongresoj*, organizataj ĉiujare paralele al la tiel nomata Universala Kongreso de Esperanto. Estas stimoj de *Rondo Familio*, organizo por tiaj grupoj, de ĉirkaŭ 1.000 tiaj familioj. Tiuj familioj, kiel scieblas, estas koncentritaj pli en Eŭropo, estu okcidenta aŭ centra kaj orienta, ol en ĉiuj aliaj kontinentoj.

“La studoj pri la akiro de Esperanto de la nasko ne estas multaj kaj ĝenerale temas pri taglibroj fare de la gepatroj. Notoj pri tiuj studoj, inkluzive de tiuj de la komenco de la lasta centjaro, troveblas en Corsetti (1993)” (Corsetti 2005: 7).

La fenomeno tiel nomata “dulingvismo” estas tute komuna afero en multaj landoj, pro diversaj kialoj. Akiri du lingvojn samtempe, aŭ akiri duan, surbaze de la denaska lingvo, estas kondiĉo, en kiu multaj homoj sin trovas, post migrado al alia lando, ekzemple, aŭ pro invado de sia lando fare de alilandanoj. Kelkaj plenkreskuloj adoptas tiun vivstilon intence, ĉar ili volas translokiĝi al alia lando, en kiu alia lingvo estas favorata aŭ havas pli da prestiĝo.

Sed estas iu tipo de dulingvismo (aŭ plurlingvismo – kiam pli ol du lingvoj estas regataj) kiu povas esti konsiderata speciala: la dulingvismo de etinfanoj, kiuj ne decidas per si mem adopti tiun kondiĉon, sed estas nature devigataj fari tion, pro la kondiĉo de siaj gepatroj, ekzemple. Eĉ pli speciala estas tiu tipo de dulingvismo nomata “denaskismo”, t. e. la dulingvismo, en kiu unu el la du lingvoj estas Esperanto, ekde la nasko de la infano. En la sekvaj alineoj, mi komentos pri tiu ankoraŭ rara fenomeno.

2.4. Kial denaskismo estas speciala dulingvismo

En la libreto *Familia Lingvo: Esperanto*, Gilbert Ledon (1996) komentas, en la paĝo 10, ke la ĉiutaga lingvo ne estas literatura, beletra, kaj, ke en familio oni ne aten-

tas pri belaj konstruoj de frazoj, kun malriĉa vortprovizo, kaj “sufiĉas interkompreni unu la alian, ofte per simpla ĵeto de kelkaj vortoj”... Do, Esperanto, kiu estas lingvo plejparte skribata kaj legata, ene de la denaskismo, trairas grandan kompletigon, gramatike kaj vortstoke. Tio, kompreneble, ne komplete ĝenas la strukturon de la internacia lingvo, ĉar kiam la infanoj kreskas kaj trovas sin inter aliaj E-parolantoj, la izolitaj tendencoj malaperas.

La gepatroj de la denaskuloj ofte renkontas situaciojn, en kiuj ili devas rapide decidi, ĉu uzi alian vorton (ne ĉiam samsignifan), nur pro la fakto ke ĝi estas en PIV, aŭ en la Fundamento, aŭ ĉu enkonduki neologismon, kiu povas esti komprenata nur de samlandanoj, samregionanoj aŭ nur en tiu familio.

En la paĝo 15, Ledon asertas, ke la unua granda defio de la denaskuloj estas, kiam ili iras unue al la lernejo, kie tutcerte ili renkontos aliajn infanojn, kiuj ne parolas aŭ komprenas Esperanton. “En kelkaj kazoj, tio estas la fino de la eksperimento por la esperantistaj gepatroj, ĉar ili ne alĉutimiĝas al la plorado kaj plendado de la gefiloj”. Sed Ernő Csizsár, male, en sia libro *Dulingve – Pli Simple* (2000), diras, ke la lernejo ne nepre estu obstaklo al denaskismo, ĉar se en la komenco, povas esti strangaj situacioj, pro la uzo de Esperanto inter la infanoj, tio povas poste rezulti en favora faktoro al la integriĝo, kiam la aliaj infanoj eĉ admiras pro tiu scio.

Ankaŭ, laŭ Csizsár: “estas fakto, ke la Esperanto-movado ankoraŭ malmulte profitis pro denaska esperantismo. La nombro de denaskuloj estas taksata je 150-200”. Kaj ili vivas dise en kelkaj landoj, sen integriĝi en la movado mem. Bakrin, citite en Csizsár, diras, ke:

“Esperanto estas unika en multaj rilatoj: ĝin uzas internacia kolektivo, kiu estas esence malsimila al la normala tipo de lingvaj komunumoj (etnaj aŭ naciaj); Esperanto estas portanto de internacia kulturo, dum ĉiuj aliaj lingvoj enhavas nur fragmenton de internacia kulturo; Esperanto estas tre interesa studobjekto de la vidpunkto de la teorio, kiu analizas ligojn inter lingvo kaj pensado”.

3. La esploro pri denaskuloj: metodologio

La esploro povas esti klasigita kiel priskriba, ĉar ĝi devas portreti la brazilajn Esperanto-denaskulojn. Rilate al la metodologio, por la laboro mi elektas la metodon hipotezan-deduktan komparan. Tiu opcio praviĝas, ĉar la metodo permesas kompari la brazilan realon de la denaskaj esperantistoj kun tiu de la eŭropaj, kaj pravigi aŭ ne hipotezojn pri tiuj realoj. La procedo estis rekta observo, ĉar la celo estis enketi la intervjuotojn per interreto. La esploro utiligis enketilojn (unu por la gepatroj, unu por la denaskaj esperantistoj, kaj unu testo por la E-denaskuloj pli ol 15-jaraĝaj, vd en la Apendico).

El la esploro de Tišljar (1996), kun 20 infanoj el Eŭropo kaj Japanio, estis ĉerpitaj pli ol sep demandoj por la demandaro al la denaskuloj kaj gepatroj de ĉi tiu esploro. En ĝi, li malkovris la fakton, ke la denaskuloj de Eŭropo estas aparte brilaj en la ler-

nejo kaj en siaj ĉiutagaj vivoj. Unu el la celoj de mia esploro estas konfirmi aŭ ne la hipotezon, ke ankaŭ la brazilaj denaskuloj estas aparte brilaj. Mi trovis la esploron de Filadelfiová kaj Gurán (1996) interesa, sed tro specifa por la Eŭropa realo. La esploroj de Corsetti (1993, 1996, 2005) ankaŭ inspiris mian laboron, en la senco portreti la parolkapablon de la denaskaj esperantistoj en la nuntempo, eĉ se la celo estis alia (kreoliĝo de Esperanto kaj kreivo de denaskaj esperantistoj).

La testo de kompetento farita de la matematikisto Marcos Cramer estis utiligata dum lia esploro pri la propono de kelkaj Esperantistoj, enkonduki la pronomon “ri” en Esperanton. Ĝi tute taŭgas por mia esploro, ĉar ĝi mezuras la konon de kelkaj kernaj gramatikaj punktoj en la lingvo. Ĝi estas proponata al la denaskuloj pli ol 15-jaraĝaj. La celo estas montri, ĉu la denaskuloj pli ĝuste uzas la lingvon en specifaj kazoj ol aliaj Esperantistoj. La intervjuitaj denaskaj esperantistoj estis junaj de precipe tri aĝo-grupoj, kaj el malsamaj regionoj de Brazilo, kiel montriĝas en la rezultoj. Tio estas spegulata en la diverseco de intereso, ekzemple, pri la plej ŝatataj kanzonoj, libroj, studobjektoj kaj hobiaj.

Ni stimas la nombron de denaskaj esperantistaj familioj (en kiu estas almenaŭ unu denaska parolanto de Esperanto) en la tuta Brazilo 16, kaj de denaskuloj 22. Mi sendis demandojn al 15 familioj, per retpoŝto, post ke la adresaron sendis al mi unu el la intervjuotaj familioj. Post monato, 9 familioj pretis respondi. Rilate al 16 denaskuloj, do sufiĉe elmontra nombro.

4. Analizo de datumoj kaj diskuto pri la rezultoj

4.1 Demandaroj por la gepatroj

(Pro manko de spaco, montreblos tie-ĉi nur kelkaj (la precipaj) demandoj faritaj al la gepatroj de la denaskuloj):

El la 9 demandaroj por la gepatroj, eblas ekscii, ke la brazilaj denaskuloj apartenas al la jenaj aĝo-grupoj:

| | |
|------------|---------|
| 0-4 | (neniu) |
| 5-10 | (3) |
| 11-14 | (neniu) |
| 15-20 | (7) |
| 21-25 | (5) |
| 26 kaj pli | (1) |

Tio signifas, ke la plejmulto el ili estas pli ol 15-jaraĝaj, kaj povus submetiĝi al la testo de Cramer. Sep el ili estis viraj, kaj naŭ estis inaj.

La respondo pri la instruiteco de la gepatroj montras, ke preskaŭ ĉiuj gepatroj havas superan nivelon, nur unu patrino havas mezan instruitecon.

Religio, kontraŭe al la antaŭsupozo, ke preskaŭ ĉiuj denaskuloj estus spiritistaj,

| | |
|-------------|-----|
| spiritistoj | (5) |
| katolikaj | (4) |
| ateisto | (1) |
| sen religio | (1) |

En du familioj, la religio de la patro estis malsama ol tiu de la patrino.

Pri la instruiteco de la denaskuloj:

| | |
|--------|-----|
| supera | (8) |
| meza | (5) |
| baza | (3) |

La metodo, kiun la plejmulto uzis por eduki siajn infanojn:

| | |
|----------------------------------|------|
| UPUL (unu persono _ unu lingvo) | (12) |
| USUL (unu situacio _ unu lingvo) | (5) |
| spontanee | (1) |

Unu familio uzis UPUL kun la patro kaj USUL kun la patrino. Tio konfirmas la preferon de la plejmulto el la denaskaj familioj por la metodo UPUL, sed montras, ke ankaŭ USUL ankoraŭ estas populara. Fakte tio estas surpriza, ĉar USUL devus esti pli uzata en unulingva regiono.

La demando, ĉu la denaskulo havas regulan Esperanto-amikojn, trovis la jenajn respondojn:

| | |
|---|-----|
| ne | (7) |
| familianoj | (1) |
| kelkaj amikoj | (2) |
| jes | (3) |
| “pli juna, li/ŝi havis, sed [translokiĝis]” | (3) |

Interpretante la respondojn pri kiom da lingvoj ili parolas, oni vidis, ke la denaskuloj parolas:

| | |
|---------------|--|
| la portugalan | (16) |
| Esperanton | (12) (kiu eksplikiĝas, ĉar kelkaj ne plu parolas la internacian lingvon, kaj kelkaj nur havas pasivan konon) |
| la anglan | (10) |
| la hispanan | (4) |

| | |
|------------|-----|
| la francan | (2) |
| la italan | (1) |

Pri specialaj sukcesoj:

| | |
|---------------------------------------|-----|
| neniun | (6) |
| matematiko | (3) |
| bone sukcesis en ĉiuj lernobjektoj | (1) |
| havis bonajn notojn | (1) |
| sukcesis en redaktado en la portugala | (1) |

Tio ne kongruas kun la esploro de Tišljar (1996), kiu malkovris specialan interenson kaj sukceson de denaskuloj en lingvolernado (eble pro la tre malsama realo de Brazilo kaj Eŭropo).

Interese esplori ĉu tiuj denaskuloj multe vojaĝis eksterlande, sed ses el ili konas nur Brazilon, kvar konas ankaŭ Argentinon, du konas Usonon, du konas Danujon, du Portugalion, du Urugvajon, du Paragvajon, unu Koreion, unu Ĉilion. Unu denaskulo konas kvin landojn kaj alia konas 12 landojn. Tio signifas, ke la brazilaj denaskuloj ne multe vojaĝas, eble pro la grandeco de la lando mem (kompare kun landoj en Eŭropo), eĉ se unu el ili diris ke li konas 12 landojn.

4.2. Pri la testo de kompetento

La teston de kompetento de Marcos Cramer trapasis 11 partoprenintoj. Ĉiuj estis pli ol 15-jaraĝaj. Komprenoble la testo ne estas kompleta ilo por mezuri la kompetenton de la E-parolantoj, kun nur 6 demandoj. Sed ĝi bone montras la gradon de ĝenerala kono de la precipaj gramatikaj eroj de la lingvo internacia, kiel akuzativo, reflektivaj pronomoj, prepozicioj, valento, inkoativoj kaj predikativoj. De la 11 partoprenintoj, ĉiuj eraris ĉe la demando pri prepozicio. Tio povas elmontri la influon de la nacia lingvo (la portugala), aŭ la malfacilecon mem de prepozicioj en ĉiu lingvo, kiu ilin havas, reflektita en Esperanto. Kvin el ili sukcesis en 5 demandoj. Tio montras, ke preskaŭ 50% el ili havis pli ol 80% de sukceso, kio pruvas la taŭgecon de la mezurilo. Kvar el ili eraris nur ĉe du demandoj (la dua estis pri refleksivoj, aŭ, en unu okazo, pri inkoativo). La aliaj du partoprenintoj eraris ĉe po 3 demandoj. Tio montras, ke la 11 testitoj havis almenaŭ 50% de sukceso, do ili ĉiuj montras sufiĉan nivelon de kompetento, konsiderante, ke multaj el ili ne havas multe da oportuno praktiki Esperanton ĉiutage, laŭ la enketoj.

4.3. Demandaroj por la denaskuloj

Pri la aĝo, en kiu ili ekparolis Esperanton, estis kelkaj malsamecoj, rilate al la demandaro por la gepatroj. Tio atendeblis, ĉar kutime la infano mem ne scias pri la

ekzakta momento de la ekparolo, sed la gepatroj kutime rakontas al ili pri tio, do povas esti kelkaj nekongruoj. Ili diris, ke ili ekparolis Esperanton:

| | |
|--|-----|
| inter 0 kaj 2 jaroj | (5) |
| inter 2 kaj 4 | (2) |
| inter 4 kaj 6 | (2) |
| ne scias | (1) |
| ne certas, “sed mia patro ĉiam parolis kun mi” | (1) |

Por respondi, kiu parolas kun ili esperante, la denaskuloj diris:

| | |
|-------------------------|-----|
| la patro | (9) |
| la patro kaj la patrino | (2) |
| la avo | (1) |
| la fratino | (1) |
| la kuzino | (1) |

La esploro de Corsetti (1996 (2)) montras similajn rezultojn.

Pri la plej ŝatataj lernobjektoj:

| | |
|---------------------------|-----|
| matematiko | (4) |
| lingvoj | (1) |
| fizika edukado | (1) |
| arto | (1) |
| komunikado | (1) |
| gramatiko de la portugala | (1) |
| biologio | (1) |
| informadiko | (1) |
| redaktado | (1) |

Do oni povas vidi certan preferon por matematiko, sed la interesoj de la brazilaj denaskuloj estas ege diversaj kaj vastaj.

Kiel hobiaj, la denaskuloj citis:

| | |
|----------------|-----|
| muzikon | (8) |
| sporton | (3) |
| desegnadon | (3) |
| kanton | (2) |
| spekti videojn | (1) |

3.4 Tabelo de komparo laŭ aĝo-grupo

| Demando | Grupo A (0-9) | Grupo B (15-19) | Grupo C (20 k pli) |
|---------|----------------------------|---|--|
| 2 | 2,5-3 | 0-2 | 1-4 |
| 3 | patro (3) bofrato (1) | patro (7) patrino (1) | patro (6) patrino (1) avo (1) kuzino (1) |
| 4 | neniun (2) ne scias (1) | ne aŭ neniun (5) ne grandan (1) pozitivan (1) | ne aŭ neniun (4) negativan (2) |
| 6 | ne (2) ne scias (1) | ne aŭ simile (7) | ne aŭ simile (6) |
| 9 | matematiko (1) | matematiko (2) ne scias (1) kemio (1) gram. port. (1) redaktado (1) | matematiko (1) komunikado (1) lingvoj (1) astrofiziko (1) literaturo (1) |
| 10 | ludi pupinojn | ludi instrumentojn (4) desegni (2) muziko (1) kanti (1) flugpilko (1) | ludi instrumentojn (3) muziko (2) desegni (1) kanti (1) danci (1) |
| 16 | neniu (3) | neniu (7) | neniu aŭ simile (5) bofrato (1) |

Ni povas vidi, ke la grupo A estas de 0 ĝis 9 jaraĝa; la B estas de 15 ĝis 19 jaroj; kaj la C estas de 20 kaj pli jaroj. Rilate al la aĝo de akiro, oni vidas, ke la dua grupo akiris Esperanton pli frue, kaj la pli aĝa grupo akiris ĝin pli malfrue. Kongrue kun aliaj esploroj, la patro estas kiu parolas pli ofte al la infanoj en Esperanto.

Pri la influo de lernejo kiel Esperanto-parolanto, preskaŭ ĉiuj diris, ke “ne estis” aŭ simile. Unu reprezentanto de grupo C diris, ke negativan influon ĝi havis. Kaj unu el grupo B, ke pozitivan.

Estas iu prefero por matematiko inter la plej ŝatataj lernobjektoj, sed ne tiel multe, ol trovis Tiŝljar en sia esploro (meza noto en matematiko = 87%). La plej aĝa grupo preferas lernobjektojn rilatajn al la universitato, dum la dua grupo preferas lernejajn temojn.

Pri la hobiaj, kompreneble la plej juna grupo preferas infanajn agojn, kiel ludi pupinojn, dum la aliaj du grupoj havas similajn interesojn, kun malmultaj elstaraj hobiaj, laŭ siaj aĝo-grupoj, kiuj kompreneble havas similajn pensmanierojn, tute aparte el la plej juna grupo.

Estas aparte elstare tio, ke multaj el ili korespondas kun neniŭ esperante, aŭ nur kun familianoj. Speciale surpriza estis la dua grupo, en kiu 5 diris, ke korespondas kun neniŭ. Tiu rezulto estas vere signifa, se oni konsideru la teston de kompetento, kiun ili trapasis, ĉar ĝi ne estas aparte facila, kaj oni atendus, ke la fiasko-kvanto estos pli granda. Same surprizaj estis la respondoj al la lasta demando, kun kiu amiko ili regule korespondas: Grupo A diris neniŭ (nesurprize), sed grupo B entute (7 respondoj) ankaŭ diris “kun neniŭ”, kaj grupo C diris amase “neniŭ aŭ simile” (5 respondoj) kaj unu el ili diris, ke kun bofrato.

3.5 Komparo kun eŭropaj rezultoj

La esploro de Tiŝlar (1996) malkovris ke, el 20 infanoj el Kroatio, Japanio, Koreio, Germanio, Pollando, Aŭstrio, Hungario kaj Italio, la hobiaj plej ŝatataj estis: sporto (11), literaturo (9), kaj muziko (8). Esperanton kaj dancon elektis po 4. Po 1 respondo havis: tradukado, astronomio, hejmaj bestoj, matematiko, skoltoj, komputiloj, tekniko, ŝako, politiko kaj frizado.

La tria demando de la eŭropa esploro estis: *Kiujn specialajn sukcesojn en la lernejo ili havis (ĉu ion aparte bone ili sciis aŭ kapablis)?* Jen la respondoj:

| | |
|--|--------|
| Fremdlingvoj | (12) |
| Matematiko | (7) |
| Muziko | (4) |
| Biologio | (3) |
| Literaturo, pentroarto, kemio kaj fiziko | (po 2) |

Klare videblas, ke la eŭropaj infanoj kutimas lerni kaj paroli fremdlingvojn, kaj ankaŭ ŝatas matematikon speciale. La brazila realo estas malsama, kvankam la brazilaj denaskaj esperantistoj ankaŭ havas iun preferon por matematiko (4 el 16).

La kvara demando tekstis: *Ĉu la infanoj havis korespondantojn en minimume du landoj?* Jen la respondoj: 5 tute ne korespondis, 2 korespondis kun nur unu lando, kaj 16 korespondis kun 2 aŭ pli da landoj.

Interese, ke 5 el la 20 eŭropaj intervjuitoj tute ne korespondis, kvankam 16 korespondis kun 2 aŭ pli da landoj. Sed la brazilanoj amase ne korespondis, malgraŭ la fakto, ke kelkaj individuoj bone korespondis.

La kvina demando temis pri tio, *en kiom da landoj la infanoj ĝis nun vojaĝis*. Ĉiuj eŭropaj intervjuitoj vojaĝis al almenaŭ 3 landoj. 6 vojaĝis en 8 landoj. Po 2 vojaĝis en 10, 12 aŭ 15 landoj. Unu vojaĝis en 20 landoj. Averaĝe en 10,65 landoj.

Kompreneble, pro la ekonomiaj faktoroj kaj la grandeco de la lando, brazilaj denaskuloj ne emas multe vojaĝi, kvankam du el ili multe vojaĝis.

La oka demando: *Kiujn lingvojn ili parolas aktive?* Jen la rezultoj:

| | |
|-------------|-----|
| 2 lingvojn | (7) |
| 3 lingvojn | (9) |
| 4 lingvojn | (3) |
| 5 lingvojn | (2) |
| 6 lingvojn | (1) |
| 11 lingvojn | (1) |

La diferenco estas masiva! La brazilaj intervjuitoj parolas maksimume 3 au 4 lingvojn. Certe ĉar ili ne kutimas multe vojaĝi eksterlanden aŭ korespondi en aliaj lingvoj.

5. Finaj konkludoj

Denaskismo en Brazilo nuntempe montras similajn karakterizojn kiel denaskismo en Eŭropo. La plej uzataj metodoj por lernigi Esperanton al la infanoj en Brazilo estas UPUL kaj USUL, kiel en Eŭropo. La brazilaj denaskuloj ankaŭ montras facilecon, lerni matematikon, kaj ankaŭ brilas en aliaj lernobjektoj (Tiŝljar, 1996). La mito, ke ĉiuj ili estas spiritistoj montriĝis falsa en ĉi tiu esploro, kvankam sufiĉe multaj. Malsame al la eŭropaj denaskuloj intervjuitaj de Tiŝljar, ili ĝenerale ne vojaĝis al multaj landoj, kaj ĝenerale ne konas multajn aliajn lingvojn (malkongrua kun Tiŝljar). La plejmulto de ili parolas Esperanton kun siaj patroj (kongrua kun Corsetti 1996), kaj nur eta grupo kun siaj patrinoj.

Neniu el ili sonĝas en Esperanto, sed kelkaj preĝas kaj kalkulas en ĝi. Tio povas esti la rezulto de la maniero, en kiu la Esperanto-instruado estis farata, la plimulto de la gepatroj lasante la portugalan por la plej intimaj momentoj.

Do, klare videblas, ke kvankam dulingvismo estas komuna fenomeno internacie, denaskismo (dulingvismo, en kiu Esperanto estas unu el la lingvoj) estas tute malsama situacio, pro diversaj kialoj. Unu el ili estas la malgranda nombro mem da esperantistoj en la mondo, kaj en Brazilo.

Laŭ la literaturo konsultita, la motivoj, por kiuj esperantistaj gepatroj decidas lernigi Esperanton al siaj infanoj estas iom malsimilaj al tiuj de la aliaj dulingvaj familioj. Precipe ili volas, ke iliaj infanoj kresku, sciante, ke estas tute bona solvo al la internacia interkompreniĝo, kaj ke ili estu vivantaj pruvoj, ke tiu solvo estas praktika kaj tute ebla internacie.

Bibliografio

- Baker, Colin 2004: Bilingualism and Multilingualism. En: Malmkjaer, Kirsten (ed.) *The Linguistics Encyclopedia* (2 ed.). Londono: Routledge
- Bassani, Indaiá de Santana 2016: *Disciplina – Fundamentos Linguísticos: Bilinguismo e Multilinguismo* 'Lernobjekto – Lingvistikaj Fundamentoj: Dulingvismo kaj Multlingvismo'. São Paulo: Unifesp. 3–23.

- Bell, Allan 2014: *The Guidebook to Sociolinguistics*. Malden and Oxford. Wiley Blackwell. 22–24.
- Bloomfield, Leonard 1933: *Language*. New York. Holt Rinehart and Winston. 56
- Brosch, Cyril 2019: Einige Bemerkungen zur Muttersprachlichkeit in Esperanto. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik. <http://www.interlinguistik-gil.de/wb/media/beihefte/JGI2019/brosch-JGI2019.pdf>
- Corsetti, Renato 1996: Esperanto kaj kreolaj lingvoj: komunaj kaj malkomunaj trajtoj en la kreoliĝo. En: *MF* 11–37.
- 1996 (2): A Mother Tongue Spoken Mainly by Fathers. En: *Language Problems and Language Planning* 20/3: 263–273.
- 2005: *L'Esperanto dalla nascita: Tra creatività e creolizzazione – Alcuni aspetti dell'apprendimento della lingua internazionale esperanto dalla nascita* 'Esperanto denaske: Tra kreivo kaj kreoliĝo – Kelkaj aspektoj de la lernado de la internacia lingvo Esperanto denaske'. Roma: Università degli Studi "La Sapienza". 3–30.
- Crystal, David 1987: *The Cambridge encyclopaedia of language*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Csiszár, Ernő 1996: Superrigardo de internaciaj / esperantistaj familioj. En: *MF* 77–86.
- 2000: *Dulingve – Pli Simple*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio. 5–85.
- Ellis, Elizabeth 2006: Monolingualism: The unmarked case. En: *Estudios de Sociolingüística* 7 (2) (2007). Armidale: University of New England. 174–176.
- European Commission. (2007). Final report: High level group on multilingualism. Luxembourg: European Communities. http://ec.europa.eu/education/policies/lang/doc/multireport_en.pdf
- Filadelfiová, Jarmila – Gurán, Peter 1996: Fontindikoj de la esploro Multkulturaj familioj de nuntempa Eŭropo. En: *MF* 47–61.
- Goodall, Grant 2020. Alproprigo de dua lingvo: ĉu ebla post la infanaĝo?. En: *Internacia Kongresa Universitato*. 2020. <https://uea.org/teko/IKU/2020/Goodall>
- Grosjean, François 2010: *Bilingual – Life and Reality*. Cambridge: Harvard University Press. Chapter 1
- Ledon, Gilbert R. 1996: Familia Lingvo: Esperanto. En: *Teknikaj Kajeroj no. 4*, de UEA. Braziljo: Eldono de la aŭtoro. 5–19.
- Lindstedt, Jouko 2010: Esperanto as a family language. En: Fred Dervin (ed.): *Lingua francas: La véhicularité linguistique pour vivre, travailler et étudier*. Paris: L'Harmattan. 1–6.
- MF: Multkulturaj Familioj de nuntempa Eŭropo*. 1996. Bratislavo: Esprima.
- Nuessel, F. 2000: *The Esperanto language*. New York & al.: Legas
- Tišljár, Zlatko 1996: Esperanto kiel konscia celo de du- aŭ plurlingva infanedukado. En: *MF* 129–140.
- Wandel, Amri 1996: Plurlingva edukado de infanoj. En: *MF* 61–71.

Apendico: Demandaroj al la gepatroj, al la denaskuloj kaj testo de kompetento

DEMANDARO AL LA GEPATROJ

(Instruo al la gepatroj: Bonvolu plenumi po unu demandaro por ĉiu denaskulo)

1. Aĝo de la denaskulo:
2. Sekso de la denaskulo:
3. Je kiu aĝo li/ŝi ekparolis E-on?
4. Loĝloko:
5. Instruiteco de la gepatroj:
Finita lernejo – Patro: () baza () meza () supera Patrino: () baza () meza () supera
6. Nacieco de la gepatroj: Patro: Patrino:
7. Religio de la familio:
8. Lernejo de la denaskulo: () baza () meza () supera
9. Kiu parolas al la denaskulo Esperante?
10. Ĉu la lernejo havis signifan influon al la E-parolo de la denaskulo?
11. Kiun metodon la familio uzas (unu lingvo – unu persono / unu lingvo – unu tempo / unu lingvo – unu situacio)?
12. Kiel funkcias interreto en la edukado de la denaskulo?
13. Ĉu la denaskulo havas Esperanto-amiko(j)n?
14. Ĉu vi rimarkis iun problemon en la evoluo de via infano kiun oni povus klarigi per la plurlingveco?
15. Ĉu vi perceptis kreiva(j)n momento(j)n en E-o ĉe la infano?
16. Kiom da lingvoj li/ŝi regas?
17. Kiel je via decido lernigi E-on al infano reagis viaj proksimuloj?
18. Kiajn averaĝajn rezultojn la infanoj ĝis nun havis en la lernejo?
19. Kiujn specialajn sukcesojn en la lernejo ili havis?
(Ĉu ion aparte bone ili sciis aŭ kapablis?)
20. Kiun mezan noton ili havis el matematiko?
21. En kiom da landoj la infanoj ĝis nun vojaĝis?
22. Viaj rimarkoj (io aparte menciinda rilate lian/ ŝian plurlingvan edukon)?

* * *

DEMANDARO AL LA DENASKULO

(Instruo al la gepatroj: Bonvolu doni po unu demandaro al ĉiu denaskulo. Se la denaskulo havas pli ol 15 jarojn, bonvolu doni ankaŭ la teston de flueco alkroĉitan)

1. Aĝo ____ Sekso: () knabo () knabino
2. Je kiu aĝo vi ekparolis Esperanton?
3. Kiu parolas al vi Esperante?
4. Ĉu la lernejo havis pozitivan/ negativan influon al vi kiel Esperanto-parolanto?
5. Ĉu vi sentas, ke koni Esperanton estas avantaĝo?
6. Ĉu vi iam havis malavantaĝon/ malagrablojn, ke vi parolas Esperante?
7. Ĉu vi kalkulas en Esperanto aŭ en alia lingvo?

8. Ĉu vi songâs/ pregas en Esperanto?
9. Kiu(j) estas via(j) plej ŝatata(j) lernobjekto(j)?
10. Kiu(j)n hobia(j)n vi havas (sporto, muziko,...)?
11. Ĉu vi partoprenas Esperantajn aranĝojn?
12. Kiucele vi uzas la interreton?
13. Kiu(j) estas via(j) plej ŝatata(j) kanzono(j) en E-o?
14. Kiu(j) estas via(j) plej ŝatata(j) libro(j) en E-o?
15. Kun kiu(j) amiko(j) vi regule korespondas en Esperanto?
16. Kun kiu(j) amiko(j) vi regule parolas en Esperanto?

* * *

TESTO DE KOMPETENTO FARITA DE MARCOS CRAMER

1. Petro vidas, ke Paŭlo manĝas _____ pomon. (Temas pri la pomo de Petro.) – lian – sian
2. _____ mankas butero. – Mi – Al mi
3. Estas _____, ke vi jam venis. – bone – bonen – bona – bonan
4. La aŭto povas veturi 180 kilometrojn _____ horo. – per – pro – po – en
5. Mi devas _____ la akvon. – boli – ekboli – boligi – boliĝi
6. La pordo nun estas ruĝa, sed mi volas farbi ĝin _____. – blanken – blankon – blankan – blanka

Does Esperanto family use foster Europeanization? A pilot study

Resumo. Ĉu Esperanto-familioj favoras eŭropiĝon? Jen esplora studo

Ekde ĝia apero, la rilato inter la Esperanto-Movado kaj la Vestfalia koncepto de 'nacio' estis kompleksa. La politika flanko de la morala filozofio de Zamenhof, unue nomita Hilelismo kaj poste Homaranismo, celis al 'Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo', laŭ la originala vortigo, farendaj post la fino de la unua mondmilito (Zamenhof 1915). Ĉiuokaze, la ĉefa ideologio de la Esperanto-Movado substrekis tutmondecon kiel kernan valoron de la lingvo, preferante malgravigi ĝiajn Eŭropajn radikojn. Tial, la subteno fare de la esperantistaro al eŭropiĝo ĉiam estis malplimulto ene de malplimulto. Ĉi tie mi prezentas esploran studon pri la temo, faritan per intervjuoj al denaskuloj kaj gepatroj de Esperantlingvaj familioj kiuj vivas tra Eŭropo. Pridemandante ilian sintenon al eŭropiĝo, la esplora studo montras, ke Esperantismo kaj eŭropiĝo enhavas malmulton komunan, se eĉ ion, eĉ kaze de Esperanto-parolantoj kiuj uzas la lingvon ĉiutage por intimaj rilatoj en siaj familioj.

Abstract. Since its launch, the relation between the Esperanto Movement and the Westphalian concept of 'nation' has been complex. The political side of Zamenhof's moral philosophy, at first called Hillelism and then Homaranism, hoped for the 'United States of Europe', to be established after the end of the Great War (Zamenhof 1915). However, the mainstream ideology of the Esperanto Movement stressed the global value of the language, preferring to downplay its European roots, and therefore the support of Europeanization among Esperantists has always been a minority inside a minority. In this contribution, we present a pilot case study, interviewing Esperanto families living across Europe about their feelings regarding Europeanization. This pilot case study shows that the overlap between Esperantism and Europeanization is small, even in speakers who use Esperanto as the language of intimacy in their family lives.

1. Introduction

The formation of major states across Europe – such as France and Poland – is rooted in the social construction of national identity, built around two main pillars: language and religion (Myhill 2006). The relations between such nation-states eventually led to an international legal system that was called the 'Westphalian model', referring to the Peace of Westphalia in 1648, in which each state is sovereign without any external interference (Beaulac 2004). Once such a system was established, Europe enjoyed a period of relative peace and prosperity, referred as the *belle époque* (1870-1914).

Paradoxically, it was during the *belle époque* that nation-states reached their acme of power, and in parallel the limits of the Westphalian model started to become clear.

In fact, the same period is also referred to as the first wave of globalization, characterized by international contacts on a scale and intensity that had never happened before in history. In particular, two phenomena gave a new meaning to the word ‘international’: first, various waves of mass migration from Europe to the Americas; second, new transportation, information, and communication technologies such as railways, international postal service, and the telephone (Bordo *et al*, 2003).

It is in this context that intellectuals and élites across Europe and in the Western countries in general fostered the idea of International Auxiliary Languages (IALs), where ‘international’ referred to commonalities among the European languages of great prestige of present times, such as English, French, German, as well as of the past, mainly Latin and Ancient Greek. The elements to be part of the ‘perfect’ or ‘optimal’ IAL were a matter of debate because of the fuzziness of the concept of ‘international’. Questions included the degree to which Latinate elements should be utilized, or whether Slavic languages were ‘international’ enough to be considered. The massive language planning effort from Volapük (launched in 1879) until Interlingua (launched in 1951) proposing very different IALs is proof of such debate (for an overview, Gobbo 2020).

Eventually, only Esperanto succeeded in forming a sociolinguistic community of practice – in the sense of Eckert (2006) – self-identifying through the practical use of the language, as well as reflection over the meaning of using it. Gobbo (2017) illustrates that the Esperanto language representation by their speakers changed across time and space, adapting to the political, social, and cultural situation. In fact, in its current form, the mainstream ideology is a sort of neutralism illustrated by the Prague Manifesto from 1996, that offers an original interpretation of multiculturalism, strictly connected to the defense of language rights in a worldwide perspective.

The most explicit text written by Zamenhof, the founder of the Esperanto phenomenon, on the possible role of the language in global politics was published in 1915 bilingually in Esperanto and English in *The British Esperantist*. Let us quote the original English translation of three key passages:

“Will you begin simply to remake and patch up the map of Europe? Will you simply decide that territory A must belong to the nation X and territory B to the nation Y? True, such work you will have to do, but it must be only an insignificant *portion* of your work; [...] in handing over any territory to the people of this or that race [sic], you will always do an injustice to other people who have the same natural rights in respect of that territory. [...] It would be best if, instead of various large and small European states, we should some day have proportionally and geographically arranged “United States of Europe” (Zamenhof 1915).

Although many Esperanto speakers are attracted to language politics in general, the special attention reserved for Europe by Zamenhof in 1915 seems to be a thing of the past. It should be mentioned that there is an association devoted to representing the Esperanto organizations active in EU member states with the EU institutions,

the European Esperanto Union (EEU 2020), which has no counterparts in other continents – e.g., there is no “African Esperanto Union” targeting the African Union in a similar way. However, Gobbo (2019) showed that the EEU is marginal to both the Esperanto and the Federalist movements; actually, this is true more in general, as the revision of the connection between Esperanto and Federalism as a political movement shows. In other words, their champions are a minority in both groups, of Esperanto speakers and federalists, and have always been. The contribution of the European Esperanto Federalists, as they call themselves, is to foster the process of Europeanization through the introduction of Esperanto as a ‘federal language’. Unfortunately, this political program remains very vague in its details and implementation, as the European Union is not a federal state. A contrastive analysis of the different positions of the leading figures, such as Tišljär (2005, 1998) or Chiti-Batelli (2008, 2007) supporting the idea of a (con)federation at the European level with Esperanto as the main common language is outside the scope of this paper. In its general idea, such a program can be understood as framing Esperanto as *the* common second language for all European citizens, to be learned preferably in primary school as the first ‘foreign’ language, for its supposed propaedeutic value in learning further ‘foreign’ languages. In this way, Esperanto should become a respected language, ultimately forming a fluid political space of discussion for European citizens, without any language fragmentation, and therefore fostering the existence of a European demos formed at the confluence of the European ethnicities. Unfortunately, their ideas are detached from the current debate on Europeanization, or to be very lenient, marginalized. Europeanization is a debated concept in political science, since at least Graziano and Vink (2007): in recent literature, Esperanto is never taken into account as a possible option for fostering Europeanization, at least to the extent of the author’s knowledge.

A careful examination of the implication of such position are not relevant for the purposes of this paper. It suffices to point out two arguments in favor of Esperanto as the ‘federal language’ of Europeans. The first argument is that Europe is the cradle of Esperanto; the second argument is that Esperanto is in many respects the quintessence of European languages. In particular, its lexicon is based mainly on Latinate roots, but with considerable contributions from Germanic and some Slavic languages as well – see the corpus-based grammar by Gledhill (2000). The research goal of this paper is to investigate if learning and using Esperanto consistently fosters Europeanization – and, if yes, to what extent – which is the assumption of European Esperanto Federalists. The use of Esperanto as a family language is a clear sign of strong language loyalty and a concrete sign of appreciation of the language per se. In the scenario desired by the European Esperanto Federalists illustrated above, such families would become the norm, instead of being the exception. Therefore, we have addressed this question to Esperanto families who live across Europe. Notably, according to the author’s observation, the majority of Esperanto families worldwide live in Europe, which is a fact that gives robustness to the fieldwork.

The methodology will be illustrated in the next section, while section 3 will show the results of the fieldwork. Finally, section 4 will discuss them, presenting provisional conclusions and directions for further research.

2. Methodology

This pilot study is a follow-up to the results of the sociolinguistic inquiry by Caligaris (2016) on Esperanto identities, which I summarize hereafter. The goal of that inquiry was to understand the place of Esperanto in the multilingual repertoire of its speakers, in terms of identity, both at the individual and group levels. The assumption is that no human language comes without identity, and Esperanto is no exception. The complexity and debate in defining the Esperanto ideology, and in particular its ‘neutrality’, is proof of that (Gobbo 2017). Fieldwork (Caligaris 2016) was carried out at two Esperanto gatherings in Italy, the Youth Festival in Castelsardo (Sardinia; 28 informants) and the Esperanto Italian Congress in Fai della Paganella (Trento; 65 informants). The semi-structured interviews were broad and deep at the same time: the questionnaire was 8 pages long, with 44 questions, open and closed, only in Esperanto. The method used to analyze them was mixed, i.e., both quantitative and qualitative. The resulting profile is homogeneous, with some relevant traits: a majority of Italians, which is a possible bias; first-languages of the informants were mainly (Indo-) European, with the notable exception of English natives, who were totally absent; the level of education is quite high in sociological terms, through the presence of university students, or even people who had obtained a PhD.

There are two prototypical answers in the positioning of Esperanto as an identity marker: first, Esperanto weakens all the identity markers linked to languages and nationalities (“I do not belong to *any* nation, I am cosmopolitan”); second, Esperanto is at the top of a multi-layered identity, encompassing region, country, continent, and finally the world (“I am European, Italian and Lombard, and I am an Esperantist”). However, a distinctive sub-group emerged: Esperanto family speakers, whose presence was not negligible. Notably, the attitudes towards Esperanto families by non-family speakers are very opinionated: either they are a reality or a desideratum, as the ‘natural’ outcome of ‘international friendship’, or they are considered a threat to the ‘neutrality’ of the language – by a minority, but one which is very strong in opposing the idea. This result is *per se* quite interesting, as it is an emergent phenomenon: from the pioneering study by Tanquist (1927; synthesis available in Garvía 2015) the motivations in being part of the Esperanto community generally mention travelling, international friendship, religious and political propaganda (only in the first half of the 20th century), with some internal variation, but they *never* mentioned forming an Esperanto family as an *explicit* goal. This may lead to the construction of an ethnicity in a long run, which is a process involving self-definition as well as external factors (Nagel 2014). The need for more research on the ideological standpoint and self-definition of Esperanto family speakers is evident.

In 2016, the author posted a message in Esperanto, on the mailing list for Esperanto families managed by Jouko Lindstedt, a leading scholar in the field of Esperanto family use (see at least Lindstedt 2015 and 2010), asking for participation on a voluntary basis. Participant observation shows that one of the main purposes of the mailing list is to help the organization of Esperanto meetings tailored to the needs of Esperanto families. In fact, in general, Esperanto gatherings do not have in mind children or teen-agers as participants, and this may prevent the participation of the whole family. Moreover, the open aim behind the organization of these meetings for families is to find Esperanto language peers for their children, so that they can practice the language outside the family unit. As most Esperanto families live across Europe, I asked questions about their feelings towards Europeanization. I introduced this term in a general, non-academic way, as follows: it is the process of construction of Europeans as a community because of the (possible) integration in the domestic discourse and identities, as well as public policies, of the EU in particular and Europe in general. Any reference to language policies was carefully avoided on purpose.

Participation was on a voluntary basis. The author received 13 answers in Esperanto – 10 fathers, 2 mothers, and one young woman. They are reported here in my English translations, and conveniently anonymized, for concerns of privacy.¹ All participants live in Europe. The results have no statistical value and therefore only a qualitative analysis has been performed, clustering the answers along their respective different arguments. In particular, special attention was paid to the intersection, if any, between Esperanto and European identities. It should also be said that the pilot study raised a fair amount of resistance in the mailing list: the study did not contain questions on Esperanto directly – which is something unusual for the habits of the mailing list. For this reason, some participants wrote to me privately explaining why such a survey was, in their opinion, inappropriate for the mailing list, and that I should “turn [my] attention somewhere else”.

Although the researcher asked for private responses on the matter, none were offered. The preference was to answer in the mailing list itself, putting forward the argument that ‘we have nothing to hide’. This behavioral pattern of course partially invalidates the data, as they are not fully independent; in other words, the answers that came at first may have set the stage for later responses, which may have inserted a bias. In spite of this, no explicit debate arose nor did any comments appear regarding the answers of others. This evidence is interpreted as a sort of reluctance to trust the research. Another fact worth mentioning is that two respondents agreed to participate only if their words were reported exactly, and for this reason they answered in English, unlike the others, who always used Esperanto, as did the researcher himself. Further-

¹ Such a number should not surprise an informed reader: although we do not have exact estimates of the number of Esperanto family speakers, we can guess that they number barely more than 1,000 across the world (Lindstedt 2010, Gobbo 2015). Although I do not have the exact figures of the members of the mailing list, my participant observation through the years shows that there is a core of active members of less than 100, the rest being merely readers.

more, the details of their respective answers also show that they *want* to be recognized, i.e., they do not want to remain anonymous. In general, the research was perceived more as a public debate than a disclosure of private details protected by anonymity.

Finally, it is worth noting that, with only one exception, the interviewees responded as individuals, not as members of a family: no discussion among the parents or with the children was recorded, with one notable exception. The exception was a family who took the occasion to discuss the topic with the children as well, and then the parents reported the answer, that will be illustrated in the next section. The sense of surprise regarding the topic and the fact that children were not involved already gives the information that Europeanization, in general, is a concept that remains outside their respective family daily lives.

3. Results

The most frequent argumentative line put forward by the participants is that the whole research is completely irrelevant. As bluntly put by one informant: “there is nothing too serious to be called ‘European identity’ to talk about.” Another answer even challenged the idea of identity as an existing concept per se, but emerging only via contrast, on occasion:

“On my side, I do not have identity. I simply am. Because of my birthplace, I am Xish, so I am Xish and European. Similarly, I am a white man, bald, or a mammal. I am such. Of course, when I am with non-Xish, I note the differences with Xish people. With non-Europeans, I note the ‘Europehood’. I would feel cosmopolitan, when I meet an extraterrestrial, if that will happen... For the family, I do not like too much when they teach the national anthems, or when they paint national flags on the face.”

This sense of discomfort at clear signs of nation-state ideology such as “national anthems” and “national flags” is shared by most informants. In other words, nation-states are perceived as divisive. A German woman answers along similar lines, but stressing its negative: “I feel European with non-Europeans, for differences. But I do not adhere to the European ideology, when it is warlike and imperialistic. I also feel cosmopolitan.”

Such an idea is reinforced by another sharp opinion against Europe as a whole, putting European and Esperanto identities in contrast, supposedly incompatible:

“Being an Esperantist implies that there should be no European identity. Human beings are one big family. The warlike spirit came from Europe and was exported everywhere in the other continents. The EU did not deserve the Nobel Prize for Peace.”

There is only one informant living in Belgium that conversely stresses the relation between Europeanization and peace-building: “We are lucky being Europeans as now we fight with words, not with weapons anymore among us.” His image is vivid: “When we see refugees, we cannot not think that we are so lucky.”

A less drastic view is to link European identity to languages and mobility: “If you do not know English, French and German you cannot feel European. You have to travel a lot spending time living in different countries. Multilingualism shapes European identity.” This is remarkable, as informants were free to describe it with their own words, and immediately the role of the languages as the main vehicles of identity is put forward, without any justification, as if there is no need to explain this ‘matter of fact’ – conversely, the role of religion never entered as a variable, although its crucial role, at least from a historical perspective, is already shown above.

The following informant required his words to be reported as they were formulated, in English, for the sake of the research:

“I’m a German and Argentinian, grew up mainly in Germany, studied in the UK, and am now living in Luxembourg. At age 16 I started learning Esperanto, which I’m using a lot since then, and through which I have made friends with people from all over the world, including many European countries. I identify more as a European and a world citizen than as a German. I am very happy that the European Union has brought peace to us Europeans, and that it it [sic] makes it possible for us to move freely in most of our home continent without showing a passport or having to change money. But I am also afraid that the current conglomeration of crises could bring about steps backwards.”

After this first section concerning European identity, the declaration follows explaining in detail the language policy inside his family:

“With my children I speak mainly Esperanto and sometimes German. My main motive for speaking Esperanto with them is so that they can already as children participate with me and my wife in the international and culturally rich Esperanto community, which is enriching our lives a lot. Since my half Russian, half German wife speaks Russian with them, and since the main language of their environment is Luxembourgish, the children grow up speaking four languages, [...] Our six year old, [sic] on the other hand, already understands that Esperanto is a special language without territory, and is proud that she can sometimes explain this to adults who don’t know about Esperanto.”

This declaration shows clearly that the articulation of the plurilingualism gives a special place to Esperanto, in defining the identity of the whole family. The collective answer by the only family who participated as a whole is along the same lines. One parent is originally from the former Yugoslavia, the other is Scandinavian, and there are two children. They all live in Scandinavia. The research sparked their interest, and

Tiuj idealaj kondiĉoj povas esti pli malpli facile kontentigataj en interkultura situacio. Tamen, Esperanto povas helpi al klara esprimado, ĉar ĝi havas utilajn rimedojn por precizigi la mesaĝon, kaj samtempe por eviti la multobligon de senutilaj informoj. Ekzemple, Piron (1994) rimarkas ke Esperanto ebligas hiperonimojn uzante la afiksan sistemon de la lingvo, tiel ke vorto kiel *skribilo* estas ofte sufiĉa por multaj situacioj kie ne necesas precize indiki la tipon de skribilo; aliaj lingvoj kiel la franca ne havas tian ĝeneralan hiperonimon. Same, oni konstatas ke memstara uzo de afiksoj povas krei tre ĝeneralajn vortojn, kiel: *ejo*, *aĵo*, *ulo*, *ilo*, *umi*, *emi*, *ege*, *eta* kaj tiel plu. Tiuj vortoj ebligas esprimadon de ĝeneralaj konceptoj, kaj samtempe, tiuj afiksaj elementoj, kiam ili estas uzataj kiel afiksoj, ĝuste povas alporti taŭgajn kaj precizigajn informojn. Kvankam Esperanto ne estas *fleksia* lingvo (morfologie), ĝi estas *fleksebla* lingvo (pro sia aglutineca karaktero)³. Tiel ke la kvanto de la informoj povas facile kreski aŭ malkreski laŭ la bezonoj de la komunikado.

² Kompreneble, iu povas malobei tiujn maksimumojn (tio ja kelkfoje okazas), sed tion farante, tiu konscias ke li ne kontentigas la postulojn de efika komunikado, kaj ke tiu konduto povas okazigi riproĉon fare de la alparolatoj.

³ Pro la eventuala ambigueco de la vorto *fleksia*, anstataŭ ĝi oni ofte uzas la vorton *fanda*. Tiu distingo inter *aglutina lingvo* kaj *fleksia (fanda) lingvo* povas esti ilustrata per komparo de Esperanto kun la franca lingvo. En Esperanto, la radiko ne varias, eĉ en kombino kun aliaj vortelementoj. Male, la franca lingvo estas *fanda* lingvo, ĉar la radiko povas varii pro aldono de morfemoj (sufiksoj, finaĵoj...). Ekzemple: *la vol-onté (la vol-o)*, *il veu-t (li vol-as)*, *nous vou-l-ons (ni vol-as)*, *ils veul-ent (ili vol-as)*, *veuil-ez (vi vol-u)*, *ils vou-d-ront (ili vol-os)*, ktp.

Aliflanke, kiam oni konsideras la enhavon de la mesaĝo kaj la necesajn kondiĉojn de interŝanĝo, oni plej ofte uzas la komunikadan modelon (*Skemo 1*), ekzemple tiun de Jakobson (1960), aŭ tiun de Weaver kaj Shannon (1963).



Skemo 1: klasika modelo de la komunikada cirkvito

3. Necesito de alĝustigo por la interparolantoj


Tiu ĉi modelo supozas stabilan komunikadon inter la parolantoj, same kiel la konversaciaj maksimumoj de Grice supozas komunan konon de komunikaj rutinoj. Tamen, tiu ĉi komunikada modelo estis ofte kritikata, ĉar la situacio ne ĉiam iras tiom glate, des pli ke ĝi prezentas la enhavon de la mesaĝo kiel ion facile transporteblan de individuo al alia individuo, kvazaŭ tiu ĉi enhavo estus simpla objekto. Jen kiel Culioli kritikis tiun ĉi modelon:

“ni ofte uzas (konscie aŭ nekonscie) la metaforon de la maŝino: sendanto, ricevanto, nigra skatolo ĉe ĉiu flanko, laŭ la jena skemo: en nigra skatolo, la senco estas transformata al mesaĝo (fluo de sonoj) kiu iras de sendanto al ricevanto (...) Eĉ laŭ fiziologia vidpunkto, oni vidas ke tio tute ne funkcias tiel, ĉar ne ekzistas strikta divido inter elsendo kaj ricevado, pro la ekzisto de retroago (...) La lingva aktiveco ne konsistas el transporto de la senco, sed el produktado kaj interpreto de formoj kiuj estas spuroj de operacioj. Do la signifo ne estas transportata, ĝi estas (re)konstruata. La rilato inter produkto kaj interpreto postulas kapablecon de alĝustigo inter la individuoj. Tiu kapableco malofte ebligas striktan alĝustigon. Pro tio ke estas variado inter la individuoj, estas variado de la alĝustigo” (Culioli 1990: 25-26; nun kaj poste mia traduko).

Tiu alĝustiĝo okazas per uzo de diversaj rimedoj, aparte per ripetoj, redundanco, retroago, spontanaj klarigoj, apogo de la kunteksto kaj de la kultura fono, kaj tiel plu (pri la demando pri redundanco en Esperanto, vidu ekzemple Rivière, 2015). Pri tiu ĉi alĝustiĝo, Culioli indikas ke ĝi ne estas io balasta en la lingvoj, sed integra parto de la lingva aktiveco:

“La komunikado baziĝas sur tiu alĝustiĝo, pli malpli sukcesa, pli malpli dezirata, inter la gvid-sistemoj de la interparolantoj. Ĉiu operacio estas kompleksa, kombiniĝas kun aliaj operacioj, kaj selektas rilatojn kaj valorojn en la sinsekvo de signoj. Tiel oni povas kompreni kial teksto (parola aŭ skriba) ne havas sencon sendepende de la aktiveco de la parolantoj. Kaj pro tio, plursencecoj kaj miskomprenoj estas ne nur klarigeblaj, sed ili estas integra parto de la modelo, samkiel la metaforaj procezoj” (Culioli 1999: 48).

Kiel oni devas kompreni la rilaton inter la signoj kaj la interpretado de la interparolantoj? Tiucele, Culioli enkondukis modelon laŭ tri niveloj de reprezentado (*Skemo 2*).



Skemo 2: modelo de la tri niveloj (laŭ Antoine Culioli)

Ĉe la unua nivelo estas la operacioj (kiuj funkcias kiel “mensaj gestoj”, t.e. mensa aktiveco); ĉe la dua nivelo estas spuroj de tiuj operacioj en la tekstoj, kaj tiuj spuroj estas radikoj, vortoj, frazkonstruoj... Tiuj spuroj estas observeblaj, male de la operacioj kiuj estas nur mensaj (kaj funkcias pli mapli nekonscie ĉe la parolantoj). Fine, ĉe la tria nivelo estas la parolado de la lingvisto (metalingvistika nivelo), kiu celas elmontri la rilatojn inter la videblaj indikoj (paroloj, tekstoj) kaj la mensaj operacioj (pri kiuj eblas nur ellabori hipotezojn).

Laŭ la koncepto de Culioli, la celo de la lingvistiko estas klarigi la rilaton inter la dua nivelo (teksto) kaj la tria nivelo (metalingvistiko), farante la hipotezon ke tiu rilato similos al la rilato ekzistanta inter la dua nivelo (teksto) kaj la unua nivelo (operacioj). El kio konsistas la operacioj? Ĉu temas pri konceptoj, pri kategorioj, pri reprezentado

de eksteraj realaĵoj (aŭ referenco al ĉi tiuj)? Fakte, la teorio de Culioli postulas ke tiuj operacioj funkcii kiel rilatiloj inter aliaj elementoj (t.e. ekzemple nocioj), kaj tiuj rilatoj estas predikativaj kaj enunciativaj rilatoj⁴. En tiu perspektivo, la konceptoj, kategorioj kaj referencoj estas nur rezultoj de tiuj operacioj, kaj ĉio dependas de la konstruado de tiuj kategorioj en la tekstoj mem (parolaj aŭ skribaj tekstoj) kaj en la koncerna kulturo de la parolantoj (kultura dimensio de la nocioj).

4. Varieco de la nocioj laŭ la lingvoj

Tiu varieco de la konceptoj kaj kategorioj estas mem evidenta se oni komparas la lingvojn. Oni povas ilustriti tion per la klasika ekzemplo de Hjelmlev (1957). Estas malsamaj distingoj inter la kategorioj kiuj rilatas al la *arboj*, laŭ la lingvoj, kiel montras la jena tabelo:

| <i>dana</i> | <i>germana</i> | <i>franca</i> | <i>angla</i> | <i>itala</i> |
|-------------|----------------|---------------|--------------|--------------|
| træ | Baum | arbre | tree | albero |
| | Holz | bois | timber | legname |
| wood | | | legno | |
| skov | Wald | forêt | forest | bosco |
| | | | | foresta |

Tabelo 2: arbo-rilataj vortoj laŭ diversaj lingvoj

Kio estas la pozicio de Esperanto inter tiuj lingvoj? La vorton *arbo* oni povas uzi por indiki ununuran *arbon* (singulara formo). La sufikso *-ar-* povas funkcii por indiki grupon de arboj (fr. *forêt*, angl. *forest*), kaj aldono de la sufikso *-et-* povas indiki malgrandan grupon de arboj (fr. *bois*, angl. *wood*, it. *bosco*). *Arbareto* estas *arbaro*, do *arbaro* validas por *Wald* (germ.) kaj *skov* (dan.). La materio mem estas *ligno*, sed ĝi povas esti ankaŭ esprimata per la vorto *arbaĵo* (laŭ la modelo de *porko* / *porkaĵo*, *ŝafo* / *ŝafaĵo*...). Tiel ke *trae* en la dana tradukiĝas en Esperanto per *arbo* aŭ *arbaĵo* (laŭ la kunteksto de la frazo). Siaflanke, la vorto *ligno* (kiel ekvivalento de *arbaĵo*) funkcias por distingi *timber*, sed por la distingo inter *timber* kaj *wood* (angle), aŭ inter *legno* kaj *legname* (itale),

⁴ La vorto *enunciativo* (france „énonciation”) celas inkluzivi semantikon, sintakson kaj pragmatikon, ĉar ĉiu elparolo (énoncé) funkcias kiel tutaĵo laŭ la vidpunkto de la aktiveco de la parolanta individuo. Pro tio, la divido inter tiuj diversaj subfakoj ne estas pravigebla, se oni konsideras la realecon de la parola ago.

validas la distingo inter *ligno* kaj *lignaĵo*. Do, Esperanto povas esprimi, per unu aŭ du radikoj (*arb-* / *lign-*) ĉiujn tiujn distingojn, per aldono de taŭgaj sufiksoj (*-ar*, *-et*, *-aĵ*).

Tiu ĉi priskribo laŭ strukturalisma maniero certe klarigas la problemon de distingo, kiuj povas multe vari inter lingvoj. Pro tio, estis provoj trovi iom da kohereco en tiu variado, kaj serĉi firman grundon en la spertoj mem de la parolantoj. Se temas pri universalaj fenomenoj, devus esti certa logiko en tiu ĉi distingado. Ekzemple pri la koloroj, estis multe da diskutoj: ĉu la elekto de la kolor-nomoj dependas de la lingvoj kaj de kulturoj (laŭ Sapir kaj Whorf), aŭ ĉu estas evoluo de la distingo laŭ la lingvoj (laŭ Berlin kaj Kay, 1969), aŭ ĉu tio dependas de centra valoro aŭ de konkretaj objektoj (laŭ la interpreto de la prototipo, ekzemple ĉe Rosch kaj Wierzbicka, pri kio klarigas ekzemple Golka 2014 parolante pri la franca lingvo)?

| <i>Kwerba</i> Indonezio | <i>Ejagham</i> Niĝerio | <i>Mura-Piraha</i> Brazilo | <i>Candoshi</i> Peruo | <i>Esperanto</i> |
|----------------------------|---------------------------|-------------------------------|--------------------------|------------------|
| icem | ényàgà | biopaiai | kantsirpi | nigra |
| | | ahoasaaga | kavabana | blua verda |
| kainanesenum | ébi | biisai | ptsijaro | flava |
| nokonim | | | chobiapi | ruĝa |
| əsiram | ébàré | kobiai | borshi | blanka |

Tabelo 3: kolor-nomoj laŭ diversaj lingvoj

La bazaj kolor-nomoj de Esperanto ĉi tie similas al hind-eŭropaj lingvoj (Koutny, 2015)⁵. Al tio necesus ankaŭ aldoni la kulturalan interpreton de la koloroj mem, kiu povas multe vari de socio al alia socio. Tamen, por sciencaj aŭ teknikaj situacioj, eblas uzi multe pli precizajn kolor-nomojn (kvankam tiuj nomoj ne estas elementaj kolor-nomoj). Kaj por konkretaj ĉiutagaj situacioj, eblas ankaŭ uzi malpli da precizeco se oni dubas pri la ĝusta koloro de iu afero. Ekzemple, en Esperanto, oni povos diri *pli malpli verda*, *verdeta*, *flavruĝa*, *hela* / *malhela*, *helflava*, ktp.

La demando pri la koloroj estas interesa ĉar ĝi koncernas kontinuecon. Oni povas laŭvole konsideri ke koloroj konsistigas kontinuecan sistemon aŭ diskretan sistemon

⁵ “Color terms are similarly used as their equivalents in European languages, although there are a number of different systems in the world (...) The basic colors are *nigra* ‘black’, *blanka* ‘white’, *ruĝa* ‘red’, *flava* ‘yellow’, *blua* ‘blue’, *verda* ‘green’ (later considered to be primary colors), in addition *bruna* ‘brown’, *oranĝa* ‘orange’, *roza* ‘pink’, *griza* ‘gray’ and *viola* ‘purple’ (known as mixed colors, since gray, for example is a mix of black and white)” (Koutny 2015: 57).

(«diskreta» en la senco de malkontinueco). Fakte, laŭ Culioli, tiuj du eblecoj estas operacioj mem (nomitaj france *Type* kaj *Attracteur*), kiuj povas aplikigi al iu ajn nocio. Do pri io ajn, parolanto povas diri ke A estas la sama afero kiel B, tiel ke ili estas en la sama kategorio (tiam ne estas kvalita diferenco inter A kaj B), aŭ parolanto povas diri (spontane, aŭ reage por kritiki) ke A estas pli malpli kiel B, kvankam ĝi estas malpli tipa en la kategorio. La prototipo do estas nur aparta kazo de pli ĝeneralaj principoj. Pluraj afiksoj en Esperanto kontribuas al la esprimado de tiuj procezoj, ekzemple por kvalitoj (kaj ne nur por koloroj): *-eca*, *-ema*, *-eta*, *kvazaŭ-*, *duon-*.

Al tiu distingo inter Tipoj kaj Kontinueco, aldoniĝas konsidero al la kultura valoro de la nocio. Pro tio, Culioli proponas difinon de *nocio* kiel “fasko de fizikaj kaj kulturaj propraĵoj” (france: “*faisceau de propriétés physico-culturelles*”). Kaj tion oni konstatas eĉ por la koloroj, kiuj ne estas nur fizikaj fenomenoj, sed ankaŭ enhavas tre ofte gravan kulturelan rolon, ekzemple laŭ la simbola valoro de tiu aŭ tiu alia koloro. La ruĝa estas festa koloro en Ĉinio, sed koloro de perforto en Sud-Afriko; la flava estas simbolo de perfido en Francio, sed koloro de riĉeco en Japanio; kaj estas multaj ekzemploj de tiu ĉi fenomeno laŭ la kulturoj.

Aliflanke, tiuj fizikaj kaj kulturaj trajtoj de la vortoj ne devas esti rigardataj kiel rigidaj trajtoj laŭ strukturalisma maniero, kaj pro tio Culioli parolas pri “fasko”. Fakte, ili povas varii laŭ la parolantoj kaj laŭ la kunteksoj. Ne malofte homoj ne interkonsentas eĉ pri la ĝusta koloro kiun ili vidas, kaj iu ekzemple povus diri:

“Por mi, tiu floro ne estas tiom ruĝa, pri tio vi malpravas! Nu... ĝi estas certe iom ruĝa, eble ruĝeta. Aŭ helruĝa? Certe ne oranĝkolora, tion mi certe ne dirus! Se mi rigardas pli atente, ĝi ŝajnas al mi rozkolora. Jes ja: ĝi estas klare rozkolora, kvankam ĝi ne estas rozo, ĉu ne?”

Kvankam tiu eta dialogo estas fikcia, similaj hezitoj estas facile aŭdeblaj ĉe la parolantoj, ĉefe en neformala situacio. Komprenible, tiu variado de komprenoj dum diskutado ne estas aparta trajto de Esperanto. Por esprimi la kolorojn, Esperanto certe havas utilajn rimedojn, sed tio eble ne ĉiam sufiĉas pro la multeco de la koloraj nuancoj – kaj pro la ekzisto de diversaj kulturaj fonoj. Kvankam tiuj esprim-rimedoj ne estas perfektaj, ili povas ludi kiel perilo en interkulturaj situacioj.

5. Varieco de la vidpunktoj pri homaj rilatoj

Simila problemo aperas kun la nomoj de parencoj, kiel montras tiu ĉi tabelo:

| <i>malaja</i> | <i>angla</i> | <i>hungara</i> | <i>indonezia</i> |
|---------------|--------------|----------------|------------------|
| sūdara | brother | báty (+) | kakak |
| | | öcs (-) | adik |
| | sister | nővér (+) | kakak |
| | | húg (-) | adik |

Tabelo 4: parencoj laŭ diversaj lingvoj


Distingoj povas varii laŭ la lingvoj, kaj simpla distingo kiel tiu inter frato kaj fratino, povas esti ne konsiderata de iuj lingvoj (ekzemple kiel la vorto *sudara* en la malaja), kaj inverse tiuj du vortoj ne sufiĉas por lingvo kiel la hungara (kie ankaŭ necesas distingi inter pli juna kaj pli maljuna frato aŭ fratino, vd. Koutny 2015: 57). En la indonezia (en Ĝakarta), la aĝa distingo same aplikiĝas kiel en la hungara, tamen ne estas distingo laŭ la sekso. Kompreneble, la aĝa distingo rekte dependas de la rilata persono (kiu ekzemple povas esti la parolanto, se li/ŝi parolas pri siaj gefratoj, kiuj povas esti ĉu pli junaj, ĉu pli maljunaj ol la parolanto mem).

Tie gravas ĉefe la vortprovizo de ĉiu lingvo, kaj Esperanto denove aperas fleksebla, ĉar ekzistas pluraj esprim-rimedoj. Ekzistas indikilo pri la virina sekso (*ino*) kaj eblecoj por marki la viran sekson: *virfrato* eble sonas strange, sed *fratiĉo* eble uziĝos – kondiĉe ke *frato* (aŭ *gefrato*⁶) mem iam fariĝus neŭtrala formo. Ekzistas ankaŭ indikilo por marki la aĝon: *frateto*, *fratineto* aperis en frua Esperanto; eble malpli karese estas uzo de *jun-* kiel prefikso (*junfrato*, *junfratino* por pli junaj gefratoj). Kaj oni povas imagi eblecojn kiel ekzemple la uzon de *old-* aŭ de *aĝ-* kiel prefiksoj por indiki pli maljunajn: *aĝfrato*, *oldfrato*... (se tiu distingo fariĝus grava en iu ajn situacio). Laŭ la bezonoj de la komunikado kaj laŭ la kultura fono de la parolanto, eblas do indiki tiujn plurajn gravajn distingojn en Esperanto.

Laŭ alia direkto, la apliko de tiuj vortoj al konkretaj personoj povas ankaŭ varii laŭ la kulturoj kaj laŭ la familiaj sistemoj. Se oni konsideras la antropologian vidpunkton, necesas distingi ses ĉefajn famili-sistemojn⁷, kiujn oni povas ilustrati per la jena skemo:

⁶ Tiu ĉi formo kaj similaj jam ekaperis en la uzo, kiel montras Johansson (2015: 237).

⁷ Tiuj sistemoj ricevis diversajn konvenciajn nomojn (laŭ tipaj popoloj kie tiuj famili-sistemoj estas uzataj kaj kie ili estis unue observitaj). La antropologoj aldonas foje sepan sistemon (t.e. la Dravidan famili-sistemon).



Skemo 3: ĉefaj parenc-sistemoj en la mondo

Kiel montras tiuj ĉi sistemoj, tiu kiu estas nomata *kuzo* en eŭropaj kulturoj, povas esti nomata *frato* en aliaj kulturoj (ekzemple en la havaja sistemo). Sammaniere, ekzistas kulturoj kie la edzo de la patrino kaj la frato de la patrino estas ambaŭ nomataj *patro*.

La eŭropa sistemo estas tiu de la nediferencigita eskimo-sistemo (nediferencigita, ĉar la familio organiziĝas de individuoj, ne de parencaroj aŭ triboj). En tiu sistemo, gekuzoj ne estas gefratoj, geonkloj ne estas gepatroj. Inverse, en la omaha sistemo, la fratino de la patrino estas patrino, kaj la frato de la patro estas patro, kaj tial la sama vorto uziĝas por gepatroj, kaj por gefiloj de ili (en la skemoj ĉi tie, ĉiu malsama cifero en iu sistemo estas aparta vorto en la respondaj etnaj lingvoj). Do, la formoj de la vortoj ne sufiĉas por ĝusta interpreto de ili.

Eĉ se du lingvoj uzas samajn distingojn (ekzemple du malsamaj vortoj *frato* kaj *fratino* por la gefratoj), ne estas certe ke la referenco de tiuj vortoj estos same interpretata de ĉiuj, se en la propra socio, tiuj du vortoj ankaŭ aplikiĝas al gekuzoj (aŭ al iuj apartaj kuzoj laŭ la patra aŭ patrino flanko). Do, tio dependas de la nocioj mem. Tiel ke antropologoj difnas tiujn vortojn ne nur pro la vorto-formoj, ne nur pro la genealogiaj pozicioj de la individuoj, sed ankaŭ pro la tipoj de rilatoj kiuj ĝenerale ekzistas inter tiuj parenc-rilatoj. Oni distingas tri bazajn rilatojn: inter geedzoj, inter gepatroj kaj gefiloj, kaj inter gefratoj. Ĉiu el tiuj rilato-tipoj funkcias laŭ certaj reguloj (sociaj, politikaj, psikologiaj, ekonomiaj, moralaj, religiaj...).

Ekzemple pri la gefratoj, ne povas esti la samaj rilatoj inter ili, kiel estas inter gepatroj kaj gefiloj, aŭ kiel estas inter geedzoj. Ni konsideru ĉi tie tiun ekzemplon de la gefratoj: la tipaj rilatoj inter tiuj individuoj estas solidareco kaj sento de protekto, konscio pri sama deveno, konsistigo de sama komunumo (frataro), kaj amika konkurenco (tra ludemo, petolemo, ktp). Ĉar la rilatoj tiel difinitaj ne aplikiĝas nur al gefratoj

laŭ biologia vidpunkto, sed povas ankaŭ aplikiĝi al sociaj gefratoj, povas ekzisti diversaj esprimoj pri tiuj rilatoj, ekzemple en Esperanto estas *laktofratoj*, *mamfratoj*, kaj ankaŭ ekzistas ebleco uzi diversajn prefiksojn (*vic*, *bo-*, *duon-*). Tiu rilato de frateco ne ekzistas nur en la familio, sed ĝi povas ankaŭ ekzisti ekster la familio, tiel ke povas esti *militfratoj*.

La vorto *frato* estas uzata ankaŭ en religiaj komunumoj, kaj oni povas paroli inter amikoj pri *frateco*, uzi la verbon *interfratiĝi*, eĉ diri pri la tuta homaro ke *Ni ĉiuj estas fratoj / gefratoj*. En ĉiuj tiuj uzoj, la samaj valoroj funkcias: solidareco, protektemo, komunumo, amikeco, simileco. La metaforo ne funkcias pro la biologia modelo, sed pro ekzisto de tiuj kulturaj valoroj, kiuj povas esti pli vaste universalaj (ol la apliko mem de la vorto *frato*, kiu povas laŭ la kulturoj ankaŭ aplikiĝi al iuj kuzoj).

Aliflanke, tiuj valoroj mem dependas de iuj specoj de rilatoj inter homoj, kaj pli profunde: inter parolantoj. Estas la sama por diversaj vortoj kiuj postulas indiko-punkton por esti ĝuste interpretataj. Jen kelkaj ekzemploj: *amiko*, *najbaro*, *kolego*, ktp. Manke de pliaj informoj, la interparolantoj interpretas la uzon de tiaj vortoj laŭ tiu, kiu uzas la vorton: «*Patro diris al mi tion*» (= mia patro); «*Kolegoj atendas nin en la apuda salono*» (= miaj kolegoj); «*La najbaroj denove faras bruon*» (= miaj najbaroj). Tiu ĉi parolanto estas la kondiĉa deir-punkto de la interpretado, kaj estas nomata de Culioli kiel *énonciateur* (sekve de Benveniste 1966) – kiun eblas traduki kiel ‘eldiranto’.

6. Rilatoj inter la parolanto kaj la interparola situacio

Fakte, multaj vortoj⁸ en la lingvoj funkcias laŭ tiu principo: la interpreto mem de tiuj vortoj dependas de rilatoj al aliaj elementoj, ĉu personaj, ĉu tempo-rilataj, ĉu subjektivaj. Oni povas aldoni ĉi tie kelkajn ekzemplojn. La tempo-rilataj vortoj dependas de la momento dum kiu oni parolas, ekzemple: *hodiaŭ*, *hieraaŭ*, *morgaŭ* ne povas esti ĝuste interpretataj se oni ne scias kiam ili estas elparolataj.

Subjektivaj vortoj dependas de la vidpunkto de la parolanto; ekzemple komplimentoj aŭ insultoj, aŭ tutsimple adjektivoj kiuj supozas taksadon (*simpatia*, *afabla*, *stulta*, *babilema*, ktp), postulas la konstruon de iu abstrakta valoro kiu estas difinita de la parolanto mem. Tio eĉ validas por vorto kiel *frato*, kiel ilustras tiu ekzemplo de frazo: «*jes ni havas la samajn gepatrojn, tamen mia frato ne plu estas por mi frato, ĉar tiu perfidulo tiom trompis min*»; kaj inverse, tia taksado povas okazi libere: «*tiu amiko estas tre kara por mi, mi konsideras lin kiel fraton*». La metaforoj devenas de tiuj procezoj. Kaj la samo okazas ankaŭ por ordinaraj objektoj, ekzemple pri *tablo*: oni povas pridiskuti pri tio kio estas *tablo*, kio estas vera *tablo*, kaj ĉu tio ĉi povas esti nomata tiel (kiom da piedoj taŭgas? kia materio eblas?).

⁸ Verdire, laŭ Culioli, ĉiuj vortoj sekvas tiun principon. Kvankam mi uzas ĉi tie la bone konatajn ekzemplojn de la deiktoj kaj de la interpersonaj verboj, tiu funkciado de la vortoj kiel rilatigiloj estas fakte io tute ordinara en la lingvoj (sed mi ne povas en la kadro de tiu ĉi artikolo elmontri la pli vastan etendiĝon de tiu ĉi principo).

Evidente, la principo ankaŭ aplikiĝas al verboj kiuj rekte konstruas rilatojn inter la parolantoj, kaj tio gravas por la bona funkciado de la interparolado. Laŭ la teorio de Culioli, ne estas principa diferenco inter semantiko, pragmatiko kaj sintakso, tiel ke ĉiu vorto, ĉiu radiko, ĉiu vort-elemento, ĉiu rilato inter vortoj, povas esti konsiderata kiel *spuro* de operacioj, kiuj povas esti reprezentataj per la samaj (meta)lingvistikaj nocioj; kaj tiuj operacioj baziĝas unue sur la rilatoj inter la parolantoj, kaj sur la (re) konstruitaj nocioj.

Oni povas uzi la ekzemplon de la verboj *peti*, *danki*, *pardoni* (vd. Brown & Levinson, 1987). Povas esti gradoj por ĉiu el ili, tiel ke parolanto povas plifortigi tiun esprimon (se bezone) per adverboj kaj sufiksoj: *mi dankas*, *dankegas*, *ege dankas*, *multe dankas*, *tre multe dankas*... Se oni povas analizi tiun rilaton laŭ la maniero de Wierzbicka (1991), oni povas diri ke tiu verbo *danki* indikas rilaton inter la parolanto kiu ricevis ion bonan en la nuna situacio, kaj la alparolanto kiu estas la origino de tiu bona afero. Tamen, laŭ Culioli, ne eblas konsideri vortojn kiel nociojn aŭ pratipojn, ĉar ne ekzistas primitivaj ideoj, sed ekzistas nur kulture kaj socie konstruitaj nocioj. La rolo de la parolanto en ĉiuj aspektoj de la lingvo estas karakteriza de tiu enunciativa vidpunkto.

La predikativan aspekton oni ankaŭ povas vidi per kelkaj ekzemploj. Ekzemple, *bonvolu* funkcias rilate al la parolanto kaj la alparolanto (via volo, kia ajn, estu bona, ankaŭ por mi), kaj *bonvoli* povas funkcii kun aliaj infinitivaj verboj (*bonvolu eniri*, *bonvolu sidiĝi*...), kiu limigas la interpreton de tio kio estas bona por tiu volo. Se ne estas predikata strukturo (ekzemple la verbo *veni* necesigas nur aganton), *bonvenon* sufiĉas kiel esprimon (ĉar la veno estas jam konstatebla), kaj ne eblos uzi la samajn formojn kiel *bonvoli* (**mi bonvenas*, **bonvenu!*). Pri la verbo *pardoni*, oni povas ankaŭ konstati tiun situacion (*pardonon*), aŭ instigi la alparolanton al tiu pardono (*pardonu min!*). Tie funkcias nocio de nuligo aŭ de forigo de iu ajn plia kompensado, kiu povus esti postulata por iu malbona situacio kiu koncernas la pardonanton.

Fine, oni devas konstati ke tiuj verboj, same kiel aliaj vortoj aŭ vort-elementoj, kiujn oni menciis, ofte estas plursencaj, polisemiaj, kaj tio povas ankaŭ okazigi riproĉon al Esperanto, kiu eble devus funkcii sen ambigueco, sen malprecizeco. Tamen, tiu polisemio ne estas vere problema, ĉar tio estas ĝenerala fenomeno kiu dependas de metaforoj (vd. Lakoff & Johnson 1986). Plie, oni povas observi ke polisemio ekzistas en ĉiuj lingvoj de la mondo, kaj dekomence, tiu polisemio ĉiam utilis por la sociaj rilatoj, tiel ke Victorri (2002) ekzemple, en sia artikolo pri la *homo narrans* (*homo rakontanta*) konsideras ke ĝi certe devenas de la praaj tempoj, kaj ebligis mildigon de konfliktaj situacioj, pri kio ankaŭ Girard (1972) montris la gravecon por prahistoriaj tempoj.

Victorri uzas kiel ekzemplon la polisemion de la verbo *pouvoir* en la franca, kiu estas ankaŭ polisemia verbo en Esperanto: *povi* indikas laŭ la frazoj eblecon, kapablecon aŭ rajton. Imagu konfliktan situacion, ekzemple peton de permeso de infano kiu volas iri por naĝi tuj post la tagmanĝo. La frazo «*vi povas naĝi*» (de la gepatroj) estas polisemia (kompare kun «*vi rajtas naĝi*» aŭ «*vi kapablas naĝi*»). Dank'al la verbo *povi*, la kunekzisto de pluraj interpretoj mildigas la situacion mem de permeso. *Kapablo*

venas de la individuo mem, dum *rajto* venas de aliaj homoj, kaj *ebleco* venas de la situacio. Pro tiu polisemio, «*vi povas naĝi*» signifas ke ne estas iu ajn obstaklo, nek de mi, nek de vi, nek de la situacio... Do ĉio estas en ordo!

7. Konkludo: polisemio kaj miskomprenoj

Tiuj parametroj (polisemio kaj variado de la interpretoj, valoroj kaj formoj de la vortoj, fleksebleco de Esperanto) ne estas malavantaĝo por interkultura komunikado, ĉar polisemio ne estas ĉiam evitinda, sed povas esti socie kaj kulture utila. Ne ekzistas perfekta lingvo, sed lingvo kiu estas uzata kiel ponto inter lingvoj kaj kulturoj devas esti facile adaptebla, kaj akcepti la riskon de miskomprenoj.

Kiel diris ofte Culioli (parafrazante Wittgenstein): “kompreno estas speciala kazo de miskompreno”. Do la miskomprenoj eble estas oftaj, ne nur en Esperanto sed en ĉiuj lingvoj. Kaj oni povas solvi tiujn situaciojn per la esprim-rimedoj de la lingvoj. Por interkulturaj situacioj, kie miskomprenoj abundas kaj kie alĝustiĝoj ofte necesas, Esperanto estas certe tute taŭga kaj adaptiĝema, kvankam ĝi ne estas perfekta lingvo.

Bibliografio

- Benveniste, Emile 1966: De la subjectivité dans le langage ‘Pri la subjektiveco en la lingvo’. En: E. Benveniste: *Problèmes de linguistique générale 1* ‘Problemoj de ĝenerala lingvistiko 1’. Paris: Gallimard. 258–266.
- Berlin, Brent & Kay, Paul 1969: *Basic color terms: their universality and evolution*. Berkeley: University of California Press
- Brown, Penelope & Levinson, Stephen 1987: *Politeness: Some Universals in Language Usage*. Cambridge University Press
- Culioli, Antoine 1990: *Pour une linguistique de l'énonciation 1: Opérations et représentations* ‘Por lingvistiko de la enunciativo 1: Operacioj kaj reprezentadoj’. Paris / Gap: Ophrys
- 1999: *Pour une linguistique de l'énonciation 2: Formalisation et opérations de repérage* ‘Por lingvistiko de la enunciativo 2: Formuligado kaj lokigaj operacioj’. Paris / Gap: Ophrys
- Girard, René 1972: *La Violence et le sacré*, ‘La perforto kaj la sankteco’. Paris: Editions Grasset
- Golka, Maria 2014: La catégorisation linguistique des couleurs : niveaux d'élémentarité des noms de couleurs en français ‘Lingva kategoriado de la koloroj: elementecaj niveloj por la kolornomoj en la franca’. En: *Cognitive Studies / Études cognitives* 2014/14
- Grice, Paul 1975: Logic and Conversation. En: P. Cole & J. Morgan (ed.): *Syntax and Semantics* 3. New York: Academic Press. 41–58.
- Hjelmslev, Louis 1971: Pour une sémantique structurale ‘Por struktura semantiko’. En: L. Hjelmslev: *Essais linguistiques* ‘Lingvistikaj Eseoj’. Paris: Editions de Minuit
- Jakobson, Roman 1960: Closing statements: Linguistics and Poetics. En: T. Sebeok (ed.): *Style in Language*. New York: MIT Press. 350–377.
- Johansson, Sten 2015: Uzi interreton kiel tekstaron por lingvaj esploroj. En: M. Lipari & H. Tonkin (red.): *Interlingvo inter lingvoj. Prilingvaj eseoj*. Rotterdam: UEA. 221–241.

- Koutny, Ilona 2010: Esperantlingva bildo de la mondo. En: D. Blanke & U. Lins (red.): *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin*. Rotterdam: UEA. 290–305.
- 2015: A typological description of Esperanto as a natural language. En: *Język Komunikacja Informacja / Language Communication Information* 10: 43–62.; esperante: Tipologia karakterizo de esperanto kiel natura lingvo. En: Christer Kiselman & Renato Corsetti & Probal Dasgupta (red.) 2018: *Aliroj al Esperanto*. Dobřichovice: Kava-Pech. 129–146.
- Lakoff, George & Johnson, Mark 1986: *Metaphors we live by*. University of Chicago Press
- Papaloïzos, Lilli 1992: *Ethnographie de la communication dans un milieu social exolingue: le Centre Culturel Espérantiste de la Chaux-de-Fonds (Suisse)* ‘Etnografio de la komunikado en socia ekzolingva medio: la Esperanto-Kulturcentro de la Chaux-de-Fonds (Svislando)’. Bern: Peter Lang
- Piron, Claude 1994: *Le défi des langues: du gâchis au bon sens* ‘La defio de la lingvoj: de la ĥaoso al sana prudento’. Paris: L’Harmattan
- Rivière, Christian 2015: Tamen kompreni: Rolo de la kunteksta redundanco. En: M. Lipari & H. Tonkin (red.): *Interlingvo inter lingvoj. Prilingvaj eseoj*. Rotterdam: UEA. 95–107.
- Rosch, Eleanor Heider 1973: Natural Categories. En: *Cognitive Psychology* 1973/4
- Sapir, Edward 1921: *Language: an introduction to the study of speech*. Harcourt: Brace
- Victorri, Bernard 2002: Homo narrans : le rôle de la narration dans l’émergence du langage ‘*Homo narrans: la rolo de la rakontado en la ekapero de la lingvo*’. En: *Langages* 2002/146
- Weaver, Warren & Shannon, Claude 1963: *The Mathematical Theory of Communication*. University of Illinois Press
- Whorf, Benjamin Lee 1956: *Language, thought and reality*. MIT Press
- Wierzbicka, Anna 1991: *Cross-cultural pragmatics: The semantics of human interaction*. Berlin: Mouton de Gruyter

Lingvo kiel ĉies propraĵo, ŝanĝo kiel ĉies rajto: Vortelektio, lingva aŭtoritato kaj normigado en Esperanto

Abstract. Language as everyone’s property, change as everyone’s right: word choice, language authority and standardization in Esperanto

During a debate in an Esperanto association in Paris, Esperantists were discussing technology, surveillance, and freedom, when the question of how to say “drone” in Esperanto emerged. At this point, the previous political debate became a linguistic discussion on possible Esperanto equivalents (*drono*, *droneo*, or *spavo*) and vocabulary choice. Based on socio-anthropological research, this study seeks to explain why, instead of looking for the “right” word in a dictionary, Esperantists often try to create their own words in the language. In everyday conversations in a constructed language, how can speakers refer to things they have no words for? After Zamenhof (the original language authority) died, who can decide whether *drono* is a neologism, non-standard language use or an error?

I propose three principles – flexibility, internationality, and originality – to understand how the linguistic ideology of equality and inclusion upon which Esperanto is based helps to develop vocabulary in this language. Finally, I use Esperanto as point of departure to reflect on language authority, variation, and errors, comparing Esperanto to more standardized languages.

Resumo. En la Esperanto-asocio en Parizo, dum homoj diskutis pri teknologio, gvatado kaj libereco, leviĝis la demando: kiel oni diras *drono* en Esperanto? Post ĉi tiu demando, la antaŭa politika debato fariĝis lingva diskuto pri “drono”, “droneo”, “spavo” kaj vortelektio. Surbaze de soci-antropologia esploro, ĉi tiu studo provas kompreni kial, anstataŭ simple serĉi la “ĝustan” vorton en vortaro, Esperantistoj ofte provas mem krei vortojn. En ĉiutagaj konversacioj en konstruita lingvo kiel oni povas nomi aferojn, por kiuj oni ne havas vortojn? Pro la fakto ke Zamenhof (la origina lingva aŭtoritato) mortis, kiu decidus, ĉu “drono” estas neologismo, parto de ne-norma lingvo-uzo aŭ eraro?

Mi proponas tri principojn – pri fleksebleco, internacieco kaj origineco – por kompreni, kiel la lingva ideologio pri egaleco kaj inkluziveco sur kiu Esperanto baziĝas, helpas evoluigi vortprovizon. Fine, mi uzas Esperanton kiel elirpunkton por pripensi lingvan aŭtoritaton, variecon kaj eraron kompare kun pli normigitaj lingvoj.

Enkonduko

Parizo, novembro 2016. Kiel kutime, grupo de ĉirkaŭ dek du Esperantistoj kunvenis en la sidejo de SAT-Amikaro por sia regula babilrondo en Esperanto. Alveninte al la asocio en tiu malvarma vendreda vespero kunportante fromaĝon, vinon kaj manĝe-

tojn por kunhavigi kun aliaj partoprenantoj, homoj fervore diskutis la temon de tiu vespero: teknologio, gvatado kaj libereco. Tamen la atendata debato pri politiko tuj fariĝis diskuto pri lingvo. Surbaze de antropologia analizo pri la diskuto, kiu sekvis dum ĉi tiu vespero, ĉi tiu studo esploros vortelekton kaj lingvan aŭtoritaton. La datumoj, kiujn mi kolektis dum etnografia kapolaboro kaj arkiva esploro reliefigos, kiel la tri lingvaj principoj, kiuj fundamentas la lingvan ideologion malantaŭ Esperanto instigas demokratian aliron al komunikado kaj igas Esperantujon lingva batalo.

Dum la debato de SAT-Amikaro la partoprenantoj kunhavigis siajn vidpunktojn pri kiel novaj teknologioj – de sociaj retoj ĝis vizaĝaj rekonkameraoj – kontraŭdire kreas spacojn, kie homoj povas esprimi sin kaj senti sin sekuraj, dum ili ankaŭ limigas esprimliberecon kaj favoras lokon, kie okazas kreskanta cenzuro. Tiam Reza¹ – irana Esperantisto, kiu vizitis Parizon kaj partoprenis la debaton – aliĝis al la konversacio parolante pri tio, ke Usono uzis “dronon” en la irana aerspaco por nepermesita gvatado kaj informkolektado. Kiel li klarigis, estis problemoj inter la irana kaj la usona registaroj pro la uzo de “dronoj”, tiel, ke Irano akuzis Usonon pri spionado ĉe la Sekureca Konsilio de la Unuiĝintaj Nacioj en 2011. La partoprenantoj de la debato, kiuj ne sciis pri tio, montris surprizon kaj intereson. Dum homoj starigis demandojn al Reza pri la enhavo de lia interveno, unu el la demandoj, starigita de Idris, kontrastis kun la antaŭa debato: “Parolante pri tio, kiel oni diras *drone* en Esperanto?”

Idris prave atentigis, ke “drono”, la vorto, kiun Reza ĝis tiam uzis por referi al *drone* en Esperanto, estas fakte substantivo devenanta de la verbo *droni*. Kvankam ne ŝajnas ĝuste nomi *drone* kiel “objekto, kiu dronas”, laŭ la kunteksto ĉiuj komprenis, pri kio Reza parolis. Dum Reza senpacience esperis, ke iu sciis la ĝustan vorton, eldirus ĝin kaj permesus al li daŭrigi lian rakonton, Juliette – alia partoprenanto de la babilrondo – ridetis kaj ironie sugestis: “Eble la ĝusta vorto estas ‘droneo’. Kial ne?” Ne konsentante pri la antaŭaj sugestoj kaj igante la diskuton pli serioza, Alain rimarkis: “kaj ‘drono’ kaj ‘droneo’ sonas kiel klaraj prunteprenoj el la angla, kiel la vorto *drone* uzata en la franca. Ĉi tio ne povas esti ĝusta! Devas esti alia vorto por ĝi en Esperanto, *pli internacia!*”

Post ĉi tiu argumento, la politika diskuto pri teknologioj kaj gvatado fariĝis lingva diskuto pri “dronoj” kaj vortelektoj. Tamen, tiu levas alian demandon: kial, anstataŭ simple serĉi la “ĝustan” vorton en vortaro, Esperantistoj ofte provas mem krei vortojn?

Esperanto estis kreita antaŭ la kreado de kosmopramoj, poŝtelefonoj kaj komputilaj programaroj. Sammaniere, kiam la unua Esperanto-libro estis lanĉita, Srilanko ne estis nomata tiel kaj media justeco ankoraŭ ne estis kerna devizo en la Okcidento. Post kiam Zamenhof kaj la unuaj Esperantistoj kreis vortprovizon por indiki aferojn, abstraktaĵojn, lokojn kaj ĉion alian bezonatan en Esperanto, tute nova mondo disvolviĝis. Kun ĝi aperis ankaŭ kreskanta bezono nomi aferojn, starigante elementajn demandojn pri la evoluo de ĉi tiu konstruita lingvo: en ĉiutagaj konversacioj kiel oni povas nomi aŭ priskribi aferojn, por kiuj ni ne havas konceptojn? Ĉar Zamenhof – la originala lingva aŭtoritato – mortis, kiu decidis, ekzemple, ĉu “drono” estas neologismo, parto de ne-norma lingva variececo aŭ eraro?

¹ Mi uzas kaŝnomojn anstataŭ la veraj nomoj por ne identigi la partoprenantojn de mia esploro.

Por analizi tiun oftan vortkreadan praktikon, mi uzos la demandon starigitan dum la debato – kiel oni diras *drone* en Esperanto? – kiel elirpunkton por pli bone kompreni la rolojn ludatajn de lingva ideologio, potencaj rilatoj kaj improvizado, kiam konstruita lingvo iĝas vivanta per sia ĉiutaga uzado.

Ĉi tiu esploro baziĝas sur longdaŭra etnografia kampo-laboro, intervjuoj kaj arkiva esploro, kiu respegulas miajn personajn spertojn kiel antropologo inter Esperantistoj en Francio inter 2016 kaj 2018.² Koncentriĝi pri analizo de interrilato – kiel la lingva debato, kiu malfermis ĉi tiun ĉapitron – ne celas bildigi la tutan Esperantujon. Male, temas pri maniero aliri la detalojn de la regula uzado de Esperanto tiel, ke oni ankaŭ povu esplori la praktikajn formojn de la ideoj kaj ideologio sur kiuj kuŝas la uzado de ĉi tiu lingvo. Post prezento de ĉi tiu lingva diskuto okazinta en Francio mi prezentos, kiel Esperanto evoluas tra la tempo, komparante vortkreadon en Esperanto kun tiuj el aliaj lingvoj. Poste, mi proponos tri principojn por ke ni pli klare analizu lingvan aŭtoritaton en Esperanto.

La antropologo George Marcus (1995) proponas, ke en kunteksto de migrado kaj tutmondiĝo oni studu socian vivon per sekvado de homoj, objektoj kaj iliaj movoj. Adaptante la metodologian aliron de Marcus, mi proponas anstataŭ sekvi homojn kaj objektojn sekvi la vorton – ĉikaze, *drone* – por analizi lingvan aŭtoritaton, variecon kaj eraron.

Ĉi tiu ĉapitro argumentas ke, ĉar Esperanto-denaskuloj ne estas taksataj kiel lingvaj aŭtoritatoj kaj ĉar Esperanto estas ofte prezentata kiel pli justa, inkluziva kaj egaleca lingvo, Esperanto provizas nin per produktiva elirpunkto por diskuti lingvan aŭtoritaton kaj variecon. Transdonante la lingvon kiel kolektivian posedon al ĝia parolkomunumo, Zamenhof celis ne altrudi centran, nediskuteblan aŭtoritaton, tiel lokante horizontalecon je la kerno de la lingva ideologio malantaŭ Esperanto. Dum Esperantistoj grandparte akceptas ĉi tiun egalecan aliron al la lingvo, interkompreniĝo ankaŭ postulas ioman stabilecon kaj normigadon. Tiamaniere, distribuante lingvan aŭtoritaton tra la Esperanto-parolkomunumo, Zamenhof finfine igis Esperanton ĉiam diskutinda temo, kie elekti kaj uzi vortprovizon estas ofte kunligita al politikaj sintenoj.

1. La drono dronanta: la principo pri fleksebleco

Por doni sencon al la lingva ideologio kaj diversaj principoj malantaŭ Esperanto, oni devas unue analizi kelkajn aspektojn de la originoj de ĉi tiu lingvo. En 1887, Zamenhof lanĉis libreton originale ruse, kiu poste estis reviziita kaj eldonita en la rusa, franca, angla, germana kaj pola sub la titolo *Fundamento de Esperanto* (Zamenhof 1905a). Ĝi enhavis tri partojn: enkondukon detaligantan la bezonon de tia lingvo, gramatika sekcio kun dek ses bazaj reguloj, kaj vortaro. Krom ĉi tiu lingva prototipo, Zamenhof

² Ĉi tiu esploro estis farata kaj en Esperanto kaj en la franca, depende de la lingvo en kiu la esplor-partoprenantoj sentis sin pli komfortaj paroli. Por ĉi tiu ĉapitro, ĉiuj dialogoj estis en Esperanto, krom kelkaj vortoj uzitaj en la franca, kiujn mi substrekis.

redaktis la *Fundamentan Krestomation* (1903), kolekto de noveloj, poemoj, sciencaj artikoloj kaj legendoj, kaj regule verkis artikolojn por Esperantaj periodaĵoj, kun la celo konstrui komencan korpuson en la lingvo kaj validigi la regulojn, kiujn li proponis.

Tamen, post starigi la bazojn por sia lingva projekto, li insiste lasis la evoluon de la lingvo en la manoj de ĝia parolkomunumo. Male ol Schleyer, la kreinto de la Volapuka lingvo, Zamenhof rifuzis konservi siajn propriet-raĵtojn sur la lingvo, por ke ĝi povu aparteni al siaj parolantoj.

En la Bulonja Deklaracio, subskribita dum la Esperanto-kongreso de 1905, Zamenhof provis kaj protekti la lingvon kaj malfermi ĝin al ĝia parolkomunumo, deklarante ke li rifuzas “unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, tial Esperanto estas nenies propraĵo, nek en rilato materiala, nek en rilato morala” (Zamenhof 1905b). La sama deklaracio asertas ke la Fundamento estas netuŝebla kaj ke malgraŭ tio, ke la stilo de Zamenhof estas imitinda, ĝi ne estas same netuŝebla. Tiel, kvankam la pozicio de Zamenhof donis iom da stabileco kaj direkto al lingvo-uzado, iu ajn referenco al li estas transdonata strikte kiel rekomendo, ne kiel neceso, tiel ke la Fundamento sole okupas la pozicion de oficiala lingva aŭtoritato.

Tamen, kaj la Fundamento kaj la Deklaracio ankaŭ esprimas klaran rifuzon de lingva aŭtoritato. Asertante, ke la enhavo de la Fundamento estas netuŝebla, ĉi tiuj dokumentoj ankaŭ afirmas, ke iu ajn Esperantisto estas libera kaj havas “la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo”. (Zamenhof 1905b), kaze ke iu ideo ne estas oportune esprimita en la Fundamento.

Dum la dua parto de la Fundamento starigis la gramatikan bazon por la lingvo, la enkonduko al la Fundamento fondis la lingvan ideologion, kiu nutras Esperanton. Tiamaniere, oni povas argumenti, ke la lingva ideologio de Esperanto antaŭvenis la lingvon mem. Ĉar kaj la antaŭparolo de la Fundamento kaj la Bulonja Deklaracio transdonas Esperanton kiel “lingvo neŭtrale homa”, “por ĉiuj popoloj” kaj esence “internacia” (Zamenhof 1905b), ĉi tiuj du verkoj skizas, kiel la lingva strukturo kaj uzo de Esperanto devas esti nedisigebla de la kosmopolitisma ideologio, kiu fondas Esperanton kiel pluralan kaj inkluzivan lingvon “por ĉiuj popoloj”.

Tiusence, lerni Esperanton signifas ankaŭ asimili ĝian kosmopolitan orientiĝon, kiu, je la lingva nivelo, esprimiĝas per onia prefero por vortprovizo, esprimoj kaj prononcmankoj konsiderataj inkluzivaj kaj pli egalecaj, kun la espero esti komprenata de aŭskultantaro kaj legantaro internaciaj. Sekve, se lingvaj ideologioj estas “aroj da kredoj pri lingvo mobilizitaj de uzantoj, kiel raciigo aŭ pravigo de perceptita lingva strukturo kaj uzo” (Silverstein 1979: 193; mia traduko el la angla), la ideologio de egalrajteco, pluraleco kaj inkluziveco nutranta Esperanton estis desegnata (de Zamenhof) kaj estas lernata (de la sekvaj Esperantistoj) antaŭ la lingva strukturo mem.

Kiam temas pri naciaj kaj hegemoniaj lingvoj, lingva aŭtoritato ofte koncentriĝas sur plenpovaj lingvaj konsilioj kaj similaj instancoj: la *British Council* por la angla lingvo; la *Académie française* kaj la *Alliance française* por la franca; en la hispana kazo, estas la *Real Academia Española* kaj *Instituto Cervantes*, samkiel pluraj organizaĵoj orientitaj

al aliaj lingvoj kaj nomataj laŭ eminentaj naciaj specimenoj, kiel Goethe, Dante kaj Camões. Kelkaj el ĉi tiuj institucioj okupiĝas pri lingvaj reguloj, dum aliaj publikigas lernolibrojn kaj respondecas pri disvastigado kaj evaluado de lingvouzo (ekzemple per ekzamenoj). Tiel hegemoniaj lingvoj evoluas nature, per sia ĉiutaga uzado, sed sub la atenta rigardo de fortaj institucioj, kiuj kalkulas je aŭtoritato por taksu ĉu iu specifa lingvouzo aŭ vortelektio estas ĝusta, erara aŭ simple malsimila al la kutima.

Zamenhof kaj aliaj Esperantistoj starigis en 1905 la Lingvan Komitaton, la ĝermon de la Akademio de Esperanto, en provo disigi la personecon de Zamenhof de lingva aŭtoritato. Farita el homoj nomumitaj kaj elektitaj de aliaj akademianoj, ĉi tiu lingva akademio plenumas sian rolon perante inter la aŭtoritato de la *Fundamento* kaj la libereco de ĉiuj lingvo-uzantoj daŭre disvolvi la lingvon, garantiante ke Esperanto estu ĉiam konstruata kaj evoluigata. Per regulaj retaj interŝanĝoj kaj jarkunvenoj, la Akademio aktive intervenas en gravaj lingvaj debatoj kaj reform-proponoj, kiam la *Fundamento* ŝajnas endanĝerigita. Tamen ĝi normale sindetenas de interveno pri detaloj de ĉiutaga lingvouzo. Samkiel libera programaro – kiu estas tre populara inter junaj Esperantistoj en Francio – Esperanto tiamaniere iĝas kunlabora konstruado, al kiu ĉiuj lingvo-uzantoj teorie rajtas kontribui. Tiusence, la Akademio naskiĝis jam esprimante kontesteblan aŭtoritaton, intence kunhavigante sian aŭtoritaton kun la parolkomunumo.

Pro la distribuata aŭtoritato sur la lingvo detenata de pluraj lingvo-uzantoj, lingvo-uzado fariĝas kampo, kie Esperantistoj – kiel tiuj kunvenataj en la babilrondo de SAT-Amikaro – ofte pasigas tempon diskutante vortprovizon per komplika procezo de kolektado de argumentoj por kaj kontraŭ la disponeblaj vortelektioj.

Revenante al la metalingvistika diskuto pri “drono”, Reza iom bedaŭris pro tio, ke li ne povis fini sian rakonton pri la usonaj “dronoj” en Irano, kaj tiam li komencis plendi pri la manko de aŭtoritato de la Akademio:

Estas multaj novaj vortoj en aliaj lingvoj, kiuj devas esti tradukitaj al Esperanto. Ĉi tiun laboron supozeble farus la Akademio – sed ĝi kunvenas ĉeeste nur unufoje jare, kiu ne sufiĉas por ĝisdatigi la lingvon. Rigardu, kiom da vortoj kreis la Akademio en la lastaj jaroj! Ni bezonas Esperantajn vortojn, ekzemple, por paroli pri *drone* aŭ *tablet*!

Ĉar Reza, Idris kaj Juliette ne trovis konsenton pri tio, ĉu estu *drono* aŭ *droneo*, Alain ironie klinis sian kapon antaŭ unu el la vortaroj sur la tablo kaj diris: “Ĉar ni ne scias la respondon, ni kontrolu la PIV-on, nian biblion!”

Eldonita de SAT, la *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV) estas la plej kompleta unulingva Esperanta vortaro, kompilita unue en 1970 kaj regule ĝisdatigita en sia retaj kaj presitaj versioj. Malgraŭ la amplekso de ĉi tiu vortaro, post kiam Alain konsultis ĝian presitan eldonon de 2005, li trovis nek *dronon* nek *droneon*, kio signifas, ke aŭ la PIV ne estis ĝisdatigata aŭ neniu el tiuj du ebloj taŭgis. Intertempe, aliaj babilrondanoj kontrolis Esperanto-francan vortarojn. Tajpante “drono” ĉe Reta Vortaro, Idris ne trovis rezulton, sed tajpante “drone” en la franca, li ja trovis du eblojn: “droneo” kaj

“spavo”, sekvatajn de la klarigo: “La vortradiko ‘spav’ estas mallongigo de SenPilota Aera Veturilo aŭ de SenPilota Aviadilo”.

Post, kiam li laŭtlegis la klarigon, la aliaj partoprenantoj debatis pri tio, kiun vorton ili preferis. Alain asertis ke “‘droneo’ sonas iom tro angle por esti vera Esperanto”, dum la plejparto de la partoprenantoj sin esprimis dirante “Vi pravas, mi preferas ‘spavon’”. Finfine revenante al la politika rakonto pri Irano kaj Usono, la irana partoprenanto diris: “Por mi ne vere gravas, kiun vorton ni uzas. Kondiĉe ke ni komprenu unu la alian, ĉio glatas”. Tamen, Idris kaj Juliette re-emfazis ke ili preferas uzi la vorton “spavo” ekde tiam, kaj tio devigis la irananon fari la samon dum la sekvo de sia parolado.

Tia metalingvistika ekzerco estas ordinara agado, farata de parolantoj de iu ajn lingvo. Tamen, tio, kio estas rimarkinda en ĉi tiu situacio, estas: kial Esperantistoj ofte provas elpensi vortojn, anstataŭ serĉi jam ekzistantajn, kaj kial, poste, ili demokratie elektas, kiun vorton uzi, anstataŭ simple sekvi la aŭtoritaton de la vortaro?

2. Kiu havas la povon post kiam la originala aŭtoritato mortis? La principoj pri internacieco kaj origineco

Kompreneble, vortkreado, necerteco pri vortprovizo kaj disputado pri tio, kiun vorton uzu, ne estas ekskluzivaj trajtoj de Esperanto. Tuŝante zorgojn rilate al imperiismo, lingvo-uzantoj ofte kreas neologismojn por eviti la trudadon de hegemoniaj lingvoj en la koncernan lingvon. Ĉi tiu temo fariĝas grava unuavice inter parolantoj de regionaj lingvoj en Francio. Pro tio ke Francio estas konata pro siaj fortaj normlingvaj ideologioj (Achard 1980; Connor 2019), parolantoj de regionaj lingvoj uzas vortprovizon kiel rimedon por distingi siajn lingvojn de la hegemonia kaj normiga potenco de la franca.

Surbaze de kampo-laboro en Korsiko, la antropologo Matei Candea (2010) priskribas, kiel la parolantoj de la korsika lingvo strebas por distingi sian lingvon de la franca kaj de la itala pere de neologismoj. Du el la ekzemploj, kiujn li analizas estas vortoj kreitaj en la 1990-aj jaroj: la unua estas *scagninu* (el la vorto *scagnu*, “tirkesto”) por metafore paroli pri kasedbendo kiel “tirkesteto”. La dua estas vorto por renomi televidilon kiel *spichjafonu* (laŭvorte, “spegul-telefono”). Ĉi tiuj du korsikaj neologismoj celis anstataŭigi vortojn, kiujn la korsikanoj antaŭe uzis en la franca lingvo, pro la manko de vortoj por priskribi ĉi tiujn teknologiojn en la korsika lingvo. La sama strategio estas uzata de franc-parolantoj kaj de la *Académie française* por eviti anglismojn en la franca: ekzemple, anstataŭigante *e-mail* per *courriel*, *online* per *en ligne* kaj *workshop* per *atelier*. Kelkaj el tiuj neologismoj estas pli sukcesaj kaj iĝas pli uzataj ol aliaj. Tiusence, la korsika vorto *spichjafonu* ne populariĝis, kaj korsikanoj daŭre uzas la francan *télévision*.

Tiu kazo ilustras la manieron, kiel lingvaj ideologioj ludas rolon en vortkreado kaj en la evoluado de lingvoj tra la tempo. Kiel Michael Silverstein (1979; 1985) argumentas pri genro kaj la evoluo de la Usona angla, la lingvaj ideologioj de anglo-parolantoj peras la ŝanĝojn, kiuj okazas en la lingvo, kiuj fine rezultas je novaj normigaj procezoj. En la esploro de Silverstein pri genro kaj lingva strukturo, la uzo

de *he* kiel seksneŭtrala pronomo en la angla fariĝis ĉiam pli kontestata fine de la 20a jarcento de feminismaj movadoj, kiuj taksis *he* kiel lingvan simbolon de patriarkismo kaj genra malegaleco. Kiel rezulto, la kreskanta malakcepto de la ĝenerala *he* favore al *he and she* aŭ *they* okazigas lingvan ŝanĝon, pli kiel konsenkvenco de ideologiaj kaj politikaj elektoj ol pro lingvaj strukturaj kialoj.³

Tiamaniere, pri la korsika lingvo, malgraŭ tio, ke pluraj korsikanoj subtenas lingvo-uzadon kaj vortojn, kiuj estas aŭtentike korsikaj, kelkaj neologismoj estas konsiderataj tro maloportunaj por iĝi vaste uzataj. En la franca, intertempe, protektantoj de la lingvo provas favori originale francajn sinonimojn por kontroli la influon de angladevena vortaro dum, en la angla lingvo, vortprovizo estas kontestata pro politikaj kaj ideologiaj kialoj. Simile en Esperanto vortprovizo kaj kreado de neologismoj ne nur difinas, kiu havas aŭtoritaton sur la lingvo, sed ankaŭ, kiel Esperantistoj decidas inter eblaj aliroj al la ideologio pri inkluziveco, justeco kaj egaleco, kiu vivtenas la lingvon.

Analizante per etnografio pri tio, kiel Esperantistoj decidas pri ĝustaj kaj malĝustaj vortoj kunvenante en asocia ĉambro, ĉirkaŭataj de vortaroj kaj gramatikaj libroj, oni vidas, kiel pluraj lingvo-uzantoj aperas kiel eblaj aŭtoritatoj. Konsekvence, lingvo iĝas polemika kaj ĉiam politikigita afero, pri kiu preskaŭ ĉiuj parolantoj povas sinesprimi kaj al kies disvolvigo ĉiuj povas kontribui. Konsideri la konkurencajn principojn kaj ideologiajn formojn malantaŭ neologisma kreado kaj vortelektio en Esperanto ebligas al ni kompreni, kiel normoj kaj perceptoj pri ĝusteco kaj malĝusteco estas deciditaj en lingvo, kies originala aŭtoritato – ĝia kreinto – mortis.

Zamenhof projektis Esperanton tiel, ke ĝi estu transformita de “artefarite” konstruita lingvo en vivantan, iĝante loko por intertraktado de vortprovizo regule. Laŭ tio, kion mi nomas la *principon pri fleksebleco*, ĉi tiu trajto funkcias por fari Esperanton alirebla kaj inkluziva kiel maniero kontraŭi lingvan diskriminacion. La principo pri fleksebleco rajtigas homojn disvolvi Esperanton kiel liber-programan projekton, kies evoluo kuŝas en la daŭra kunlabora lingva produktado de la parolkomunumo. Tiel la principo pri fleksebleco respondecas pri la percepto ke, ekzemple, proponante vortojn por priskribi teknologiajn aparatojn ankoraŭ ne nomitajn en Esperanto, iu ajn lingvo-uzanto rajtas kontribui al la disvolvigo de la lingvo. Kvankam tia fleksebleco havas limojn, ĝi estas malstrikte difinita per lingvokompreno: fleksebleco kaj improvizado ebligas ke konversacioj en Esperanto daŭru, kondiĉe ke la babilantoj komprenu unu la alian kaj malgraŭ tio, ke ili ne certas pri la ĝusteco de iu specifa vorto aŭ esprimo. Ĉi tiu estas la principo, kiun Reza provis uzi, kiam li eldiris “dronon” en la babilrondo.

Tamen, samkiel en aliaj okcidentaj lingvoj, ekzistas ankaŭ kriterioj kaj mekanismoj por igi Esperanton stabila kaj kohera, kiel korektaĵoj kaj riparoj. Sen tiaj mekanismoj, ĉiam ŝanĝiĝanta lingvo ne povus esti efike lernita aŭ ebligi veran interkompreniĝon.

Kontraste, klasĉambroj – precipe konversaciaj klasoj – provas akordigi flekseblecon kun la kontrolado pri ĝusteco. Dum la instruado de komencantoj kaj progresantoj en SAT-Amikaro, la instruistoj ofte kuraĝigas lernantojn partopreni dumklasan babila-

³ En ĉi tiu volumo aperas artikolo de Marcos Kramer, kiu analizas genron kaj personajn pronomojn en Esperanto.

don, tiel situante lingvan improvizadojn je la kerno de sia pedagogio kaj, samtempe, rimarkigante, kiam iu improviza provo konstituas lingvan eraron. Emfazante, ke francaj Esperantistoj devas pensi pri ĉinaj kaj japanaj Esperanto-parolantoj, kiam ili uzas la lingvon, tiuj instruistoj ofte memorigas siajn lernantojn pri la lingvaj aspektoj de la kosmopolita orientiĝo de Esperanto: “se ni uzas ĉi tiun specifan vorton aŭ prononcas ĉi tion kun tia franca akĉento, ĉu ĉinaj kaj japanaj Esperantistoj komprenus, kion ni diras? Se ne, eble ni bezonos rekonsideri ĉi tion”.⁴ Lerninte Esperanton per la kursoj de SAT-Amikaro, Alain aplikis similan logikon, kiam li montris al siaj interparolantoj, ke “drono” kaj “droneo” estis “tro francaj por esti vera Esperanto”.

Ankaŭ lernaj rimedoj, kiel preskribaj gramatikoj, ebligas mapi, kiuj vortelektoj kaj lingvo-uzoj estas perceptataj kiel ĝustaj kaj malĝustaj, kovrante lingvaj trajtojn, kiuj ne estis difinitaj en la fundamentaj dek ses gramatikaj reguloj de Esperanto. Same, la disvolviĝo de vortprovizo parte dependas de literaturo kaj vortaroj. Krome, kiel formalaj mekanismoj por plifortigi perceptojn pri ĝusta kaj malĝusta lingvo-uzado, prononco, prozodio kaj skribmaniero, UEA subtenas la organizadojn de la KER-ekzameno (kiu taksas lingvo-kompetencon de la kandidatoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj) kaj okazigas, kadre de la Universalaj Kongresoj, Belartajn kaj Oratorajn Konkursojn. Certe, ĉi tiuj materialoj kaj formalaj normigaj mekanismoj tenas certan lingvan aŭtoritaton, sed ili ne nepre formas koheran tuton, nek estas liberaj je polemikoj – kio rezultigas du pliajn konkurencajn principojn.

Unuflanke estas tio, kion mi nomas la *principon pri internacieco*. Por ke Esperanto estu facile komprenebla de multaj homoj tra la mondo kaj, tiel, estu pli inkluziva, justa kaj egaleca ol hegemoniaj lingvoj – kiel ĝiaj subtenantoj ofte asertas – ĝiaj radikoj devas esti kiel eble plej “internaciaj”, por ke la lingvo estu rapide lernebla. Jen la principo, kiu gvidas Esperanto-instruadon ĉe SAT-Amikaro, instigante ke francoj uzu Esperanton en maniero facile komprenebla de aziaj Esperantistoj. Krome, reguloj de internacia lingvo ne devas dependi je reguloj de naciaj lingvoj, tiel ke internacia vortprovizo ne estu “tro angla” aŭ “tro franca”, kiel asertis Alain. Sen nomi ĝin tia, la principo pri internacieco estis priskribita de Zamenhof kiel la dek kvina regulo de la Fundamento:

La tiel nomataj “fremdaj” vortoj, t.e. vortoj, kiujn la pli granda nombro da lingvoj devenigis de la sama fonto, suferas neniun ŝanĝon en la internacia lingvo, krom konformi al ĝia sistemo de ortografio. Tia estas la regulo rilate elementajn vortojn, derivaĵoj pli bone formiĝas (el la elementaj vorto) laŭ la reguloj de la internacia gramatiko, ekz. teatr’o, “teatro”, sed teatr’a, “teatra” (ne teatrical’a), ktp (1905a: 11; mia traduko el la angla).

⁴ Ĉi tiu konsilo venas de la franca Esperantisto Claude Piron (1989), al kiu la internacieco de Esperanto dependis de tio, ke ĝi estu komprenata de parolantoj de Esperanto el socie kaj geografie malproksimaj lokoj, kiel Ĉinio kaj Japanio. Koincide, ankaŭ la sociologo Max Weber (1949: 58–59) instigis sociajn sciencistojn verki por “ĉina leganto” – signifante iun, kiu plej verŝajne ne kunhavas la samajn bazajn supozojn de okcidentaj verkistoj.

Dum la principo pri internacieco privilegias eŭropdevenajn radikojn kaj neologismojn, ĝi ofte konfliktas kun alia principo, ankaŭ rekte rezultanta de la plumo de Zamenhof: tiu de *origineco*.

La Fundamento (precipe ĝia 2.700-vorta vortaro), proverbaro, *Fundamenta Krestomatio* kaj pluraj originalaj kaj tradukitaj poemoj kaj romanoj provizis Esperanton per amaso da radikvortoj, kiuj, por multaj Esperantistoj, sufiĉas por plene disvolvita lingvo. Laŭ la Fundamento, Esperanto estas aglutina kaj permesas al uzantoj prunti vortojn de aliaj lingvoj laŭbezone. Kerna kondiĉo por tio estas ke oni pruntu unu bazan radikon kaj divenigu de ĝi aliajn, tiel ke vortprovizo de la sama leksika kampo devenu el komuna radiko – kiel, ekzemple, *domo*, *domaro*, *domego*, *domano* kaj *urbodomo*.

La enkonduko de la *Universala Vortaro* (parto de la Fundamento) asertas: “Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia Esperanto, oni povas kompreni kun helpo de ĉi tiu vortaro” (Zamenhof 1950a: 84). Tion mi nomas la *principon pri origineco*, kiu konsistas en agnoski, ke Esperanto estas vivanta lingvo kun evoluanta vortaro, sed, kies vortprovizo devas esti tenata kiel eble plej proksima de la radikoj origine enkondukitaj de Zamenhof. Ĉi tio signifas maksimumigi aglutinadon kaj vortprovizon kaj, samtempe, minimumigi la aldonon de novaj radikoj al Esperanto, tiel ke la *Universala Vortaro* – konsiderata tiel netuŝebla, kiel la aliaj sekcioj de la Fundamento – povu daŭre plenumi bezonojn pri vortprovizo.

3. Inter leksikaj elektoj kaj politikaj elektoj

Ĉar teknologio postulas konstantajn lingvajn ĝisdatigojn por nomi novajn aferojn, ĝi konstituas interesan enirpunkton por ke oni esploru la funkciadon de la tri suprepriskribitaj konkurencaj principoj. “Senpilota aviadilo” kaj ĝia mallongigo, “spavo”, estas la rezulto de aglutinado de la prepozicio *sen* + la radiko *pilot* + la adjektiva finaĵo *-a*, sekvita de la radiko *aviad* (funkciigi aerodinon) + la sufikso *-il-* (indikanta ilon) + la substantiva finaĵo *-o*. Pro tio, “spavo” pli proksime rilatas al la principo pri origineco kiel “pure esperanta” kunmetaĵo de fundamentaj radikoj listigitaj en la *Universala Vortaro*. “Droneo”, siavice, ilustras la principon pri internacieco: anstataŭ deveni el fundamentaj esperantaj radikoj, ĝi baziĝas sur la angladevena, pli internacie kaj vaste rekonata *drone*: tamen, dum la angla *drone* referas al virabeloj kaj flugiloj, la Esperanta radiko *dron-* rilatas al la ago droni. Aliflanke, “drono” elegante ilustras la principon pri fleksebleco, kiu temas pri simple kaj rapide adapti la originalan anglan kaj francan vorton *drone*, konatan de ĉiuj partoprenantoj de la babilrondo, al Esperanto, sen multe da peno igi la vorton ĝusta, esperante simple ke ĝi estu komprenebla.

Samkiel paroli “kasedbendo” en la franca aŭ en la korsika kuŝas sur la bezono elekti, kiun lingvan ideologion oni apogas en Korsiko, elekti vortprovizon en Esperanto laŭ ĉi tiuj tri konkurencaj principoj ankaŭ signifas malsame aliri al la lingva ideologio de Esperanto. Por la subtenantoj de internacieco kaj fleksebleco, “spavo” estas perceptata kiel tro nebula por Esperantaj komencantoj, kiuj verŝajne ne plene

komprenus la mallongigon de aglutina vorto, kiu devigas homojn lerni plurajn bazajn radikojn. “Droneo”, siavice, estas perceptata de siaj kontraŭuloj kiel tro eŭropa por tiuj, kiuj ne havas eŭropan lingvon kiel sian unuan lingvon. Intertempe, “drono” starigas diskutojn pro klara pruntepreno, kiu eble permesas tujan komprenon, sed je la kosto endanĝerigi la strukturon kaj la ioman stabilecon de la lingvo.

La sama konflikto validas por aliaj novaj teknologioj ne nomitaj de Zamenhof: ĉu oni nomu *tablet computer* en Esperanto laŭ la pli Zamenhofecaj vortoj “platkomputilo”, “tabulkomputilo” kaj “komputileto”? Aŭ ĉu eble, kiel la pli improvizita, angladevena “tableto” (malgranda tablo)? Kiel pri la angla vorto *software*, kiu estas alternative esperantigita kiel la pli fundamenta “programaro” (aro de programoj uzataj por funkciigi elektronikajn aparatojn, devenanta el la radiko *program-* + la morfemo *-ar-* indikanta kolektivecon + la substantivan finaĵon *-o*) aŭ la pli internacian “softvaro”, kiu kunigas radikojn nefundamentajn, sed, kiu restas fidela al la pli disvastigata angla vorto?

Certe la temo de vortelektio – kaj la lingvaj principoj kaj aliroj al ideologio originantaj de ĝi – ne limiĝas al teknologioj, kiel montras ekzemple la vorto por *hospitalo*. Zamenhof origine sugestis la kunmetaĵon “malsanulejo”. Tra la jaroj, per lingva variado kaj uzado, la “loko por tiuj al kiuj mankas sano” akiris du sinonimojn: la malpli ofte uzata kunmetaĵo “kuracejo” kaj la plej lastatempa formo, malpli aglutina kaj pli internacie uzata “hospitalo”. Tiaj leksikaj diskutoj ankaŭ aperas, foje ŝerce, en la esperantigo de nomoj de lokoj: ĉu la ĝusta esperantigo de la brita urbo *Liverpool* estus “Liverpool” (en la originalo, pli proksima al la Fundamento, kiu ne regas pri personaj kaj lokaj nomoj), “Liverpoo/Liverpulo” (pli internacia, en laŭvorta aŭ fonetika adaptado, devenanta el la angla vorto sekvata de finaĵo) aŭ, kiel aŭdite antaŭe inter britaj Esperantistoj, “Hepathaseno” (la radik-per-radika traduko de *liver*, ‘hepato’ + *pool*, ‘baseno’)?

La konkurencaj principoj sur kiuj la disvolviĝo de Esperanto baziĝas – fleksebleco, internacieco kaj origineco – estis formulitaj de Zamenhof mem.⁵ Nutrante lingvan ideologion, kiu pravigas la ekzistadon de Esperanto en ĝia lernebleco, justeco, inkluziveco kaj egaleco, tamen, ĉi tiuj konkurencaj principoj konsistigas manierojn ekvilibrigi inter du sintenoj. Unuflanke, estas la percepto, ke Esperanto estu laŭeble plej alirebla kaj facila por parolantoj el la tuta mondo; aliflanke, estas la perceptata bezono, ke la lingvo estu sufiĉe kompleksa, por ebligi la plenan esprimon de homaj pensoj pri iu ajn temo. Por permesi al la lingvo esti samtempe facila por lerni kaj kompleksa por uzi, la lingva ideologio malantaŭ Esperanto historie baziĝas sur la rifuzo de klara lingva aŭtoritato. Dum grupoj de parolantoj de la korsika lingvo batalas por aŭtoritato sur sia lingvo, eminentaj Esperantistoj faras la malon: Zamenhof rifuzis esti la sola lingva posedanto kaj aŭtoritato, transdonante la rajtojn sur sia lingvo al ĝia parolkomunumo; la Akademio de Esperanto sindetenas en konfliktoj pri ĉiutaga lingvo-uzado, sinesprimante nur, kiam pli vastaj strukturaj trajtoj de Esperanto estas kontestataj; la antaŭparolo de PIV skizas, ke Eugène Lanti (idealisto de PIV) ne esperis, ke PIV estos perfekta, kompleta aŭ aŭtoritata, sed simple utila al siaj uzantoj (Waringhien 2002 [1968]: 5); kaj Bertilo Wennergren (membro de la Akademio, aŭtoro de PMEG

⁵ Kvankam, kiel antaŭe notite, ĉi tiu terminologio estas mia, ne Zamenhofa.

kaj ĉefredaktoro de la lasta eldono de PIV 2020) deklaris, ke, malgraŭ sia potenco kaj preskriba influo sur la lingvo, li ne volas iĝi “la verda papo” (Wennergren 2020).

La manko de koncentrita aŭtoritato pri ĉi tiu lingvo okazigas debatojn kiel tiu, kiu malfermis ĉi tiun ĉapitron, kiam diskutoj *en* Esperanto iĝas diskutoj *pri* Esperanto. Tamen la tri supreprezentitaj principoj, kvankam kontrastaj, helpas ekvilibrigi facilecon kaj kompleksecon en la lingvo. Plifortigante la lingvan ideologion, kiu proponas ĉi tiun lingvon kiel pli alireblan, inkluzivan kaj egalecan ol lingvoj pli hegemoniaj kaj pli normigitaj, la potenco super Esperanto estas pli distribuita en sia parolkomunumo. Tiel, vortprovizaj elektoj de lingvo-uzantoj ankaŭ estas politikaj elektoj, kiu igas lingvo-uzadon esprimo de politika sinteno pri kiel igi Esperanton alirebla kaj malferma.

4. Konkludaj rimarkoj: repolitikigita lingvo kaj demokratia batalo

La Esperanta Vikipedio, samkiel retaj vortaroj kaj jutubaj filmetoj, alportis pli da dinamiko kaj variado al vortkreado en Esperanto, pro la fakto, ke la kunlabora funkciado de ĉi tiuj platformoj malfermis novajn kampojn por metalingvistikaj debatoj. Kiel antaŭvideble, ankaŭ la diskuto pri *drone* leviĝis ĉe la internacie diversa grupo *Esperanto* (enhavante 22,5 mil membrojn) en Facebook. En junio 2020, brazila membro afiŝis en ĉi tiu grupo bildon de *drone*, demandante, kiel oni esperantigu tiun objekton. 16 homoj reagis al lia demando, rezultante 28 respondojn. La unua konsistis el ligilo, sekvita de mesaĝo dirante: “La Wikipedia artikolo proponas ‘senpilota aviadilo’, ‘spavo’ (mallongigo), au ‘droneo’”. Lian respondon parte malaprobis alia membro de la grupo: “La propono [pri “droneo”] estas malbonega. Mi ne komprenas kial oni devus ekhavi angleskajn neologismojn”. Alia homo – kiu havis foton de la kovrilpaĝo de PIV kiel sian profildildon – ankaŭ plendis pri “droneo”, dirante ke ĝi “ne estas fundamenta”, dum alia grupano respondis: “ĝi ja estas, pro la sama kialo, ke ekzistas ne nur la vorto ‘piedpilko’ sed ankaŭ ‘futbalo’: la 15a regulo de la fundamenta gramatiko”.

Dum la mesaĝa diskuto disvolviĝis, sekvis pliaj sugestoj: “flugroboto”, “helikoptereto”, “flugmaŝino” kaj “flugfotilo”, ĝis kiam alia grupano skribis: “Oni ne devas forgesi, ke ekzistas Akademio de Esperanto, kies unu el la funkcioj estas precize elpensi novajn vortojn taŭgajn al la esperantaj reguloj”. Lia elvoko de la aŭtoritato de la Akademio, tamen, ne ĉesigis la debaton: alia partoprenanto aldonis “Mi vidis ĉinan amikon uzantan ‘spavon’”, dum aliaj daŭre sugestis alternativojn kaj deklaris, kiun vorton ili preferas.

Similaj antagonismoj rilate al vortelekto ankaŭ manifestiĝas en retaj kunlaboraj vortaroj. Male ol vortaroj kompilitaj de aparta redaktoro aŭ institucio, kunlaboraj vortaroj konsistas el kontribuoj de neidentigitaj ordinaraj lingvo-uzantoj. Tiusece, retejoj kiel *Tatoeba* kaj *Glosbe* proponas tradukojn de vortoj el kaj al pluraj lingvoj sekvataj de ekzemplaj frazoj. Ili estas konstante ĝisdatigataj kaj pligrandigataj de siaj

uzantoj: ĉiuj povas registriĝi en ĉi tiuj retejoj kiel kontribuantoj kaj proponi novajn tradukojn kaj ekzemplajn frazojn por montri vortojn en kunteksto. Plej grave estas, ke la kunlabora funkciado de ĉi tiuj datumbazoj aldonas diversecon al la lingvo, plejparte surbaze de la influo de la gepatraj lingvoj de la kontribuantoj. Ekzemple, en la Esperanto-angla versio de *Tatoeba*, la angla substantivo *sink* estas ofte tradukita kiel "lavujo" aŭ "lavkuvo", dum en ĝia Esperanta-franca versio, kvankam kelkaj ekzemplaj frazoj ankaŭ indikas "lavujon", la plejmulto el ili listigas "lavabon" kiel la ĝustan tradukon de la franca *lavabo*.

Tiamaniere, la interreto disponigas kampon, kie novaj lingvaj aŭtoritatoj aperas. Flanke de gramatikistoj, akademianoj, vortareldonistoj, verkistoj, instruistoj, provlegantoj kaj radielsendantoj, ankaŭ jutubistoj, kontribuantoj de Vikipedio kaj tiuj, kiuj regule afiŝas en Esperantaj retpaĝoj kaj grupoj en sociaj retoj fariĝas elstaraj kaj estas ofte rigardataj kiel imitindaj lingvo-uzantoj, kun siaj afiŝoj, tekstoj, voĉmesaĝoj kaj filmetoj starigante novajn lingvajn variadojn, tiel influante lingvouzon.

Ĉe interretaj konversacioj kaj grupoj, oni ofte vidas Esperantistojn korektante alipersonajn (aŭ siajn proprajn) lingvajn erarojn. Prezente sin kiel pli fleksebla, Esperanto ne estas tute libera. Tamen difinoj pri ĝusteco kaj malĝusteco estas relative malstrikataj, pro tio, ke Esperanto estas "nenies lingvo". Esti nenies signifas esti potencie ies ajn, kaj pri tio efektive konsistas la perceptoj pri justeco, inkluziveco kaj egaleco, sur kiuj fondiĝas la lingva ideologio de Esperanto.

Esperanto kalkulas je denaskuloj, edukitaj en esperantlingvaj hejmoj, kiuj havas Esperanton kiel unu el siaj gepatraj lingvoj (Miner 2011). Tamen la lingva kompetenteco de ĉi tiuj Esperanto-parolantoj ne decidas pri lingvaj normoj (Fiedler 2012). Male al denaskaj parolantoj de etnaj lingvoj, Esperanto-denaskuloj ne sociumas en tute esperantlingva medio, tiel ke Esperanto neniam estas ilia sola gepatra lingvo. Pro la manko de nekontestebla norm-provizantaj lingvo-uzantoj, anstataŭ turni sin strikte al la Akademio, al vortaroj aŭ al skribaj specimenoj, Esperantlingvaj praktikoj kaj ideologio disvolvas mekanismojn por rifuzi starigon de rigora aŭtoritato. Kiel konsekvenco, diversaj (ĉefe neformalaj) lingvo-uzoj kaj vortelektoj estas ofte rigardataj kiel lingva variado, anstataŭ kiel eraroj.

Analizante indiĝenajn grupojn en Sudameriko, Pierre Clastres (1989) argumentas, ke al ili mankas la ŝtat-aparato ne ĉar ili ne kapablas organizi centralizitajn potencajn strukturojn, sed ĉar ili intence disvolvas mekanismojn kontraŭ ŝtat-formado. Simile, la lingva ideologio de Esperanto formiĝas per praktikoj, kiuj starigas la parolkomunumon kontraŭ la lingva akademio kaj kiuj aktive malebligas la aperon de nekontestebla aŭtoritato.

La tri konkurencaj principoj ĉi tie priskribitaj estas tio, kio ebligas al Esperanto sin prezenti kiel malfermita, egalrajteca, pli justa kaj inkluziva lingvo. Ĉar lingvo-uzado estas regule kontestebla kaj kontestata, Esperanto estas konstante (re)politikigita, kiu kreas relative demokratian spacon malfermitan por lingva debato. Rifuzante konsideri ĉi tiun lingvon kiel posedaĵon de iu ajn grupo, la tri principoj certigas, ke Esperanto realigu pli demokratian komunikadon, kie lingvo-uzantoj povas kontribui al la lingvo

kaj havi la eblon sugesti la uzadon de unu vorto anstataŭ alia, tiel sin esprimante pli libere, sen esti nepre ĵuĝitaj kiel malbonaj lingvo-uzantoj.

Tiusence, Esperanto repolitikigas interkulturan komunikadon, instigante homojn pensi pri rolo de lingvo, interkompreniĝo kaj egaleco, kiam oni uzas la lingvon kaj skribe kaj parole. Tamen, anstataŭ komplementi unu la alian, la tri principoj, kiuj ebligas tiun liberecon estas ofte konkurencaj, kio igas Esperantujon lingva batalkampo, kie manifestiĝas de subtenantoj de la fundamenta lingvo ĝis ĉiuspecaj reformuloj.

Dankoj

Unue mi ŝatus danki al Ilona Koutny, Ida Stria kaj Michael Farris pro la organizado de la Kvina Interlingvistika Simpozio de la Universitato de Poznano, kie mi unue prezentis kaj diskutis la enhavon de ĉi tiu teksto. Krome mi kore dankas al Thu Ngân Ngô pro la ĉiama subteno kaj inspiro; al Manuela Burghilea pro la atenta legado kaj tre valoraj komentoj pri malneto de ĉi tiu teksto; al Humphrey Tonkin pro la regula kuraĝigo; kaj al Matei Candea kaj Penny Harvey pro la instigo uzi miajn esplordatumojn por pridiskuti lingvajn ideologiojn. Mi ankaŭ dankas la instituciojn, kiuj provizis rimedojn por mia esploro: University of Manchester, Manchester Jean Monnet Centre of Excellence kaj Esperantic Studies Foundation.

Bibliografio

- Achard, Pierre 1980: History and the Politics of Language in France: A Review Essay. *History Workshop Journal* 10/1: 175–183.
- Candea, Matei 2010: *Corsican Fragments: Difference, Knowledge, and Fieldwork*. Bloomington: Indiana University Press.
- Clastres, Pierre 1989: *Society Against the State: Essays in Political Anthropology*. New York: Zone Books.
- Connor, Janet 2019: ‘The Langue d’Oc is bringing people together’: Debating the place of regional languages in France. *Journal of Linguistic Anthropology* 29/2: 249–270.
- Fiedler, Sabine 2012: The Esperanto denaskulo: The status of the native speaker of Esperanto within and beyond the planned language community. *Language Problems and Language Planning* 36/1: 69–84.
- Marcus, George 1995: Ethnography in/of the world system: The emergency of multi-sited ethnography. *Annual Review of Anthropology* 24: 95–117.
- Miner, Ken 2011: The impossibility of an Esperanto linguistics. *Inkoj, Interlingvistikaj Kajeroj* 2/1: 26–51.
- Piron, Claude 1989: *La Bona Lingvo*. Vienna: Pro Esperanto.
- Silverstein, Michael 1979: Language structure and linguistic ideology. En: P. Clyne, W. Hanks, C. Hofbauer (red.): *The Elements: A parasession on linguistic units and levels*. Chicago: Chicago Linguistic Society. 193–247.
- Silverstein, Michael 1985: Language and the culture of gender: At the intersection of structure, usage, and ideology. En: E. Merz, R. Parmentier (red.): *Semiotic Mediation: Sociocultural and Psychological Perspectives*. Orlando: Academic Press. 219–259.

- Waringhien, Gaston 2002 [1968]: Ĝenerala antaŭparolo (1-a eldono). En: G. Waringhien (red): *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Weber, Max 2017 [1949]: *Methodology of Social Sciences*. London and New York: Routledge.
- Wennergren, Bertilo 2020: Bertilo ne intencas iĝi verda papo. *Libera Folio*, 28 septembro 2020. https://www.liberafolio.org/2020/09/28/bertilo-ne-intencas-igi-verda-papo/?fbclid=IwAR1ptD1oWm3Vl6i9KO6_-Z9C5ZK6FB_nFfX89WUzPc45FhQk2Kk5g-NotJw.
- Zamenhof, Lazar Ludwig 1903: *Fundamenta Krestomatio de la Lingvo Esperanto*. Paris: Hachette.
- Zamenhof, Lazar Ludwig 1905a: *Fundamento de Esperanto*. Paris: Hachette.
- Zamenhof, Lazar Ludwig 1905b: *Boulogne Declaration*. <https://web.archive.org/web/20140506075349/http://aktuale.info/en/biblioteko/ddokumendo/1905>.

Ĉu ekzistas bona lingvo?

Abstract. Does a “good language” exist?

The book *La bona lingvo* (The good language) by Claude Piron appeared in 1989 and revived an old debate on neologisms between those who find the vocabulary of the *Fundamento* insufficient and borrow new radicals from their own language to express the nuances they need and those who refuse any unnecessary addition to the *Universala Vortaro* (Universal Dictionary). Claude Piron’s basic idea, however, was not to hinder the evolution of Esperanto, but to raise awareness that imposing western culture on all humanity through avoidable calques is not a good idea. Some criticize the toponym *Barato* (India) as it is not used in European languages, but it is official in a country with twice the population of Europe. The fifteenth rule of the *Fundamento* should not be used in a colonial manner. For Esperanto to remain a “good language” it is first necessary that it is primarily used to communicate with people from diverse cultures and not only with those from the same environment. Secondly, this intercultural communication should not aim to globalize one’s own thoughts but to accept as being of equal value the way those from other cultures receive one’s message, with the goal of effective intercultural comprehension and agreement. Is this possible?

Resumo. La verko de Claude Piron, *La bona lingvo*, aperinta en 1989, vigligis jam malnovan debaton pri neologismoj, inter tiuj, kiuj trovas nesufiĉa la vortprovizon de la *Fundamento* kaj pruntas el la propra lingvo novajn radikojn por esprimi ĉiujn nuancojn bezonatajn de ili, kaj tiuj, kiuj nepre rifuzas ĉiun nenecesan aldonon al la *Universala Vortaro*. Tamen la baza ideo de Claude Piron ne estis malhelpi la evoluon de Esperanto, sed konsciigi, ke trudi iun okcidentan kulturon al la tuta homaro per tiaj eviteblaj paŝaĵoj estas ne bone. Kelkaj kritikas la landnomon *Barato*, ne uzata en eŭropaj lingvoj, sed ĝi ja estas oficiala en lando kun duoble pli nombra loĝantaro ol tuta Eŭropo. La dekkvina regulo de la *Fundamento* ne estu uzata laŭ hegemonia maniero. Por ke Esperanto restu ‘bona lingvo’, necesas unue, ke ĝi utilu ĉefe por komuniki kun homoj el plej diversaj kulturoj, kaj ne nur kun homoj el la sama medio, kaj due, ke tiu interkultura komunikado ne celu tutmondigi la propran penson, sed akceptu kiel samvaloran la manieron, kiel homo kun alia kulturo ricevos onian mesaĝon, celante efektivan interkulturan komprenemon kaj interkonsenton. Ĉu eblas?

Lingva evoluo kaj neologismoj

La verko de Claude Piron, *La bona lingvo*, aperinta en 1989, vigligis jam malnovan debaton pri neologismoj (vd. bonalingvo.net). Sed disdividi la esperantistaron en du kontraŭajn skolojn, la *bonlingvuloj* kaj la *neologismemuloj*, estus tro simpla maniero aliri malsimplan problemon.

Estas tute klare, ke en Esperanto same kiel en ĉiu vivanta lingvo aperas laŭbezone neologismoj, ĉar lingvo evoluas same kiel la mondo evoluas. Sed kia estas tiu bezono je neologismoj? Per la lingvo oni devas esprimi ion novan, kio ne ekzistis en pli frua epoko, aŭ kion oni ankoraŭ ne aŭdis mem. Povas esti, ke la sola solvo estas ja prunti novan radikon el la nacia lingvo, el kiu ni eksciis pri tiu novaĵo. Multaj naciaj lingvoj uzas tiun ĉi rimedon, sed en Esperanto ekzistas aliaj manieroj elturniĝi fronte al tiaj problemoj, kaj pruntado de ekstera radikoj ne nepre estas la plej bona.

Zamenhof evidente ne konis *komputilojn*, kaj la unua emo de la esperantistoj, kiam disvastiĝis la bezono nomi tiujn ĉi maŝinojn, estis paŭsi la originan anglan nomon: *komputero* aŭ *komputoro* (Lo Jacomo 1981: 175–186). Sed iom post iom la esperantistaro konvinkiĝis, ke tia neologismo ne utilas, ĉar Esperanto disponas alian riĉecon: la sufikso *-il*, kiu ĝenerale ne ekzistas en aliaj lingvoj. Tute klare, tio postulis iometan evoluigon de la kerna signifo de *komputi*, ĉar la nuna signifo ne ekzistis, kiam la radikoj estis unuafoje uzataj. Sed ne necesis aŭtoritata decido: la normala evoluo de Esperanto kiel vivanta lingvo sufiĉis por akceptigi la terminon *komputilo*, kiu estas konforma al la logiko kaj la spirito de la lingvo.

Inter la sufiksoj de Esperanto, *-ej* montras la lokon, sed ne nur la lokon mem: *lernejo* ne estas nur konstruaĵo (ĉu *mezgrada lernejo* estas mezgrade konstruita?), sed la tuta institucio ligita al tiu ĉi ejo. Do kial ne uzi la saman sufikson por, ekzemple, *ministrejo*, anstataŭ ol plipezigi la vortrezoron de Esperanto per plia radikoj *ministerio*, kiu estas klara nur por homoj, kies denaska lingvo uzas similan vorton, laŭ logiko alia ol tiu de Esperanto?

La ebleco de virtualaj renkontiĝoj inter homoj el ĉiuj mondpartoj estas sufiĉe nova kaj multe ĝeneraliĝis dum la lastaj monatoj pro la pandemio, kiu malhelpis multajn ĉeestajn renkontiĝojn. Kaj ĝi aperigis novan problemon, kiun Zamenhof ne povis antaŭvidi – ĉar la unua transoceana telekomunikado okazis en 1914 –, ke por kelkaj kunparolantoj estas mateno dum por aliaj estas vespero, tiel ke la klasikaj esprimoj “bonan matenon” aŭ “bonan vesperon” iĝas ne taŭgaj. Fronte al tiu ĉi komplikaĵo, interalie Geoffrey Greatrex salutis nin per: “*bonan tageron*”. Kiu alia lingvo ebligas tiaspecan solvon de tutmonda problemoj?

La kerna riproĉo farebla al neologismemuloj estas la fakto, ke anstataŭ serĉi tian elturniĝon per baza materialo karakteriza por Esperanto, ili maldiligente paŭzas la propran lingvon, kvazaŭ tiu ĉi lingvo estus tiom pli grava ol la aliaj, ke ĉiuj devus kompreni senprobleme ilian paŭsaĵon. Ekzemple, ĉu vorto kiel *descendi* estas utila? Ekzistas pluraj manieroj esprimi tion ĉi en ‘bona’ Esperanto. La plej komuna estas *malsupreniri*, multege pli ofta en la efektive parolata kaj skribata Esperanto ol *descendi*, sed Claude Piron proponis ankaŭ *desupri*. La aserto de Jorge Camacho, en *La mava lingvo* (kritiko de *La bona lingvo*), koncerne liston de vortoj, interalie *descendi*: “Kvankam ne ĉiuj verkistoj ilin uzis, apenaŭ eblas kompreni la esperantan beletron sen ili pro la daŭra kaj kontinua apero en tekstoj de tre diversaj aŭtoroj” aspektas al mi troa.

Sed eĉ se ĝi estus vera, la fakto, ke aŭtoroj uzis eviteblajn radikojn, neniel pravigas, ke oni daŭre uzadu ilin. Lingvo evoluas, kaj eĉ vortoj uzitaj de Zamenhof mem estas nun apenaŭ uzataj. Claude Piron (1989: 19) skribas ekzemple:

“La lingvo ja ŝanĝiĝis. Ekzemple, [Zamenhof] ĝenerale diris *evolucio*. Sed la kolektivo tiusence nun preskaŭ ĉiam diras *evoluo*, kaj sentas ĉi-lastan formon pli tipe Esperanta ol la malnoviĝinta *evolucio*. Tial *evoluo* estas por mi nuntempe pli bona formo. Pro la sama kialo mi preferas *komenti* al la zamenhofa *komentarii*, rezulto al lia rezultato kaj *spontana* al la oficiala *spontanea*”.

Vortojn uzitajn de diversaj aŭtoroj oni evidente konservu en la vortaroj, por ke legantoj de tiuj aŭtoroj povu kompreni ilin, sed tio ne postulas, ke oni plu uzadu ilin. Mi tre ŝatas la francan vorton ‘matutinal’, kiun mi lernis el la plej fama teatraĵo *Cyrano de Bergerac* de Edmond Rostand (1897), kiel sinonimon de ‘matinal’ (*matena*), sed mi neniam uzas ĝin.

Ĉu oni parolas lingvon por plezurigi sin mem aŭ por esti komprenata de siaj kunparolantoj? Eble poetoj emas plezurigi sin mem, kaj verkas por homoj, kiuj havas samajn gustojn, interalie saman kulturon. Sed lingvo kreita por internacia komunikado principe celas pli vastan publikon, homojn el la tuta mondo kun plej diversaj kulturoj. Dum longa tempo, ĉefa argumento kontraŭ Esperanto estis, ke ĝi estas senkultura lingvo. Propran kulturon ĝi iom post iom konstruas, ĉar ĝi ja estas vivanta lingvo. Sed tiu ĉi kulturo ne nepre estu eŭropa kulturo. Eĉ en sciencaj kampoj: venis demando, ĉu oni uzu la vorton *propedeŭtika* aŭ ĉu oni konstruu samsignifan vorton per fundamentaj radikoj, *lernhelpa* aŭ *lernfaciliga*. Se oni alparolas homojn el la sama scienca medio, kiuj ĉiutage uzas en sia lingvo vorton similan al *propedeŭtika*, kaj se nia celo estas pruvi al ili, ke ankaŭ ni apartenas al la sama scienca klubo, do tute klare oni uzu la saman vorton *propedeŭtika*, kiun ili kutimas. Sed eble ĉiuj ĉi homoj ankaŭ kutimas paroli inter si en la angla, do apenaŭ utilas uzi Esperanton. Aliflanke, se ni direktas nian mesaĝon al la tuta mondo, tiel ke ĝi estu komprenata de kiel eble plej multaj homoj el plej diversaj landoj, kulturoj, fakaj medioj, tiam oni prefere uzu vorton, kies signifon ĉiu simpla homo kapablas mem konstrui analizante ĝiajn vortelementojn. *Lernhelpa* aŭ *lernfaciliga* estas tuj komprenebla de iu ajn, eĉ sen studado pri la koncerna fako.

Respekto al kultura diverseco

Bona lingvo ne estas lingvo, kiu entute rifuzas evoluon kaj rifuzas ĉiun ne-fundamentan radikon. Estas amuze, ke inter uzantoj de neologismoj Jorge Camacho mencias Johán Valano, kiu estas kaŝnomo de Claude Piron, aŭtoro de la libro *La bona lingvo*. Sed bona estas lingvo, kiu rifuzas la hegemonian sintenon, laŭ kiu kelkaj eŭropaj lingvoj estas pli gravaj ol la aliaj kaj ĉiuj en la mondo devas lerni radikojn ĉerpitajn el tiuj lingvoj eĉ se ili estas ne vere utilaj. Ni ne ignoru la 15an regulon de la *Fundamento*: “La ‘fremdaj’ vortoj, t.e. tiuj, kiujn la plimulto el la lingvoj pruntis el la sama fonto, ne ŝanĝiĝas en Esperanto”. Sed unue, laŭ mi, pli grava parto de tiu ĉi 15a regulo estas la sekvantaj frazeroj:

“... ricevante nur la ortografion kaj la gramatikajn finiĝojn de tiu ĉi lingvo. Tia estas la regulo koncerne la bazajn vortojn, sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton bazan kaj formi la ceterajn derivaĵojn el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo internacia. Ekz. tragedi|o, sed tragedi|a; teatr|o, sed teatr|a (ne: teatrical|a), k.t.p.”.

Do unu el la aplikaĵoj de tiu ĉi 15a regulo estas la vorto *pico*, skribita per esperantaj literoj kaj ne kiel la origina itala vorto *pizza*, kiun aliaj tiamaj planlingvoj emus paŭsi, ĉar multaj lingvoj asimilis tiun ĉi vorton kun ĝia origina literumo (eĉ rusoj skribas ‘Пицца’ kun duobla ‘ц’).

Kaj due, en tiu ĉi 15a regulo de la Fundamento, kiel kompreni “la plimulto el la lingvoj”? Por mi, matematikisto, tio devus signifi: pli ol 3 500 lingvoj, se konsideri, ke ĉirkaŭ 7 000 lingvoj estas parolataj nun sur la tero. Aŭ eventuale: lingvoj parolataj de pli ol kvar miliardoj da homoj, ĉar nun estas preskaŭ ok miliardoj da enloĝantoj en la mondo (kvinoblo ol en la tempo de Zamenhof!). Antaŭ unu jarcento, Eŭropo enhavis 25% el la tutmonda loĝantaro, nun nur 10%, do malkreskas la argumento, ke la eŭropa kulturo estas nepre tutmonda. Sed ĉiuokaze, ĉu esperantistoj favoru la ideon, ke sufiĉas kelkaj eŭropaj lingvoj por atesti, ke iu radiko estas uzata en “la plimulto el la lingvoj”? “Ĉar mi tuŝas la temon de tiu 15a regulo, Claude Piron skribas (1989: 63), mi faru konstruan proponon. Kial ni ne decidu, ke ĝi aplikiĝos nur, kiam la vorto respondos al objektiva kriterio? Tia kriterio povus esti, ke la radiko ekzistu, samsence, en kvin ne-hindeŭropaj lingvoj. La turka, la hebrea, la indonezia, la hungara, la japana kaj aliaj ja akceptis multajn origine okcidentajn vortojn. Ĉu demokratio ne postulus tian kontrolon antaŭ ol ni rigardu vorton internacia?”

Iniciaton tiudirekten lanĉis Andreas Kück per sia rekomendata testo (2017). Li “rigardas internacia vorton, kiun el unu fonto prenis kaj esence samsignife uzas tri lingvoj, el kiuj apartenas:

- 1) almenaŭ unu al la okcidenta lingva kulturkomunumo,
 - 2) almenaŭ unu al la islama, hinda aŭ orientazia lingva kulturkomunumo kaj
 - 3) ĉiuj al malsamaj lingvosubfamilioj de kiuj ajn lingvofamilioj;
- [se] krome ne estas evidente, ke alian vorton prenis kaj esence samsignife uzas pli da lingvoj, el kiuj pri tri ankaŭ trafas la supraj trajtoj 1 ĝis 3”.

Almenaŭ pli scienca estas tiu ĉi testo ol la simpla konstato, ke du aŭ tri lingvoj pli-malpli parencaj uzas similan vorton: tri lingvoj estas ja malmultaj, sed la kondiĉo pri neparenceco igas la specimenon akceptebla, eĉ se la lasta parto “ne estas evidente, ke alian vorton prenis pli da lingvoj” ne tre plaĉas al sciencista menso, kiu ne emas fidi evidentajojn. Eĉ la unuaj kriterioj de Kück ne estas tiel facile kontroleblaj, ĉar per gugla tradukado ekzemple, kiam malofta vorto estas ne konata de la tradukilo en la cellingvo, tiu ĉi tradukilo kopias la anglan vorton, do la simileco ne estas nepre reala. Cetere, eĉ la esprimo “esence samsignife uzas” estas diskutibla: ekzemple seĝo, kiun franco kutimas nomi *fotelo*, ne nepre estas *fotelo* por hispanlingvano. Kaj por

ĉinlingvano? Ĉu *brakseĝo* ne estas pli klara por ĉiuj? La 15a regulo de la *Fundamento* evidente akceptigas vortojn kiel *hospitalo*, tamen ne estas malpermesate rekomendi pli bazan kunmetaĵon: *malsanulejo*.

Krome, utilas ne nur konstati la similecon, sed esplori la kialon de tiu ĉi simileco. Povas esti hazardo: ‘bad’ signifas *malbona* kaj en la angla kaj en la persa, sed verŝajne pro hazardo. Inter la miloj da lingvoj ekzistantaj tra la mondo, tiaj koincidoj verŝajne multnombros, sed ili estas malmulte esplorataj. Yves Nevelsteen (2018) kolektas markonomojn, kiuj devenas de esperantlingvaj vortoj, sed nur tiujn, kiuj intence estis elektitaj el esperantlingvaj vortoj. Ankaŭ oftas markonomoj, kiuj hazarde identas kun vortoj en Esperanto. Kaj la historio de vorto estas ofte historio de politika superregado: la vorto ‘sequoia’ (*sekvojo* aŭ *sekvojadendro*) estas sufiĉe internacia nomo de arbo kreskanta en Usono, sed usonanoj nomas ĝin ‘redwood’: ili pli kutimas, ke la aliaj lingvoj prunteprenas anglajn vortojn ol ke la angla pruntas vorton el indiĝena lingvo. Kvankam antaŭ miloj da jaroj, pro alidirekta lingva superregado, la angla lingvo pruntis pli-malpli duonon de sia vortrezoro el la franca lingvo. La vorto *tunelo* ŝajne devenas de la angla ‘tunnel’, sed tiu ĉi originas el la franca ‘tonnelle’ (*laŭbo*). Por ne tro fali en la kaptilon, ke ankaŭ Esperanto estus superregata de kelkaj lingvoj, ni ŝparu pruntadon de neologismoj al la okazoj, kiam tio estas vere necesa. La vorto *sokero* utilas en landoj, ĉefe Usono kaj Kanado, kie oni praktikas piedpilkon ludon malsaman ol en la cetera mondo, ĉar necesas ne konfuzi ambaŭ ludojn. Se en la Esperanto-movado, ekzemple dum Universalaj Kongresoj, oni okazigus paralele maĉojn pri usona futbalo kaj pri alilanda piedpilkado, la vorto *sokero* estus verŝajne bezonata. Sed laŭ mia scio tio (ankoraŭ) ne okazas, do *piedpilko* ne estas ambigua.

Bona lingvo devas antaŭ ĉio respekti la kulturalan diversecon. La landnomo *Hindio* ne estas pli internacia ol estus ekzemple *Hitalio*, ĉar en plej multaj lingvoj (krom la turka kaj kelkaj aliaj) la komenca *H* ne aperas en la landnomo. Kaj ĉefe, tiu ĉi komenca *H* kreas konfuzon inter la lando, la *hindua* religio, kiu ne estas la sola religio en tiu lando kaj krome estas praktikata en pli ol 80 aliaj landoj, kaj la *hindia* lingvo, ja la plej grava lingvo de la lando, tamen ne la nacia lingvo kaj parolata nur de malplimulto (inter kiuj malmultaj esperantistoj). Sekve la esperantistoj el tiu lando preferis al la jam disvastiĝinta *Hindio* oficialan nomon de la lando: *Bharato* (en 1982), kaj fine, pro la malfacilo akceptigi la sonkombinon *Bh, Barato* (en 1999). Kaj tio ege ŝokis interalie André Cherpillod, kiu, serĉinte en la antikva tempo pravigon de la komenca *H* de moderna landnomo *Hindio*, skribis (2010: 18):

“Oni devas rimarki – ĉar tio estas tre grava afero – ke **ĉiam** Zamenhof donis al la geografiaĵoj (landoj, urboj, riveroj) Esperantan nomon **konforman al la internacia formo de la nomo**. Sed **neniam, nepre neniam**, Esperantan nomon, kiu estus konforma nur al enlanda aŭ regiona nomo”.

Oni ja povus diskuti, kio estas “la” internacia formo de *Germanio* ekzemple. Krome, kiel rimarkis Otto Prytz (en privata retmesaĝo), la posta aserto mem ne estas tute vera:

“Laŭ PIV la vorto *kimro* estas Zamenhofa, sed en ĉiuj aliaj lingvoj, kiujn mi konas, *Kimrujo* havas tute alian nomon: en la angla ‘Wales’, uzata ankaŭ en la skandinavaj kaj supozeble en la germana, en la rusa ‘Уэльс’, en la hispana ‘País de Gales’, kaj simile en la franca. Nur en la kimra lingvo mem oni nomas la landon/regionon simile, kiel en Esperanto”.

Fakte, traitante la pli ol cent lingvojn de gugla tradukado, oni facile konvinkiĝas, ke radiko simila al *Kimrujo* ekzistas nur en la kimra kaj la gaela, kaj ke plej internacia estas la angla vorto ‘Wales’. Tamen Zamenhof preferis la radikon *kimro*. Cetere, ĉu tiu ĉi kutimo nomi landon per alilingva radiko ne povas mem evolui? La mapo de nia terglobo multe ŝanĝiĝis de post Zamenhof! Ĉu kelkaj eŭropaj esperantistoj rajtas malpermesi al kvazaŭ-kontinento duoble pli enloĝata ol tuta Eŭropo nomi sian landon per radiko oficiala en ĉiuj siaj lingvoj? Antaŭ tridek kvin jaroj, la registaro de la lando *Côte d’Ivoire* postulis, ke la nomo de ilia lando restu senŝanĝa en iu ajn alia lingvo. Ĉu esperantistoj rajtas kontraŭi tiun ĉi postulon, daŭre uzante la tradukon *Ebur-bordo*? Ĉu ne estas rajto de la enloĝantoj elekti la nomon de sia lando, same kiel oni rajtas lasi senŝanĝa sian propran personan nomon? Unu el la eksjugoslavaj respublikoj finfine decidis en 2019 nomiĝi Nordmakedonio. Ne-makedonaj esperantistoj ne enmiksiĝu en tiun ĉi decidon!

La boneco de Esperanto postulas akcepton, ke la propra logiko de Esperanto ne nepre estu paŭsado de la logiko de kelkaj hegemoniaj eŭropaj lingvoj. Uzante esprimon, eĉ kunmetaĵon el fundamentaj radikoj, oni demandu sin: kion komprenos iu kun malsama kulturo? La vorto *forpaso* estas kutime uzata kiel sinonimo de *morto*, ĉar en eŭropaj kulturoj morto estas paso de la mondo de la vivantoj al la mondo de la mortintoj (por kelkaj kulturoj, trans la rivero Aĥerono). Sed ĉu tio ĉi validas tutmonde? Ĉino diris al mi, ke li ne komprenas, kiel *forpasi* povus signifi *morti*, ĉar en lia kulturo morto estus prefere *diopaso*. Tiun ĉi lastan vorton mi komprenis kiel la fakton, ke morto pli kongruas kun paso al iu dia stato ol paso al iu alia loko. Tamen Esperanto akceptis la grekdevenan signifon de *forpaso*, kaj eble estas tro malfrue por ŝanĝi tion. Antaŭ kvardeko da jaroj, iu demandis min, kiel mi komprenus la vorton *kunfali*. Fakte mi ne komprenis, kvankam simila kunmetaĵo ekzistas en la franca ‘coïncider’, la germana ‘zusammenfallen’ kaj probable aliaj lingvoj. Sed Esperanto ne asimilis ĝin.

La signifo de kunmetaĵo ne nepre estas la matematika sumo de ties elementoj, sed ĉefe gravas, ke oni respektu la manieron, kiel homo kun alia kulturo komprenos ĝin. Ĉu la vorto *pugningo* estas komprenebla kiel “metala armilo, per kiu oni ĉirkaŭas la fingrojn por igi pli danĝera pugnofrapon”? Tio ĉi ne estas precize la signifo de *pugno* + *-ingo*, tamen ĉar Esperanto akceptis la vorton *fingringo*, ankaŭ *pugningo* estas komprenebla. La vorto *futbalo* estas ja sufiĉe internacia, malgraŭ la konkurenca *sokero*. Sed por iu, kiu ne konas tiun vorton en la propra lingvo, *piedpilko* estas pli klara. Logike, *piedpilko* estu la pilko mem: por nomi la sporton, la reta vortaro proponas la vorton *piedpilkado*. Tamen, en la praktiko, la sporton oni pli ofte nomas *piedpilko* ol *piedpilkado*.

Decidpovo pri lingva evoluigo

Kiu decidu pri tiaj novaj vortoj aŭ novaj signifoj? Bonaj aŭtoroj evidente grave rolas, sed laŭ kiu kriterio de boneco? Ĉu Karolo Piĉ estis bona aŭtoro? Ankaŭ revuoj grave rolas, sed ĉu lingvaj elektoj de *Monato* pli influas la evoluon de la lingvo ol rekomendoj de la Akademio? Evidente la vortaroj estas la baza referenco, sed la tasko de vortaristo ne estas mem decidi pri la uzindeco kaj la signifoj de la vortoj.

Ĉiuokaze, bona lingvo ne estas lingvo regata de diktatoraj preskriboj. Kaj eĉ flanke de la tiel nomataj bonlingvuloj, kelkaj decidoj povas aspekti kontestinde diktatoraj. En la reeldono de *La bona lingvo* (Piron 1989), Vilhelmo Lutermano decidis aldoni artikolon antaŭ mallongigoj kiel UN (Unuiĝintaj Nacioj), klarigante per piednoto (p. 15):

“[en la UN:] Originale: en UN. Sed UN signifas Unuiĝintaj Nacioj. Tiu esprimo estas ja propra nomo, sed propra nomo konsistanta el ĝenerallingvaj vortoj, kaj antaŭ tiaj propraj nomoj staras la artikolo kiel antaŭ ĉiaj ceteraj substantivoj (vd la gramatikon de *Wennergren*). Dum multa tempo la plej multaj E-istoj ne konsciis tion kaj traktis ĉiujn proprajn nomojn same”.

Tamen, tiu sistema uzo de *UN* kaj *Unesko* sen artikolo en la origina teksto de Claude Piron ne povas esti tajperaro, kaj tiel ŝanĝi la tekston de aŭtoro pro aŭtoritata argumento, kiu aperas nenie en lia verko, ne estas akceptebla. Tiaj piednotoj ne sufiĉos por devojigi la evoluon de Esperanto: estas tute klare, ke en Esperanto oni ne uzas artikolon antaŭ *UN* kaj *Unesko* ekzemple. Eĉ en la franca, en kiu oni ja uzas artikolon antaŭ ‘Unesco’ kaj ‘ONU’, mi mem multe strebas por uzi artikolon ankaŭ antaŭ ‘UEA’, kiam mi mencias Universalan Esperanto-Asocion ene de franca teksto, sed malgraŭ la regulo tute klara en la franca lingvo, ofte oni ne uzas artikolon franclingve antaŭ tiu ĉi mallongigo ‘UEA’.

La demandon pri lingva povo necesas aliri kun aktuala vidpunkto, ĉar la nuna situacio ne plu estas sama kiel en 1905. Tiam, Esperanto estis nur lingvo-projekto, kaj la reganta prizorgo estis: ĉu eblas plibonigi ĝin? La netuŝebleco de la *Fundamento* celas konsciigi, ke ne per individuaj iniciatoj oni plibonigos la lingvon. Zamenhof mem skribis (1910: 114–115):

“La sola celo, kiun la *Fundamento* havas, estas nur: gardi la lingvon kontraŭ *anarĥio*, kontraŭ reformoj *arbitraj* kaj *personaj* [...], kontraŭ forĵetado de malnovaj formoj, antaŭ ol la novaj estos sufiĉe *elprovitaj* kaj tute definitive kaj sendispute *akceptitaj*” (Lingva respondo nro 144: la emfazitajn vortojn substrekis Zamenhof mem).

Sed nun, la lingvo vivas, ĝi ne plu estas nur projekto. La argumento de lingvistoj kiel Claude Hagège, ke tia lingvo ne havas tekstaron, ne plu validas: serĉante la signifon de iu esprimo oni ne plu limigas la esploradon per la *Fundamento* aŭ la Zamenhofa lingvo, eĉ ne nur per vortaroj, sed oni konsideras la amason da okazoj,

kiam ĝi estis uzata depost Zamenhof, kaj la lingvan senton, kiu rezultas el tiu ĉi longtempa uzado.

Do ne per la fakto, ke ĝi restis ŝtonigita de pli ol cent jaroj Esperanto estas bona lingvo, sed per la fakto, ke ĝi malpli kostas kaj malpli diskriminacias ol aliaj lingvoj.

“Nenio valora riceviĝas senkoste, Claude Piron skribas (1989 : 54). Se mi volas komuniki sur intergenta nivelo, mi devas pagi la prezon. Feliĉe, ĉi-koncerne, Esperanto montriĝas bona lingvo durilate: unuflanke, ĉiu perdas malpli ol se alia komunikilo uziĝus; aliflanke, la lingvo estis konceptita por dividi la koston kiel eble plej egale inter la diversaj popoloj”.

Enkonduko de superflujaj neologismoj donas al parolantoj de kelkaj eŭropaj lingvoj privilegion ne meritatan. Claude Piron (1989 : 14) mencias ekzemplon:

“*teologo* unuavide ŝajnas esti fakulo pri teo; ni ja nomas *vinologo* la fakulon pri vino, kaj en lando, kie estas multaj specoj de teo, kun subtilaj aromnuancoj, ekzistas rilate al teo homoj kompareblaj al *vinologoj* pri vino”.

Sed prefere ol tio, oni paŭsis la radikon uzatan en kelkaj eŭropaj lingvoj kun signifo di-fakulo, pro la supozo, ke tiuj ĉi lingvoj estas pli universalaj ol la aliaj. Uzado de tiaj vortoj estas ja diskriminacia al la multegaj parolantoj de lingvoj, kiuj ne uzas similan radikon.

Jorge Camacho opinias: “Por mi esperanto havas senco nur kiel lingvo de altkvalita komunikado. Alivorte: nek lingveto nek lingvaĉo. [...]. Altqualita el la vidpunktoj de la komunikanto, de la ricevanto kaj de la sendaĵo mem. En esperanto mi serĉas do lingvon riĉan, esprimivan, kapablan je precizo kaj je preciozo, je koloroj kaj nuancoj”.

Fakte ni ne konfuzu la ‘bonan lingvon’ kun ‘Esperanto facila’, kiu provizas facile legeblan materialon al komencantoj (same kiel necesas verki taŭgajn publikaĵojn por infanoj). Sed ĉu tiu strebo al altkvalita komunikado postulas trudi la propran kulturon al aliaj homoj, kvazaŭ nia propra kulturo estus nepre pli riĉa, pli altkvalita ol ĉiu alia? Kiam Liven Dek skribis ekzemple (2012: 21): “Sur muro de la koridoro pendis granda ceramika fiŝo. Ĝia korpo, konstruita el pluraj pecoj, estis tiel aranĝita ke la fiŝo naĝis tuj kiam aerblovo riveris”, li ne bezonis neologismon por riĉe esprimi per “aerblovo riveris”, kion malfacilas traduki al kelkaj eŭropaj lingvoj – povas esti, ke en kelkaj aliaj lingvoj eblas similaj esprimoj: vidu la faman konfucean konsilon: 父父 子子 ‘Fufu, zizi’ (*patro patru, filo filu*).

En multaj okazoj, Claude Piron pravas, ke per ioma strebado oni trovas elturniĝojn evitantajn nenecesajn neologismojn. Sed kelkfoje necesas ja cerbumado, dum paŭsado de la propra lingvo kostas malpli da strebado kaj taŭgas interalie al nespertaj esperantistoj. Kelkaj kritikis la prefikson *mal-*, kvankam ĝi donas al la lingvo sian ĉarmon, kiel pravas la poemo de William Auld: *Insulo de fetiĉuloj*:

Kaj kiam en la malmaten'
la suno malaŭroras,
malvek' maliras kun malpen'
kaj oni maldeĵoras,

sed por eviti troan uzadon de *mal*-vortoj, ekzistas aliaj manieroj ol enkonduko de novaj radikoj, kiel montras Claude Piron per tiu ĉi ekzemplo kun tri variantoj:

La malbela maljunulino malfermis la pordon al sia kelo kaj malrapide malsupreniris la ŝtuparon
La turpa oldulino softe apertis la pordon al sia kelo kaj lante descendis la ŝtuparon
La malbela grandaĝulino kviete malfermis la pordon alkelan kaj trankvilpaŝe desupris laŝtupare.

Konsiderante plurajn eblecojn, la ĝusta demando ne estas: “ĉu tiu ĉi esprimo estas kondamninda?” ĉar ĉiuokaze ni ne havas veran eblecon kondamni ĝin. Tradukisto ja konscias, ke la sama frazo povas esti vortumata multmaniere, kaj eĉ la propran preferon oni plurfoje ŝanĝas, kiam oni plurfoje relegas la verkatan tekston. Pli taŭgas la demando: “ĉu tro da libereco ne difektos la lingvan unuecon?” Laŭ mi, lingvan unuecon oni ne serĉu en diktatoraj preskriboj, sed prefere en bonkvalita komunikado.

La kvalito de internacia komunikado

Esperanto ne havas teritoriojn aŭ stabilajn lingvajn komunumojn, tial ĝi permesas sekvi la ‘logikon’ de la L1 kaj ofertas grandan aron da esprimiloj. Esperanto ebligas reprodukti strategiojn uzatajn en alia lingvo. Esperanto sekvas la normon bazitan sur la gramatika akceptebleco: ĉiu gramatike konstruita frazo estas akceptebla. La rezultoj montras, ke la partoprenantoj fokusiĝas sur malsamaj strategioj por priskribi rolulojn kaj aĵojn en rakontoj. La plej frapaj diferencoj implikas, interalie, riĉecon de verba morfologio, provojn esprimi la verban aspekton, specojn de adverboj, adjektivojn kaj intensigilojn kaj iliajn nombrojn en rakontoj.

1. Enkonduko

Ĉiu lingvo havas sian manieron diri aĵojn kaj esprimi ideojn. Ne temas nur pri la diferencoj en la leksiko, gramatiko kaj sintakso, sed ankaŭ pri la maniero pensi pri eventoj aŭ aĵoj kaj organizi esprimilojn inter ili en la parolado, kiun Slobin (1991, 1996 kaj 2003) nomas *thinking for speaking* ‘pensi por paroli’. Gramatikaj konceptoj de la lingvo influas la atenton kaj la pensmanieron kiam oni devas rakonti en tiu-ĉi lingvo. En fremda lingvo (L2), la gepatra (unua) lingvo (L1) kaj ĝiaj gramatikaj konceptoj influas la elekton de esprimiloj en L2. Abunda lingvistika literaturo ilustras tion.

Ĉiuj lingvoj, krom Esperanto, havas limojn rilatajn al la uzo. Lingvoj havas vortojn *bona* kaj *mateno*, sed ne en ĉiuj lingvoj oni povas kombini ilin por saluti iun matene.

Tio eblas en la angla kaj la germana: *good morning* kaj *guten Morgen*. Tio eblas en la rusa, sed la adjektivo *bona*, kiu estas la plej ofte *xopouuuü* ‘ĥoroŝij’, en la saluto estas *доброе* ‘dobroje’, kiu signifas “bona” kaj ankaŭ “bonkora”. Do oni povas diri *bonan matenon* en la rusa: *доброе утро* ‘dobroje utro’. Sed en la rusa, ekzistas alia formo de salutado, kiun oni uzas pli ofte: *здравствуйте* ‘zdravstvujte’ kiu signifas “estu sana”. Simile en la hebrea, oni povas diri *bonan matenon*: בוקר טוב ‘boker tov’, sed oni ankaŭ diras שלום ‘šalom’, kiu signifas “paco”, sendepende de la horo. En la franca kaj en la itala, oni simple ne diras *bonan matenon*: **bon matin* (en la franca) kaj **buona mattina*¹ (en la itala). Similaj ekzemploj abundas.

Kiam oni parolas pri veturado kaj transportiloj, en Esperanto oni povas diri *veturi per boato, per trajno, per aviadilo*, sed en la rusa oni havas tri malsimilajn verbojn. En la itala kaj en la franca, unu verbo sufiĉas: *andare* aŭ *aller* “iri/veturi”. Slobin (1996) diskutas la esprimadon de movado en la angla kaj la hispana kiuj havas diversajn esprimmanierojn por transdoni samajn ideojn.

En la angla, oni uzas la adjektivon *beautiful* “bela” kiam temas pri virino: *beautiful woman* “bela virino”, sed ne eblas diri **beautiful man* “bela viro” kaj oni devus diri *handsome man* aŭ uzi sinonimojn.

2. Esploroj

Miaj studoj baziĝas sur parolaj rakontoj pri pasintaj eventoj kaj rakontoj bazitaj sur la famaj bildoj *Historio pri kato* (cf. Apendico) jam uzitaj en multaj studoj de aliaj lingvistoj. La uzo de bildoj faciligas la komparon de rakontoj: la baza eventa enhavo de la historio estas simila kaj eblas observi la elektojn de parolantoj de tri lingvaj grupoj.

Pro la fakto, ke Esperanto-parolantoj devenas de diversaj lingvaj fonoj, la unua lingvo influas iliajn elektojn en Esperanto. Esperanto permesas pli grandan flekseblecon ol aliaj lingvoj pro sia normo fondita sur la gramatika akceptebleco: iu ajn gramatike konstruita frazo estas akceptebla. La amasa uzo de Esperanto kaj akcepto de tiu-ĉi variado reprezentas distingon trajton de moderna Esperanto.

Mi komparas esprimilojn en Esperanto en rakontoj de parolantoj de la franca, itala kaj rusa kaj komparas strategiojn en Esperanto kaj en la unua lingvo (franca, itala kaj rusa). Materialoj estis kolektitaj laŭ strikta protokolo kaj la partoprenantoj ne sciis pri la vera celo de la studo. La partoprenantoj parolas sufiĉe bone kaj flue en Esperanto kaj uzas Esperanton en ĉiutaga vivo. Ili ne estas multlingvanoj. Ili lernis unu aŭ du fremdajn lingvojn en la lernejo, sed ne scipovas diskuti, skribi aŭ legi en ili. Mi renkontis ilin en Francio, Italio kaj Rusio. Mi havas similajn materialojn en la franca, la franca kaj la rusa: denaskaj unulingvanoj partoprenis en miaj esploroj laŭ la sama protokolo. La materialoj en L1 permesas pristudi strategiojn kaj esprimilojn uzatajn de la partoprenantoj kaj kompari kun la materialoj en Esperanto.

¹ La simbolo * indikas, ke la uzada normo ne akceptas tiun-ĉi formon.

En miaj esploroj, mi interesiĝas, unue, pri tensoj, aspektoj, verbaj formoj kaj, due, pri adjektivoj kaj intensigiloj. Mi analizas ankaŭ Zamenhofan uzon de Esperanto (tensoj, verbaj formoj, adjektivoj), ĉar tiel oni povas observi ne diritajn regulojn, kiujn li mem sekvis. Tiu-ĉi studo resumas plurajn esploroj kaj prezentas la ĉefajn rezultojn.

3. Teoria kadro

En sia modelo de parolproduktado, Levelt (1989) identigas tri stadiojn: konceptado, formulado kaj artikulacio. Konfrontite kun iu okazaĵo, la parolanto unue devas kompreni kio okazis kaj poste elekti kion rakonti. Do, kompreni la okazaĵon, interpreti ĝin kaj elekti la informojn por transdoni estas parto de la unua etapo kiu estas konceptado. La generado de la antaŭvorta mesaĝo estas la rezulto de tiu-ĉi unua etapo: oni havas ideon kion oni diros. Ĉi-tio estas mensa procezo, kiu, laŭ Levelt, okazas sendepende de la lingvo de la parolanto. Tamen multaj esploroj faritaj pri akiro de dua lingvo montris, ke eĉ en tiu-ĉi frua stadio la unua/gepatra lingvo (L1) de la parolanto ludas rolon en la elekto de la transdonotaj informoj. La lasta etapo, la artikulacio de la mesaĝo, ne gravas por miaj esploroj, ĉar temas nur pri fonetikaj aspektoj de la parolo. Por ni tio signifas ke, kiam ni parolas en Esperanto, nia unua lingvo gvidas niajn elektojn: morfologiajn formojn kaj kombinadon de formoj. Prezentotaj rezultoj povas pruvi tion.

4. Tensoj kaj aspektoj

En la lingvoj, la tempeco² esprimiĝas per kombino de esprimiloj: tensoj, aspektoj, leksikaj aspektoj (*Aktionsarten*), adverboj kaj tempaj partikloj. Mi adoptis la difinojn proponitajn de Klein (1994) por tiuj-ĉi esprimiloj, kiu distingas inter koncepto kaj ĝia esprimo kaj inter formo kaj ĝia funkcio. Tio ebligas la komparon de rakontoj en kvar lingvoj, kiuj havas malsamajn manierojn esprimi tempecon. La tempo estas eksterlingvistika koncepto. Ekzistas tri tempoj kiuj estas universalaj: estinta, estanta kaj estonta. Lingvaj tensoj ne koincidas kun la tri tempoj. En multaj lingvoj la rilatoj *antaŭe – nun – poste* pli gravas ol tiel nomataj estinta, estanta kaj estonta tensoj:

- (1) Lastsemajne mi *diris* al Marko ke mi *sendos* al li mian projekton.

En la ekzemplo 1, *mi diris* signifas ke la evento jam okazis kaj *sendos* – ke tiu-ĉi evento okazos poste, *-os*, la estonta tenso, indikas ke tio okazos post *mi diris*. Oni ne certas ke temas pri la estonta tempo kaj la kunteksto gravas por situi la eventon sur la templinio. Ĉiuj esprimiloj havas propran signifon kaj valoron, sed en specifa

² *Temporality* en la angla.

kunteksto kaj situacio la entuta signifo de la frazo ne estas la preciza sumo de apartaj vortoj kaj morfologiaj formoj.

Rigardu nun la ekzemplon 2:

(2) *Lia edzino estis kuracistino.*

En 2, la interpretado de la signifo povas varii. Oni do povas kompreni ke: “Ŝi ne plu estas lia edzino”, “Ŝi ne plu estas kuracistino”, “Ŝi emeritiĝis” aŭ “Ŝi mortis” ĉar *-is* formo povas influi unun aŭ ĉiujn vortojn en la frazo kaj indiki, kio ne plu validas nuntempe.

(3) *Li lernis la hispanan en lernejo.*

La frazo 3 kun *-is* en la verbo signifas unu aŭ du aferojn: finon de la lernado “Li ne plu lernas la hispanan” aŭ rezulton “Nun li scipovas paroli la hispanan”. La diferenco estas de aspekta naturo. La sama ambigueco ekzistas en la franca kaj la itala. En la rusa aŭ en la pola, oni nepre devas elekti taŭgan formon por paroli pri la fino de la lernado aŭ pri la rezulto de la lernado, ĉar la esprimo de la verba aspekto gravas pli ol la simpla esprimo de la tempo. Laŭ la modelo de slavaj lingvoj (kiel la rusa aŭ la pola), oni povas uzi prefiksojn por esprimi la perfektan aspekton:

(4) Li lernis la hispanan. (fino de la lernado – imperfekta aspekto)

(5) Li **ell**ernis la hispanan. (rezulto – perfekta aspekto)

La esprimo de la verba aspekto estas deviga en la rusa en ĉiuj verbaj formoj inkluzive de la infinitivo. Miaj rezultoj montras ke, en esperanto, rusoj uzas prefiksojn por esprimi la perfektan aspekton pli ofte ol du aliaj grupoj (cf. Dankova, 1997 kaj 2009).

Ĝenerale, la prefiksado estas uzata de ĉiuj en movaj verboj: *iri* – *eliri* – *preteriri* – *trairi*. En Esperanto, rusparolantoj uzas prefiksojn en verboj, inkluzive de psikologiaj verboj (kiel *vidi*, *rigardi*, *aŭdi*) kaj kognaj verboj (*scii*, *pensi*, *imagi*), kaj ili faras tion ofte. Por ruslingvanoj la prefiksado aperas ankaŭ en infinitivoj: *havi* (imperfekta aspekto) – *ekhavi* (perfekta aspekto). La prefikso *ek-* estas kutime uzata por marki la komencon de ago: *kanti* – *ekkanti*.

5. Tensoj kaj aktivaj kaj pasivaj participoj

Esperanto havas tri simplajn tensojn: *mi parolas*, *mi parolis*, *mi parolos* kaj formojn kiuj kunmetas la verbon *esti* kun unu el ses participoj. Teorie, oni povas konstrui tiel multajn verbajn formojn. Sed en reala, spontana lingvo, kunmetitaj verbaj formoj estas tre maloftaj. Laŭ miaj rezultoj, en rakontoj, infinitivoj, *-as* kaj *-is* formoj reprezentas inter 87% kaj 95% de ĉiuj verbaj formoj (kunmetitaj verbaj tensoj estis kalkulitaj kiel

unu formo). Italoj uzas kunmetitajn formojn pli ofte ol francoj kaj rusoj kaj nur en situacioj, kie oni devas distingi eventojn laŭ aspektoj. Rakontante en pasinttempo, partoprenantoj de tri grupoj uzas *-as* kaj *-is* formojn ne nur kiel tempajn formojn, sed ankaŭ por esprimi la aspektojn kaj tempajn rilatojn *antaŭe – nun – poste*.

Imagu situacion en pasinttempo: iu volas esti certa, ke alia persono dormas kaj rigardas. La ekzemploj 6, 7, 8 kaj 9 priskribas la situacion: en la momento kiam *li rigardis, ŝi dormas*. La elekto inter kvar eblecoj dependas de la unua lingvo de la parolanto kaj de ĝia maniero esprimi tempajn rilatojn. Mi ripetas, ke mi interesiĝas pri spontana parola Esperanto, ĉar en la skriba lingvo oni havas tempon por pripensi, kiel oni volas esprimi, relegi kaj korekti, tio ne eblas en spontana parolado.

- (6) Li rigardis, ĉu ŝi dormas.
- (7) Li rigardis, ĉu ŝi dormis.
- (8) Li rigardis, ĉu ŝi estis dormanta.
- (9) Li rigardis, ĉu ŝi estas dormanta.

En la ekzemplo 10 prenita el rakonto en estinto, oni rimarkas, ke la evento esprimita per *estis salutinta* okazis antaŭ la evento menciita antaŭe (*la ŝipo forveturis*):

- (10) kaj la ŝipo forveturis kaj ĝi celis francan urbon Dieppe / kaj mi estis tie / mi jam estis salutinta ĉiujn kongresanojn / kaj jes, mi verŝajne opiniis ke kelkaj el ili ankaŭ ŝipos / sed mi ne planis renkonti samideanojn tie.

La kunmetita tenso permesas esprimi tiun-ĉi antaŭecon, ĉar se la rakontanto dirus *mi jam salutis*, oni povus kompreni, ke la salutado okazis post la forveturo de la ŝipo: laŭ tiel nomata *universala ordo* kaj se ne ĉeestas tempaj adverboj indikantaj revenon malantaŭen en la rakonto, ĉiu nova evento menciita okazas post la jam menciitaj. La *universala ordo* permesas konstrui, eĉ sen verba morfologio, tre simplan rakonton, ekzemple en L2 kiam oni estas komencanto. Tiu fenomeno estas observata en ĉiuj lingvoj kaj pro tio ĝi nomiĝas *universala ordo* (Klein 1986).

En la ekzemplo 10, oni ankaŭ rimarkas, ke la verbo *ŝipos* en la estonta tenso ne priskribas eventon, kiu okazos en estonta tempo, sed eventon, kiu okazis post *mi opiniis*, do ie en pasinttempo.

La uzo de kunmetitaj verbaj formoj permesas forigi tempan kaj aspektan ambiguecon; en la ekzemplo 11, kunmetita tenso *estis veninta* indikas revenon malantaŭen kaj havas perfektaspektan valoron:

- (11) kaj la diferenco estis / ke li ankaŭ al Britio estis veninta bicikle.

En la ekzemplo 12, prenita el rakonto en pasinttempo, *gapantaj* havas la valoron de malperfekta aspekto kaj *estis vidintaj*, kiel en la ekzemplo 11, mencias eventon, kiu okazis antaŭ *ni trairis* kaj havas perfektaspektan valoron:

- (12) kaj ni **trairis** la kampon inter **gapantaj** bovinoj kiuj **neniam estis vidintaj** tiun spektaklon

La ekzemplo 13 ilustras aspekton kontraston en pasinttempo: la simpla tenso havas perfektan valoron kaj la kunmetita – imperfektan:

- (13) mi **malfermis** la okulojn / mi **estis veturanta** kiel blindulo

En la ekzemplo 14, kies aŭtoro estas itala esperantoparolanto, la aspekta kontrasto en pasinttempo videblas en participoj. En la momento, kiam la partino-birdo revenis, la kato jam estis forfuĝinta (perfekta aspekto) kaj ankoraŭ estis postsekvata de la hundo (imperfekta aspekto):

- (14) kiam la partino-birdo **revenis** kun la manĝaĵo por siaj birdetoj / la kato estis forfuĝinta postsekvata de la hundo

En la ekzemplo 15, la participo *ekfluganta* havas imperfektan valoron en pasinttempo:

- (15) tie proksime estis kato kiu **vidis sin ekfluganta**

La *Fundamento de Esperanto* ne parolas pri la verba aspekto. Tamen en realeco, la verba aspekto estas esprimata kaj tiel nomataj estinta, estanta kaj estonta tensoj ne estas puraj tensoj.

Pasivaj estontaj participoj (*-ota*) neniam estis uzataj en rakontoj kiujn mi analizis. Aktiva estonta participo (*-onta*) estis uzata nur unufoje en *Historio pri kato: la kato estis preskaŭ atingonta la neston*. Estontaj participoj estas misteraj formoj kaj plej multaj lingvoj simple ne havas ilin. Do estontaj participoj ne havas ekvivalentojn en L1 de partoprenantoj. Zamenhof aldonis estontajn participojn por havi regulecon kaj simetron en verbaj formoj. La lingvoj, kiujn li uzis, ne havas estontajn participojn. Unu el miaj esploroj estis dediĉita al estontaj participoj en Zamenhofa verkaro (Dankova 2015) por ekzameni kiel Zamenhof uzis ilin. En la tuta *Originala verkaro* (1929) aperas nur ses kunmetitaj tensoj kaj kvin el ses enhavas la verbon *esti* kaj pasivan estontantan particon: (*estas*) *ricevota*, (*estas*) *akceptota*, (*estas*) *kronotaj*, (*estas*) *aprobota*, *estis eldonota*, vidu ekzemplon 16:

- (16) [...] Tial mi prenis sur min pretigi tiun ĉi parton, kiu **estis eldonota** poste kune kun la partoj en aliaj kvar lingvoj kaj provizore komencis eliradi per apartaj kajeroj [...] (Zamenhof 1910, Antaŭklarigado al Proverbaro Esperanta, p. 53)

kaj nur unu kunmetitan tenson enhavantan aktivan estontan particon:

- (17) *Ĉiuj ideoj, kiuj estas ludontaj* gravan rolon en la historio de la homaro, havas ĉiam tiun saman sorton [...] (Zamenhof 1900: Esenco kaj Estonteco, p. 276)

Zamenhof konsilis ne tro uzi kunmetitajn tensojn. La maloftaj kazoj estis atestitaj en liaj formalaj tekstoj destinitaj por publikigo. La malofteco de estontaj participoj en kunmetitaj tensoj povus esti klarigita, unue, per la koncepta komplekseco de tiaj formoj kaj per ilia foresto en la lingvoj, kiujn Zamenhof uzis, kaj, due, per la konkurenco kun aliaj, simplaj tensoj.

6. Rakonta organizado kaj tempaj adverboj

La elekto de verbaj formoj ne estas la nura diferenco inter tri lingvaj grupoj. Ankaŭ la uzo de tempaj adverboj malsamas en rakontoj de italoj, francoj kaj rusoj kaj tio veras en Esperanto kaj en L1. Rigardu tion en la ekzemplo de la alveno de la kato al la arbo en *Historio pri kato*. Por priskribi la alvenon de la kato, ili adoptas malsamajn strategiojn. Italoj preferas adverbojn, kiuj lokigas eventojn sur la templinio:

- (18) **en tiu momento** alvenis la kato.

Rusoj preferas adverbojn, kiuj esprimas transirojn de unu evento al alia:

- (19) kaj **tuj** alvenis la kato.
(20) kaj **subite** alvenas la kato.
Francoj troviĝas inter du tendencoj.

Tiuj-ĉi trovoj validas por la rakontoj en Esperanto kaj en gepatraj lingvoj. En la franca, oni ofte rakontas pasintajn eventojn en estanta tenso. Francaj partoprenantoj faras tion ankaŭ en Esperanto. En la franca, se oni rakontas en estinta tempo, oni ofte uzas la estantan tensojn por priskribi la ĉefan momenton en la rakonto. Mi observas la saman strategion en rakonoj de francoj en Esperanto:

- (21) lastesemajne mi promesis al mia partino viziti ŝin ĉar ŝi bezonis helpon en la domo / mi vekigis je la kvina de mateno / mi venis al stacidomo, aĉetis bileton kaj iris al la trajno / kvin minutoj poste, oni **anoncas** ke ne plu **estas** trajnoj por ŝia stacio kaj trajnoj ne **haltas** tie! / mi estis tre malkontenta ...

7. Adjektivoj, sufiksoj kaj intensigiloj

La adjektivoj, kompare al la substantivoj aŭ verboj, ne estas absolute necesaj en la frazo, tamen ili aldonas nuancojn kaj precizecon. “Antaŭ la aĝo de 15 jaroj, rakontoj

povas ne enhavi adjektivojn” (Gayraud 2000). Ĉe plenkreskuloj, la ĉesto de adjektivoj kaj ilia nombro rilatas al la grado de ellaborado de la frazo aŭ rakonto:

(22) Hieraŭ mi vidis filmon.

(23) Hieraŭ mi vidis bonan / interesan / teruran filmon.

Adjektivoj kaj verboj povas esti interŝanĝeblaj en la lingvo, ekzemple oni povas diri: *Mi estas malsata* aŭ *Mi malsatas*. En la rusa oni diras: *я хочу есть* [ja ĥoĉu jest’], tio signifas laŭvorte “mi volas manĝi”, sed eblas ankaŭ diri *я голоден* [ja goloden] laŭvorte “mi malsata”. La unua opcio estas ege pli ofta. Ne temas pri la uzo de la verbo *есть* [jest’] “esti” kiu malaperas en estanta tenso en la rusa, sed pri la uzo de leksikaj verboj anstataŭ adjektivoj: “mi volas manĝi” anstataŭ “mi malsata”.

Intensigiloj povas esti uzataj kun adjektivoj. Ili aldonas nuancon, plifortigas aŭ malfortigas la intensecon de la signifo de adjektivoj: *tute perdita, tre bela, nekredeble talenta, sufiĉe bona*.

Adjektivoj kaj substantivoj povas enhavi sufiksojn, kiuj iomete modifas la signifon, ekzemple: *granda domo, grandega domo, domego, dometo* aŭ *kato, kateto, kataĉo*.

En Esperanto, sufiksoj povas formi novajn vortojn: la sufikso *-et-* formas la adjektivon *eta* kaj la sufikso *-id-* formas la substantivon *ido*. En la frazo *Eta ido iĝis ega*, la radikoj en ĉiuj vortoj estas formitaj de sufiksoj. Uzataj en substantivoj, kelkaj sufiksoj povas anstataŭi adjektivojn: *kajereto, malgranda kajero* aŭ *eta kajero*.

La L1 de la partoprenantoj, la rusa, la itala kaj la franca, ankaŭ havas adjektivajn kaj substantivajn sufiksojn, sed ilia produktiveco malsimilas: en Esperanto, oni povas aldoni *-et-*, *-eg-* aŭ *-aĉ-* al iu ajn substantivo aŭ adjektivo, en la L1 la sufiksado ne funkcias kun la sama reguleco kaj facileco.

La rusa lingvo havas grandan aron da sufiksoj: *собака* [sobaka] “hundo”, *собачка* [sobaĉka] “hundeto”, *собачонка* [sobaĉonka] “kompatinda hundeto” kaj *кот* [kot] “kato”, *котик* [kotik] “kateto”, *котяра* [kotjara] “katego/kataĉo”, *котище* [kotiŝĉe] “katego”. En la rusa lingvo, pluraj sufiksoj povas aldoni gradojn al la sama vorto kaj eblas uzi du sufiksojn en la sama vorto.

La itala havas kelkajn diminutivajn kaj malestimajn sufiksojn por substantivoj, la diminutiva sufikso *-in-* estas la plej ofta, oni povas aldoni ĝin al multaj substantivoj: *tavola* “tablo” – *tavolina* “tableto kaj *uccello* “birdo” – *uccellino* “birdeto” kaj “birdido”. La duobla diminutivo ankaŭ eblas en la itala.

En la franca, la diminutivo estas formata per diversaj sufiksoj, sed tiuj-ĉi sufiksoj ne estas tiel produktivaj kiel en la rusa aŭ en la itala. Aldoni la adjektivon *petit* “malgranda” antaŭ substantivo estas la plej efika kaj la plej ofta maniero esprimi la diminutivon en la franca (Dankova 2018).

Analizante la adjektivojn uzitajn en la korpuso, mi ekzamenas ilian nombron kaj la uzon de intensigiloj. Krome, mi ekzamenas la lokon de adjektivoj – antaŭ aŭ post la substantivo –, ĉar Esperanto permesas ambaŭ poziciojn, kaj la uzon de sufiksoj uzeblaj anstataŭ adjektivoj. Chii-kvadrata testo estis farita por la kvantaj datumoj.

Rezultoj montras (Dankova 2020), ke en Esperanto la informantoj uzas pli da adjektivoj en personaj rakontoj ol en *Historio pri kato*: la personaj rakontoj estas pli longaj ol la rakontoj bazitaj sur la serio de bildoj, sed la longeco ne estas la sola kialo. Italaj kaj francaj informantoj montras similan konduton kaj estas malmultaj diferencoj inter du grupoj. En *Historio pri kato*, rusaj informantoj uzas pli da adjektivoj ol la aliaj du grupoj kune kaj malpli da adjektivoj en personaj rakontoj, sed la diferenco estas malpli granda en personaj rakontoj (vidu la tabelon 1):

Tabelo 1. Adjektivoj en Esperanto (nombroj kaj averaĝoj)

| | <i>Historio pri kato</i> | Averaĝo po rakonto | Personaj rakontoj | Averaĝo po rakonto |
|-----------|--------------------------|-----------------------|----------------------|-----------------------|
| Itala L1 | 21 | 2,6 | 107 | 13,4 |
| Franca L1 | 28 | 3,5 | 109 | 13,6 |
| Rusa L1 | 58 | 7,25 | 86 | 10,75 |

La Chii-kvadrata testo estas tre decida: $\chi^2 = 23,484$, grado de libereco = 2, $p = 0,000$
 Nombro de partoprenantoj po grupo: 8

La diverseco de uzataj adjektivoj ankaŭ varias: en *Historio pri kato*, la italaj partoprenantoj uzas 17 malsimilajn adjektivojn, la francaj 15 kaj la rusaj partoprenantoj uzas 35 malsimilajn adjektivojn en la rakontoj. La plej ofte uzataj adjektivoj estas *malgranda*, *bela* kaj *bona*. La ekzemploj 24-26 ilustras uzon de adjektivoj:

- (24) delonge mi ne manĝis bongustajn freŝajn birdetojn
- (25) kiam ĉarma birdo forflugis / unu kato sufiĉe ruza kaj nesingarda alproksimiĝis la arbon
- (26) kaj laŭ rea vojo / mi petveturis / tio ĉiam estas sufiĉe amuza kaj sufiĉe interesa kaj timema afero

Uzataj en substantivoj, diminutivaj, malestimaj kaj aŭgmentativaj sufiksoj povas anstataŭigi adjektivojn. Ne oftas konsideri adjektivojn kaj sufiksojn kune. La rolo de tiuj-ĉi sufiksoj similas al rolo de epitetaj adjektivoj, ekzemple: *malgranda kato* aŭ *kateto* havas la saman signifon kaj la elekto inter du ebloj dependas de la parolanto.

La rusaj informantoj uzas sufiksojn pli ofte ol la italaj kaj la francaj informantoj en *Historio pri kato*: la sufikso uzata de tri grupoj estas la diminutiva sufikso *-et-* (14 okazoj entute), sekvata de la aŭgmentativa sufikso *-eg-* uzita de rusaj kaj italaj informantoj (entute 3 okazoj) kaj la malestima sufikso *-aĉ-* uzita unufoje de rusa informanto.

La rusaj kaj francaj partoprenantoj uzas ankaŭ duoblan diminutivon, ekzemple: *malgranda kateto*, *malgrandaj birdetoj*, *etaj birdetoj*, *malgrandaj infanetoj*.

Rigardante la uzon de diminutivaj, malestimaj kaj aŭgmentativaj sufiksoj en *Historio pri kato* en rusa L1, mi trovis 94 okazojn de tiuj-ĉi sufiksoj kaj 60 adjektivojn

en korpuso de 10 rakontoj – tio signifas, ke la uzo de sufiksoj estas strategio favorata de la rusaj informantoj en la rusa lingvo, strategio kiun ili uzas ankaŭ en Esperanto, ĉar similaj sufiksoj disponeblas en Esperanto.

Por *Historio pri kato*, ĉiu partoprenanto estis invitita rakonti rakonton kvazaŭ li / ŝi parolus al juna infano. Kelkaj partoprenantoj imagis la situacion, ludis la ludon kaj produktis tre kompleksajn kaj ellaboritajn rakontojn kelkfoje eĉ kun teatra intonacio kaj rolludo. Kiel hipotezo, mi konsideras, ke la rusaj informantoj provas rilatigi siajn rakontojn al tradiciaj fabeloj kun ĉiuj stilaj trajtoj, kiujn la rusaj tradiciaj fabeloj trudas kiel literatura ĝenro kaj ĉar Esperanto proponas similajn esprimilojn. Certe, tradiciaj fabeloj ekzistas ankaŭ en la itala kaj en la franca, sed ilia influo ŝajnas ne funkcii same, kiel en la kazo de rusaj partoprenantoj kaj, kiel mi jam menciis, temas nur pri klariga hipotezo.

8. Intensigiloj

Intensigiloj, kiuj aldonas nuancon, plifortigas aŭ malfortigas la intenson de la signifo de adjektivoj, estas uzataj en *Historio pri kato* kaj en personaj rakontoj en Esperanto, sed ili estas pli ofte uzataj en personaj rakontoj (vidu la tabelon 2). La italaj informantoj uzas 15 malsamajn intensigilojn, la francaj informantoj uzas 14 malsamajn intensigilojn, kaj la rusaj informantoj uzas 12 malsamajn intensigilojn entute. Inter la plej ofte uzataj estas *tre* (kun la varianto *tre-tre*) kun 26 okazoj entute kaj *sufiĉe* (14 okazoj entute) por ĉiuj grupoj de informantoj, kaj *tute* por la italaj kaj la francaj informantoj kun entute 9 okazoj:

- (27) mi estis **tiel** laca / **absolute** morte laca
- (28) kaj ĉio ŝajnis al mi **tute** klara
- (29) ĝi estis **preskaŭ** plata
- (30) kaj estis **tre** amuza / **tre** interesa ankaŭ
- (31) do tio estis **iomete** ambigua afero
- (32) tio ĉiam estas **sufiĉe** amuza kaj **sufiĉe** interesa
- (33) li estas **iom tro** forta por mi
- (34) la hundo vidas **tiom** kruelan konduton de la kato

Tabelo 2. Intensigiloj en Esperanto (nombroj kaj averaĝoj)

| | <i>Historio pri kato</i> | Averaĝo po rakonto | Personaj rakontoj | Averaĝo po rakonto |
|-----------|--------------------------|-----------------------|----------------------|-----------------------|
| Itala L1 | 1 | 0,13 | 28 | 3,5 |
| Franca L1 | 4 | 0,5 | 31 | 3,9 |
| Rusa L1 | 12 | 1,5 | 24 | 3 |

La Chii-kvadrata testo estas tre decida: $\chi^2 = 11,351$, grado de libereco = 2, $p = 0,01$
 Nombro de partoprenantoj po grupo: 8

La uzo de intensigiloj de la rusaj partoprenantoj diferencas de la aliaj du grupoj: la rusoj uzas intensigilojn pli regule en ambaŭ specoj de rakontoj. La francaj kaj la italaj parolantoj uzas ilin plejparte en personaj rakontoj. Kompare al *Historio pri kato*, en personaj rakontoj ne estas signifaj diferencoj inter tri grupoj rilate al la uzo de intensigiloj.

9. Konkludo

Kompare al aliaj lingvoj, Esperanto ne havas teritoriojn aŭ stabilajn lingvajn komunumojn. Esperanto permesas al siaj parolantoj sekvi la «logikon» de la gepatra lingvo (L1) kaj ofertas tre diversajn esprimilojn. Tiel Esperanto ebligas reprodukti strategiojn uzatajn en aliaj lingvoj. La normoj de la uzo de Esperanto estas pli flekseblaj ol en aliaj lingvoj.

La gepatra lingvo (L1) kaj ĝia maniero agordi la haveblajn esprimilojn influas la elekton de esprimiloj en Esperanto. La rezultoj montras, ke la partoprenantoj, kies la L1 estas respektive la franca, la itala aŭ la rusa, fokusiĝas sur malsamaj strategioj en rakontoj. La plej frapaj diferencoj implikas, interalie, riĉecon de la verba morfologio, provojn esprimi la verban aspekton (ne nur pere de kunmetitaj tensoj, sed ankaŭ pere de verbaj prefiksoj laŭ la modelo de slavaj lingvoj), adverbojn, adjektivojn kaj intensigilojn kaj iliajn nombrojn en la rakontoj. En Esperanto, la influo de la L1 videblas ankaŭ, dank'al zorgemaj analizoj, en la ĝenerala organizado de rakontoj kaj en la retoriko specifa al la L1.

Diversaj lingvouzoj renkontiĝas dum la komunikado kaj Esperanto-parolantoj spertas tion pli aŭ malpli konscie kaj akceptas tion. La diverseco de uzoj de Esperanto kaj la toleremo de Esperanto-parolantoj por la diverseco de uzoj karakterizas modernan Esperanton. La diversecon de uzoj akompanas la alĝustigo de Esperanto-parolantoj rilate al sia propra esprimmaniero kaj kompreno de aliaj.


Bibliografio

- Dankova, Natalia 2020: Adjectives in Spoken Esperanto. En: *Language, Individual & Society* 2020/14: 9–16. <https://www.scientific-publications.net/en/article/1002115/>
- 2018: Adjectifs dans des textes narratifs en français québécois et en français de France, 'Adjektivoj en rakontaj tekstoj en la franca de Kebekio kaj en la franca de Francio'. Paper presented at *Les français d'ici Conference*, Concordia University, Montreal. 23–25 May 2018.
- 2017: Storytelling in French from France and French from Quebec. En: *Corela* 2017/15/2. <https://journals.openedition.org/corela/5051>
- 2015: Future participles in Esperanto. En: *Esperantologio – Esperanto Studies* 2015(7): 61–72. <http://www.cb.uu.se/esperanto/ees7.pdf>

- 2009: Temporality in Spoken Esperanto. En: *Esperantologio/Esperanto Studies* 2009(4): 46–60. <http://www.cb.uu.se/esperanto/ees4.pdf>
- 1997: Transfert. Marquage temporo-aspectuel et adverbes de temps ‘Temp-aspekta markado kaj tempaj adverboj’. En: Diaz L. & Perez C. (red.): *Views on the Acquisition and Use of a Second Language*. Barcelona: Universitat Pompeu Fabra. 171–176.
- Gayraud, Frédérique 2000: Développement de la différenciation oral/écrit vu à travers le lexique ‘Evoluo de parola/skriba diferencigo vidata en la leksiko’. PhD Thesis, Lyon: Université Lumière Lyon 2. <http://theses.univ-lyon2.fr/documents/getpart.php?id=lyon2.2000.fgayraud&part=22287>
- Gass, Susan M. & Selinker, Larry 1992: *Language Transfer in Language Learning*. Amsterdam: Benjamins.
- Hickmann, Maya 1982: The Development of Narrative Skills: Pragmatic and Metapragmatic Aspects of Discourse Cohesion. PhD Thesis, Chicago: University of Chicago.
- Klein, Wolfgang 1986: *Second Language Acquisition*. Cambridge: CUP.
- Levelt Willem J. M. 1989: *Speaking. From Intention to Articulation*. London: MIT Press.
- Odlin, Terence 1989: *Language Transfer*. Cambridge: CUP.
- Slobin, Dan Isaac 1991: Learning to think for speaking. Native language, cognition and rhetorical style. En: *Pragmatics* 1991/1/1: 7–26.
- 1996: Two ways to travel: Verbs of motion in English and Spanish. En: Shibatani M. & Thompson S.A. (red.): *Grammatical Constructions: Their Form and Meaning*. Oxford: Clarendon Press. 195–219.
- 2003: Language and thought online: Cognitive consequences of linguistic relativity. En: Gentner D & Goldin-Meadow S (red.): *Language in mind: Advances in the Study of Language and Thought*. Cambridge: MIT Press. 157–192.
- Zamenhof, Ludoviko Lazaro 1929: *Originala verkaro: Antaŭparoloj – Gazetartikoloj – Traktaĵoj – Paroladoj – Leteroj – Poemoj*. Kolektitaj kaj ordigitaj de D-ro Joh. Dietterle. Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn. Reproduced in 1983 by Osaka: Oriental-Libro.

Appendico *Cat Story (Historio pri kato)*

Hickmann, Maya 1982: The Development of Narrative Skills: Pragmatic and Metapragmatic Aspects of Discourse Cohesion. PhD Thesis, University of Chicago.



Fervojaj paspagoj, fervojaj pordegoj, fervojaj mastoj aŭ fervojaj baroj? Komparo de la lingva bildo de fervoja terminologio en la pola, angla, nederlanda kaj Esperanto

Abstract. *Railway turnpikes, railway gates, railway spars or railway barriers? Comparison of the linguistic worldview of railway terminology in Polish, English, Dutch and Esperanto*
Although England is considered the home of railways, it is not entirely the case that English railway terminology is copied into all the languages of the world, i.e. where the trains have arrived. Almost every European country contributed to the development of railways, because rolling stock was produced not only in England, which is also reflected in the language, as the use of crushed stone for back filling the tracks was invented by Poles, steering carriages were developed in German-speaking countries, and motor railcars or popular railbuses today come from Hungary. Although comparative studies of railway terminology in different languages are rarely of interest to linguists, this topic is worth exploring, the more so as discovering the mechanisms shaping the linguistic worldview of railway lexis in individual languages is generally of great cognitive value also for linguistics.

Resumo. Kvankam Anglujo estas konsiderata la hejmo de la fervojo, tute ne temas pri tio, ke la angla fervoja terminaro estas kopiita en ĉiujn lingvojn de la mondo, kien alvenis la trajnoj. Preskaŭ ĉiu eŭropa lando kontribuis al la disvolviĝo de fervojoj, ĉar la materialo rulanta estis produktata ne nur en Anglujo, kio ankaŭ speguliĝas en la lingvo, ĉar la uzo de disrompita ŝtono por plenigi la trakojn estis inventita de poloj, stirantaj vagonoj disvolviĝis en germanlingvaj landoj, kaj motorvagonoj aŭ popularaj relobusoj hodiaŭ venas el Hungario. Kvankam komparaj studoj pri fervojaj terminaroj en diversaj lingvoj malofte interesas lingvistojn, ĉi tiu temo valoras esploron, des pli ke malkovri la mekanismojn formantajn la lingvan bildon de fervoja leksiko en diversaj lingvoj ĝenerale havas grandan kognan valoron ankaŭ por la lingvistiko.

0. Enkonduko

Multaj landoj de la mondo estis atingitaj, estas aŭ estos en la estonteco per fervojo. Kvankam trajnoj sendube estas angla inventaĵo, en multaj lokoj tra la mondo ili estas modifitaj por adapti ilin al klimataj kondiĉoj, por pliigi la nombron da varoj, kiujn ili portas, aŭ por adapti ilin al la bezonoj de vasta nombro da pasaĝeroj uzantaj fervojajn servojn en multaj urboj tra la mondo. Pro la fakto, ke preskaŭ ĉiuj landoj, kie veturas trajnoj, modifas sian rulvaron kaj infrastrukturon por konformi al ĝiaj bezonoj, en multaj landoj de la mondo oni povas renkonti tute malsamajn rulvarajn unuojn. La

diverseco de la rulvaro ankaŭ speguliĝas en la lingvo, kaj tio signifas, ke ekzemple en teknikaj fervojaj tradukoj oni povas renkonti problemojn rilate al la manko de ekzisto de donita speco de vagono en alia lando, kio signifas, ke la tradukisto devas redoni la enhavon de sia traduko en priskriba maniero, aŭ ĉirkaŭrigardi en la specoj de vagonoj de difinita lando por elekti tiun kun proksimuma funkcio. Ekzemplo de tio povas esti la koncepto de pola karboplatforma vagono, kiu ne ekzistas en aliaj lingvoj, kaj kiam oni tradukas ĝin en la anglan, oni devas uzi sufiĉe longan priskriban esprimon *‘mixed flat and open high-sided wagon’*, laŭvorte: miksita plata kaj malferma altflanka vagono.

Oni povas renkonti similajn problemojn en tradukado de lokaj specoj de rulvaro kaj fervoja infrastrukturo, kiel la usona *double stack container train* – duoble stakigebla aŭ dunivela kontenertrajno aŭ la pola invento SUW 2000 uzata por aŭtomate ŝanĝi la traklarĝon por rearanĝi la vagonojn de la larĝa trako al normala kaj inverse, kiu ankaŭ estas konata en la angla kulturo kiel SUW 2000, sed postulas sufiĉe ampleksan priskribon en la angla. Indas rigardi la lingvan bildon de fervoja terminologio en la pola, angla, nederlanda kaj Esperanto por kapti kaj kompari la diversajn lingvajn procezojn formantajn fervojan terminaron en ĉi tiuj lingvoj. Esperanto estas lingvo artefarite konstruita de Ludoviko Zamenhof en la deknaŭa jarcento, kiu pruntas fervojan terminologion de multaj lingvoj, kio faras la komparon de sia bildigo kun aliaj lingvoj des pli bunta kaj indas detalan lingvan analizon. La fervoja terminologio ekzameniĝos laŭ la jena ordo: lokomotivoj, pasaĝeraj kaj ŝarĝaj vagonoj, teknikaj veturiloj kaj fervoja infrastrukturo.

1. Kelkaj ĝeneralaj rimarkoj pri fervoja terminaro kaj ĝia lingva bildo en eŭropaj lingvoj kaj Esperanto

La fervojo estas eŭropa invento, kiu ne nur kontribuis al la transporta revolucio, sed ankaŭ markis diversajn lingvojn kaj kulturojn en la mondo. Ĉar la disvolviĝo de fervoja transporto en Eŭropo koincidis kun la kreskanta populareco de Esperanto fine de la 19a jarcento, ne mirigas, ke multaj el la tiamaj fervojistoj aliĝis al la Esperanto-movado, kaj Esperanto ankaŭ fariĝis maniero por esprimi sciencajn kaj fakajn pensojn pri fervoja teknologio. Baldaŭ aperis Esperanto-klubo, kiuj kunvenigis kaj laboristojn kaj entuziasmulojn de fervoja transporto, kaj ili komencis eldoni diversajn publikaĵojn kaj periodaĵojn pri fervojoj. Ĉi tiujn tradiciojn kultivas esperantaj fervojistoj ĝis hodiaŭ, kiuj formas organizojn kiel la *Internacia Fervojista Esperanta Federacio* (IFEF). Ili respondecas pri fakaj kunvenoj kaj redaktas fervojajn revuojn en Esperanto, kiel ekzemple *Itala Fervojisto* aŭ *Hungara Fervojista Mondo*. Tiaj kunvenoj kaj agadoj estas bonegaj ŝancoj por diskuti pri la formo de fervoja terminologio en difinita tempo kaj por antaŭenigi ĝin en institucioj profesie rilataj al la fervojo. Dank’ al ĉi tiuj agadoj, en multaj Esperantaj vortaroj estas enmetitaj fakaj fervojaj terminoj, kiuj ne

ĉiam estis popularaj, eble pro la supoze tro malproksima distanco de fervojaj aferoj en la vivo de ordinara homo, des pli ke nur malmultaj kutime interesiĝas pri fervojoj. Ĉi tiu studo klare montras, ke la apartaj fervojaj terminoj en Esperanto estas pruntitaj de diversaj lingvoj, kio igas ilian lingvan bildon des pli interesa, ĉar oni ĉerpas el la spertoj kaj kulturoj de diversaj eŭropaj nacioj (Kozicki 2018). Oni povas vidi ĉi tie ne nur diversajn lingvajn kalkeojn, sed ankaŭ provojn por transplanti metaforigitajn konceptojn de diversaj eŭropaj lingvoj al Esperanto. La sekvo de tio estas diversaj lingvaj bildoj por unuopaj konceptoj, kio meritas taŭgan lingvan analizon ne nur ene de Esperanto mem, sed ankaŭ komparante la ekzistantajn fervojajn terminojn kun la profesiaj terminaroj troveblaj en eŭropaj lingvoj, ĉar la komparo de la fervoja leksiko bedaŭrinde estas la tute neglektita kaj vere tro malmulte esplorita temo ne nur en la kampo de pola, sed ankaŭ eŭropa lingvoscienco.

En la studo la terminoj estas ĉerpitaj el la pola *Leksykon Terminów Kolejowych* [Leksikono de Fervojoj Terminoj] kaj la *Mały Słownik Żargonu Kolejowego* [Malgranda Vortaro de la Fervoja Ĵargono], se temas pri la pola fervoja sociolekto, la nederlanda *Spoorweg-woordenboek Nederlands-Engels* [Nederlanda-Angla Fervoja Vortaro] kaj la reta eldono de *Railway Lexicon* prilaborita ĉe la Universitato de Birmingham. Se temas pri la esperantaj fervojaj fakvortoj, estis uzita la *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2020* kaj kelkaj polaj-esperantaj kaj anglaj-esperantaj retaj vortaroj kiel *Glosbe*. La aŭtoro uzis ankaŭ la retajn eldonojn de la *Itala Fervojisto* kaj *Hungara Fervojista Mondo* kaj elektitajn materialojn trovitajn sur la retpaĝo de IFEF kiel referencojn.

2. La koncepto de lokomotivo en Esperanto kaj en la elektitaj eŭropaj lingvoj

La vorto „lokomotivo” estas internaciismo, kiu devenas de la latina, kaj ĝi aperas en diversaj variantoj en eŭropaj lingvoj (same kiel laŭplanaj surbaze de la latinida leksiko). En la pola ĝi estas *lokomotywa*, dum en la angla ĝi aperas kiel *locomotive* (aŭ mallonge *loco*). Ĝi similas en la nederlanda *locomotief*, kie ankaŭ eblas mallongigi la vorton al *loc*. Estas la termino *lokomotivo* en Esperanto, sed ĝi ne plu povas esti mallongigita al *loko*, ĉar la signifo de la vorto ŝanĝiĝas. La lokomotivo povas esti karbobrula, t.e. vapora, dizela, elektra aŭ dizel-elektra. En ĉiu lingvo, ni nomas ilin *lokomotywa parowa*, *steam locomotive*, *stoomlocomotief* kaj *vaporlokomotivo*, kaj ili estas lingvaj kalkeoj. La esprimoj *diesel locomotive*, *dieselloc* kaj *dizela lokomotivo* aperas kun la adjektivo dizela, do lokomotivo kun Diesela motoro, t.e. de la nomo de ĝia inventinto. En la pola oni uzas la terminon *lokomotywa spalinowa*, laŭvorte: haladza lokomotivo. La lokomotivo ankaŭ povas esti universala, ŝarĝa aŭ pasaĝera. Se temas pri universala lokomotivo, adaptita al pasaĝera same kiel vartrafiko, en la angla kaj la nederlanda ekzistas terminoj kun relative simila signifo, t.e. *mixed traffic*

locomotive kaj *locomotief* (*bedoeld*) *voor gemengd verkeer*, dum en Esperanto oni uzas la esprimon *universala* aŭ *mikstrafika lokomotivo* kaj en la pola *lokomotywa uniwersalna* (universala lokomotivo). Se temas pri frajta lokomotivo, oni havas la esprimon *lokomotywa towarowa* en la pola, *freight locomotive* en la angla, *goederentrein locomotief* (por trakti vartrajnojn) en la nederlanda, kaj *vartrajna lokomotivo* en Esperanto, aŭ eĉ la angladevena neologismo *frajta lokomotivo*. Pri la koncepto de pasaĝera lokomotivo, en la pola ĝi estas *lokomotywa pasażerska*, la angla esprimas ĝin kiel *express train locomotive*, la nederlanda per *sneltreinlocomotief*, kaj Esperanton kiel *pasaĝera lokomotivo*.

La lokomotivo povas tiri vagonojn aŭ malfiksi, kio ankaŭ esprimiĝas alimaniere en la analizitaj lingvoj ĉi tie. Trajnoj tiritaj per lokomotivoj estas nomataj *składy ciągnięte przez lokomotywę* en la pola, *loco hauled trains* en la angla, kaj en la nederlanda ili estas nomataj per la sama leksika strukturo – t.e. *getrokken treinen*. Oni nomas la malpeze veturantan lokomotivon pole *lokomotywa jadąca luzem* aŭ simple *luzak* (el la pola fervoja sociolekto), *light engine* aŭ *locomotive running loose* la angla, *losse* aŭ *losrijdende locomotief* (malplena) en la nederlanda aŭ *malplene veturanta lokomotivo* en Esperanto. En iuj stacioj, la lokomotivo devas ŝanĝi sian antaŭon aŭ direkton, kio igas ĝin fari rondiron ĉirkaŭ la vagonoj, aŭ ordinarlingve „ĉirkaŭflugas” la trajnon. La specifa „ĉirkaŭflugado” de la trajno estas esprimita en la pola kiel „*oblatywanie składu*” (ofte uzata en fervojistaj konversacioj), en la angla kiel *running around the train*, kaj en la nederlanda kiel *materieel omloop* (kurado ĉirkaŭ la trajnaro), dum Esperanto havas la esprimon *kurado ĉirkaŭ la trajno* aŭ "*ĉirkaŭflugado*" *de la trajno*. Multaj kapstacidomoj en la mondo estas ekipitaj per tiel angle nomata *headshunt*, t.e. mallonga sekcio de trako permesanta al la lokomotivo malligi sin de la trajno kaj eliri el la stacio sur paralela trako. Ĉar hodiaŭ ne ekzistas aktivaj kapstacidomoj en Pollando, la esprimo estas malfacile tradukebla en la polan, kvankam ĝi povas esti derivita de la usona termino *escape track* – evakuovojo, aŭ eble fuĝovojo.

En la ĉi tie analizitaj lingvoj, la koncepto de lokomotivo puŝanta vartrajnon ankaŭ povas esti interesa. La poloj esprimas tiun terminon kiel *lokomotywa pchająca* aŭ *popych*, la angloj nomas ĝin *pushing engine*, aŭ pli simple *pusher*, dum la nederlandanoj uzas la esprimon *opdruk loc*, t.e. de la verbo *opdrukken* (puŝi, premi), t.e. lokomotiva puŝado aŭ kvazaŭ farante premon sur la trajno, kiun ĝi puŝas, aŭ frazoj *rijden met opdruk* (veturi kun premo). En Esperanto oni uzas la esprimon *puŝilo* (laŭvorte io, kio puŝas) aŭ *puŝanta lokomotivo*.

3. Pasaĝeraj kaj ŝarĝvagonoj. La komparo de terminoj en Esperanto kaj la analizitaj lingvoj

Koncerne fervojajn vagonojn, ili estas ĉefe uzataj por transporto de homoj aŭ varoj. Dum en la pola, angla, nederlanda aŭ Esperanto ni uzas la vortojn *wagon*,

car/wagon, wagen/wagon aŭ *vagono* por priskribi ambaŭ specojn de vagonoj, en la nederlanda ekzistas apartaj vortoj uzataj por difini la koncernaj vagonoj. La nederlandanoj uzas la vorton *rijtuig* por pasaĝera vagono, kvankam la vorto *wagen* ankaŭ estas uzata en kolokacioj, ekz. *slaaprijtuig* aŭ *slaapwagen* (litvagono) aŭ *bagagerijtuig* aŭ *bagagewagen* (bagaĝvagono), sed la vorto *rijtuig* principe ankaŭ povas esti uzata ankaŭ identigi ŝarĝvagonon (*goederen rijtuig*). Iuj vagonoj povas esti kombinitaj kaj havas sian propran veturadon, kio profesie nomiĝas elektra (aŭ dizela) multobla unuo (EMU). En la pola lingvo oni uzas la terminon *elektryczny zespół trakcyjny (EZT)*, laŭvorte: elektra trakcia komponaĵo, la angla lingvo uzas la esprimon *electric multiple unit (EMU)*, do plurunua tirada unuo, dum la nederlanda uzas la esprimon *elektrisch treinstel met x bakken* (elektra komponaĵo [konsistanta el] x unuoj). La koncepto de elektra trakcia unuo estas esprimita en Esperanto kiel *elektra multobla unuo*.

La maniero por esprimi la koncepton de rapidtrajno en la ĉi tie analizitaj lingvoj ankaŭ povas esti interesa. En la pola estas mallongigo KDP – *kolej dużych prędkości* (rapidega fervojo) kaj en la angla – HST (*high speed train*), laŭvorte: rapidega trajno. La nederlandanoj uzas la saman mallongigon kiel la angla (HST), sed ĉi-kaze la pligrandigo de ĉi tiu mallongigo estas nur unu vorto, t.e. *hogesnelheidstrein* (grandrapida trajno). La esperanta lingvo uzas la esprimon *grandrapida* aŭ *rapidega trajno*, do rapidtrajno aŭ tre rapida trajno. Rapidaj trajnoj kutime havas la t.n. kliniĝantan korpon. Pole ĝi nomiĝas *pociąg z wychylnym nadwoziem*. En la angla, kliniĝanta trajno nomiĝas *tilting train*, do de la verbo *to tilt* – elkliniĝi. En la nederlanda, ekzistas la koncepto de *kantelbaktrein*, kiu estas laŭvorte kombinita trajno, kies partoj (*bakken*) kliniĝas flanken, do de la verbo *kantelen* – turniĝi al la flanko (*kant*). En Esperanto oni uzas la esprimon „kliniĝanta trajno”. En la kazo de trajnodifekto, pasaĝeroj povas esti transportataj per alternativa busservo. En la pola la termino sonas *zastępcza komunikacja autobusowa*, la angloj nomas ĝin *rail replacement bus service* aŭ simple *bustitution* (de *bus substitution*), t.e. la servo anstataŭigi la trajnon per buso, la nederlandanoj uzas la esprimon *de inzet van bussen*, do la uzon de la buso anstataŭ la trajno, t.e. de la verbo *inzetten* – uzi. Esperanto uzas la terminon *fervoja anstataŭa busservo*.

Se temas pri ŝarĝvagonoj, ĉiuj lingvoj nomas ilin iomete malsame, kio ankaŭ meritas lingvan analizon. Dum ekzistas multaj specoj de ŝarĝvagonoj, ni limigos nin al la bazaj ĉi tie. Preskaŭ la plej ofta frajta vagono en la mondo estas karbovagono, kiu povas transporti ne nur karbon, sed ankaŭ agregaĵon, lignon kaj eĉ rubmetalon. En la pola ĝi estas nomata *węglarka* (karbujo) kaj en la angla la termino *open wagon* aŭ *open truck* estas uzata. En la nederlanda oni uzas la esprimon *open goederenrijtuig* kaj en Esperanto – *karbowagono* aŭ eĉ *duonvagono*, t.e. sentegmenta vagono. Krom malfermitaj vagonoj, ekzistas kovritaj vagonoj por transporto de varoj sentemaj al vetercirkonstancoj. La poloj uzas la esprimon *wagon kryty* (kovrita vagono), la angloj – *covered goods wagon*, la nederlandanoj uzas *bedekt* aŭ *gedekt goederenwagen*, kaj

Esperanto-parolantoj – *kovrita varvagono*. En ĉiuj menciitaj kazoj ĉi tie, la koncepto de kovrita vagono esprimiĝas per similaj vortfaradaj rimedoj.

Sur la fervojoj ankaŭ specialaj konstruaj karbovagonoj estas uzataj, ekzemple por transporti disrompitan ŝtonon, koakson aŭ kalkŝtonon, kio ankaŭ speguliĝas en lingvoj. Temas ĉefe pri mem-malŝarĝaj vagonoj, kiujn oni nomas *wagony samowyladowcze* en la pola, *self-discharging cars* en la angla, *zelflossers* en la nederlanda kaj *ŝutvagonoj* en Esperanto. Ekzistas diversaj specoj de mem-malŝarĝaj vagonoj, kiuj kutimas malŝarĝi disrompitan ŝtonon rekte sur la trakojn, t.e. ŝutvagonoj. En la pola, la koncepto de ŝutvagono estas esprimita kiel *szutrówka*, kaj tio devenas de la germana esprimo *Schotterwagen*. En la angla, la koncepto de ŝutvagono estas tradukita kiel *ballast hopper* (t.e. ujo por transporto de balasto), en la nederlanda kiel la tielnomita *onderlosser* (t.e. vagono, kiu malŝarĝas disrompitan ŝtonon rekte sub la reloj, kvazaŭ sub ĝi), kaj en Esperanto kiel *balastvagono* (vagono por transporti disrompitan ŝtonon). Kvankam la koncepto de karboplatforma vagono estas tipe pola kaj malfacilas traduki ĝin en alian lingvon, aliaj landoj uzas similajn vagonojn, la t.n. gondoloj (ĉefe en Usono). La nederlanda lingvo ankaŭ uzas la esprimon *gondelwagon* aŭ ĝian priskriban ekvivalentan *open wagen met lage zijwanden* – t.e. malferman konstruĉaron kun malaltaj flankoj.

Interesa lingve estas la strukturo mem de la „lokomotivo kun la stoko de ŝarĝvagonoj”, kiu esprimiĝas diversmaniere en la ĉi tie analizitaj lingvoj. En la pola ĝi estas *lokomotywa ze składem wagonów* (lokomotivo kun la stoko de vagonoj) dum en la angla ĝi estas *loco with a rake of freight wagons*, kie la vorto *rake* devas esti komprenata kiel aro aŭ komponaĵo. Nederlande oni uzas la konstruon *een loc met een stel goederenwagens*, kie la vorto *stel* devas esti komprenata simile, kaj en Esperanto la esprimoj estas *lokomotivo kun la stoko de varvagonoj*, kiu similas al la angla kaj la nederlanda.

4. Teknikaj veturiloj kaj diversaj problemoj

Se temas pri teknikaj veturiloj, specialaj trajnoj estas uzataj sur la fervojoj, ekz. por inspektado kaj prizorgado de fervojaj trakoj, t.e. diversaj specoj de troleoj, enpremitoj, ŝtonaj skrapiloj, trakaj mueliloj, ĉenlineaj riparveturiloj aŭ iaj troleoj aŭ aliaj mezurveturiloj. Ĝenerale, en la lingvoj studitaj ĉi tie, estas signifa diferenco inter drezino kiel inspekta veturilo kaj mana troleo, escepte de la pola, kie la koncepto de drezino kovras ambaŭ specojn de ĉi tiuj veturiloj. Tia estas la diferenco inter la angla koncepto pri prizorgada veturilo kiel *maintenance vehicle* kaj *draisine*, kiu signifas manan troleon. La samo validas pri la nederlanda esprimo *inspectie voertuig* kaj *lorrie* kaj pri la esperanta termino *prizorgada veturilo* kaj *drezino*.

La frapmaŝino estas la veturilo uzata por ebenigi la kurson kaj surfacon de la fervoja trako por pliigi ĝian forton. En la pola ĝi nomiĝas *podbijarka*, laŭvorte: frapilo. En la

